

Kugel la Ruza Jack Vance



La Mortanta Tero, Vol. 2

Enhavoj

Kovrilo

Titola Paĝo

Antaŭparolo

Kugel la Ruza

La Supermondo

Cil

La Montoj de Magnatz

La Sorĉisto Fejresm

La Pilgrimoj

La Kaverno en la Arbaro

La Domego de Iŭkoŭnu

Vortaro

Du Plusaj Rakontoj

La Dek Sep Virgulinoj

La Sakpleno da Songoj

Vortaro

Atribuoj

Senpage Haveblaj

Permesilo

Antaŭparolo

Vortaro: Vidante vorton ‘*ĉi-aspektan*’ (sen citiloj), ŝvebu super ĝi per fingropinto aŭ muso kaj ekvidu, ke ĝi ŝanĝiĝos por aspekti ‘*tiel ĉi*’. Per tio vi scios ke tiu vorto havas difinon en la provizita vortaro. Klaku ĝin por ekvidi ties difinon. Post legi la difinon, atentu pri la komenco-vorto de la difino, kiu aspektos kiel ‘*difin/o*’. Klaku tion por salti reire al la rakonto.

Trovante refrencon tian, kia *~EB 360/15*; *~BeE 194/15* ĉe fino de nominativa difino, rekonu tion por indiki bildon en aparta bildovortaro: la *Esperanta Bildvortaro* (ISBN 0-91918603207) de 1988; aŭ la *Bildvortaro en Esperanto* (ISBN 978 90 77066 48 5) de 2012. Divido-streko apartigas jene: sekcio/bildo(j).

Bonvolu Plendi: Tiun ĉi tradukitan romanon vi ĝuas rezulte pro la kunlaborado de pluraj homoj kiuj petas nenian repagon krom ke vi ĝuu. Iliajn nomojn vi trovos en posta sekcieto titolita ‘Atribuoj’. Via nomo rajtas aperi en tiu listo. Plendu epoŝte se vi trovas eĉ la plej malgrandan eraron. Plendu, ni petas, pri io ajn kio malplaĉas. Ni dankos vin pro tiaj plendoj. Ni tuj enketos, kaj se ni trovas vin prava, ni estus surlistigontaj vin inter niaj kontrolistoj. Tial, do, antaŭdankon.

Dosieroj: Se sur via aparato la vortaraj ligiloj ne aspektas kiel supere, tio rezultas de afero kie la niaj CSS-aj reguloj super-regiĝus fare de interna sistemo de via propra aparato: **Nook**, **Kobo**, **Kindle**, ktp. Do, substrekoj povas aperi *malgraŭ* niaj specifaj elektoj. Kulpigu la propran aparaton tiukaze.

Ni provis elekti mezan stilon post demandi ĉe Fejsbuko kaj alie pri diversaj personaj preferoj. Ni ja volas provizi elekton al ĉiu leganto. Bedaŭrinde, tio nuntempe ne eblas. Solvo devas atendi ĝis la plimulto el bitlibraj aparatoj subtenos la formaton **EPub 3**, kio permesos funkcion pri elekto inter stiloj pere de **JavaScript**. Sed **EPub 2**, per kio la plimulto el aparatoj ankoraŭ funkcias, ne ebligas tiajn elektojn.

Ni elektis difini nur la niaopinie maloftajn vortojn. Bonega helpo por esperantaj progresantoj, nur iomete helpo por komencantoj. Se via opinie, plua vorto bezonas difinon, kontaktu nin, kaj ni aldonos.

Post finlegi la unuan rakonton, por salti trans la vortaro al la komenco de la dua rakonto, alklaku la vortaran bildosimbolon. Kaj fine sciu, ke ajna leganto rajtas peti aldonon de plua difino en la vortaro. Kontaktu la eldonejon epoŝte or sugesti pri tio.

Idiomoj: Ĉar ĉi tiuj rakontoj temas pri la ege fora futuro, tempopaso dum kiam preskaŭ ĉio estos ŝanĝita, la aŭtoro elektis prezenti al sia denaske anglalingva legantaro fremde novajn nomojn por fikciaj futuraj estaĵoj: bestoj, monstroj, ktp. Aparta ŝoko por oni leganta en nove akirita lingvo. Ties unua inklino estus serĉi (tute vane) en vortaro.

Helpe je tio, ni foje indikas tian fremdecon per fremde akcentita vokalo, jene: *ásmo*, *dédando*, *érbo* ktp. Prononcu laŭvole. Kiam signifo gravas, prenu tion el la cirkonstanco. Sed ne zorgu strebe. Foje tiaj vortoj ekzistas nur por aldoni plusan fremdecon. En tiaj kazoj manko de precizeco apenaŭ gravas. Estas same por denaskaj anglalingvanoj.

Fakte sciu, ke aparta leksikono haveblas en la angla lingvo pri la multaj tiaj nomoj inventitaj de la aŭtoro: *The Jack Vance Lexicon: from Ahulph to Zipangote* kompilita de Dan TEMIANKA,

ISBN 0887331181. Ĝi enhavas 136 paĝojn da difinoj, kaj temas pri ĉiuj 70 libroj de la aŭtoro dum lia 50-jara aŭtora kariero.

Propraj Nomoj: Plejparte ni lasis, ke propraj nomoj restu kiel eble plej proksimaj al la originalo. Tamen, por eviti falsajn sufiksojn ‘-an’ ktp, ni opiniis tion dece, ke ni faru necesajn ŝanĝetojn.

Referencoj: La referenca originalo kiun ni tradukis devenas el volumoj 15a kaj 35a el la 44-voluma eldono *Vance Integral Edition* (ISBN 0-9712375-1-4), kun la anglaj titoloj *Cugel the Clever* kaj *Cugel, the Skybreak Spatterlight*.

La Mortanta Tero: Jen unu memstara romano kaj du noveloj pri Kugel la Ruza, unu el la plej ŝatataj protagonistoj de aŭtoro Jack Vance, kies verkaro plenigas 44 koncizajn volumojn en la angla lingvo. Ĉi tiu romano, kvankam tute memstara, apartenas al romanara serio nomata ‘La Mortanta Tero’ kune kun la romana novelaro ‘Mazirien la Magiisto’ ankaŭ havebla en Esperanto.

Ĉi tiaj rakontoj temas pri fora estonteco tiom ege malproksima ke ĉiuj homoj loĝantaj sur tero timas, ke la suno tre baldaŭ estingiĝos. En la ĉielo ĝi briletas ruĝege kaj tiom malforte ke homoj povas rigardi ĝin nudokule por vidi makulojn sur ĝia surfaco.

Sociaj Etosoj: Proksimiĝante al la porĉiama mallumiĝo, ĉiuj el la homaj socioj jam kelkfoje unuiĝis kaj tuj poste repartiĝis. Ĉiu aparta eta homaro kredas sin mem por esti la sola kies kutimoj ĝustas kaj kies religio veras. Sekve, ne plu estas grandaj nacioj. Restas nun nur kelkaj urboj, plejparte ruinaj, ĉiu for de ĉiuj aliaj. Inter tiuj situas ege sovaĝaj arbaroj, dezertoj, maroj kaj montaroj kie diversaj magie kreitaj homvoraj estuloj vagas kaj flugas libere.

Fripona Heroo: Trans tiu sovaĝa globo vagadas sole Kugel la Ruza, sendita kontraŭ sia propra volo fare de potenca magiisto al misio nefarebla. Tra pluraj malamikaj socioj kaj eĉ pli danĝeraj sovaĝejoj li devas paŝadi por reveni al sia hejmo. Tion li faras preskaŭ tute sendefende, havante nur glavon kaj neniom da propra magio. Armita nur per sia ruzo, li strebas venki ĉiujn obstaklojn. Kaj ofte li strebas iom tro forte, por venki ankaŭ sin mem.

Kugel la Ruza

aŭtorita de majstro

Jack Vance

tradukita de

Ĝan Ŭesli Starling

&

Orlando Hernández

ilustrita de

Paul Rhoads

re-eldonita je

2015-08-23

Ĉapitro 1

La Supermondo

Sur la altejo super la rivero Zan, ĉe la loko de certaj antikvaj ruinoj, Iŭkoŭnu la Ridanta Magiisto orndonis ke estu konstruita domo laŭ sia privata gusto: malkutima konstruaĵo el krutaj **gabloj**, **balkonoj**, ĉiel-pontoj, **kupoloj**, kune kun tri **spiral**-konusaj verdaj vitraj turoj tra kiuj la ruĝa sunlumo brilis laŭ torditaj brileroj kaj kuriozaj koloroj.

Malantaŭ la domo kaj trans la valo, malaltaj montetoj ondis foren kiel dezertaj sabloondoj ĝis la limo de vido. La suno elĵetis moviĝantajn krescentojn el nigra ombro; krom tio la montetoj estis sen distingo, malplenaj, solaj. La Zan, leviĝanta en la Malnova Arbaro oriente de Almerio, preterfluis sube, ĝis tri **leŭgojn** okcidente elfluis en la riveron Skaŭm. Tie ĉi estis Arzenome, urbeto antikva preter memorkapablo, rimarkinda nun nur pri ĝia **foiro**, kio logis homojn el la tuta regiono. Ĉe la Fairo Arzenomea, Kugel establis budon por vendi **talismanojn**.

Kugel estis viro el multaj kapabloj, kun sinteno samtempe fleksebla kaj nedeflankiĝema. Li estis longa je la gamboj, lerta je la manoj, facila je la fingroj, mola je la lango. Lia hararo estis la plej nigra el nigraj feloj, kreskanta malsupre sur la frunto, kurbiĝanta akre malantaŭen super la brovoj. Liaj ekflanke rigardemaj okuloj, longa scivolema nazo kaj **drola** buŝo donis al lia iom osta vizaĝo esprimon pri viveco, veremo, kaj afableco. Li estis spertinta multajn sortoŝanĝojn, gajnante el tiuj **suplecon**, fajnan diskretecon, majstrecon de kaj braveco kaj ŝteliro. Akirinte antikvan plumban **ĉerkon** — post forĵeti la enhavon — li kreis aron da plumbaj **lozenĝoj**. Tiujn ĉi, frape markita per decaj simboloj kaj runoj, li ofertis vende ĉe la Fairo Arzenomea.

Malbonsorte por Kugel, malpli ol dudek paŝoj for de lia budo, certa viro Fianostor jam estis establinta pli grandan budon kun vendaĵoj el plia diverseco kaj pli memevidenta efikeco, tiel, ke kiam ajn Kugel haltigis preterpasanton por atentigi pri sia vendaĵaro, la preterpasanto pli ofte ol ne montrus aferon aĉetitan de Fianostor kaj daŭrigi sian iradon.

Je la tria tago de la foiro Kugel estis forvendinta nur kvar **amuleton**, kontraŭ prezoj apenaŭ super la valoro de la plumbo mem, dum Fianostor spertis malfacilon servi ĉiujn siajn aĉetantojn. Raŭka pro kriadi senefikajn logdirojn, Kugel malfermis sian budon kaj alproksimiĝis la komercan lokon de Fianostor, por ke li inspektu la metodon de konstruo kaj la fermilojn ĉe la pordo.

Fianostor, observante, gestis ke li alvenu. “Envenu, amiko mia, envenu. Kiel progresas via komerco?”

“Por tute verdiri, ne tre bone,” diris Kugel. “Mi kaj perpleksiĝas kaj malesperiĝas, ĉar miaj talismanoj ne estas memevidente senutilaj.”

“Mi povas klarigi vian perpleksecon,” diris Fianostor. “Via budo okupas la lokon de la iama pendumilo, kaj ensorbis malbonŝancajn esencecojn. Sed mi kredis, ke mi observis, ke vi ekzamenas la manierojn laŭ kiuj la lignaĵoj de mia budo estas kunigitaj. Vi ekhavas pli bonan vidkampon de interne, sed unue mi devas malplilongigi la ĉenon de la kaptita érbo kiu vagadas ĉiloke dum la nokto.”

“Ne necese,” diris Kugel. “Mia scivolo estis nur momenta.”

“Rilate pri la malespero kion vi suferas,” Fianostor daŭrigis, “ne necesas, ke ĝi daŭru. Vi observas ke mia vendostoko jam plejparte elvendiĝis.”

Kugel agnoskis, ke estis tiel. “Kiel tio ĉi rilatas al mi?”

Fianostor atentigis fingre pri viro portanta vestojn el nigro. Tiu ĉi viro estis eta, flava je haŭto, kalva kiel ŝtono. Liaj okuloj aspektis simile je nodoj en lignotrabo; lia buŝo estis larĝa kaj kurbiĝis en rideto de kronika amuziĝado. “Jen staras Iŭkoŭnu la Ridanta Magiisto,” diris Fianostor. “Post mallonga tempo li venos en mian budon por provi aĉeti certan ruĝan **librumon**, la kazo-libro de Dibarkaŝ Major, kiu studis sube de Grandulo Fandea. Mia prezo estas pli alta ol li volos pagi, sed li estas pacienca viro, kaj disputos por almenaŭ tri horoj. Dum tiu ĉi tempo lia domego staros sen loĝanto. Ĝi enhavas grandegan kolektaron da magiaj objektoj, instrumentoj, kaj aktivigiloj, kaj ankaŭ kuriozaĵoj, amuletoj kaj librumoj. Mi ankŝias aĉeti tiajn aferojn. Ĉu necesas, ke mi diru plu?”

“Ĉio ĉi ja estas bone,” diris Kugel, “sed ĉu Iŭkoŭnu lasus sian domon sen gardisto aŭ prizorgisto?”

Fianostor etendis larĝe la manojn. “Kial ne? Kiu tiom riskus ŝteli de Iŭkoŭnu la Ridanta Magiisto?”

“Precize tiu ĉi penso malkuraĝigas min,” Kugel respondis. “Mi estas viro lerte provema, sed ne sence riskema.”

“Ekzistas riĉaĵoj por esti akirotaj,” diris Fianostor. “Okulfrapaĵoj kaj montraĵoj, mirindaĵoj netakseble valoraj, kune kun sorĉetiloj, fortikigiloj, kaj **eliksiroj**. Sed rememoru, mi urĝas nenion, mi konsilas nenion; se vi kaptiĝus, vi estus nur aŭdinta min eksklami pri la riĉeco de Iŭkoŭnu la Ridanta Magiisto! Sed nun li venas. Rapide: turniĝu por montri la dorson por ke li ne vidu vian vizaĝon. Tri horojn li restos ĉi tiel, tioman longecon mi garantias.”

Iŭkoŭnu eniris la budon, kaj Kugel kurbiĝis por ekzameni botelon en kiu estis **peklita homonkulo**.

“Bonvenon, Iŭkoŭnu!” elvokis Fianostor. “Kial vi prokrastis? Mi jam rifuzis malavaregajn ofertojn por certa ruĝa librumo, tute favore al via honoro! Kaj jen — atentu pri tiu ĉi ĉerko! Ĝi troviĝis en tombejo apud la loko de malnova Karkodo. Ĝi restas ankoraŭ fermita, kaj kiu povas imagi la mirindaĵon kion ĝi povas enhavi? Mi prezo modestas je dek du mil tĉrsoj.”

“Interese,” murmuris Iŭkoŭnu. “La enskribo — lasu min vidi... Hmm. Jes, ĝi aŭtentikas. La ĉerko enhavas kalcinajn fiŝ-ostojn, kiuj uziĝadis tra la tuto de Granda Motolamo kiel **laksetiga** medikamento. Ĝi valoras eble dek aŭ dek du tĉrcoj por esti kuriozaĵo. Mi posedas ĉerkojn pli antikvajn je epokoj, devenaj ĝis la Epoko de Brilado.”

Kugel promenatis al la pordo, atingis la straton, kie li paŝadis ien kaj tien, konsiderante ĉiun detalon de la propono laŭ la ekspliko de Fianostor. Unuavide la afero ŝajnis sensohave: jen estis Iŭkoŭnu; tie estis la domego, kreve plena de riĉegaj enhavoj. Certe nenio malbona rezultos de simpla pririgardo. Kugel ekiris orienten laŭ la bordoj de la Zan.

La torditaj turoj de verda vitro leviĝis kontraŭ la malhela blua ĉielo, **skarлата** sunlumo renkontanta sin inter la **volutoj**. Kugel paŭzis, zorge aprezis la ĉirkaŭajn kampojn. La Zan preterfluadis sen sono. Proksime, duon-kaŝita inter nigraj **poploj**, pale verdaj **larikoj**, pendemaj päl-

salikoj, estis vilaĝo — dek du da ŝtonaj dometoj enloĝataj de **barĝistoj** kaj **erpistoj** de la riveraj **terasoj**: popoloj fokuse zorgantaj la proprajn aferojn.

Kugel studis la alirejon de la domo: **sinua** vojeto el malhelaj brunaj **kaheloj**. Post longe li decidis, ke ju pli senkaŝa estus sia alveno, des malpli komplikaj necesus esti siaj eksplikoj, se tiujn oni postulos. Li komencis supreniri la montetoflankon, kaj la domo de Iŭkoŭnu staregis super li. Atingante la kortegon, li paŭzis por serĉi la pejzaĝon. Trans la rivero, montetoj ondis for en la malklaran distancon, tiom for kiom okulo povis vidi.

Kugel marŝis hast-maniere al la pordo, frapis, sed instigis nenian respondon. Li konsideris. Se Iŭkoŭnu, kiel faris Fianostor, tenadis gardan beston, eble ĝi tentiĝus al eligo de sono se oni ĝin provokus. Kugel vokis laŭte en variaj tonoj: **graŭlante**, ĝemante, sensenc-parole.

Silento interne.

Li marŝetis timopaŝe al fenestro kaj enrigardadis al halo grize **drapirita**, enhavanta nur tableton sur kiu, sub vitra **kloŝo**, kuŝis mortinta rodento. Kugel ĉirkaŭpaŝis la domegon, esplorante ĉiun fenestron laŭ proksimiĝo, kaj eventuale atingis la grandan halon de la antikva kastelo. Lertmove li grimpis la malglatajn ŝtonojn, saltis transe al unu el la **parapetoj** kaprice dezajnitaj de Iŭkoŭnu kaj facile akiris eniron en la domegon.

Li staris en dormoĉambro. Sur podio, ses **gargojloj** subtenantaj litseĝon turnis la kapojn por rigardi agace pro la truda eniro. Per du ŝteliraj paŝoj Kugel atingis la arkon, kiu malfermiĝis al ekstera ĉambro. Ĉi tiel la muroj estis verdaj kaj la meblaro nigra kaj roza. Li forlasis la ĉambron por balkono ĉirkaŭanta centran ĉambregon, lumo fluanta tra **orieloj** altaj en la muroj. Sube estis vitraj skatoloj, ŝrankoj, bretoj kaj rakoj havantaj ĉiujn klasojn da objektoj: la mirinda kolekto de Iŭkoŭnu.

Kugel staradis poze, nervoza kiel birdo, sed la kvalito de la silento trankviligis lin: la silento de malplena loko. Malgraŭ tio, li estis trude paŝanta la propraĵon de Iŭkoŭnu la Ridanta Magiisto, kaj atentemo estis decega.

Kugel paŝadis malsupren laŭ larĝe kurbanta ŝtuparo en grandegan halon. Li staris sorĉe miranta, pagante al Iŭkoŭnu la honoron de senlima miro. Sed al li la tempo havis limon; li devis ŝteli rapide kaj tuj foriri. Elprenis li sian sakon; li ĉirkaŭiris la halon, detale elektanta tiujn objektojn havantaj malmultan grandecon kaj grandan valoron: eta poto kun kornaroj, kiu eligis nubojn da rimarkindaj gasoj kiam la kornopintoj premiĝis; ebura korno tra kiu soniĝis voĉoj el la pasinteco; miniatura teatro kie kostumitaj diabletoj atendis pretaj por ludi humorajn **kapriolaĵojn**; objekto simila al aro da kristalaj vinberoj, ĉiu montranta malklaran fenestrovidon al unu el la demonaj mondoj; bastono sur kiu burĝone kreskis frandaĵoj el diversaj gustoj; antikva fingroringo kun gravuritaj runoj; nigra ŝtono ĉirkaŭita de naŭ zonoj de netuŝebla koloro. Li preterpasis centojn da potoj de pulvoroj kaj likvaĵoj, simile detenis sin je la ujoj enhavantaj konservitajn kapojn. Nun li venis al bretoj plenigitaj de volumoj, foliaroj kaj librumoj, kie li elektis kun zorgo, preninta laŭ prefero tiujn kun bindaĵoj el purpura **veluro**, la kutima koloro de Fandea. Li sammaniere elektis foliojn de desegnaĵoj kaj antikvajn mapojn, kaj la dislokita ledon eligis **mucidan** odoron.

Li reiris laŭ cirklo al la hala enirejo preterpasante dudekon da etaj metalaj kestoj, fermitaj per **koroditaj** zonoj el granda antikveco. Kugel elektis tri hazarde; ili estis malkonvene pezaj. Li pasis preter kelkaj masivaj motoroj kies celo li estus volonta enketi, sed la tempo progresadis, kaj decidis, ke li estu foriranta, returne al Azenome kaj la budo de Fianostor...

Kugel malridetis. Laŭ kelkaj rezonoj la propono ŝajnis nepraktike. Fianostor malprobable elektos pagi la plenan valoron por liaj stokaĵoj, aŭ, pli prave, la stokaĵoj de Iŭkoŭnu. Eble estus saĝe, ke li fose kaŝu la ŝtelaĵaron ĉe izola loko... Jen estis **alkovo**, kiun Kugel antaŭe ne priatentis. Mola lumo ŝveladis kiel akvo kontraŭ la kristala panelo, kiu apartigis la alkovon de la halo. **Niĉo** ĉe la malantaŭo montris komplikan objekton ege ĉarman. Laŭ lia plej bonkonjekta percepto, ĝi ŝajnis esti miniatura **karuselo** sur kio rajdis dek du belegaj pupetoj el ŝajna viveco. La objekto mem evidente estis multe valora, kaj plaĉis al Kugel, ke li povis trovi aperturon en la kristala panelo. Li trapaŝis, sed du futojn antaŭ li situis dua panelo obstakle je lia irado, establanta avenuon kiu ŝajne kondukis al la magia rondiraĵo. Kugel procedis memfide, nur por obstakliĝi ĉe plua panelo kiun li ne vidis ĝis tiam, kiam li ĝin alfrapis. Kugel retropaŝadis siajn paŝojn kaj trovis, je lia plaĉo, la sendube ĝustan enirejon en loko malantaŭa je kelkaj futoj. Sed iu ĉi nova avenuo kondukis lin laŭ kelkaj rektaj anguloj al pluan senpordan panelon. Kugel decidis forlasi akiron de la karuselo kaj foriri la kastelon. li turniĝis, sed malkovris, ke li iom konfuziĝis. Ĉu li estis veninta de maldekstre — aŭ ĉu dekstre?... Kugel estis ankoraŭ serĉanta eliron kiam, post kutima tempo, Iŭkoŭnu revenis al sian domegon.

Pauzante apud la alkovo, Iŭkoŭnu esprimis al Kugel per rigardado el humora surprizigo. “Kion ni havas ĉi tie? Vizitanto? Kaj mi estis tiom malgastigema, ke mi devigis vin atendadi! Tamen, Mi vidas, ke vi amuzis vin mem, do mi devas senti nenian ĉagrenegon.” Iŭkoŭnu permesis al si, ke eta rido eskapis siajn lipojn. Li poste pretendis ekatenti pri la sako de Kugel. “Kio estas tio ĉi? Vi portis objektojn por mia ekzamenado? Bonege! Mi ĉiam anksias por plibonigi mian kolektaĵaron, por ke mi restu flank-al-flanke kun la detruigo de pasantaj jaroj. Vi ŝokiĝus se vi lernus pri la friponoj kiuj celas rabi min! Tiu vendisto de bagatelaĉoj en sia **puca** eta budo, ekzemple — vi ne povus koncepti liajn furiozajn strebadojn cele je tio! Mi toleradas lin ĉar ĝis ĉi date li ne estis tiom kuraĝa por ke li risku eniri mian domegon. Sed venu, elpaŝu ĉi tien en la halon, kaj ni ekzamenos la enhavaĵojn de via sako.”

Kugel riverencis elegante. “Feliĉe. Laŭ via supozo, mi ja estis atendanta vian revenon. Se mi rememoras ĝuste, la elirejo troviĝas per tiu ĉi pasejo ...” Li paŝis antaŭen, sed refoje obstakliĝis. LI faris geston signifan pri memĉagrena amuzo. “Mi ŝajne elektis malĝustan direkton.”

“Ŝajne tiel,” diris Iŭkoŭnu. “Rigardante supren, vi atentiĝos pri ornama dezajnaĵo sur la plafono. Se vi sekvos la kurbĝion de la lunarkoj, vi gvidiĝos al la halo.”

“Kompreneble!” Kaj Kugel haste paŝis antaŭen laŭ la direktiloj.

“Momenton!” vokis Iŭkoŭnu. “Vi forgesis vian sakon!”

Kugel malvole reiris por la sako, fojon plu repaŝis elen, kaj baldaŭ eniris al la halo.

Iŭkoŭnu faris mole ĝentilan geston. “Se vi volas paŝi ĉi tien mi ĝoje ekzamenos viajn vendaĵojn.”

Kugel ekrigardis reflekse laŭ la koridoro al la fronta enirejo. “Estus trude je via pacienco. Miaj etaj bagatelaĵoj estas el kvalito sub via intereso. Kun via permeso mi adiaŭos.”

“Neniel tio!” deklaris Iŭkoŭnu grandakore. “Mi havas malmultajn vizitantojn, la plimulto el kiuj estas friponoj kaj ŝtelistoj. Mi vin certigu, ke ilin mi traktas severe! Mi insistas, ke vi almenaŭ akceptu iom da refreŝigaĵo. Metu vian sakon sur la plankon.”

Kugel zorge subenmetis la sakon. “Antaŭ nelonge mi instruiĝis pri eta kompetenteco fare de mar-virinaĉo de Blanka Alstro. Mi kredas, ke vi interesiĝos. Mi bezonas kelkaj éojn da fortika ŝnuro.”

“Vi ekctitas mian kuriozemon!” Iŭkoŭnu etendis brakon; pordeto en la murpanelo glitis malfermiĝe; **buklo** da ŝnuro memĵetiĝis al lia mano. Frotanta la vizaĝon kvazaŭ por kaŝi rideton, Iŭkoŭnu transdonis la ŝnuron al Kugel, kiu elskuis ĝin zorgege. “Mi petas vian partoprenon,” diris Kugel. “Simpla afero en kio vi etendos unu brakon kaj unu gambon.”

“Jes, certe.” Iŭkoŭnu etendis la manon, indikis per fingro. La ŝnuro ekvolvis ĉirkaŭ la brakoj kaj gamboj de Kugel, kaptante lin por ke malkapablu movi. La rideto de Iŭkoŭnu preskaŭ disfendis al li la tutan kapon. “Jen surpriza okazaĵo! Pro miso mi vokis elen Ŝtelisto-kaptisto! Por via komforto, ne baraktu, ĉar Ŝtelisto-kaptisto estas plektaĵo el gamboj de vespoj. Nu do, mi enketos la enhavavojn de via sako.” Li enrigardis la sakon de Kugel kaj eligis molan krion de malbonsurprizo. “Vi malordigis mian kolektaĵon! Mi atentis pri kelkaj el miaj plej ŝategataj valoraĵoj!”

Kugel grimacis. “Nature! Sed mi estas nenia ŝtelisto; Fianostor instigis, ke me venu tien ĉi por ekhavi certajn objektojn, kaj pro tio — ”

Iŭkoŭnu suprentenis la manon. “La ofendo tro seriozas por frivolaj kontraŭdiroj. Mi jam diris pri mia malamego al rabistoj kaj ŝtelistoj kaj nun mi devas vizitigi al vi justecon en ĝia plej nemoligita regul-strikteco — krom, kompreneble, vi povas sugesti adekvatan redonon.”

“Iu tia redona pagmaniero ja devas ekzisti,” Kugel asertis. “Tiu ĉi ŝnuro, tamen, dolorfrotas al mi la haŭton tiel, ke mi trovas cerbumadon nefarebla.”

“Ne grave. Mi jam decidis apliki la Ŝorĉon de Senespera Encistigo, kiu tenadas strikte la subjekton en veziketo kio situas ĉirkaŭ kvardek kvin **mejlojn** sub la surfaco de la tero.

Kugel palpebrumis malbonsurprize. “Sub tiuj ĉi cirkonstancoj, kompenso repago ne povas fariĝi.”

“Prave,” diris Iŭkoŭnu pensoplene. “Mi scivolas, ĉu preter ĉio, povas esti iu eta servo kion vi povas fari por mi.”

“La malbonulo estas kvazaŭ jam mortinta!” deklaris Kugel. “Nun demetu tiun ĉi **abomenindan** ŝnurkaptiĵon!”

“Mi ne havis en la menso iun ajn specifan mortigon,” diris Iŭkoŭnu. “Venu.”

La ŝnuro iomete malstrikiĝis, permesante ke Kugel povu malgrandpaŝe sekvi post Iŭkoŭnu en flankan ĉambron ornamitan de detalegaj **broditaj** murtapiŝoj. El ŝranko Iŭkoŭnu prenis kaseton kaj kuŝigis ĝin sur **ŝvebantan** diskon el vitro. Li malfermis la kaseton, gestis al Kugel, kiu perceptis, ke la skatolo enhavis du kavetojn kovritajn de skarlata felo, kie kuŝis unu sola duonsfereto el sapvezik-maldike **tapetita** viola vitro.

“Kiel edukita kaj multveturinta viro,” sugestis Iŭkoŭnu, “vi sendube rekonas tiun ĉi objekton. Ĉu ne? Vi scias, kompreneble, pri la Kútaj Militoj de la Dek Oka Epoko? Ne?” Iŭkoŭnu gestis ŝultroleve pro surprizo. “Dum tiuj ĉi furoraj okazoj la demono Unda-Hrada — li listiĝas kiel 16-04 Verdo en la Almanako de Ĥrumpo — elpensis, ke li helpu siajn ĉefulojn, kaj tiucele puŝis certajn

agentaĵojn supren el la submondo La-Er. Por ke ili povu percepti, ili surhavis ĉe la finoj lensojn similajn al tiu kiun vi vidas antaŭ vi. Kiam okazoj eke fariĝis misaj, la demono ektiris sin reen al La-Er. La kalotaĵoj malfiksiĝis kaj falis disloke tra la tuto de Kutz. Unu el tiuj, kiel vi vidas, apartenas al mi. Vi devas akiri ties ĝemelon kaj porti ĝin al mi, post kio mi elektos preteratenti vian trudpaŝon.”

Kugel pripensadis. “La elekto, se ĝi kuŝas inter misio al la demona mondo La-Er kaj la Ŝorĉo de Senespera Encistigo, samvaloras. Por diri senkaŝe, al mi la decido ne fareblas.”

La rido de Iŭkoŭnu preskaŭ fendis la grandan flavan vezikon de lia kapo. “Vizito al La-Er eble ne estos necesa. Vi povas akiri la objekton en tiu lando iam konata kiel Kutz.”

“Se mi devas, mi devas,” graŭlis Kugel, tute malplaĉigita pri la maniero en kiu la laboro de la tago finiĝis. “Kiu gardadas tiun violetan kalotaĵon? Por kio ĝi funkcias? Kiel mi iru kaj reiru? Kiujn necesajn armilojn, talismanojn kaj aliajn magiajn akcesoraĵojn vi planas provizi al mi?”

“Ĉio laŭ sia deca tempo,” diris Iŭkoŭnu. “Unue mi devas fari certe, ke post via liberiĝo, vi memkonduktos kun senĉesa lojaleco, fervoro kaj pri solsula celo.”

“Neniel timu,” deklaris Kugel, “al mi la diro estas ĉiam katena.”

“Bonege!” kriis Iŭkoŭnu. “Tiu ĉi informo reprezentas bazan sekurecon pri kio mi neniel taksas negrava. La afero nun farota sendube superas la bezonon.”

Li eliris la ĉambron kaj post momento revenis kun kovrita vitra bovlo enhavanta etan blankan estulon, tute el ungoj, akraj stab-pintoj, kroĉ-pintoj kaj hokoj, nun skvermanta kolere. “Tiu ĉi,” diris Iŭkoŭnu, “estas mia amiko Firks, de la stelo Aĉernaro, kiu saĝas multe pli ol estas ŝajne. Firks agaciĝas pro tio, ke li malkuniĝas disde lia kamarado kun kiu li kunloĝas en baseno en mia laborĉambro. Li helpos al vi pri la ekspeda plenumo de viaj devoj.” Iŭkoŭnu alpaŝis proksime, lertmove puŝis la estulon kontraŭ la abdomenon de Kugel. Ĝi penetris enire inter la visceroj de Kugel, atenteme prenis deĵoran lokon kroĉite ĉirkaŭ la hepato de Kugel.

Iŭkoŭnu staris iomete for, ridanta en tiu preterdeca amuziĝo, kiu gajigis al li la kromnomon. La okuloj de Kugel grandegiĝis en lia kapo. Li malfermis la buŝon por diri akran riproĉon, sed anstataŭe premis firmege la mandiblon, suprenrulis la okulojn.

La ŝnuro malvolvis sin. Kugel staris tremetanta, ĉiu muskolo nodigita.

La amuzo de Iŭkoŭnu malpliigadis al pensema rideto. “Vi parolis pri magiaj akcesoraĵoj. Kio je tiuj talismanoj kies efikecojn vi proklamadis el via budo en Arzenome? Ĉu ili ne paralizos malamikojn, dissolvos feron, pasiigos virgulinojn, aldonos senmortecon?”

“Tiuj ĉi talismanoj ne ĉiuj estas egale dependindaj,” diris Kugel. “Mi bezonos pluajn kompetentecojn.”

“Vi havas ilin,” diris Iŭkoŭnu, “en via glavo, via talento ruze persvada kaj la lertmoveco de viaj piedoj. Tamen, vi instigas mian zorgemon kaj mi helpos vin ĝis tiu ĉi limo.” Li pendigis etan kvadratan tabuleton ĉirkaŭ la kolo de Kugel. “Vi nun povas flankenmeti ĉiun timon pri malsatego. Altuŝo de tiu ĉi potenca objekto induktos nutrecon al ligno, arboŝelo, herbo, eĉ forĵetitaj vestoj. Ĝi krome sonos eksonoron kiam proksima al veneno. Do nun — ekzistas nenio por hezitiĝi nin. Venu, ni iros. Ŝnuro? Kie estas Ŝnuro?”

Obeeme la ŝnuro ekvolvis sin ĉirkaŭ la kolo de Kugel, kaj Kugel perfortiĝis marŝi sekve post Iŭkoŭnu.

Ili elvenis sur la tegmenton de la antikva kastelo. Mallumo jam delonge surfalis la landon. Ien kaj tien la valo de la Zan briletadis per malfortaj lumpintoj, dum la Zan mem estis malregule larĝa strio pli malluma ol mallumo.

Iŭkoŭnu fingre indikis kaĝon. “Tiu ĉi estos via transportilo. Eniru.”

Kugel hezitis. “Eble estus preferinde, ke oni manĝu bone, dormu kaj regajnu la forton, por morgaŭ ekiri frefreŝiĝinta.”

“Kio?” parolis Iŭkoŭnu en tia voĉo kia korno. “Vi aŭdacas stari antaŭ mi kaj stati preferojn? Vi, kiu venis ŝtelire en mian domon, ŝtelegis miajn valoraĵojn kaj lasis ĉion en malordo? Ĉu vi komprenas vian bonsorton? Eble vi preferas la Senesperan Encistigon?”

“Laŭ nenia maniero!” protestis Kugel nerveze. “Mi **anksias** nur pri la sukceso de la entrepreno!”

“Eniru la kaĝon, do.”

Kugel turnis senesperantajn okulojn ĉirkaŭ la kastela tegmento, malrapide aliris la kaĝon kaj paŝis internen.

“Mi fidas, ke vi suferas nenian malsufiĉon je la memoro,” diris Iŭkoŭnu. “Sed eĉ se tiu ĉi okaziĝos, kaj se vi neglektus vian ĉefan respondecon, kio estas por diri, la akiro de la viola lenso, Firks ĉeestus por rememorigi vin.”

Kugel diris, “Ĉar mi nun estas devigita al tiu ĉi entrepreno, kaj malprobable revenonta, eble interesus vin ekscii tion, kiel mi taksas vin kaj vian karakteron. En ordo, je la unua —”

Sed Iŭkoŭnu suprentenis la manon. “Mi ne volas aŭskulti; kalumnio vundas al mi la memestimon kaj mi emas skeptiki al laŭdo. Do nun — estu for!” Li retroiris for, fiksrigardis supren en la mallumon, poste kriis tiun sorĉvokon kiu nomiĝas la Láganeta Transiro de Trasdrubalo. De alte venis alfrapo kaj flankenpuŝo, muflita muĝego de kolero.

Iŭkoŭnu retrotretis kelkajn paŝojn, kriis supren vortojn en antikva lingvo; kaj la kaĝo kun Kugel kaŭranta interene estis ekprenita supren kaj ĵetita tra la aero.



Malvarma vento mordis al la vizaĝo de Kugel. La kaĝo svingiĝis antaŭen kaj reen. De supre venis mola klakado kaj grincado de vastaj flugiloj kaj morna lamentado. Malsupre ĉio estis malluma, nigreco ŝajne truega. Laŭ la interpozicio de la steloj Kugel perceptis, ke la irado celis norden, kaj baldaŭ li sentis la suprenpuŝon de la Montaro Maŭrenra de sube; kaj poste ili flugis super tiu sovaĝejo kiu nomiĝas la Lando de la Falanta Muro. Unu- aŭ du-foje Kugel ekvidetis la lumojn de izola kastelo, kaj unufoje grandegan brulfajron. Dum ioma tempo flugilhava **koboldo** venis por flugilumi apud la kaĝo kaj enrigardadi. Ŝajne, ĝi trovis la malbonsorton de Kugel amuza, kaj kiam Kugel provis akiri informon pri la lando suba, ĝi nur eligis kriojn de amuzego. Ĝi laciĝis kaj provis kroĉi al la kaĝo, sed Kugel piedbatis ĝin for, kaj ĝi defalis en la venton kun kriego de envio.

La oriento koloriĝis ruĝe kiel malnova sango, kaj baldaŭ la suno aperis, tremetanta tiel kiel maljunulo suferanta pro malvarmo. La grundo kaŝiĝis pro nebuleto; Kugel apenaŭ povis vidi por scii ke ili transiradis landon el nigraj montoj kaj mallumaj **abismoj**. Post nelonge la nebuleto apartiĝis refoje por malkaŝi plumbecan maron. Je unu aŭ du fojoj li rigardis supren sed la tegmento de la kaĝo kaŝis la demonon krom la pintoj de la ledecaj flugiloj.

Finfine la demono atingis la nordan strandon de la oceano. Falflugante al la strando ĝi sonigis venĝeman ekmuĝon, kaj lasis la kaĝon fali de alteco de dek kvin **futoj**.

Kugel rampis el la rompitan kaĝon. Frotante kontuzojn li vokis blasfemon kontraŭ la forfluganta demono, poste turniĝis por paŝadi peze tra la sablo kaj malseka flava tufherbo, kaj grimpis la deklivon de la marstrando. Norde estis marĉaj senhomejoj kaj malproksima areto de malaltaj montetoj; Oriente kaj okcidente estis oceano kaj morna strando. Kugel gestis per skuita pugno al la sudo. Iel, iam, iumaniere, li portos venĝon al la Ridanta Magiisto! tion por minimumo li ĵuris.

Malproksima je kelkcent **jardoj** oriente estis postsigno de antikva mar-muro. Kugel pripensis inspekti ĝin, sed moviĝis apenaŭ moviĝis je tri paŝoj antaŭ ol Firks aplikis akrajn pintojn preme al lia hepato. Kugel, rulante supren la okulojn pro dolorego, renversis sian irdirekton kaj ekpaŝadis laŭ la strando orienten.

Post nelonge li malsatis, kaj ekpensis pri la talismaneto provizita de Iŭkoŭnu. Li suprenprenis pecon de lignoflosaĵo kaj frotis ĝin per la tabuleto, esperante vidi, ke ĝi ŝanĝiĝu en teleron da frandaĵoj aŭ rostitan birdon. Sed la lignoflosaĵo simple moliĝis ĝis la teksturo de fromaĝo, daŭre tenis la guston de ligna flosaĵo. Kugel manĝis per klaksonoj kaj glutegoj. Plua ofendo por kalkuli kontraŭ Iŭkoŭnu! Ja multe la Ridanta Magiisto repagos!

La skarлата globo de la suno glitis trans la suda ĉielo. Nokto proksimiĝis, kaj finfine Kugel trovis loĝlokon de homoj; kruda vilaĝo apud malgranda rivero. La **kabanetoj** estis tiaj kiaj birdonestoj el koto kaj stangetoj, kaj odoris ofende je fekaĵo kaj malpuregeco. Inter ili vagadis homoj tiel malbelaj kaj sengraciaj kiel estis la kabanetoj. Ili estis malaltaj, brutecaj kaj grasegaj; al ili la hararoj estis malglataj flavaj disordaĵoj; iliaj vizaĝaj aspektoj estis nodaĵaj. Al ili la sola rimarkinda atribuo — iun pri kiu Kugel tuj atentis kun akra intereso — estis la okuloj: ŝajne blindaj violaj kalotoj, similaj laŭ ĉiu respekto al tiu objekto postulata de Iŭkoŭnu.

Kugel aliris la vilaĝon zorge sed la loĝantaro atentis malmulte pri li. Se la duonsfero dezirata de Iŭkoŭnu estus **identa** al la violaj okuloj de tiu ĉi popolo, sekvis ke baza necerteco de la misio estus solvigita, kaj akiriĝo de la viola kaloto fariĝus nur afero **taktika**.

Kugel paŭzis por observi la vilaĝanojn, kaj trovis multajn aferojn **puzlaj**. Ĉefe estis, ke ili portis sin ne tiel, kiel la fiodoraj ridinduloj kiuj ili fakte estis, sed kun rimarkinda alteco de digno kio bordis foje je memestimego. Kugel rigardadis konfuzite: ĉu ili estis tribo el stultuloj? Ajnakaze ŝajnis, ke ili prezentis nenian danĝeron, kaj li aliris en la ĉefan straton de la vilaĝo, marŝante zorge por eviti la pli ofende odorajn amasojn da forĵetaĵoj. Unu el la vilaĝanoj nun elektis atenti pri li, kaj alvokis lin en bleka profundgorĝa voĉo. “Nu sinjórho: kio estas via deziro? Kial vi ŝteliras la ĉirkaŭejo de nia urbo Smoldo?”

“Mi estas vojaĝanto,” diris Kugel. “Mi petas nur direktiĝi al la gastejo, kie mi povas trovi viandon kaj loĝejon.”

“Ni havas nenian gastejon; vojaĝantoj kaj vagadistoj estas nekonataj al ni. Tamen, vi estas bonvena al dividaĵo el nia pleneco. Jen proksime estas domo havanta ĉion necesan por via komforto.” La viro fingre indikis al disfaliĝinta kabaneto. “Vi rajtas manĝi laŭ via volo; simple eniru la [refektorion](#) tiel kaj elektu tion kion vi volas; avarismo ne okazas ĉe Smoldo.”

“Mi dankas vin elkore,” diris Kugel, kaj estus parolinta plu, sed lia gastiganto estis jam paŝadinta for.

Kugel delikate inspektis la kabanaĉon, kaj post ioma laboro forpurigis la plej malkonvenajn rubaĵojn, kaj aranĝis [stabl](#) sur kio li povos dormi. La suno estis nun ĉe la horizonto kaj Kugel iris al tiu stokejo, kiun oni nomis refektorio. La pridiro de la vilaĝano pri la bondiverseco havebla, kiel Kugel jam suspektis, havis la naturon de [hiperbolo](#). Je unu flanko de la stokejo estis amaso da fumigita fiŝviando; je la alia estis ujo enhavanta [lentojn](#) intermiksitaj kun diversaj semoj kaj cerealoj. Kugel prenis porcion kaj reiris al sia kabaneto, kie li faris malĝojan vespermanĝon.

La suno jam subhorizontiĝis; Kugel eliris por trovi tion, kiajn distraĵojn la vilaĝo ofertis, sed trovis la stratojn senhomaj. En kelkaj el la kabanetoj lampoj bruladis, kaj Kugel, enrigardantaj tra fendaĵoj vidis la enloĝantojn manĝantaj fumigitan fiŝviandon aŭ interdiskutantaj. Li reiris al sia kabanetaĉo, konstruis etan fajron kontraŭ la malvarmeto kaj pozis sin por dormi.

La sekvan tagon Kugel rekomencis sian observadon de la vilaĝo Smoldo kaj ĝia viol-okula popolo. Neniu, li observis, eliris por labori, nek ŝajnis esti kampoj proksimaj. La malkovro malplaĉis al Kugel. Por ke li akiru unu el la violaj okuloj, li estus devigata mortigi ĝian posedanton, kaj por tiu ĉi celo, necesas, ke oficiala obstaklismo estu for.

Li faris provizorajn provojn al konversacio inter la vilaĝanoj, sed ili alrigardis lin en tia maniero kio komencis malkomfortigi lian sintenon: estis kvazaŭ ili estus noblaj sinjoregoj kaj li mem fiadora aĉulo!

Sum la posttagmezo li paŝadis suden, kaj preskaŭ je mejlo laŭlonge la marbordo li alvenis je plua vilaĝo. La popolo estis multe tiel, kiel la ĉeloĝantoj de Smoldo, sed kun ŝajne ordinaraj okuloj. Krom tio ili ankaŭ estis laboremaj; Kugel rigardadis ilin plugi la kampojn kaj fiŝkapti sur la oceano.

Li alproksimiĝis al paro da fiŝkaptistoj kiuj reiradis al la vilaĝo, la kaptaĵaroj pendigitaj de sur la ŝultroj. Ili haltis, okulumis al Kugel kun ne multa amikemo. Kugel nomis sin por esti vojaĝanto kaj demandis pri la landoj en la oriento, sed la fiŝkaptistoj agnoskis mankon de priscio krom ke la regiono estis senhoma, morna kaj danĝera.

“Mi nuntempe estas gasto ĉe la vilaĝo Smoldo,” diris Kugel. “Mi trovas la popolon sufiĉe plaĉa, sed iom stranga. Ekzemple, kial estas iliaj okuloj tiel kiel ili estas? Kio estas la naturo de ilia malsano? Kial ili kondutas kun tiom aristokrata memestimo kaj tiel miela etiketo?”

“La okuloj estas magiaj lensoj,” diris la pli maljuna el la fiŝkaptistoj en avara voĉtono. “Ili ofertas vidadon de la Supermondo; kial la posedantoj ne konduku tiel kiel lordoj? Tiel mi tiam faros, kiam Radkuf Vomen mortos, ĉar mi heredos liajn okulojn.”

“Ĉu vere!” eksklamis Kugel, mirante. “Ĉu tiuj ĉi magiaj kalotoj povas esti elprenitaj laŭvole kaj esti transdonataj tiel kiel la posedanto volas?”

“Ili povas, sed kiu interŝanĝus la Supermondon kontraŭ tiu ĉi?” La fiŝkaptisto gestis per braka

svingo ĉirkaŭe al la morna pejzaĝo. “Mi jam laboregis longe kaj finfine estos mia vico por gusti la delektajojn de la Supermondo. Post tiu ĉi estos nenio, kaj la sola danĝero estas morto pro troeco da ĝojego.”

“Vaste interese!” rimarkis Kugel. “Kiel mi mem fariĝus taŭga por havi paron da tiuj ĉi magiaj kalotoj?”

“Strebadu tiel kiel ĉiuj aliaj en Grodz: aldonu vian nomon sur la liston, poste laboregu por provizi la lordojn de Smoldo per nutro. Tridek unu jarojn mi jam semis kaj kultivis lentojn kaj émerojn kaj rete kaptis fiŝojn kaj sekigis ilin super malrapidaj faroj, kaj nun la nomo de Bubaĥ Ang estas ĉe la supro de la listo, kaj vi devas fari same.”

“Tridek unu jarojn,” diris Kugel pripense. “Tempopaso el ne malgranda daŭro.” Kaj Firks tordiĝadis malripozeme, kaŭzante al la hepato de Kugel ne malgrandan malkomforton.

La fiŝkaptisto procedis al sia vilaĝo Grodz; Kugel revenis al Smoldo. Tie li serĉis tiun viron al kiu li parolis je la alveno al la vilaĝon. “Mia lordo,” diris Kugel, “kiel vi scias, mi estas vojaĝanto el fora lando, logata ĉi tien pro la grandiozeco de la urbo Smoldo.”

“Kompreneble,” gruntis la alia. “Nia belegeco ne povas fari alimaniere ol inspiri samfaradon.”

“Kio do estas la fonto de la magiaj kalotoj?”

La vilaĝa estrarano turnis la violajn duonsferojn al Kugel kvazaŭ ekvidante lin unuafoje. Li parolis en malagrabra voĉo. “Ĝi estas afero kion ni preferas malmulte pripensi, sed estas en tio nenia danĝero, nun post ol la subjekto enrompiĝis. Je iu praa tempo la demono Underherd sendis supren tentaklojn por vidi trans la Tero, ĉiu havanta surpinte kaloton. Simbiliso la Dek Sesa dolorigis la monstron, kiu ektiris sin reen al sia sub-mondo kaj la kalotoj malpoziciiĝis. Kvarcent kaj dek du el la kalotoj estis kolektitaj kaj portataj al Smoldo, kio tiam estis tiom belega kiel ĝi nun prezentiĝas al mi. Jes, mi komprenas, ke mi vidas nur ŝajnaĵon, sed same faras vi, kaj kiu povas diri kies vido estas reala?”

“Mi ne travidas magiajn kalotojn,” diris Kugel.

“Prave.” La estrarano gestis ŝultroleve. “Tio estas afero kion mi preferas preteratenti. Mi malklare rememoras, ke mi loĝas en fikabanaĉo kaj manĝadas la plej krudan el nutraĵoj — sed la persona realeco estas ke mi enloĝas grandiozan palacon kaj manĝigas min per bonegaj viandoj inter la princoj kaj princinoj, kiuj estas miaj geegaluloj. La afero eksplikiĝas jene: la demono Underherd rigardis el la sub-mondo al tiu ĉi; ni rigardas el tiu ĉi al la Supermondo, kio estas la perfektigo de homa espero, [vizia](#) sopiro, kaj [beata](#) songado. Ni kiuj loĝas en tiu ĉi mondono — kiel ni povas pripensi nin mem iel alie ol por esti grandiozaj gelordoj? Tiel ĉi ni estas.”

“Inspirege!” eksklamis Kugel. “Kiel mi atingu paron de tiuj ĉi magiaj kalotoj?”

“Ekzistas du rimedoj. Underherd perdis kvarcent dek du da ili. Du neniam troviĝis, kaj evidente kuŝas sur la planko de la oceana profundejo. Vi rajtas akiri tiujn. La dua rimedo estas fariĝi civitano de Grodz, kaj provizi al la lordoj de Smoldo nutraĵojn ĝis tiam, kiam unu el ni mortas, kion ni faras malofte.”

“Mi informiĝis, ke iu nomata Lordo Radkuf Vomen malsanas.”

“Jes, jen li tie.” La estrarano indikis pri rond-abdomena maljuna viro kun malstrikte nefirmigita salivumanta buŝo, sidanta en malpuregeco antaŭ sia kabanaĉo. “Vi vidas lin ripozanta en la gardeno de lia palaco. Lordo Radkuf strebigis sin vunde dum eksceso da volupto, pro tio ke niaj princinoj estas la plej ravindaj estulinoj el homa inspirado, ĝuste tiel kiel mi estas la plej nobla el princoj. Sed Lordo Radkuf indulgis sin tro plene, kaj tiel suferis mortigan vundon. Jen leciono por ni ĉiuj.”

“Ĉu eble mi povus fari specialan aranĝon por akiri liajn kalotojn?” sugestis Kugel.

“Mi timas, ke ne. Vi devas iri al Grodz kaj laboradi kiel faras la aliaj. Kiel mi mem faris, en antaŭa vivtempo kio nun ŝajnas al mi malklara kaj rudimenta... Neimageble, ke mi suferis tiom longe! Sed vi junas; tridek aŭ kvardek aŭ kvindek jaroj ne estas tro longa tempo por atendadi.”

Kugel metis manon sur la stomakon por kvietigi la agacitajn moviĝojn de Firkso. “Inter la daŭro de tiom longa tempo, la suno jam eble estos estingiĝinta. Rigardu!” Li indikis supren dum nigra flagro transiris la vizaĝon de la suno kaj ŝajnis postlasi momentan kruston. “Eĉ nun ĝi **fadas!**”

“Vi timemas tro,” diris la estrarano. “Al ni, kiuj estas la lordoj de Smoldo, la suno eligas radiadon el **ekskvizitaj** koloroj.”

“Tio ĉi eble estas prave je la nuna momento,” diris Kugel, “sed kiam la suno fariĝos malluma, kio do tiam? Ĉu vi prenos egalan ĝojegon en la malheleco kaj la malvarmeco?”

Sed la estrarano ne plu priatentis lin. Radkuf Vomen jam estis falinta flanken en la koton, kaj ŝajnis mortinta.

Ludanta sendecide je lia tranĉilo Kugel iris por rigardi suben al la korpo. Lertmova tranĉo aŭ du — malpli ol la laboreto de momento — kaj li estus sukcesinta je sia celo. Li klinis antaŭen, sed jam la fluganta momento pasiĝis. Aliaj lordoj de la vilaĝo jam alproksimiĝis por puŝi flanken al Kugel; Raduf Vomen liftiĝis kaj portiĝis kun la plej solena estimo en la fiodoran internon de lia kabanaĉo.

Kugel rigardadis sopire tra la pordo, kalkulante la ŝancon de jen iuj trompo jen alia.

“Estu ke lampoj alportiĝu!” kante diris la estrarano. “Estu ke fina nimbo lumi ĉirkaŭ Lordo Radkuf sur sia juvele krustita mortplatformo! Estu ke la ora korno soniĝi de sur la turoj; lasu, ke la princinoj vesti sin en roboj el ore brodita silko; lasu ke iliaj hararoj kovri la vizaĝojn kiujn Lordo Radkuf amis tiom bone! Kaj nun ni devas deĵore gardadi! Kiu gardos la mortplatformon?”

Kugel ekpaŝis antaŭen. “Mi taksos tion ja honorige.”

La estrarano kapneis. “Tiu ĉi estas privilegio rezervita por liaj egalranguloj. Lordo Maŭlfag, Lordo Glus: ĉu eble vi agos en tiu ĉi ofico?” Du el la vilaĝanoj proksimiĝis al la benko sur kio Lordo Radkuf Vomen kuŝis.

“Sekve,” deklaris la estrarano, “la funebraĵoj devas proklamiĝi, kaj la magiajn kalotojn devas transdoniĝi al Bubaĥ Ang, tiu plej meritoplena grandulo el Grodz. Kiu, mi petas refoje, iros por informi tiun grandulon?”

“Refoje,” diris Kugel, “Mi ofertas mian servadon, se nur por repagi laŭ iu eta maniero la gastigadon kiun mi ĝuadis ĉe Smoldo.”

“Bone dirita!” kante diris la estrarano. “Pro tio do, rapide al Grodz; revenu kun tiu grandulo kiu per sia fidemo kaj dediĉa laboro meritas plialtiĝon.”

Kugel riverencis, forkuris trans la senhoma interspaco al Grodz. Kiam li proksimiĝis al la plej eksteraj kampoj li moviĝis zorge, ŝtelirante de herbotufo al arbareto, kaj baldaŭ trovis tion, kion li serĉis: kamparano fose turnanta la malsekan teron per **pioĉo**.

Kugel ŝteliris kviete antaŭen, frapis suben al la stultulo per nodeca radiko. Li deprenis la plej bonajn vestaĵojn, la ledan ĉapelon, la gambaĵojn kaj piedoŝirmilojn; per lia tranĉilo li dehakis la neflekseman, pajlo-koloran barbon. Portante ĉion kaj forlasante la komparaĉulon kuŝante duonkonscia kaj nuda en la koto li eskapis per longaj paŝoj reire al Smoldo. Li ekzamenis la dehakitan barbon kun iom da puzzleco, kaj fine, per interligi malfajnaj flankajn harojn por fari tufetojn kaj ligante tufon al tufo, li aranĝis malordaspektan falsan barbon por si mem. Tiom da haroj kiuj restis, ilin li kaptis sub la randon de la facile falidĝema leda ĉapelo.

La suno estis jam subirinta; prun-kolora mallumo malklarigis la landon. Kugel reiris al Smoldo. Oleaj lampoj flagris antaŭ la kabanaĉo de Radkuf Vomen, kie la grasegaj kaj misformaj virinoj de la vilaĝo ploregis kaj ĝemadis.

Kugel paŝadis zorge antaŭen, pripensante tion, kion oni atendas de li. Rilate al lia trompema aliŝajno: ĝi aŭ proviĝos efektiva aŭ male. La grada nivelo je kiu la violaj kalotoj konfuzis perceptadon estis afero dubema; li povus nur riski provon.

Kugel marŝis kvazaŭ kuraĝe en la kabanaĉon. Pitĉigante la voĉon tiom profunde kiom li povis, li vokis, “Jen mi, estimataj princoj de Smoldo: la grandulo Bugaĥ Ang el Grodz, kiu dum tridek unu jaroj portis amase la plej delikatajn el frandaĵoj al la stokejoj de Smoldo. Nun mi ĉeestas, petante leviĝon al rango nobla.”

“Laŭ via rajto,” diris la Ĉefa Estrarano. “Sed vi ŝajnas nun viro malsama ol tiu Bubaĥ Ang kiu tiom longe servis la princojn de Smoldo.”

“Mi estas aliformita — kaŭze de domaĝosento pro la forpaso de Radkuf Vomen kaj kaŭze de ekstazo de anticipo pri leviĝo.”

“Tio klaras kaj kompreneblas. Venu do — pretigu vin por la ritoj.”

“Mi pretas jam je ĉi tiu momento,” diris Kugel. “Fakte, se vi nur transdonos al mi la magiajn kalotojn, mi portos ilin kviete al flanko kaj priĝojos.”

La Ĉefa Estrarano kapneis indulge. “Fari tiel ne agordas kun la ritoj. Por komenci vi devas staradi nude ĉi tie sur la pavilono de tiu ĉi grandega kastelo, kaj la plej belaj el la belaj sanktoleos vin per bonodoraĵoj. Post okazas la vokadon al Edit Bran Maŭr. Kaj poste —”

“Estimatulo,” diris Kugel, “lasu al mi unu favoron. Antaŭ ol la ceremonioj komencas, apliku al mi la magiajn kalotojn por ke mi povu kompreni la tutan signifon de la ceremonio.”

La Ĉefa Estrarano konsideris. “La peto estas malortodoksa, sed laŭ la rezono. Elportu la kalotojn!”

Okazis atendado, dum kiam Kugel staris komence sur unu piedo, sekve sur la alia. La minutoj

treniĝadis; la vestoj kaj la falsa barbo jukis netolereble. Kaj nun ĉe la rando de la vilaĝo li vidis alvenon de kelkaj novaj figuroj, venantaj laŭ la direkto de Grodz. Unu preskaŭ certe estis Bubaĥ Ang, dum alia ŝajnis esti distondita de sia barbo.

La Ĉefa Estrarano aperis, tenante en ambaŭ manoj violan kaloton. “Paŝu antaŭen!”

Kugel vokis laŭte, “Mi estas tie ĉi, sinjoro.”

“Mi nun aplikas la oleaĵon kiu sanktigas la kunigon de magia kaloto al dekstra okulo.”

Ĉe la malantaŭo de la homamaso Bubaĥ Ang laŭtigis sian voĉon. “Haltu! Kio okazas?”

Kugel turniĝis, fingre indikis. “Kiu ŝakalo estas tiu ĉi, kiu interrompas solenaĵojn? Forpelu lin: tuj!”

“Prave!” vokis la Ĉefa Estrarano decidege. “Vi malnobligas kaj vin kaj la dignecon de la ceremonio.”

Bubaĥ Ang kaŭretis retroen, momente subpremita.

“Ĉar okazis la interrompo,” diris Kugel, “Same valorus, ke mi prenu propriĝon de la kalotoj ĝis tiuj ĉe aĉuloj povus esti ĉagrenataj.”

“Ne,” diris la Ĉefa Estrarano. “Tia procedo maleblas.” Li skuis gutojn da putra graso en la dekstran okulon de Kugel. Sed nun la kamparano dehakita de sia barbo plendegis elkrie: “Mia ĉapelo! Mia bluzo! Mia barbo! Ĉu ne ekzistas justeco?”

“Silenton!” siblis la homamaso. “Tiu ĉi estas solena okazaĵo!”

“Sed mi estas Bu — ”

Kugel vokis, “Enmetu la magian kaloton, lordo; lasu ke ni ignoru tiujn ĉi aĉulojn.”

“Aĉulo, vi nomas min?” muĝegis Bubaĥ Ang. “Mi rekonas vin nun, vi fripono. Haltigu la procedon!”

La Ĉefa Estrarano diris nehaltigeble, “Mi nun investas vin per la dekstra kaloto. Vi devas dumtempe tenu fermite tiun ĉi okulon por eviti malakordiĝon kiu troŝarĝus la cerbon, kaj tiel kaŭzu stuporon. Nun por la maldekstra okulo.” Li paŝis antaŭen kun la oleaĵo, sed Bubaĥ Ang kaj la senbarba kamparano ne plu permesos detenon. “Haltigu procedojn! Vi nobligas falsulon! Mi estas Bubaĥ Ang, la meritoplena grandulo! Li kiu staras antaŭ vi estas vagabondo!”

La Ĉefa Estrarano inspektis al Bubaĥ Ang konfuzite. “Ja prave, ke vi similas al tiu kamparano kiu dum tridek unu jaroj portis stokaĵojn al Smoldo. Sed se vi estas Bubaĥ Ang, kiu estas tiu ĉi?”

La senbarba kamparano ŝancelis antaŭen. “Li estas la senanima aĉulo kiu ŝtelis la vestojn de sur mia dorso kaj la barbon de sur mia vizaĝo.”

“Li estas krimulo, ŝtelisto, vagabondo — ”

“Haltu!” kriis la Ĉefa Estrarano. “La vortoj estas malsaĝe elektitaj. Memoru, ke li jam leviĝis al

la rango inter princoj de Smoldo.”

“Ne entute!” kriis Bubaĥ Ang. “Li havas unu el miaj okuloj. Mi postulas la alian!”

“Embarasa situacio,” murmuris la Ĉefa Estrarano. Li parolis al Kugel: “Kvankam antaŭe estis vagabondo kaj gorĝo-tranĉisto, vi nun estas princo, viro de respondeco. Kio estas via opinio?”

“Mi sugestas vipadon por tiuj ĉi brue obstinaj aĉuloj. Poste — ”

Bubaĥ Ang kaj la senbarba kamparano, sonigantaj kriegojn kolerajn, [risortis](#) antaŭen. Kugel, saltante for, ne povis regi sian dekstran okulon. La palpebro ekmalfermiĝis; en lian cerbon kraŝis tiom mira sperto de [ekzaltiĝo](#), ke al li la koro preskaŭ haltis pro surprizego. Sed samtempe lia maldekstra okulo montris la realecon de Smoldo, la kontraŭeco inter tiuj du tro sovaĝis por esti tolerata; li stumblis kaj falis kontraŭ kabanon. Bubaĥ Ang staris super li kun pioĉo levita alte, sed nun la Ĉefa Estrarano ekpaŝis interpoze.

“Ĉu vi perdas la mensan stabilecon? Tiu ĉi viro estas princo de Smoldo!”

“Viro kiun mi mortigos, ĉar li havas mian okulon! Ĉu mi laboregos tridek unu jarojn por plibonigi vagabondon?”

“Kalmigu vin, Bubaĥ Ang, se tio estas via nomo, kaj memoru ke la afero ankoraŭ restas ne tute klara. Eble eraro ja okazis — preterdube honesta eraro, ĉar tiu ĉi viro nun estas princo de Smoldo, kio estas por diri, justeco kaj saĝeco personigita.”

“Li ne estis tio antaŭ ol li ricevis la kaloton,” disputis Bubaĥ Ang, “Kiam la ofenda ago estis farata.”

“Mi ne povas okupi min pri distingoj inter kaŭzoj,” respondis la estrarano. “Ajnakaze, via nomo superas en la listo kaj je la venonta mortiĝo — ”

“Dek aŭ dek du jarojn estontece?” kriis Bubaĥ Ang. “Ĉu mi laboregos ankoraŭ pli longe, kaj akiru mian meritaĵon ĝuste tiam, kiam la suno mallumiĝos? Ne, ne, tio ĉi ne povas esti!”

La senbarba kamparano faris sugeston: “Prenu la alian kaloton. Tiel ĉi vi havos almenaŭ duonon de via rajtaĵo, kaj tiel obstaklos la entrudinton, ke li ne prifriponos vin tute.”

Bubaĥ Ang kunsentis. “Mi komencos per unu el miaj magiaj kalotoj; mi poste mortigus tiun kanajlon kaj ekhavas la alian, kaj ĉio estos bone.”

“Nu, nu” diris la Ĉefa Estrarano [orgojle](#), “tiel ĉi estas apenaŭ la maniero per kio oni pridiri princon de Smoldo!”

“Ba!” ronkis Bubaĥ Ang. “Primemoru la fonton de viaj viandoj! Ni el Grodz ne laboregos por nula repago.”

“Nu bone,” diris la Ĉefa Estrarano. “Mi malestimas tian malĝentilan fanfaronadon, sed mi ne povas kontraŭdiri, ke vi havas iom da racio viaflanke. Jen la maldekstra kaloto de Radkuf Vomen. Mi flankenlasos la invokadon, eladon kaj la gratulan [peanon](#). Estu tiom bone por paŝi antaŭen kaj malfermi la maldekstran okulon — jen.”

Kiel Kugel jam faris antaŭe, Bubaĥ Ang rigardis el ambaŭ okuloj kune kaj ekŝanceliĝis malantaŭen en konfuziĝo. Sed frape kovrante la manon kontraŭ maldekstra okulo li restabiligis sin, kaj antaŭiris minace al Kugel. “Vi nun devas kompreni la senutilecon de via trompo. Transdonu al mi tiun kaloton kaj foriru laŭ via vojo, ĉar vi neniam havos la utilon de la du.”

“Tio gravas tre malmulte,” diris Kugel. “Dank’ al mia amiko Firks, mi kontentiĝas plene pro havi nur unu sola.”

Bubaĥ Ang grincis dente. “Ĉu vi planas trompi al mi duan fojon? Via vivo alproksimiĝas je sia fino: ne nur mi mem sed la ĉiuj el Grodz unuiĝas promese pri tio!”

“Ne inter la bordoj de Smoldo!” avertis la Ĉefa Estrarano. “Devas esti neniuj disputoj inter la princoj: mi postulas amikecon! Vi kiuj dividis la kalotojn de Radkuf Vomen devas ankaŭ dividi lian palacon, liajn robojn, bonhavaĵojn, juvelojn kaj servistaron, tiel ĝis tiu espereble fora tempo, kiam unu el la alia mortos, je kiu tempo la pluvivanto prenos ĉion. Jen mia decido; nenio plu estu dirota.”

“La momento de la morto de la trudinto espereble proksimas,” grumble murmuris Bubaĥ Ang. “Tiu momento, kiam li ekmetos piedon ekster Smoldo estos lia fina! La civitanoj de Grodz subtenos gardadon daŭranta cent jarojn, se necese!”

Firks moviĝis torde pro la informo kaj Kugel ekis pro malkomforto. En voĉo mildiga li alparolis al Bubaĥ Ang. “Kompromiso eble povas aranĝiĝi: al vi proprietiĝos la tuto de la havaĵoj de Radkuf Vomen: liaj palaco, kromaj aferoj, servistaro. Al mi posediĝos nur la magiaj kalotoj.”

Sed Bubaĥ Ang rifuzis absolute. “Se vi taksas valora vian vivon, transdonu tiun kaloton al mi ĉimomente.”

“Tio ĉi ne povas fariĝi,” diris Kugel.

Bubaĥ Ang turniĝis for, parolis al la senbarba kamparano, kiu kapjesis kaj foriris. Bubaĥ Ang grimacis minace al Kugel, poste iris al la kabano de Radkuf Vomen kaj sidiĝis sur la amason da [fatrasaĵo](#) antaŭ la pordo. Tie li eksperimentis pri sia nova kaloto, zorge malfermante la dekstran okulon, malfermante la maldekstran por rigardadi mire al la Supermondo. Kugle pensis, ke li prenu avantaĝon de lia distriĝo kaj ekpaŝis for al la urbeto rando. Ŝajnis, ke Bubaĥ Ang ne atentis. Ha! pensis Kugel. Estus tiel facile, do! Du paŝojn plu kaj li estos perdita en la mallumo. Eta sono — grunto, skrapo, interfroto de vestoj — instigis, ke li ekiretu flanken; suben svingiĝis pioĉa tranĉando, tranĉante la aeron tie kie estis lia kapo. En la malmulta lumeto ĵetita de la lampoj de Smoldo Kugel ekvidis la venĝan vizaĝesprimon de la senbarba kamparano. Malantaŭ li venis Bubaĥ Ang kureganta, peza kapo puŝata antaŭen kiel virbovo. Kugel saltis evite, kuris lertmove reen al la centro de Smoldo. Malrapide kaj en grandega malesperiĝo Bubaĥ Ang revenis, por sidigi sin fojon plu. “Vi neniam eskapos,” li diris al Kugel. “Transdonu la kaloton kaj ŝparu vian vivon!”

“Laŭ neniun manieron,” respondis Kugel fortanime. “Anstataŭe, timu pri via propra malsekaĉa vivforto, kiu pludaŭras en eĉ plia risko!”

El la kabaneto de la Ĉefa Estrarano soniĝis averta vokaĵo. “Ĉesu disputadi! Mi indulgas la ekzotikajn kapricojn de belega princino kaj necesas, ke mi ne distriĝu.”

Kugel, rememorante pri la oleaĉaj amasoj da karno, la firigardantaj gras-vangaj vizaĝoj, la ĥaose kunpremitaj [pediko-havaj](#) hararoj, la haŭto-klapoj kaj [kistoj](#), la fiaĉaj odoroj, kiuj karakterizis

la virinojn de Smoldo, mirigis denove pri la potenco de la kalotoj. Bubaĥ Ang refoje testadis la vidadon de la maldekstra okulo. Kugel mem pretigis sin sur benko kaj provis uzi sian dekstran okulon, antaŭe tenante la manon antaŭ la maldekstran...

Kugel portis ĉemizon el supraj arĝentaj **skvamoj**, striktan skarlatan pantalonon, malhelan bluan jakon. Li sidis sur **marmora** benko antaŭ vico de spiralaj marmoraj kolonoj surkreskitaj de malhela foliaro kaj blankaj floroj. Ĉe ambaŭ flankoj la palacoj de Smoldo turis etende en la nokton, unu post alia, kun molaj lampoj ornamantaj la arĥaĵojn kaj fenestrojn. La ĉielo estis mole malhela bluo, alpendita de grandaj lumantaj steloj; inter la palacoj estis ĝardenoj el cipreso, mirto, jasmeno, sfĵdo, ĥajsno: la aero pleniĝis de parfumo de floroj kaj fluanta akvo. De ie venis ventaĵero da muziko: murmuro de molaj kordoj, suspiro de melodio. Kugel entiris profundan enspiron, leviĝis stariĝi. Li paŝis antaŭen, movis trans la teraso. Palacoj kaj ĝardenoj ŝanĝiĝis laŭ perspektivo; sur malhela herbejo tri junulinoj en roboj el blanka ĉifono rigardadis lin transŭltre.

Kugel faris unu senvolan paŝon antaŭen, kaj tiam rememorante la malicon de Bubaĥ Ang, paŭzis por kontroli sian situon. Trans la placo leviĝis palaco el sep etaĝoj, ĉiu nivelo havanta sian terasan ĝardenon, kun grimpoplantoj kaj floroj pendantaj suben laŭ la muraj surfacoj. Tra la fenestroj Kugle ekvidis luksajn meblojn, riĉe brilajn **lustrojn**, la molan movadon de **livreigitaj ĉambelanoj**. Sur pavilono antaŭ la palaco staris **falk-vizaĝa** viro kun tondita ora barbo en roboj el okra flavo kaj nigro, kun oraj **epoletoj** kaj nigraj **kotornoj**. Li staris kun unu piedo sur ŝtona **grifo**, brakoj apogitaj sur faldita genuo, rigardanta al Kugel kun vizaĝesprimado de profunda malŝato. Kugel miris: ĉiu tiu povas esti la pork-vizaĝa Bubaĥ Ang? Ĉu la mirinde bela sep-etaĝa palaco estu la kabanaĉo de Radkuf Vomen?

Kugel iris malrapide for trans la placo, kaj nun trovis pavilonon lumigitan de **kandelabro**. Tabloj surhavis viandojn, **ĵeleoj**, kukaĵoj de ĉiu tipo; kaj la stomako de Kugel, nutrita nur per floslignaĵo kaj fumigita fiŝviando, instigis lin antaŭen. Li vagadis inter tablo post tablo, gustumante bonmordetojn el ĉiu manĝaĵo, kaj trovis ĉion plej altkvalitaj.

“Fumigitan fiŝviandon kaj lentojn mi eble ankoraŭ manĝegas,” diris Kugel al si mem, “sed ekzistas multo prilaudinda pri la sorĉo per kiu ili fariĝas ĉi tiaj eksvizitaj delekaĵoj. Viro povus vivteni multe malpli bone ol trasperti la tuton de sia vivo ĉi tie en Smoldo.”

Kvazaŭ estus ke Firks jam atendis la penson, li tuj vundis al Kugel la hepaton per serio da torturaj doloregoj, kaj Kugel amare insultadis je Iŭkoŭnu la Ridantan Magiiston kaj rediris siajn ĵurojn promesantajn pri venĝo.

Regajnante la memregadon, li marŝis facile al tiu loko kie la formalaj ĝardenoj ĉirkaŭantaj la palacojn kondukis al parka lando. Li ekrigardis trans la ŝultro kaj trovis la falk-vizaĝa princo en okra flavo kaj nigro alvenanta, kun memevidente malica intenco. En la mallumeco de la parko Kugel atentiĝis pri aliaj movadoj kaj pensis, ke li videtis nombron da armitaj militistoj.

Kugel reiris al la placo kaj Bubaĥ Ang sekvis, refoje por staradi rigardanta minace al Kugel antaŭ la palaco de Radkuf Vomen.

“Klare,” diris Kugel laŭte, por la aŭdado de Firks, “nenia eliro de Smoldo okazos ĉinokte. Nature mi ankŝias alporti la kaloton al Iŭkoŭnu, sed se mi estus mortigata, nek la kaloto nek la admirinda Firksio iam ajn reiros al Almerio.”

Firks ne plue montradis. Nun, pensis Kugel, kie mi tranoktiĝu? La sep-etaĝa palaco de Radkuf Vomen memevidente ofertis sufiĉe da komforta spaco por ambaŭ li kaj Bubaĥ Ang. Efektive tamen la du estus kunpremitaj en unu-ĉambra kabaneto, kun sola amaso da malsekaj **fragmitoj** kiel litseĝo. Pensoplene, domaĝoplene, Kugel fermis la dekstran okulon, malfermis la maldekstran.

Smoldo estis tiel, kiel antaŭe. La malbonhumora Bubaĥ Ang kaŭris antaŭ la pordo de la kabano de Radkuf Vomen. Kugel paŝis eke antaŭen, piedbatis forte al Bubaĥ Ang. En surprizo kaj ŝoko, ambaŭ okuloj de Bubaĥ Ang malfermiĝis, kaj la rivalaj instigoj kolizantaj en lia cerbo instigis paralizon. Iom for en la malumo, la senbarba kamparano muĝis kaj venis kureganta antaŭen, pioĉo tenata alte, kaj Kugel forlasis sian planon pri tranĉi la gorgon de Bubaĥ Ang. Li salte enpaŝis la kabanon, fermis kaj stange sekuris la pordon.

Li nun fermis la maldekstran okulon, malfermis la dekstran. Li trovis sin en la grandioza akceptejo de la palaco de Radkuf Vomin, la **portiko** kio sekuriĝis per barokrado el forĝita fero. Ekstere, or-hara princo en okro kaj nigro, tenanta manon kovre je okulo, levis sin en malvarma digneco de sur la pavimo de la placo. Levante unu brakon en nobla defio, Bubaĥ Ang svingĝetis sian mantelon superŝultren, marŝis for por kuniĝi kun siaj militistoj.

Kugel promenatis tra la palaco, inspektante la komfortaĵojn kun plezuro. Se ne pro la persistado de Firks, ne estus kaŭzo por hasto ke li ekprovu la danĝeran veturon reiran al la Valo de la Zan.

Kugel elektis luksan ĉambron sude frontantan, demetis siajn riĉajn vestaĵojn por **satena** noktovesto, komfortigis sin sur litseĝo havanta littukojn el pala blua silko, kaj tiumomente ekdormis.

En la mateno okazis iomete da malfacileco pri rememori kiun okulon li malfermu, kaj Kugel pensis, ke estus bone fari kovrilon por porti super tiu okulo ne tiumomente uzata.

Dumtage la palacoj de Smoldo estis eĉ pli grandiozaj, kaj nun la placo estis plena de princoj kaj princinoj, ĉiuj el la pleja beleco.

Kugel vestis sin en bonaspektaj vestaĵoj el nigro, kun moda verda ĉapelo kaj verdaj **sandaloj**. Li subenmarŝis al la akceptejo, levis la barokadron per komanda gesto kaj eliris en la placon.

Ne estis signo pri Bubaĥ Ang. La aliaj ĉeestantoj de Smoldo salutis lin kun ĝentileco kaj la princinoj montris percepteblan varmecon, kvazaŭ ili trovis lin bonaspekta. Kugel kapjesis ĝentile, sed sen fervoro: ne eĉ la magia kaloto povis persvadi lin kontraŭ la amaraj buloj da graso, karno, malpuraĵo kaj haroj el kio konsistis la Smoldaj virinoj.

Li matenmanĝis sur plezurigaj viandoj ĉe la pavilono, poste revenis al la placo por konsideri sian planon de sekvaj agadoj. Netuta inspektado de la parkoj malkovris militistojn de Grodz gardantajn. Ne estis tuja oportuno por eskapi.

La noblularo de Smoldo aplikis sin al siaj distradoj. Kelkaj vagis sur la herbejoj; aliaj rajdis boatojn sur la belegaj akvejoj je la nordo. La Ĉefa Estrarano, princo de saĝeca kaj nobla vizaĝo, sidis sola sur **oniksa** benko, profunde pripensanta.

Kugel alproksimiĝis; la Ĉefa Estrarano aktivigis sin kaj donis al Kugel saluton de limigita amikeco. “La menso ne trankvilas,” li deklaris. “Malgraŭ ĉiu ebla bonjuĝado, kaj lasante permesojn pro via neevitebla nescio pri niaj kutimoj, mi sentas, ke ia malegalaĵo fariĝis, kaj mi ne povas elpensi rimedon por ĝin ripari.”

“Ŝajnas al mi,” diris Kugel, “ke Ĝentilulo Bubaĥ Ang, kvankam sendube estiminda viro, montras mankon de disciplino maltaŭga je la digneco de Smoldo. Miaopinie, li gajnos per kelkaj pluaj jaroj da maturiĝo ĉe Grodz.”

“Ja estas io en tio, kion vi diras,” respondis la plimaljunulo. “Etaĵ personaj sinoferoj foje necesas por la plibono de la komunumo. Mi certas, ke vi, se la demando okazus, ĝoje oferus la propran kaloton kaj enlistiĝus denove ĉe Grodz. Kion signifas kelko da jaroj? Ili preterflugas tiom facile kiom papilioj.”

Kugel faris molan geston. “Aŭ eĉ decido per loterio povus aranĝiĝi, en kio ĉiuj kiuj vidas per du kalotoj partoprenus, la perdinto de la loterio dononte unu el siaj kalotoj al Bubaĥ Ang. Mi daŭre kontentiĝos per nur unu sola.”

La estrarano malridetis. “Nu — tiu alternativo malprobablas. Intertempe vi devas partopreni en nia sinamuzado. Se mi rajtas tion diri, vi prezentas bonaspektan figuron kaj kelkaj el la princinoj jam rigardadis ŝafokule je via direkto. Jen, ekzemple, la bela Udela Narŝag — kaj jen iomete for, Zokoŝa de la Roz-Petaloj, kaj poste la vivanima Ilviu Lasmal. Vi devas ne retrorigardi; ĉi tie en Smoldo ni vivas nelimigitan vivstilon.”

“La logeco de tiuj ĉi ĝentilulinoj ne preteris mian atenton,” diris Kugel. “Domaĝe, mi ligiĝas de ĵur-promeso pri sindeteno.”

“Malbonsorta viro!” eksklamis la Ĉefa Estrarano. “La princinoj de Smoldo belas nekompareble! Kaj atentu — jen alia vokante vian atenton!”

“Certe estas vi, kiun ŝi vokas por venigi,” diris Kugel, kaj la estrarano iris por alparoli la junan virinon priatentigitan, kiu venis rajdante en la placon en grandioza boat-forma ĉaro kio marŝadis sur ses **igno**-piedoj. La princino ripozis sur seĝo el rosaj tuf-plumoj kaj estis tiom belega, ke Kugel bedaŭris la sindetenemon de sia rememorado, kiu projektis ĉiun kunpremitan haron, **nevuson**, pendantan sublipon, ŝvitantan sulketon kaj sulkon de la virinoj de Smoldo al la antaŭo de sia memoro. La princino estis ja la esenco de revaĵo: svelta kaj supla, kun haŭto kia senmova kremo, delikata nazo, lumaj profunde pensantaj okuloj, buŝo de plaĉega fleksebleco. Ŝia esprimo loge konfuzis Kugelon, ĉar ĝi estis pli komplika ol tiuj de la aliaj princinoj: pensema, tamen voloplena; arda tamen malplaĉigita.

En la placon venis Bubaĥ Ang, vestata akcesore laŭ militista modo, kun **korseto**, **moriono** kaj glavo. La Ĉefa Estrarano aliris por lin alparoli; kaj nun je la agaco de Kugel la princino en la marŝanta boato gestis atente al li.

Li iris antaŭen. “Ĵes, princino; vi salutis min, mi kredas?”

La princino kapjesis. “Mi spekulativas pri via ĉeesto en ĉi tiaj nordaj landoj.” Ŝi parolis per mola klara voĉo kia muziko.

Kugel diris, “Mi estas ĉi tie plenumante mision; mi restas nur iometan tempon ĉe Smoldo, kaj poste mi devas iradi orienten kaj suden.”

“Ĉu prave!” diris la princino. “Kio estas la temo de via misio?”

“Por diri vere, mi estis portita ĉi tien per la malico de magiisto. Ĝi neniel estis deziro mia

propra.”

La princino ridis mole. “Mi renkontas malmultajn nekonatulojn. Mi sopiras por novaj vizaĝoj kaj nova parolo. Eble vi venos al mia palaco kaj ni parolos pri magio, kaj la strangaj cirkonstancoj kiuj abundas sur la mortanta tero.”

Kugel riverencis strikte. “Via oferto estas kompata. Sed vi devas serĉi aliloke; mi ligiĝas je ĵurpromeso de sindeteno. Regu vian malplaĉiĝon, ĉar ĝi aplikas ne nur al vi sed al Udela Narŝag tie, al Zoks, kaj al Ilviu Lasmal.”

La princino levis la brovojn, sinkis malantaŭen en sia tuf-pluma seĝo. Ŝi ridetis milde, “Vere, vere. Vi estas severa viro, severa malcedema viro, ke vi rifuzas vin mem tiom multe da petadantaj virinoj.”

“Tio prave estas la kazo, kaj tiel devas esti.” Kugel turniĝis for por alfronti la Ĉefan Estraronon kiu alvenis kun Bubaĥ Ang tuj sekvante.

“Malĝojaj cirkonstancoj,” anoncis la Ĉefa Estrarano en voĉo maltrankviligita. “Bubaĥ Ang parolas por la vilaĝo de Grodz. Li deklaras, ke neniom plu da manĝaĵoj estos provizata ĝis post justeco fariĝis, kaj tiun ĉi afero ili difinas kiel la cedo de via kaloto al Bubaĥ Ang, kaj de vi mem al komitato punistara kiu atendas en la parka lando jen proksime.”

Kugel ridis malkomforte. “Kia tordita vidpunkto! Vi certigis al ili, kompreneble, ke ni el Smoldo manĝus herbon kaj detruus la kalotojn antaŭ ol akcepti tiajn malamindajn kondiĉojn, ĉu?”

“Mi timas informi, ke mi evitadis,” statis la Ĉefa Estrarano. “Mi sentas, ke la aliaj el Smoldo favoras pli flekseblan decidon pri agadoj.”

La impliko estis klara, kaj Firks komencis moviĝadi en malplaĉiĝo. Por ke li aprezu cirkonstancojn en la plej rekta maniero ebla, Kuge interŝanĝis la kovrileton por rigardi el la maldekstra okulo.

Kelkaj civitanoj de Grodz, armitaj per falĉiloj, pioĉoj kaj bastoj atendis ĉe distanco de kvindek jardoj: evidente la komitato punistara pri kio Bubaĥ Ang menciis. Ĉe unu flanko estis la kabanetoj de Smoldo; ĉe la alia estis la paŝanta boato kaj la princino de kia — Kugel fiksrigardis surpriz-mirigita. La boato estis tiel, kiel antaŭe, paŝanta sur ses birdo-gamboj, kaj sidanta en la rosaj tufplumetoj estis la princino — se eble, pli belega ol antaŭe. Sed nun ŝia esprimo, anstataŭ milde rideta, estis malvarmeta kaj senmova.

Kugel faris profundan enspiron, ekkuris. Bubaĥ Ang kriegis ordonon, ke li haltu, sed Kugel atentis neniom. Trans la malplenejoj li kuris konkurse, kun la komitato punistara ĉasante.

Kugel ridis feliĉege. Li estis longa je la membroj, forta je la spirado; la kamparanoj estis malaltaj, nodec-muskoloaj, nespritaj. Li povus facile kuri po du mejlojn kontraŭ unu je ili. Li paŭzis, kaj turniĝis por saluti bonadiaŭon. Malbonsurprize, du gamboj de la boato detiris sin de la boato kaj eksaltis postsekve al li. Kugel kuregis por sia vivo. Vane. La gamboj venis saltigante preter li, po unu ambaŭflanke. Ili turniĝis ronde, piedbatis lin ekhalte.

Kugel malbonkore marŝis reen, la gamboj saltetantaj postsekve. Tuj antaŭ ol li atingis la bordon de Smoldo li etendis sub la kovrilon kaj detiris la magian kaloton. Dum la punistara komitato

almarŝis lin, li tenis ĝin alte. “Stariĝu for — aŭ mi rompos la kaloton en fragmentojn!”

“Haltu! Haltu!” vokis Bubaĥ Ang. “Tio devas ne esti! Venu, donu al mi la kaloton kaj akceptu vian meritosorton.”

“Nenio jam decidiĝis,” Kugel rememorigis lin. “La Ĉefa Estrarano decidis favore al neniu.”

La knabino leviĝis el sia sidloko en la boato. “Mi mastros; mi estas Derŭi Korim, el la Domo de Dombro. Donu al mi la violan vitraĵon, kio ajn ĝi estas.”

“Absolute ne,” diris Kugel. “Prenu la kaloton de Bubaĥ Ang.”

“Neniam!” eksklamis la nobelulon de Grodz.

“Kio? Vi ambaŭ havas unu kaloton kaj ambaŭ deziras havi du? Kiuj estas tiuj ĉi valoregaj objektoj? Vi portas ilin kiel okuloj? Donu ilin al mi.”

Kugel prenis sian glavon. “Mi preferas kuri, sed mi batalos se mi devos.”

“Mi ne povas kuri,” diris Bubaĥ Ang. “Mi preferas batali.” Li prenis la kaloton de sur la propra okulo. “Nun, vagabondo, preparu vin por la morto.”

“Momenton,” diris Derŭi Korim. El unu el la gamboj de la boato etendiĝis maldikaj brakoj por ekteni la pojnon de kaj Kugel kaj Bubaĥ Ang. La kalotojn falis sur la teron; tiu de Kugel kaptiĝis kaj portiĝis al Derŭi Korim; tiu de Bubaĥ Ang alfrapis ŝtonon kaj skuiĝis en fragmentojn. Li hurlis korŝirigita, eksaltis sur Kugel, kiu [retretis](#) de la atako.

Bubaĥ Ang sciis nenion pri glava batalado; Li hakis kaj svingis kvazaŭ li estus buĉanta fiŝon. La furiozo de lia atako, tamen, estis maltrankviliga kaj Kugel devis strebe labori por sindefendi. Pluse aldona je la saltoj kaj svingoj de Bubaĥ Ang, Firks montris malĝojegon pri la perdo de la kaloto.

Derŭi Korim jam perdis intereson en la afero. La boato ekforiris trans la malplenejo, moviĝante pli kaj pli rapide. Kugel tranĉis flanken per sia glavo, saltis malantaŭen, retrosaltis fojon plu, kaj por la dua fojo ekeskapis trans la malplenejo, kaj la popolo de Smoldo kaj Grodz diregis blasfemojn post li.

La boatoĉaro duonkuris je nehasta rapido. Pulmoj pulantaj dolore, Kugel proksimiĝis al ĝi, kaj per grandega salto supren, ekkaptis la boatrandon, tiris sin internen.

Estis tiel, kiel li atendis. Derŭi Korim jam trarigardis la kaloton kaj ripozis malantaŭen pro kapturiniĝo. Li viola kaloto situis sur ŝia sino.

Kugel ekprenegis ĝin kaj dum momento rigardadis malupren al la ekvizita vizaĝo kaj pripensis ĉiu li risku ion pli. Firks pensis nee. Jam Derŭi Korim komencis suspiri kaj movi la kapon.

Kugel elsaltis la boaton, kaj nur ĝustamamente. Ĉu ŝi vidis lin? Li kuris al tufo da fragmitoj kio kreskis apud lageto, ĵetis sin en la akvon. De ĉi tie li vidis la paŝ-boaton halti dum Derŭi Korim leviĝis por stari. Ŝi palpatis la rosan tufplumetaron por la kaloto, poste ŝi rigardadis serĉe la ĉirkaŭan terenon. Sed la sange-ruĝa lumo de la malalta suno estis tiam en ŝiaj okuloj kiam ŝi rigardis laŭ la direkto de Kugel, kaj ŝi vidis nur la fragmitojn kaj la reflektito de suno sur akvo.

Kolera kaj mabonanima eĉ pli ol antaŭe, ŝi instigis la boaton al antaŭa ekiro. Ĝi marŝis, poste duonkuris, poste kuregis al la sudo.

Kugel eliris la akvon, inspektis la magian kaloton, enmetis ĝin en sian zonsaketon, rigardis retroen al Smoldo. Li komencis paŝadi suden, post paŭzis. Li prenis la kaloton el sia zonsako, fermis la maldekstran okulon, tenis la kaloton al sia dekstra okulo. Jen turis la palacoj, etaĝon sur etaĝo, turo super turo, la ĝardenoj pendantaj de la terasoj... Kugel volis rigardadi longan tempon sed Firks fariĝis malripozema.

Kugel remetis la kaloton en sian saketon kaj refoje turnis la vizaĝon por fronti la sudon, por la longa veturo reire al Almerio.



Ĉapitro 2

Cil

Sunsubiro trans la nordaj malplenejoj estis morna procedo, tiom langvora kiom la elsangiĝo de jam mortinta besto; krepusko venis dum Kugel strebis transiri la sal-marĉon. Li estis trompita de malhela ruĝa lumo de posttagmezo; komencinte transiri la malalt-tavolan malplenejon li unue trovis malsekecon subpiede, poste akvoplenan spongecon, kaj nun je ĉiuj flakoj estis koto, marĉo-graso, kelkaj larikoj kaj salikoj, **flakoj** kaj ŝlimejoj reflektantaj la plumban purpuron de la ĉielo.

En lia poŝo ripozis la viola kaloto kiun li devis transporti al la domo de Iŭkoŭnu super la rivero Zan' en Almerio. Kugel estus volinta reiri laŭ oportuno sia propra, sed Firks, tiu kolerema interplektaĵo de spikoj kaj hok-pikiloj kiun Iŭkoŭnu estis alkroĉiginta al Kugel la hepaton, permesis nenian atendemon, kaj la nura konsolo de Kugel estis esperebla oportuno por venĝo. Je la oriento estis malaltaj montetoj; al tiuj ĉi Kugel procedis, saltanta de tufkreskaĵo al tufkreskaĵo, kuranta delikate sur la krustiĝinta ŝlimo. Foje li misis je salteto, por fali sterne en la koton aŭ putrintajn fragmitojn, kiam liaj minacoj kaj insultegoj pri Iŭkoŭnu la Ridanta Magiisto atingis maksimumon de **rankoro**.

Krepuskeco daŭriĝis ĝis, ŝanceliĝanta pro laco, li atingis la deklivon de la orientaj montetoj, kie lia situacio pli malboniĝis anstataŭ boniĝis. Iuj duon-homaj rabistoj jam atentis pri lia alveno, kaj nun ili komencis atakon. Naŭza fiodoro etendiĝis al Kugel eĉ antaŭ la sono de iliaj piedpaŝoj; laciĝo forgesita, li risortis forkure, kaj estis ĉasata supren laŭ la deklivo.

Frakasita turo etendiĝis supren kontraŭ la ĉielo. Kugel ramp-kuris super putriĝantaj ŝtonoj, eltiris sian glavon, paŝadis en la malfermejon kio iam servis kiel pordejo. Interne estis silento, laodoro de polvo kaj malseka ŝtono; Kugel faletis sur la genuon kaj kontraŭ la horizonta rando vidis, ke la tri **groteskaj** formoj ekhaltis ĉe la rando de la ruinaĵoj.

Strange, pensis Kugel, tamen plaĉe — kvankam koincide iom malbonprogoze. La estuloj evidente timis la turon.

La fina resteco de krepusko foriĝis; laŭ diversaj aŭguroj Kugel grade komprenis, ke la turo estis **hantata**. Ĉirkaŭ noktomeze fantomo aperis, portanta palajn robojn kaj arĝentan kap-bandon kio tenis dudek lunjuvelojn sur longaj arĝentaj stangetoj. Ĝi rondiris proksime al Kugel, subenrigardanta per malplenaj okulo-ungoj enrigardante kiujn, oni povas perdi la pensojn. Kugel premis sin retroen kontraŭ la muro tiel, ke la ostoj knaris, senkapabla movi solan muskolon.

La fantomo parolis: “Malkonstruu tiun ĉi fortikaĵon. Dum ŝtono restas kunigita al ŝtono mi devas resti, eĉ dum tiam kiam la Tero fariĝos malvarma kaj rondiradas tra mallumeco.”

“Vole,” ronkis Kugel. “se ne estus pro tiuj atendantaj ekstere kiuj deziras preni mian vivon.”

“Ĉe la malantaŭo de la halo estas trapasejo. Agu ŝtelire kaj forte, post tio faru mian postulaĵon.”

“La fortikejo estas preskaŭ jam detruita,” deklaris Kugel fervore. “Sed kiuj cirkonstancoj ligas vin al tia ĉi neniam-malstreĉebla posteno?”

“Ili forgesiĝis; mi restas. Plenumu mian postulon, aŭ mi malbenos vin per tia ĉiamdaŭra enuo

kia la mia!”

Kugel vekigis en mallumo, dolorata de malvarmo kaj [kramfoj](#). La fantomo jam malaperis: kiom longe li dormis? Li trarigardis la pordon kaj trovis, ke la orienta ĉielo kolorigis pro la alveno de sunleviĝo.

Post atendo apenaŭ eltenebla la suno aperis, sendanta flaman radion tra la pordo ĝis la malantaŭo de la halo. Tie ĉi Kugel trovis ŝtonan ŝtuparon subeniranta al polva pasejo, kiu post kvin minutoj da malrapida palp-irado kondukis lin ree al la surfaco. El kaŝa loko li serĉigardis la grundon, kaj vidis la rabistojn, ĉe apartaj lokoj, ĉiu kaŝita malantaŭ falinta kolono.

Kugel elingigis sian glavon kaj kun ega zorgo ŝteliris antaŭen. Li atingis la unuan kaŝantan figuron, puŝis ŝtalon en la ŝnur-aspektan kolon. La estulo elĵetis la brakojn, palpegis la grundon kaj mortis.

Kugel torde eltiris sian glavon, frot-purigis ĝin kontraŭ la ledo de la mortinto. Per la plej malpeza kaj plej facila ŝtelirado li alvenis la duan rabiston de malantaŭe, kiu en sia mortado faris sonon de sufero. La tria rabisto venis por enketi.

Risortante el kaŝiĝo, Kugel trapenetris ĝin. La rabisto kriegis, eltiris sian propran ponardon kaj alsaltis por stabi, sed Kugel saltis retroe, ĵetis pezan ŝtonon kio faligis ĝin al la tero. Tie ĝi kuŝis, grimacante en malamado.

Kugel venis zorge antaŭen. “Ĉar vi alfrontas morton, diru tion al mi, kion vi scias pri kaŝita [trezoro](#).”

“Mi scias pri neniuj,” diris la rabisto. “Ĉu iu tia ekzistus, vi estus la lasta el informatoj, ĉar vi min mortigis.”

“Tio ĉi neniel estas kulpo mia,” diris Kugel. “Vi ĉasis min, ne mi vin. Kial vi faris?”

“Por manĝi, por pluvivi, kvankam vivo kaj morto estas ambaŭ egale senvaloraj kaj mi malestimas ambaŭ egalforte.”

Kugel pripensadis. “En tiu ĉi kazo vi ne bezonas senti rankoron pri mia partopreno en la transiro kion vi nun frontas. La demando pri kaŝitaj valoraĵoj refoje fariĝas taŭga. Ĉu eble vi havas finan vorton pri la afero?”

“Mi havas finan vorton. Mi montros mian solan trezoron.” La estulo serĉe palpis en sia sako, eltiris rondan blankan ŝtoneton. “Jen la kranio-ŝtono de grúho, kio ĉimomente tremegas pro potenco. Mi uzas tiun ĉi potencon por malbeni vin, por porti al vi la tujan komencon de [ŝankra](#) mortigado.”

Kugel haste mortigis la rabiston, poste ellasis pezan suspiron. La nokto estis portinta nur malfacilecon. “Iŭkoŭnu, se mi tavivus, estus ja okazonta venĝon!”

Kugel turniĝis por ekzameni la fortikaĵon. Kelkaj el la ŝtonoj disfaliĝos je nura tuŝo; aliaj bezonos multe pli da laboro. Ja eblas, ke li ne pluvivados sufiĉe longe por plenumi la taskon. Kiuj estis la terminoj de la malbeno de la rabisto? “— tuja komenco de ŝankra mortado.” Pura malicemo. La malbeno de la reĝo-fantomo estis neniel malpli subprema: kiel ĝi estis? “— ĉiamdaŭra enuo.” Kugel frotis al si la mentonon, kapjesis signifoplene. Plilaŭtiganta sian voĉon li vokis, “Lordo

fantomo, mi ne povas resti por plenumi vian postulon: mi jam mortigis la rabistojn kaj nun mi foriras. Adiaŭ kaj estu, ke la epokoj elpasadu kun rapido.”

El la profundaj partoj de la fortikaĵo venis ĝemo, kaj Kugel sentis la premon de io nekonata. “Mi aktivigas mian malbenon!” aŭdiĝis flustro en la cerbo de Kugel.

Kugel ekpaŝadis rapide al la sudoriento. “Bonege; ĉio bonas. La ‘ĉiamdaŭra enuo’ precize kontraŭas al ‘tuja komenco de ŝankra mortado’ kaj mi restas suferante nur la ‘ŝankron’ kio, en la ĉeesto de Firks, jam afliktas min. Oni devas uzi sian ruzon kiam prizorgante malbenojn.”

Li iradis trans la malplenejoj ĝis la fortikaĵo ne plu videblis, kaj baldaŭ venis refoje al la maro. Supreniranta la antaŭstrandon li rigardis je iu direkto kaj la alia laŭ la strando, vidante malhelan **promontoron** en la oriento kaj alia en la okcidento. Li subeniris al la strando, kaj ekiris orienten. La maro, malvigla kaj griza, sendis malspritan ŝaŭmon kontraŭ la sablo, kio estis glata, sen postsigno de piedpaŝoj.

Kugel ekvidis antaŭan malhelan makuleton, kiu momenton poste montriĝis kiel maljuna viro sur la genuoj, pasiganta la sablon de la strando tra **kribrilo**.

Kugel haltis por spekti. La maljunulo gestis al li per digna kapjeso kaj procedis plu pri sia laboro.

Al Kugel, la scivolemo instigis, ke li parolu. “Kion vi serĉas tiom diligente?”

La maljunulo subenmetis sian kribrilon, frotis la brakojn. “Ie laŭlonge sur la strando amuleto estis perdita fare de la patro de mia pra-patro. Dum tute la vivo li kribris sablon, esperante trovi tion kion li perdis. Lia filo, kaj post li mia avo, kaj poste la patro kaj nun mi, la lasta el mia familia linio, faradis same. Ĉie ekde Cil ni kribradis sablon, sed ankoraŭ restas ses leŭgoj ĝis Benbaĝ Stúl.”

“Ĉi tiuj nomoj estas al mi nekonataj,” diris Kugel. “Kiu loko estas Benbaĝ Stúl?”

La maljunulo indikis la kabegon ĉe la okcidento. “Antikva haveno, kvankam nun vi trovus nur disfalantan ondorompilon, malnovan kajon, unu aŭ du kabanojn. Malgraŭ tio, **barkoj** de Benbaĝ Stúl iam suriris la maron al Falgunto kaj Meŭl.”

“Refoje, regionoj kiuj preteras mian priscion,” diris Kugel. “Kio kuŝas trans Benbaĝ Stúl?”

“La tero malgrandiĝadas en la nordo. La suno pendiĝas malalte super marĉoj kaj **torfejoj**; neniu troveblas tie krom malmulte da malĝoje solaj forpedituloj.”

Kugel turnis sian atenton al la oriento. “Kaj kiu loko estas Cil?”

“Tiu ĉi tuta regno estas Cil, kion prapatro mia perde rezignis al la Domo de Dombro. Ĉiom da grandiozo estas for; restas la antikva palaco kaj vilaĝo. Trans tiuj, la lando fariĝas malhela kaj danĝera arbaro, tiom multe estis nia regno malfortiĝinta.” La maljunulo neis kape, returnis al sia kribrado.

Kugel staris rigardanta momenton, poste, piedbatante sencele en la sablo, malkovris ekbrilon de metalo. Kaŭrante, li suprenprenis **braceleton** el nigra metalo brilanta per purpura rebrilo. Ĉirkaŭ la **periferio** estis tridek sternaĵetoj havantaj la formon de veziko, ĉiu cirklita de aro da gravuritaj runoj.

“Ha!” eksklamis Kugel, montrante la braceleton. “Atentu tiun ĉi bonegan objekton: io ja trezora!”

La maljunulo submetis fosileton kaj kribrilon, leviĝis malrapide al la genuoj, poste al la piedoj. Li ekis antaŭen, bluaj okulkaj rondigitaj kaj fiksrigardantaj. Li etendis la manon. “Vi malkovris la amuleton de mia prapatraro, la Domo de Slej! Donu ĝin al mi!”

Kugel ekpaŝis retroen. “Nu, nu, vi faras ekstreme maldecan peton!”

“Ne, ne, la amuleto estas mia; vi faras malbonon per forteni ĝin. Ĉu vi volas senrezultigi la laboron de mia vivo kaj kvar vivoj antaŭ la mia?”

“Kial vi ne priĝojiĝas ĉar la amuleto troviĝis?” demandis Kugel ĝeniĝeme. “Vi nun malŝarĝiĝas de bezono de plua serĉado. Ekspliku, mi petas, la potencon de tiu ĉi amuleto. Ĝi elspiras pezan magion. Kiel ĝi profitigas la posedanton?”

“La posedanto estas mi mem,” ĝemis la maljunulo. “Mi petegas vin, estu donema!”

“Vi metas min en situacion malkomfortan,” diris Kugel. “Mia proprajaro tro malgrandas por permesi al mi donemegon, sed mi ne povas konsideri tion kiel mankon de donemo. Se vi estus trovinta la amuleton, ĉu vi estus doninta ĝin al mi?”

“Ne, ĉar ĝi estas mia!”

“Pri tio ni malkonsentas. Hipotezu, se vi povas, ke via konvinkajo malpravas. Via vidkapablo atestus, ke la amuleto estas en miaj manoj, sub mia zorgado, kaj, tiel simple, mia proprajo. Mi pridankos, tial, ajnan informon pri ĝiaj kapabloj kaj metodoj de uzado.”

La maljunulo ĵetis la brakojn supren, piedbatis sian kribrilon kun tiom sovaĝa emocio, ke li elrompis la kradon, kaj la kribrilo iris rulante malsupren sur la strando al la akvobordo. Ondo surĝis landen kaj flosigis la kribrilon; la maljunulo faris pretervolan movon por ĝin repreni, post tio refoje suprenĵetis la manojn kaj ŝancele paŝadis supren laŭ la antaŭstranda longmonteto. Kugel montris grandan malaprobbon per kapneo, kaj turniĝis por pluri orienten laŭ la strando.

Nun okazis malĝuan disputon kun Firks, kiu konvinkiĝis ke la plej ekspeda reiro al Almerio situas okcidente tra la haveno de Benbaĝ Stúl. Kugel ektenis al si la abdomenon pro doloro. “Estas nur unu sola reirota vojdirekto! Tra tiuj landoj kiuj kuŝas je la sudo kaj oriento. Kio do, se la oceano ofertas pli rektan direkton por iri? Ekzistas neniuj boatoj konvene haveblaj; kaj ne estas eble, ke oni naĝu tiom ege longan distancon!”

Firks aplikis kelkajn dolorojn por signi pridubon, sed fine permesis, ke Kugel daŭre iru orienten laŭ la marbordo. Malantaŭe, sur la supro de la antaŭstrando, sidis la maljunulo, fosileto pendanta inter la gamboj, fiksrigardante elen trans la maro.

Kugel pluiris laŭ la strando, bone plaĉita pro la eventoj de la mateno. Li ekzamenis la amuleton longatempe: ĝi ekzudis riĉan sencon de magio, kaj krome estis objekto nemal multe bela. La runoj, engravuritaj kun artista lertego kaj delikateco, malbonŝance preteris lian kapablon elĉifri. Li facilzorge glitis la braceleton sur sian pojnon, kaj tiel farante premis hazarde unu el la sternaĵoj. El iu nekonata loko venis abisme profundan ĝemon, sono de la pleja dolorego. Kugel ekhaltis, rigardis ambaŭdirekte laŭ la strando. Griza maro, pala strando, antaŭstrando kun tufaj aroj da sabloherbo. Benbaĥ Stúl en la nordo, Cil oriente, griza ĉielo supre. De kie venis la granda ĝemo? Zorge Kugel

tuŝis la sternaĵon refoje, kaj refoje kaŭzis aŭdiĝi la vundita plendego.

Fascinite Kugel premis alian el la sternaĵoj, ĉifoje kaŭzante el ie dolorkrio de kompatinda malespero en alia voĉo. Kugel perpleksiĝis. Kiu laŭlonge de tiu ĉi morna strando manifestis tiom frivola dispozicio? Li premis ĉiun sternaĵon en vica ordo kaj kaŭzis soniĝi tutan koncerton da elkrioj, en ĉiu grado de korŝiro kaj doloro. Kugel pristudis la amuleton kritike. Krom la elvokado de ĝemoj kaj ploregoj ĝi montris neniun memevidentan potencon kaj Kugel baldaŭ tediĝis pri la okupo.

La suno atingis sian **zeniton**. Kugel kvietigis sian malsaton per marplantaĵo, kiun li faris nutra per froti ĝin kun la sorĉileto provizita por tiu ĉi celo fare de Iŭkoŭnu. Manĝante li ŝajnis aŭdi voĉojn kaj senzorgan babiladan ridadon, tiom mallaŭtan, ke ĝi povus esti la sono de **surfo**. Langformaĵo el roko etendiĝis en la maron apude; aŭskultante zorge, Kugel malkovris ke la voĉoj venis el tiu direkto. Ili estis klaraj kaj infansonaj, kaj sonoritis de malkulpa ĝojado. Li iris zorge elen sur la roko. Ĉe la fora ekstremo, kie la oceano surĝis kaj malhela akvo ondis forte, kvar grandaj ŝeloj estis alfiksintaj sin. Tiuj ĉi situis klape malfermaj; kapoj elrigardis, konektitaj al nudaj ŝultroj kaj brakoj. La kapoj estis rondaj kaj belaj kun molaj vangoj, blue grizaj okuloj, tufaj palaj hararoj. La estuloj mallevis la fingrojn en la akvon, kaj el la gutoj ili lertmane teksis fajnan molan teksaĵon. La ombro de Kugel falis sur la akvon; tuje la estuloj fermis sin klape ene de siaj ŝeloj.

“Kial tiel?” eksklamis Kugel ŝerce. “Ĉu vi ĉiam ŝlosas vin for de vido de stranga vizaĝo? Ĉu vi estas tiel timemaj? Aŭ ĉu nur malagrablaj?”

La ŝeloj daŭris resti fermitaj. Malhela akvo ondetis kirle super la kanelitaj surfacoj.

Kugel venis unu paŝon pli proksime, kaŭris por sidumi sur la kruroj, klinis flanken la kapon. “Aŭ eble vi estas fieraj? Tiel, ke vi fortiras vin pro malŝato? Aŭ ĉu estas, ke en vi graco mankas?”

Ankoraŭ ne estis respondo. Kugel restis kiel antaŭe, kaj komencis **fajfi**, **tril**-fajfante kantaĵon kiun li estis aŭdinta ĉe Arzenomea Foiro.

Postnelonge la ŝelo ĉe la fora rando de la roko malfermiĝetis por montri fendon, kaj okuloj elrigardis al li. Kugel fajfis pluan strofon aŭ du, poste parolis plu. “Malfermu viajn ŝelojn! Jen atendas fremdulon, ansia por ekscii la vojon kondukantan al Cil, kaj aliajn gravajn aferojn!”

Alia ŝelo malfermiĝis je fendeto; alia paro da okuloj briletadis el la malheleco interna.

“Eble vi estas malkeraj,” mokis Kugel. “Eble vi scias nenion krom la koloroj de fiŝoj kaj la malsekeco de akvo.”

La ŝelo de la pli malproksima malfermiĝis iom plu, sufiĉe por montri la indignan vizaĝon internan. “Ni estas laŭ neniun senco malkleraj!”

“Nek mallaboremaj, nek mankaj je gracio, nek malŝatemaj, nek malagrablaj,” diregis la dua.

“Ne timemaj!” aldonis tria.

Kugel kapjesis saĝesprime. “Tio povas ja esti. Sed kial vi fortiris vin tiel abrupte je mia nura proksimiĝo?”

“Tiel estas nia naturo,” diris la unua ŝelulino. “Certaj estuloj de la maro feliĉus trovi, se ni

senatentus, kaj estas saĝe retreti unue kaj enketi due.”

Ĉiuj kvar el la ŝeloj nun estis malfermitaj, kvankam neniu estis tiel plene malfermitaj kiel tiam, kiam Kugel estis ĵus alvenata.

“Nu do,” li diris, ”kion vi povas diri al mi pri Cil? Ĉu nekonatoj renkontiĝas kun afableco, aŭ forpeliĝas? Ĉu gastejoj troveblas, aŭ ĉu la veturanto devas dormi en vojflanka fosaĵo?”

“Tiaj aferoj preteras nian specifan priscion,” diris la unua ŝelulino. Ĝi malfermis plene sian ŝelon, etendis palajn brakojn kaj ŝultrojn. ”La popolo de Cil, se onidiro de la maro pravas, estas retretemaj kaj suspektemaj, eĉ inkluzive de sia estrino, kiu estas knabino, nenio pli, el la antikva Domo de Dombro.”

“Jen paŝadas maljuna Slej nun,” diris alia. “Li reiras frue al sia kabano.”

Alia ridis ete. “Slej maljunas; neniam trovos li sian amuleton, la Domo de Dombro regos ĝis la suno estingiĝos.”

“Kio estas ĉio ĉi?” demandis Kugel. “Pri kiu amuleto vi parolas?”

“Tiom longe kiel la memoro raportas,” unu el la ŝelulinoj eksplikis, “maljuna Slej kribradis sablon, kaj lia patro antaŭ ol li, kaj ankoraŭ pliaj Slej-oj tra la jaroj. Ili serĉas metalan bandon, per kio ili esperas regajni siajn antikvajn privilegiojn.”

“Fascina legendo!” diris Kugel entuziasme. “Kiu estas la potencoj de la amuleto, kaj kiel ili aktiviĝas?”

“Elbe Slej havus tiujn ĉi informojn,” diris unu dubeme.

“Ne, pro li estas severa kaj malbonhumora,” deklaris alia. “Konsideru lian sintenon pri iritiĝo tiam, kiam li kribras fosaĵon da sablo por nenia rezulto!”

“Ĉu ekzistas neniom da informo aliloke?” Kugel demandis anxie. “Neniu onidiro de la maro. Neniu antikva tableto aŭ aro da piktogramoj?”

La ŝelulinoj ridis pro amuziĝo. “Vi demandas tiel serioze, ke vi povus mem esti Slej! Tiaj scioj estas al ni nekonataj.”

Kaŝante sian malplaĉiĝon, Kugel demandis pri pluaj aferoj, sed la estuloj estis distriĝemaj kaj ne povis koncentrigi la atenton sur iu ajn sola afero. Dum Kugel aŭskultadis, ili diskutis la fluadon de la oceano, la guston de perloj, la eviteman sintenon de certa mar-estulo kiun ili estis observintaj la tagon antaŭan. Post kelkaj minutoj Kugel refoje turnis la konversacion, ke ĝi temu pri Slej kaj la amuleto, sed refoje la ŝelulinoj estis malspecifaj, preskaŭ infanecaj en la senkonsekvenceco de ilia babilado. Ili ŝajnis forgesi pri Kugel, kaj mallevente la fingrojn en la akvon, tiris palajn fadenojn el la gutoj. Certaj **konkuloj** kaj **bukcenoj** estis agacintaj ilin pro sia impertinenteco, kaj ili diskutis pri granda urno kuŝanta sur la mara plafono for de la strando.

Kugel fine tediĝis pri la konversacio kaj stariĝis, je kiu okazo la ŝelulinoj refoje donis al li sian priatenton. “Ĉu vi devas foriri tiel frue? Ĝuste tiam, kiam ni estis demandontaj la kialon de via ĉeesto; preterpasantoj estas malmultaj laŭ la Granda Sabla Strando, kaj vi ŝajnas esti tia viro kiu

vojaĝis longe.”

“Tio estas prave,” diris Kugel, “kaj mi devas vojaĝi ankoraŭ plu. Atentu la sunon: ĝi komencas subeniri laŭ la okcidenta kurbo, kaj hodiaŭ nokte mi volas endomigi min ĉe Cil.”

Unu el la ŝelulinoj levis la brakojn kaj montris bonegan vestaĵojn, kion ĝi teksis el akvo-fadenoj. “Tiun ĉi vestaĵon ni ofertas kiel donaco. Vi ŝajnas esti sensitiva viro kaj tial eble bezonas ŝirmon de la vento kaj malvarmo.” Ĝi ĵetis la vestaĵon al Kugel. Li inspektis ĝin, mirante pri la supleco de la teksaĵo kaj ĝia ondeta lumado. “Mi ja dankas vin,” diris Kugel. “Tio ĉi estas donemo plia ol mi antaŭvidis.” Li volvis sin en la vestaĵo, sed tuj ĝi reŝanĝiĝis en akvon kaj Kugel plene ekmalŝekiĝis. La kvaropo en la ŝeloj kriis en **petola** amuzego, kaj kiam Kugel alpaŝis venĝe antaŭen, tiam ili ekfermis la ŝelojn.

Kugel piedbatis la ŝelon de la estulino kiu estis ĵetetinta al li la vestaĵon, kontuzante sian piedon kaj pliigante sian koleregon. Li ekprenis pezan ŝtonon, faligis ĝin suben al la ŝelon, dispremante ĝin. Ektiranta la estulinon, Kugel ĵetegis ĝin longe for sur la strandon, kie ĝi kuŝis fiksrigardanta lin, kapo kaj etaj brakoj kun palaj intestoj. En malforta voĉi ĝi demandis lin, “Kial vi traktas min tiel? Pro petolaĵo vi prenas de mi la vivon, kaj mi havas neniun alian.”

“Kaj tiel vi estos malebligata je pluaj petolaĵoj,” deklaris Kugel. “Atentu, vi sekigis min ĝis la haŭto!”

“Ĝi estis nur ageto petola; malgranda afero certe.” La ŝelulino parolis en fadanta voĉo. “Ni el la rokoj scias malmultan magion, tamen al mi doniĝis la povo por malbeni, kaj tion ĉi mi nun prononcas: estu ke vi perdu la plejan deziron de via koro, kio ajn ĝia naturo; vi estos domaĝigota antaŭ ol forpasos unu sola tago.”

“Ĉu plua malbeno?” Kugel kapneis en malplezuriĝo. “Du malbenojn jam mi nuligis je ĉi tiu tago; nun mi afliktiĝis per alia?”

“Tiun ĉi malbenon vi ne nuligos,” flustris la ŝelulinon. “Mi faras, ke ĝi estu la fina faraĵo de mia vivo.”

“Malico estas kvalito malestiminda,” diris Kugel agacite. “Mi dubas la efikecon de via malbeno; malgraŭ tio, mi vin bone admonas, ke vi purigu la aeron de ĝia fiodoro kaj tiel regajni mian bonopinion.”

Sed la ŝelulino diris nenion plu. Baldaŭ ĝi kolapsis por fariĝi nubeca ŝlimo kaj **sorbiĝis** en la sablon.

Kugel ekiris for laŭ la strando, konsiderante pri kiel pli bone li evitu la konsekvencojn de la malbeno de la ŝelulino. “Oni devas uzi la intelekton kiam traktante malbenojn,” Kugel diris por la dua fojo. “Ĉu mi nomiĝas Kugel la Ruza pro nenio?” Neniu taktiko leviĝis en la menso, kaj li pluiris laŭ la strando pripensante la aferon je ĉiuj ĝiaj aspektoj.

La promontoro orienta fariĝadis klara. Kugel vidis, ke ĝi kovriĝis de altaj malhelaj arboj, tra kiuj ekvidebletis blankaj konstruaĵoj. Slej montris sin refoje, kuranta ien kaj tien trans la strando tiel, kiel iu freneziĝinta. Li venis al Kugel, falis sur la genuojn. “La amuleto, mi petegas vin! Ĝi apartenas al la Domo de Slej; ĝi ebligis al ni la estradon de Cil! Donu ĝin al mi kaj mi plenumos al vi la plejan deziron de via koro!”

Kugel ekhaltis. Jen intriga **paradokso!** Se li cedus la amuleton, Slej evidente perfidos lin, aŭ je la pleja minimumo malsukcesus plenumi sian promeson — supozante, ke la malbeno vere potencus. Je la alia flanko, se Kugel tenadus al si la amuleton, li perdus la plejan deziron de la koro je ne malplia grado — supozante la veron de la malbeno — sed la amuleto restus ankoraŭ lia.

Slej miskomprenis la heziton por esti signo de fleksebleco. “Mi faros vin grandulo de la regno!” li kriis en fervora voĉo. “Vi havos barĝon el skulptita eburo, ducent belvirinoj servos vin je ĉiuj deziroj; viaj malamikoj estos fermegataj en rondiranta **kaldrono** — nur donu al mi la amuleton!”

“La amuleto provizas tiom multe da potenco?” demandis Kugel. “Estas eble estigi ĉion ĉi?”

“Ja, ja!” kriis Slej, “kondiĉe, ke oni povas legi la runojn!”

“Nu, do,” diris Kugel, “kio estas ilia signifo?”

Slej alrigardis lin en bedaŭra vundiĝo. “Tion mi ne povas diri; mi devas havi la amuleton!”

Kugel faris fanfaronan mangeston signe je malestimo. “Vi rifuzas plaĉi mian kuriozemon; je mia vico mi kontraŭdiras viajn arogantajn ambiciojn!”

Slej turniĝis por rigardi al la promontoro, kie blankaj muroj lumis inter la arboj. “Mi komprenas ĉion. Vi planas estri super Cil en via propra memo!”

Ekzistsi malpli dezireblajn oportunojn, pensis Kugel, kaj Firks, komprenante iom de tio, faris admonan kunpremon. Bedaŭrante Kugel forlasis la koncepton; tamen, ĝi sugestis rimedon por nuligi la malbenon de la ŝelulino. “Se mi estos malhavigita disde mia elkora deziro,” Kugel diris al si, “estus saĝe, ke mi ekdecidu pri nova celo, pri fervora nova prientuziasmaĵo, por almenaŭ unu-taga tempopaso. Mi do tial aspiras al la estrado de Cil, kio nun fariĝas la pleja deziro de mia koro.” Por ke li ne aktivigu la gardegemon de Firks, li diris laŭte, “Mi planas uzi tiun ĉi amuleton por ege gravaj celoj. Eble inter ili estas la lorda estrado de Cil, kion mi rajtas pro rimedo de la amuleto.”

Slej faris sovaĝan sardonan ridon. “Unue vi devas konvinki al Derŭi Korim pri via aŭtoritato. Ŝi estas el la Domo de Dombro, malbonhumora kaj tromeagema; ŝi aspektas esti malpli ol knabino, sed ŝi manifestas la malfeliĉeman senzorgemon de arbara grúho. Estu singarda kontraŭ Derŭi Korim; ŝi ordonos, ke vi kaj mia amuleto estu ĵetitaj en la oceanan profundejon!”

“Se vi timas tiom ĉi multe,” diris Kugel en severa voĉtono, “instruu min pri la uzado de la amuleto, kaj mi malhelpos tiun katastrofon.”

Sed Slej muele kapneis. “La malbonaĵoj de Derŭi Korim estas konataj; kial interŝanĝi ilin por la fremdecaj **eksceso** de vagabondo?”

Pro lia troparolemo Slej ricevis baton kio puŝis lin ŝancelige. Kugel poste ekiris laŭ la strando. La suno vadis malalte ĉe la maro; li hastigis siajn paŝojn, ansia por trovi ŝirmejon antaŭ venos mallumiĝo.

Li venis post longe al la fino de la strando. La promontoro staris supere, kun la altaj malhelaj arboj starante ankoraŭ pli alte. **Balustrado** ĉirkaŭ-ĝardena montriĝis fojfoje tra la foliaro; iom sube, kolonara **rotondo** superstaris montrante la maron sude. Ja grandioze! pensis Kugel, kaj li pristudis la amuleton kun nova atentemo. Lia dumtempa deziro de l’ koro, estrado super Cil, malfariĝis fikcia.

Kaj Kugel primeditis, ĉu eble li ne fiksiĝu sur nova deziro de l' koro — aspiro mastrumi la sciaron de besta prizorgado, ekzemple, aŭ deviga urĝo por majstri je akrobataj bravaĵoj... Kun bedaŭro, Kugel malakceptis la planon. Je ajna okazo, la forteco de la malbeno de la ŝelulino ankoraŭ ne certis.

Piedvojo forkondukis de la strando, por serpenti supren inter arbustoj kaj odoraj arbustetoj: dîmfio, **heliotropo**, nigra **cidonio**, kampetoj da long-tigaj ŝtelgutoj, ombra vérvetiko, flora **amanito**. La strando aspektis fariĝi rubando fadiĝanta brunruĝa malklaraĵo de sunsubiro, kaj la promontoro ĉe Benbaĝ Stul ne plu vidiĝis. La piedvojo ebeniĝis, trairis densan arbareton da **laŭroj**, kaj elkondukis al herbaĉ-kovrita ovalo, kio ajnatempe estis parada aŭ ekzerca kampo.

Iom for ĉe la maldekstra bordo estis alta ŝtona muro, rompita de granda ceremonia portiko kiu tenis supren **heraldika** objekto ege antikva. La pordobariloj staris plene malfermaj, enkondukantaj al marmore pavimita promenejo longa je mejlo kaj kondukanta al la palaco: tiu ĉi estanta riĉe detala konstruaĵo el multaj tavoloj, kun verda bronza tegmento. Teraso etendiĝis laŭ la longo de la fronto de la palaco; promenejo kaj teraso kuniĝis per aro da larĝaj ŝtupoj. La suno jam malaperis; malheleco subenfalis el la ĉielo. Malhavante pli bonan oportunon, Kugel ekiris al la palaco.

La promenadejo iam estis konstruaĵo elegantega, sed nun estis en stato disfalanta, kion la krepusko plenigis per malĝojeta belo. Dekstre kaj maldekstre estis detalegaj ĝardenoj nun nezorgataj kaj trokreskintaj. Marmoraj urnoj **festonitaj** per el **karneolo** kaj jado flankis la promenejo; laŭlonge en la mezo etendiĝis linio da piedestaloj iom pli altaj ol viro. Ĉiu el tiu ĉi subtenis **buston**, identigita de surskribaĵo en runoj kiujn Kugel rekonis kiel similaj al tiuj gravuritaj en la amuleto. Le piedestaloj apartiĝis je kvin futoj, kaj estis sternitaj laŭ la tuta mejlo ĝis la teraso. La skulptaĵo de la unuaj estis mola pro ventoj kaj pluvoj tiel ke la vizaĝoj apenaŭ distingeblis; dum Kugel pluiris la vizaĝ-aspektoj fariĝadis pli detalaj. Piedestalon post piedestalo, buston post busto; ĉiu vizaĝo fiksrigardis momente al Kugel dum li marŝis al la palaco. La lasta el la serio, malklara en la fadanta lumo, montris junan virinon. Kugel ekhaltis: tiu ĉi estis la knabino de la paŝanta boato, kiun li renkontis en la lando de la nordo: Derŭi Korim, el la Domo de Dombro, estrino de Cil!

Maltrankviligita de duboj, Kugel paŭzis por konsideri la masivan portalon. Li ne estis apartiĝinta de Derŭi Korim en amikeco; oni povas ja atendi, ke ŝi tenadu indigon. Aliflanke, je ilia ekrenkontiĝo, ŝi invitis lin al ŝia palaco, uzante frazojn de nemiskomprenebla varmeteco; eble ŝia indigno estus malaperinta, lasante nur la varmetecon. Kaj Kugel, rememorante ŝian rimarkindan belecon, trovis stimulgiga la eblecon de dua renkonto.

Sed kio, se ŝi ankoraŭ indignus? Ŝi devas impresiĝi pri la amuleto, kondiĉe ke ŝi ne insistu, ke Kugel montru ĝian uzadon. Nur se li sciis kiel legi la runojn, ĉio estus simplega afero. Sed pro tio ke la scio ne eblas akiriĝi de Slej, li devas serĉi ĝin aliloke, kio en praktiko signifas, ke li faru en la palaco.

Li staradis antaŭ aro da malaltaj ŝtupoj kondukantaj supren al la palaco. La marmoraj ŝtuptraboj havis fendojn; la balustrado laŭlonge de la teraso havis makulojn el musko kaj **likeno**: situacio kion la mallumo de krepusko plenigis kun morna grandiozeco. La palaco malantaŭa ŝajnis esti en iom pli bona ripariteco. Ege alta **arkado** etendiĝis supren de la teraso, kun maldikaj kanelitaj kolonoj kaj detalege skulptitaj **entablementoj**, la dezajnon de kiuj Kugel ne povis vidi klare tra la mallumo. Ĉe la malantaŭo de la arkado estis altaj arkaj fenestroj, montrantaj malfortajn lampojn, kaj la grandega portalo.

Kugel surpaŝis la ŝtupojn, maltrankviligita de novaj duboj. Kio se Derŭi Korim priridus liajn

pretendojn, defie kontestus lin al farado de lia pleja malbono? Ĝemoj kaj elkrioj eble ne sufiĉus. Li transiris la terason sur hezitemaj paŝoj, optimismo fadanta dumirade, kaj haltis sub la arkado; eble, konsiderante ĉion, estus pli bone serĉi ŝirmejon aliloke. Sed rigardante malantaŭen li pensis, ke li vidis altan senmovan formon starantan inter la kolonoj. Kugel ekĉesis pripensi serĉadon de aliloka ŝirmejo, kaj paŝis rapide al la altan pordon; se li prezentus sin en humila aspekto li eble eskapus la atenton de Derŭi Korim. Okazis ŝtelira sono sur la ŝtupoj. Kun ege grava hasto li funkciigis la frapilon. La sono eĥis interne de la palaco.

Minuto pasadis, kaj Kugel pensis, ke li aŭdis pluajn sonojn malantaŭ si. Li frapadis refoje, kaj refoje kaj la sono eĥadis interne. Spiontruo malfermiĝis, okulo studis Kugel-on kun zorgo. La okulo moviĝis supren; buŝo aperis. “Kiu vi estas?” parolis la buŝo. “Kion vi volas?” La buŝo glitis for, por montri oreton.

“Mi estas vojaĝanto, mi deziras ŝirmejon por la nokto, kaj haste ĉar estulo minaca alproksimiĝas.”

La okulo reaperis, rigardis zorge trans la teraso, revenis por fokusi al Kugel. “Kiu estas viaj kvalitoj; kie viaj certigaj dokumentoj?”

“Mi havas neniujn,” diris Kugel. “Mi ege preferas diskuti la aferon interne, pro tio ke la estulo paŝon post paŝo supreniras al la teraso.”

La spiontruo frape ekfermiĝis. Kugel fiksrigardis la senornaman pordon. Li laŭte sonigadis la frapilon, stude rigardante retroen en la mallumon. Kun grato kaj knaro la portalo malfermiĝis. Malgranda diketa viro portanta purpuran uniformon gestis al li. “Internen, kun hasto.”

Kugel glitis rapide tra la pordo, kion la lakeo tuj tiregis malferme kaj sekuris per tri feraj stangetoj. Dum tion li faris, sammomente okazis knaro kaj premo sur la pordo.

La lakeo frapis laŭte sur la pordon per sia pugno. “Mi obstaklis la estulon refoje,” li diris kun memplaĉa sento. “Se me estus malpli rapidema, ĝi estus ekatakinta vin, je mia maltrankviliĝo same kiel la via. Tio ĉi nun estas mia ĉefa amuzo, malpermesanta la estulon je ĝiaj plezuroj.”

“Jes ja,” diris Kugel, spirante peze. “Kia speco de estulo ĝi estas?”

La lakeo prigestis sian nescion. “Nenio preciza prisciiĝas. Ĝi nur proksima-tempe aperis, por staradi kaŝe je noktoj inter la statuoj. Ĝiaj kutimoj estas kaj vampiraj kaj preternature voluptaj, kaj kelkaj inter miaj kunuloj havas kaŭzojn por plendi; fakte, ĉiu jam mortis pro ties abomenindaj faradoj. Do poste, por distri min, mi mokas la estulon kaj kaŭzas al ĝi malplaĉiĝojn.” La lakeo paŝetis retroen, por stude rigardi al Kugel kun atentemo. “Kio pri vi? Via maniero, la kliniĝo de via kapo, la svingado de viaj okuloj flank-al-flanke montras riskemon kaj emon ekagi hazarde. Mi fidas, ke vi entenos tiujn ĉi kvalitojn kvietigitaj, sed ili prave ekzistas.”

“Je tiu ĉi momento,” diris Kugel, “miaj deziroj estas simplaj: alkovo, litseĝo, mordeton da manĝaĵo por mia vespermanĝo. Se mi aldonaciĝas per ĉi tiuj, vi trovos min esti dankemo personigita; mi ja helpos vin je viaj plezuroj, kune ni elpensos taktikojn por moklogi la [ĥulon](#).”

La lakeo riverencis, “Viaj bezonoj povas plenumiĝi. Ĉar vi estas veturinto de malproksime, nia estrino volus alparoli vin, kaj ja eble ofertos bonvenigaĵojn multe pli grandiozajn ol viaj minimumaj bezonoj.”

Kugel rapide kontraŭdiris ajnan tian ambicion. “Mi estas el malalta kvalito; miaj vestoj malpuras, mia memo fiodoras; mia konversacio konsistas el malinteresaj banalaĵoj. Pli bone, ke oni ne trudu al la estrino de Cil.”

“Ni riparos tiom da malsufiĉaĵoj kiom ni povas,” diris la lakeo. “Sekvu, se vi volas.”

Li gvidis Kugelon laŭ koridoroj lumigitaj de sursangaj tasolampoj, fine turniĝanta al apartementaro. “Ĉi tie vi rajtas lavi; mi brosos viajn vestaĵojn kaj trovos freŝajn litotukojn.”

Kugel malvole demetis al si la vestojn. Li banis, tondis la molan nigran plataĵon de siaj haroj, razis la barbon, frotis la korpon per forte ordora oleo. La lakeo portis freŝajn vestojn, kaj Kugel, multe refreŝigita, vestis sin. Surmetante la jakon li hazarde tuŝis la amuleton sur la pojno, premante unu el la sternaĵoj. De profunde sub la plafono venis gemo el la plej profunda turmento.

La lakeo ristortadis ĉirkaŭdirekte en teruro, kaj lia okulo ekatentis la amuleton. Li fiksrigardis en malfermbuŝa mirsurprizego, poste fariĝis sklave ĝentilega. “Mia kara sinjoro, ĉu mi estus rekoninta vian identon, mi estus kondukinta vin al apartamentoj oficialaj, kaj elpreninta la plej luksajn robojn.”

“Mi neniel plendas,” diris Kugel, “kvankam la litotukoj ja estis iomete nefreŝaj.” Kun ŝerca emfazo li frape tuŝetis sternaĵon ĉe la pojno, kaj responda ĝemo kaŭzis, ke la genuoj de la lakeo interfrapi.

“Mi petegas vian komprenon,” li diris tremvoĉe.

“Ne necesas diri pli,” diris Kugel. “Ja estis mia espero viziti la palacon rekonata, iel, por ke mi trovu tion, kiel aferoj plenumiĝas.”

“Tiel estas saĝe,” kunsentis la serviston. “Sendube vi volos maldungi ambaŭ la ĉambelanon kaj la suban kuiriston post kiam iliaj pekemoj fariĝos lumigitaj. Rilate al mi mem, kiam via moŝto riparos al Cil, ke ĝi rehavu ĝian antikvan grandiozon, eble tiam estos modestan [sinekuron](#) por Jodo, la plej lojala kaj obeema inter via servistaro.”

Kugel faris gracian geston. “Se tia ĉi evento ja estus okazonta — kaj ĝi estas la pleja deziro de mia koro — vi ne estus neglektota. Por la baldaŭa tempo mi restados kviete en tiu ĉi apartamento. Vi povas porti tien ĉi decan manĝaĵaron kun diversa aro da bonegaj vinoj.”

Jodo gestis per svinga riverenco. “Ĉio laŭ la deziro de via moŝto.” Li foriris. Kugel malstreĉiĝis sur la plej komforta litseĝo de la ĉambro kaj komencis studi la amuleton kio tiel eke vokis la fidelon de Jodo. La runoj, kiel antaŭe, estis nelegeblaj; la sternaĵoj produktis nur ĝemojn, kiuj, kvankam distraj, havis malmultan praktikan utilecon. Kugel provis ĉiun ordonon, devigon, striktigon kaj interkonsentaĵon kiujn lia priscieta de sorĉismo povis provizi, senrezulte.

Jodo revenis al la apartamenton, sed sen la bonmanĝaĵaro kion Kugel estis mendinta.

“Via moŝto,” diris Jodo, “Mi havas la honoron por transporti al vi inviton de Derŭi Korim, antaŭa estrino de Cil, ke vi ĉeestu kun ŝi ĉe la vespera bankedo.”

“Kiel eblas tio ĉi?” postule demandis Kugel. “Ŝi estas eksciinta nenion pri mia ĉeesto; laŭ mia memoro, mi diris al vi specifajn instrukciojn pri ĉi afero.”

Jodo faris pluan profundan riverencon. “Nature mi obeis, via moŝto. La lertmetodoj de Derŭi Korim preteras mian komprenopovon. Per iu devizo ŝi eksciis pri via ĉeesto kaj pro tio etendiĝas la invito kiun vi ĵus aŭdis.”

“Nu do,” diris Kugel malĝoje. “Estu tiom ĝentila, ke vi gvidu. Vi menciis mian amuleton al ŝi?”

“Derŭi Korim scias ĉion,” estis la ambigua respondo de Jodo. “Sekvu min, via moŝto, se tio plaĉas.”

Li gvidis Kugelon laŭ la malnovaj koridoroj, fine tra alta mallarĝa arko en grandan halon. Je ambaŭ flankoj staris vico da io, kio ŝajnis esti militistoj en latunaj **kiraso**j kun kaskojo el kvadratigita ostaĵo kaj **gagato**; kvardek entute, sed nur ses ensembloj de armaĵo okupiĝis de vivantaj viroj, la aliaj estante subtenataj sur rako. **Atlantoj** el troigita longeco kaj groteske torditaj vizaĝoj subtenis la fume makulitajn trabojn; riĉa tapiŝo kun verdaj samcentraj cirkloj sur nigra fono kovris la plafonon. Derŭi Korim sidis ĉe la fino de cirkla tablo, tiu ĉi estante tiom masiva, ke ĝi donis al ŝi ŝajnecon, ke ŝi estus knabino, malĝojema pripensadema knabino de la plej delikata beleco. Kugel alproksimiĝis kun malbonprognosa rezignemo, ŝiaj okuloj fiksitaj al la amuleto. Ŝi ensuĉis grandan spiron. “Al kiu havas mi la plezuron paroli?”

“Mia nomo ne gravas,” diris Kugel. “Vi rajtas saluti min per ‘Moŝto’.”

Derŭi Korim ŝultrolevis indiferece. “Laŭ via prefero. Mi iom rekonas vian vizaĝon. Vi similas al vagabondo kiun antaŭnelonge mi ordonis esti vipata.”

“Mi estas tiu vagabondo,” diris Kugel. “Mi ne povas diri, ke via konduto ne lasis **reziduon** de maldankemo kaj mi nun venis por postuli eksplikon.” Kaj Kugel tuŝis sternaĵon, vokante ĝemon tiom senesperan ke la kristalaj teleraĵoj tremetis sur la tablo.

Derŭi Korim palpebrumis kaj ŝia buŝo subfleksiĝis. Ŝi parolis malgracie. “Ŝajnas, ke miaj agoj malbone elpensiĝis. Mi ne perceptis vian moŝtan staton, kaj pripensis vin esti nur la aĉe stata fripono kion via aspekto sugestas.”

Kugel paŝis antaŭen, metis la manon sub ŝia eta pinta mentono, turnis supren la eksvizita vizaĝo. “Tamen vi invitis, ke mi vizitu vin ĉe via palaco. Ĉu vi memoras ĉi tion?”

Derŭi Korim faris kontraŭvolan kapjeson.

“Ĝuste tiel,” diris Kugel. “Jen mi estas.”

Derŭi Korim ridetis, kaj dum ioma tempo fariĝis alloga. “Tiel vi estas, kaj fripono, vagabondo, aŭ kiel ajn via naturo, vi portas la amuleton per kiu la Domo de Slej estris trans du cent generacioj. Vi devenas el tiu domo?”

“Iom-post-iom vi konos min bone,” diris Kugel. “Mi estas donema viro, kavankam iom kaprica, kaj se ne estus pro iu Firks... Malgraŭ tio, mi malsatas, kaj nun mi invitas vin partopreni la bankedon kion mi mendis esti portata al mi fare de bonega Jodo. Estu tiom ĝentile, ke vi moviĝu flanken je unu aŭ du seĝoj, kaj mi sidiĝos.”

Derŭi Korim hezitis, je kio la mano de Kugel moviĝis sugeste al la amuleto. Ŝi moviĝis sprite kaj Kugel komfortigis sin sur tiu seĝo ĵus antaŭe elsidiĝita de ŝi. Li frapetis sur la tablon: “Jodo? Kie

Jodo?”

“Jen mi, Moŝto!”

“Elportu la bankedon: la plej bonajn manĝaĵojn kion havas la palaco!”

Jodo riverencis, kaŭre ekiris for, kaj post nelonge aperis vico da lakeoj portantaj plejtojn kaj flakonojn, kaj tiel aranĝiĝis sur la tablo bankedo pli bona ol tio, kion Kugel atendis.

Kugel elprenis la sorĉilon provizitan de Iŭkoŭnu la Ridanta Magiisto, kiu povis ne nur ŝanĝi organikan forĵetaĵon en nutraĵojn, sed ankaŭ atentigi per sonoro kiam apud toksaj substancoj. La unuaj kelkaj teleroj estis **salubraj** kaj Kugel manĝis entuziasme. La malnovaj vinoj de Cil estis same bonsanaj, kaj Kugel drinkis abunde, el pokaloj el nigra vitro, skulptita **cinabro** kaj **eburo** enkrustitaj de turkiso kaj **perlamoto**.

Derŭi Korim ludumis pri sia manĝaĵo, trinketis sian vinon, rigardanta al Kugel pensoplene la tutan tempon. Pliaj frandaĵoj portiĝis kaj nun Derŭi Korim kliniĝis antaŭen. “Ĉu vere vi planas reĝi en Cil?”

“Jen la pleja deziro de mia koro!” deklaris Kugel kun fervoro.

Derŭi Korim moviĝis proksime al li. “Ĉu vi do prenos min kiel via edzinulino? Diru jes; vi estos pli ol kontenta.”

“Ni vidos tion, kion ni vidos,” diris Kugel vastigante. “Ĉi tiu vespero estas la nuna vespero, morgaŭ estos morgaŭ. Multaj ŝanĝoj okazos, tio ĉi estas certa.”

Derŭi Korim ridetis milde, kapjesis al Jodo. “Portu la plej antikvan el niaj vinoj, ni drinkos je la sano de la nova Lordo de Cil.”

Jodo riverencis, kaj portis malbrilan flakonon kovritan de polvo kaj araneaĵo, kiun li malfermis kun ega ceremonieco, kaj **dekantis** en kristalajn pokalojn. Kugel levis sian pokalon, kaj la sorĉilo sonoris averton. Kugel abrupte subenmetis la pokalon, kaj rigardis dum Derŭi Korim levis la propran al siaj lipoj. Li etendis transe, prenis la pokalon, kaj refoje la sorĉilo sonoris. Veneno en ambaŭ? Strange. Eble ŝi ne planis drinki. Eble ŝi jam **ingestis** la kontraŭvenenon.

Kugel signalis al Jodo. “Plian pokalon, se plaĉas al vi... La dekantilan ujon.” Kugel verŝis trian porcion kaj refoje la sorĉilo indikis pri malbonegeco. Kugel diris, “Kvankam tio, ke mia konado pri la bonega Jodo estas el mallonga daŭro, mi tre bone impresiĝis pri lia valoro, kaj mi nun levas lin al la posteno Majordomo de la Palaco!”

“Moŝto,” balbutis Jodo, “tio ĉi estas ja aparta honoro.”

“Drinku tial el la antikva bonvino, por solenigi tiun ĉi novan dignecon!”

Jodo riverencis profunde. “Kun la plej kore sentita dankemo, Moŝto.” Li levis la pokalon, trinkis. Derŭi Korim rigardis indiferente. Jodo subenmetis la pokalon, malridetis, faris **konvulsian** ekmovon, turnis por montri alarmitan esprimon al Kugel, falis al la tapiŝon, elkriis, ekstremis kaj kuŝis senmove.

Kugel malridete rigardis stude al Derŭi Korim. Ŝi ŝajnis esti tiom ŝoke surprizita kiom Jodo. Nun ŝi turniĝis por alrigardi lin. “Kial vi venenis Jodon??”

“Ĝi estis via faro,” diris Kugel. “Ĉu vi ne ordonis venenon en la vino?”

“Ne.”

“Vi devas diri, ‘Ne, Moŝto’.”

“Ne, Moŝto.”

“Se vi ne faris — kiu?”

“Mi konfuziĝas. La veneno eble estis celigita al mi.”

“Aŭ al ni ambaŭ.” Kugel signalis unu el la lakeoj. “Forportu la korpon de Jodo.”

La lakeo signalos paron da sub-servistoj, kiuj portis for la malbonŝancan majordomon.

Kugel prenis la kristalajn pokalojn, fiksrigardis en la [sukcenan](#) likvaĵon, sed ne komunikis siajn pensojn. Derŭi Korim kliniĝis malantaŭen en sia seĝo, kontemplis lin longatempe. “Mi konfuziĝas,” ŝi diris baŭdaŭe. “Vi estas viro pretera je la instruado de mia sperto. Mi ne povas distingi la koloron de via animo.”

Kugel amuze kortuŝiĝis per la fraz-esprimo. “Vi vidas animojn kolore, do?”

“Prave. Tio estis la naskiĝ-donaco de virina sorĉistino, kiu ankaŭ provizis al mi mian paŝo-boaton. Ŝi mortis kaj mi nun solas, kun neniu amiko aŭ iuj ajn kiuj pripenas min kun amo. Kaj do mi estradis la landon Cil kun malmulta ĝojo. Kaj nun vi ĉeestas, kun animo kiu flagras tra multaj koloroj, tiel kiel neniu homa viro alveninta min antaŭe.”

Kugel elektis ne mencii pri Firks, kies propra spirita elspirado, intermiksanta kun tiu de Kugel, sendube kaŭzis la kolorflagradon atentitan de Derŭi Korim. “Ekzistas kialo por tiu ĉi kvalito,” diris Kugel, “kio nuligiĝos je la deca tempo, aŭ tiel mi esperas. Ĝis tiam, vi povas pripensi mian animon kiel iun brilantan per la plej pura radiado kiu imageblas.”

“Mi provos teni tiun penson en la menso, Moŝto.”

Kugel malridetis. En la rimarkoj de Derŭi Korim kaj en la pozo de ŝia kapo li atentis pri apenaŭ kaŝita malrespekto, kion li trovis agacega. Tamen, restis sufiĉa tempo por ĝustigi la aferon post lerni la uzadon de la amuleto, kio estis afero el la ĉefa hasto. Kugel kliniĝis malantaŭen en la kusenojn, kaj parolis ŝajne tiel, kiel oni kia supozemas sencele: “Ĉie je tiu ĉi tempo de la Tera mortado, cirkonstancoj vokas priatenton. Antaŭ nelonge, ĉe la domo de Iŭkoŭnu la Ridanta Magiisto, mi observis grandegan librumon kiu indeksis ĉiujn el la skriboj pri magio, kaj ĉiun stilon de magia runo. Eble vi havas similajn volumojn en via biblioteko?”

“Ja povas esti,” diris Derŭi Korim. “La Dek Kvara Garĥ Hakst de Slej estis diligenta ordig-kolektanto, kaj kompilis dikan volumenon ĉiotraktan pri la temo.”

Kugel kunfrapis la manojn. “Mi volas vidi tiun ĉi gravan verkaĵon tuj!”

Derŭi Korim rigardis lin en miro. “Ĉu vi estas tioma libromaniulo, do? Domaĝa afero, ĉar la Oka Rubel Zaf ordonis tiun ĉi **kompension** subakvigita en la maron ĉe Promontoro Horizonto.”

Kugel faris amaran vizaĝ-esprimon. “Ĉu konvene ĉeestas neniuj aliaj stud-dokumentoj?”

“Sendube,” diris Derŭi Korim. “La biblioteko okupas la tuton de la norda alo. Sed ĉu ne morgaŭ sufiĉus por via studado?” Kaj streĉante en **langvora** varmeteco, ŝi aranĝis torde la korpon laŭ unue unu luksa pozo, poste alia.

Kugel drinkis profunde el nigra vitra pokalo. “Jes, estas nenia hasto pri tiu ĉi afero. Kaj nun —” Li interrompiĝis de virino el mezaj jaroj en volumenaj brunaj vestaĵoj, ŝajne unu el la sub-servistoj, kiu ĉimomente rapidis en la halon. Ŝi estis kriadante histerie kaj kelkaj lakeoj risortis antaŭen por subteni ŝin. Inter profundspiraj ploregoj ŝi klarigis la fonton de sia korŝiro; abomeninda ago nur ĵus ĉimomente farita de la ĥulo sur ŝian filinon.

Derŭi Korim gracie indikis al Kugel. “Jen la nova Lordo de Cil; li havas vastajn potencojn de magio kaj ordonos la ĥulon detruita. Ĉu vi ne farus, Moŝto?”

Kugel pensoplene frotis al si la mentonon. Ja estis vera **dilemo**. La virino kaj ĉiuj el la servistoj falis sur la genuojn. “Moŝto, se vi regas tiun ĉi korodigan magion, apliku ĝin tuj por detru la fiegan ĥulon!”

Kugel ekspasmetis, kaj turnante la kapon renkontis penseman rigardon de Derŭi Korim. “Kial necesas magio kiam mi kapablas per glavo? Mi dishakos la estulon orgeno disde orgeno!” Li signalis la ses armitaj kirasuloj kiuj staris apude en siaj latunaj arm-vestaĵoj. “Venu! Portu torĉojn! Mi antaŭiros por distranĉi la ĥulon!”

La kirasuloj obeis sen entuziasmo. Kugel pelis ilin al la granda portalo. “Kiam mi puŝegos malferme la pordojn, kune rapidu antaŭen kun la torĉoj, por fari brul-briladon kio lumigos la malbonegulon! Tenu la glavojn elprenitaj por ke, kiam mi estas pelanta ĝin retrosancelige, vi tiam faru la finmortigan puŝtranĉon!”

La kirasuloj, ĉiu kun torĉo kaj elprenita glavo staris antaŭ la portalo. Kugel glitigis retroen la stangetoj kaj puŝis malfermege la portalon. “Eliru! Surbriligu la ĥulon per la fina lumo de ĝia vivado!”

La kirasuloj rapidis antaŭen kun tima urĝo, kun Kugel fier-marŝanta de malantaŭe, svinge montranta sian glavon. La kirasuloj ekpaŭzis ĉe la supro de la ŝtuparo, por rigardadi sendecide elen trans la promenado, de kie povis aŭdiĝi kviete horora sono.

Kugel rigardis trans la ŝultro por vidi ke Derŭi Korim rigardadis atente ĉe la pordejo. “Antaŭen!” li kriis. “Ĉirkaŭu tiun ĉi fibestaĉon, kies morto nun alvenas lin!”

La kirasuloj malsupreniris la ŝtupojn, kun Kugel marŝanta ĉe la malantaŭo. “Haku voloplene!” li vokis. “Estos sufiĉe da gloro por ĉiu! Iu ajn viro kiu malefikis je sia tranĉo, tiun mi eksplodigos per magio!”

La flagrantaj lumoj briletigis la piedestalojn, kiuj etendiĝis en longa linio por kuniĝi fine kun la malumeco. “Antaŭen!” kriis Kugel. “Kie estas la besta estaĵo? Kial ĝi ne aperas por akcepti siajn punojn?” Kaj Kugel strebe rigardegis tra la onde moviĝantaj ombroj, esperante ke la ĥulo estu jam

alarmita kaj eskapinta.

De iu flanko venis eta sono. Turniĝante, Kugel vidis altan palan formon kviete starantan. La kirasuloj elspiregis, forkuris senorde supren sur la larĝaj ŝtonoj. “Mortigu la beston per magio, Moŝto!” vokis la serĝento. “La plej ekonomie rapida metodo ofte plej bonas!”

La ĥulo venis antaŭen; Kugel stumblis retren. La ĥulo faris rapidan paŝon antaŭen. Kugel risortis malantaŭ piedestalon. La ĥulo svingis etende la brakon; Kugel hakis per sia glavo, risortis al la ŝirmeco de alia piedestalo, poste rapidegis kun ega movlerteco reire trans la teraso. La pordo jam estis fermiĝanta; Kugel ĵetis sin tra la mallarĝiĝanta aperturon. Li tiregis firme la pordon, puŝis ŝlose la stangojn. La pezeco de la ĥulo frapegis kontraŭ la ligno-trabojn kaj la stangetoj grincis proteste.

Kugel turniĝis por renkonti la bril-okulan aprezadon de Derŭi Korim. “Kio okazadis?” ŝi demandis. “Kial vi ne mortigis la ĥulon?”

“La militistoj elkampiĝis kun la torĉoj,” diris Kugel. “Mi ne povis vidi pri kie haki nek kie tranĉi.”

“Strange,” diris Derŭi Korim pripense. “Ŝajne estis sufiĉa lumo por tiom bagatela ekzerco. Kial vi ne uzis la potencon de la amuleto por ŝiri la ĥulon disde ĉiuj ĝiaj membroj?”

“Tiel simpla kaj rapida morto ne decas,” diris Kugel dignoplene. “Mi devas pripensi iom longe, kaj decidi kiel plej bone li elpagu siajn krimojn.”

“Ja prave,” diris Derŭi Korim. “Prave.”

Kugel paŝadis reiri en la grandan halon. “Ni reiru al la bankedo! Lasu, ke la vino flui! Ĉiuj devas drinki salute pri la leviĝo de la nova Lordo de Cil!”

Derŭi Korim diris en silka voĉo, “Se vi volas, Moŝto, faru iun montradon de la potenco de la amuleto, por kontentigi nian kuriozon!”

“Certe!” Kaj Kugel tuŝadis sternaĵon post sternaĵo, produktante tremsonojn kaj ĝemojn de korŝira bedaŭro, kun foje plorego aŭ ekkrio.

“Ĉu vi povas fari ion pli?” enquete demandis Derŭi Korim, ridetante la molan rideton de petola infano.

“Ja vere, se mi tiel elektus. Sed sufiĉe! Drinku, unu kaj ĉiuj!”

Derŭi Korim signalis la serĝenton el la gardistoj. “Ektenu glavon, detranĉu la brakon de la stultulo; portu al mi la amuleton.”

“Kun plezuro, Moŝta Lordino.” La serĝento alvenis kun nuda tranĉilego. Kugel laŭte postulis: “Ne moviĝu! Je unu plua paŝo magio faldos ĉiujn viajn ostojn je [ortaj](#) anguloj!”

La serĝento rigardis al Derŭi Korim, kiu ridis. “Faru tiel, kiel mi vin ordonis, aŭ timu mian venĝon, kio estos tia pri kio vi jam scias.”

La serĝento spasmetis, marŝis antaŭen. Sed nun sub-servisto rapidis al Kugel, kaj sub ties

kapuĉo Kugel vidis la sulkon vizaĝon de maljuna Slej. “Mi savos vin. Montru al mi la amuleton!”

Kugel permesis, ke avidaj fingroj palpetadu inter la sternaĵoj. Slej premis unu el tiuj ĉi, vokis ion en voĉo tiom ekzaltita kaj akra ke la silaboj perdiĝis. Okazis grandega flugila sonado, kaj enorma nigra formo staris ĉe la malantaŭo de la halo. “Kiu turmentas min?” ĝi ĝemis. “Kiu donos al mi ĉeson?”

“Mi!” kriis Slej. “Antaŭiru en tra la halo, mortigu ĉiun krom mi!”

“Ne!” kriis Kugel. “Mi posedas la amuleton! Jen estas mi, kiun vi devas obei. Mortigu ĉiun krom mi!”

Derŭi Korim ekkroĉis al la brako de Kugel, provante vidi la amuleton. “Nenio efikus, krom se vi vokus lin per lia nomo! Ni ĉiuj pereos!”

“Kio estas lia nomo?” kriis Kugel. “Instruu min!”

“Paŭzu!” ordonis Slej. “Mi ĵus konsideris —”

Kugel faris al li bategon kaj risortis malantaŭ la tablon. La demono estis alvenanta, paŭzante por ekteni kirasulojn kaj svingi ilin dispremfrape kontraŭ la murojn. Derŭi Korim kuris al Kugel. “Lasu min vidi la amuleton; ĉu vi scias nenion ajn? Mi ordonos al li!”

“Neniel!” diris Kugel. “Ĉu mi estas Kugel la Ruza pro nenio? Montru al mi pri la deca sternaĵo, diru al mi la nomon.”

Derŭi Korim klinis la kapon, legis la runon, etendis por tuŝi sternaĵon, sed Kugel flankenbatis ŝian brakon. “Kiun nomon? Aŭ ni ĉiuj mortos!”

“Voku al Vanijl! Premu tie ĉi, voku al Vanijl!”

Kugel premis la sternaĵon. “Vanijl! Haltigu tiun ĉi disputon!”

La nigra demono atentis neniel. Estis dua granda sono, dua demono aperis. Derŭi Korim elkriis en teruro. “Ne estis Vanijl; montru al mi refoje la amuleton!”

Sed tempo ne sufiĉis; la nigra demono superstaris ilin.

“Vanijl!” tondre kriis Kugel. “Detruu tiun ĉi nigran monstron!”

Vanijl estis malalta kaj larĝa, kaj el fluanta verda koloro, kun okuloj kiaj skarlataj lumiloj. Ĝi ĵetis sin sur la unuan demonon, kaj la terura muĝego de la renkonto sonis sordige al la oreloj, kaj okuloj ne povis sekvi la frenezadon de la batalo. La muroj tremis dum la grandaj fortuloj batis kaj resaltis. La tablo dispeciĝis sube de grandaj displataj piedoj; Derŭi Korim ĵetiĝis en angulon. Kugel rampis tien poste, por trovi ŝin faldpoza kaj fiksrigardanta, sed senigita de volo. Kugel puŝis la amuleton antaŭ ŝiaj okuloj. “Legu la runojn! Voku la nomojn; ĉiun mi provos en ĝia vico! Rapide, por savi niajn vivojn!”

Sed Derŭi Korim nur faris molan movaĵon per siaj lipoj. Malantaŭe, la nigra demono, rajde sur Vanijl, estis metode per ungoj tiranta manplenojn de ties substanco kaj ĵetante ilin for, dum Vanijl

muĝegis kaj turnadis ripete la ferocan kapon ien kaj tien, ekmordante kaj graŭle montrante la dentojn, bantate per grandegaj verdaj brakoj. La nigra demono enpuŝis profunde la brakojn, ektenis iun centran nodon kaj Vanijl fariĝis sparkanta verda ŝlimo el multegaj partoj, ĉiu brileru kaj sparketo ekfluganta kaj tremanta kaj solviĝanta for en la ŝtonon.

Slej staris rideteganta super Kugel. “Ĉu vi deziras vian vivon? Donu tien ĉi la amuleton kaj mi ŝparos vin. Atendu eĉ unu momenton kaj vi ekmortos!”

Kugel apartigis de si la amuleton, sed ne povis devigi sin fordoni ĝin. Li diris kun subita ruzeco, “Mi povas doni la amuleton al la demono.”

Slej rigardegis malsupren al li. “Kaj per tio ni ĉiuj mortos. Al mi la afero ne gravas. Mi defias vin. Se vi deziras vivon — la amuleton.”

Kugel rigardis malsupren al Derŭi Korim. “Kio pri ŝi?”

“Kune vi ambaŭ estos ekzilitaj. La amuleton, ĉar jen ĉi tie estas la demono.”

La nigra demono turis supere; Kugel haste transdonis la amuleton al Slej, kiu sonigis akran krion kaj tuŝis sternaĵon. La demono plorĝemetis, faldiĝis en si kaj malaperis.

Slej paŝetis retroen, ridetanta en triumfo. “Nun foriru kun la knabino. Mi fidus je mia promeso al vi, nenio plu. Vi povas havi viajn mizerajn vivojn: foriru.”

“Donu al mi unu deziraĵon!” petegis Kugel. “Transsendu nin al Almerio, al la Valo de la Zan, kie mi povos malŝarĝi min de iu ŝankro nomata Firks!”

“Ne,” diris Slej. “Mi rifuzas al vi vian kor-deziron. Ekiru tuj.”

Kugel helpis al Derŭi Korim, ke ŝi stariĝu. Ankoraŭ duonkonscia ŝi rigardis al la difekteco de la halo. Kugel turniĝis al Slej. “La ĥulo atendas sur la promenadejo.”

Slej kapjesis. “Tio povas ja esti prave. Morgaŭ mi punegos lin. Ĉi vespere mi vokas submondajn artistojn por ripari la halon kaj renovigi la gloron de Cil. For! Ĉu vi pensas, ke al mi gravas tion, kiel vi spertos traktante la ĥulon?” Lia vizaĝo [sufuziĝis](#) ruĝe kaj lia brako moviĝetis al la sternaĵoj de la amuleto. “For, ĉimomente!”

Kugel prenis la brakon de Derŭi Korim kaj kondukis ŝin el la halo al la granda enireja portalo. Slej staris kun piedoj apartigitaj, ŝultroj entiritaj, kapo klinita antaŭen, okuloj sekvante ĉiujn movon de Kugel. Kugel glitigis silente la stangetojn, malfermis la pordon, elpaŝis sur la terason.

Estis silente laŭlonge de la promenadejo. Kugel kondukis al Derŭi Korim, ke ŝi malsupreniru la ŝtupojn kaj iom flanken, en la trokreskiĝintajn plantojn de la malnova ĝardeno. Ĉi tie li paŭzis por aŭskultadi. De la palaco venis sonoj de aktiveco; raspado kaj skrapado, raŭkaj vokoj kaj muĝoj, la ekbrilo de mult-koloraj lampoj. En la mezo de la promenado venadis alta blanka formo, paŝanta el ombro de unu piedestalo al la sekva. Ĝi paŭzis por aŭskulti en miro. Dum ĝi tiel distriĝis Kugel kondukis al Derŭi Korim for, al la malantaŭejo de mallumaj foliaroj, kaj tiel for en la nokton.



Ĉapitro 3

La Montoj de Magnatz

Baldaŭ post sunleviĝo Kugel kaj Derŭi Korim elvenis de la montet-flanka stalo en iu ili ŝirmiĝis tranokte. La aero malvarmetis kaj la suno, vino-kolora veziko malantaŭ alta nebuleco, produktis nenian varmecon. Kugel intertenis al si la brakojn, saltetadis ien kaj tien, dum Derŭi Korim staradis malstrikte apud la malnova stalo kun pinĉa esprimo.

Kugel post nelonge iritiĝis pro ŝia pozo, kiu **implicis** subtilan kalumniadon pri li. “Akiru lignon,” li diris al ŝi abrupte. “Mi ekbruligos fajron; ni matenmanĝos komforte.”

Sen ajna vorto la iama princino de Cil iris por kunpreni **uleksojn**. Kugel turniĝis por inspekti la malhelan larĝejon en la oriento, vokante aŭtomatan malbenon al Iŭkoŭnu la Ridanta Magiisto, kies rankoro estis ĵetinta lin al tiu ĉi norda senhomejo.

Derŭi Korim revenis portante brakplenon da tigoj; Kugel signalis aprobon per kapjeso. Dum iometa tempdaŭro post ilia elpelo de Cil ŝi estis tenanta sin kun maldeca memfiero, kion Kugel toleris kun kvieta rideto por si mem. Ilia unua kunkuŝado estis kaj eventoplena kaj peniga; post kiam Derŭi Korim modifis almenaŭ sian nekaŝitan konduton. Ŝia vizaĝo, delikata kaj bonaspekta, perdis malmulte da sia malbonhumora malgajeco, sed la arogo ŝanĝiĝis, kiel lakto fariĝas fromaĝo, por esti nova kaj vekiĝinta aprezo pri la realo.

La fajro kraketadis feliĉsone; ili matenmanĝis per **rapunkolo** kaj pulpecaj nigraj **galberoj**, dum Kugel demandis pri la landoj orientaj kaj sudaj. Derŭi Korim povis doni malmultan informon, neniom el kio estis bonesperiga. “La arbaro, laŭ onidiro, estas senfina. Mi aŭdis ĝin nomata per kelkaj nomoj: la Granda Ermo, la Arbaro de la Oriento, la Lig-Ĥig’. Sude vi vidas la Montojn de Magnatz, kiuj laŭdire estas teruregaj.”

“Kiumaniere?” postulis Kugel. “La informo estas grava; ni devas transiri tiujn ĉi montojn sur nia vojo al Almerio.”

Derŭi Korim gestis kapnee. “Mi aŭdis nur pridirojn, kaj atentis tiujn malmulte, ĉar neniam mi planis viziti la regionon.”

“Nek mi,” grumblis Kugel. “Se ne estus pro Iŭkoŭnu mi estus aliloke.”

Sparko de interesiĝo vivigis la volomankan vizaĝon. “Kiu estas tiu ĉi Iŭkoŭnu?”

“Abomeninda sorĉisto de Almerio. Li havas boligitan ĝarden-kukurbon por sia kapo, kaj montraĉas senmensan firideton. En ĉiu maniero li estas aĉega, kaj montras la malbonvolemon de bole brulvundita **eŭnuko**.”

La buŝo de Derŭi Korim moviĝis por fari etan malvarman rideton. “Kaj vi agacis tiun ĉi sorĉiston.”

“Ba! Estis neniaĵo. Pro triviala malbonfareto li ĵetis min norden ŝargita al malfarebla misio. Mi estas Kugel la Ruza ne pro nenio! La misio finiĝis kaj nun mi reiras al Almerio.”

“Kaj kio pri Almerio — ĉu tiu estas plaĉa lando?”

“Sufiĉe plaĉa, kompare al tiu ĉi senhomejo el arbaro kaj nebulo. Tamen, malperfektecoj ekzistas. Sorĉismo agace abundas, kaj justeco ne estas senvariema, kiel mi pridiris.”

“Diru al mi pri Almerio. Ĉu tie estas urboj? Ĉu estas homoj aliaj krom friponoj kaj sorĉistoj?”

Kugel malridetis. “Kelkaj urboj ekzistas, palaj ombroj de antikva gloro. Ekzistas Arzenome, kie la Zan kuniĝas kun Skaŭm Fluo, kaj Kajin en Askolajs, kaj aliaj laŭlonge de la marbordo transe kontraŭ Kaŭĉikŭo, kie la popolo kutimas pri grandega subtileco.”

Derŭi Korim kapjesis pensoplene. “Mi iros al Almerio. Kune kun vi, de kio mi povos baldaŭe sensuferiĝi.”

Kugel ekrigardis al ŝi flanken, ne ŝatante la guston de la diraĵo, sed antaŭ ol li povis detale respondi, ŝi demandis: “Kiu landoj kuŝas inter ni kaj Almerio?”

“Ili estas larĝaj kaj danĝeraj kaj tie loĝas gidóĵ, érboj, kaj déodandoj, kaj ankaŭ léŭkomorfoj, ĥuloj kaj grúhoj. Krom tio, al mi informo mankas. Se ni pluvivus post la veturo, estus ja miraklo.”

Derŭi Korim rigardis sopire malantaŭen al Cil, poste ŝultrolevis kaj silentiĝis.

La ŝparema manĝo finiĝis. Kugel kliniĝis malantaŭen kontraŭ la stalo, por ĝui la varmecon de la fajro, sed Firks, la agento de instigado enmetita de Iŭkoŭnu inter la viceroj de Kugel, permesis nenian ripozon, kaj Kugel, grimacante, eksaltis stariĝe. “Venu; ni devas ekiri. La malico de Iŭkoŭnu permesas nenion malplian.”

Malsupren laŭ la dekliveto ili marŝadis, sekvante tion, kio ŝajnis esti malnova vojo. La pejzaĝo ŝanĝiĝis. **Erikejo** finiĝis kaj malseka malsupra tereno komenciĝis: baldaŭe ili aliris la arbaron. Kugel okulumis la malhelajn ombrojn malfideme. “Ni devas iri kviete, kaj esperi, ke ni atentigu nenion minacan. Mi atentis antaŭen, kaj vi malantaŭen, por certigi ke nenio postsekvas, por sursalti al ni la dorsojn.”

“Ni perdos la vojon.”

“La suno pendiĝas en la sudo: tio ĉi estos nia gvidilo.”

Derŭi Korim ŝultrolevis fojon plu; ili eke eniris la ombrejon. La arboj staris alte superkape kaj la sunlumo, filtrita tra la foliaro, nur pliigis la malhelecon. Venante al rivereto, ili marŝis laŭ ĝia bordo kaj post nelonge eniris maldensejon kie fluadis akvoplana rivero.

Sur la riverbordo, proksime al ŝnure sekurita **floso**, sidis kvar viroj en ĉifonaj vestaĵoj. Kugel rigardis detale al Derŭi Korim, kaj prenis la juvelajn butonojn de ŝiaj vestoj. “Tiuj plej probable estas banditoj kaj ni devas mildigi ilian monavidecon, eĉ kvankam ke ili ŝajnas esti malbonkvalita grupo.”

“Estos pli bone, ke ni evitu ilin,” diris Derŭi Korim. “Ili estas bestoj, neniuj pli bonaj.”

Kugel malsamopiniis, “Ni bezonas ilian flosan kaj ilian gvidan informon, kion ni devas ordoni; se ni almozus, ili kredus sin havanta elekton, kaj fariĝus disputemaj.” Li paŝegis antaŭen kaj Derŭi Korim devis sekvi kontraŭ sia propra prefero.

La friponoj ne pli bone aspektis je pli proksima vido. Iliaj haroj estis longaj kaj malpure impliktaĵoj, iliaj vizaĝoj estis nodecaj, kun okuloj tiaj kiel betloj kaj buŝoj montrantaj malpurajn flavajn dentojn. Entute, iliaj esprimoj estis sufiĉe mildaj, kaj ili rigardis la venadon de Kugel kaj Derŭi Korim kun singardemo anstataŭ atakemo. Unu el ili, laŭ ŝajna aspekto, estis virino, kvankam tiu ĉi apenaŭ evidentiĝis per iliaj vestoj, vizaĝoj aŭ delikateco de manieroj. Kugel donis al ili saluton signife pri lorda subenrigardo, je kio ili palpebrumis en konfuziĝo.

“Kiu popolo vi estas?” demandis Kugel.

“Ni nomas nin Busiakoj,” respondis la plej aĝa el la viroj. “Ĝi estas kaj nia raso kaj nia familio; ni ne distingas inter ili, estante iomete **poliandriemaj** laŭ kutimo.”

“Vi estas enloĝantoj de la arbaro, sciantaj pri ĝiaj vojoj kaj vojetoj?”

“Tio estas adekvata priskribo,” agnoskis la viro, “tamen nia priscio estas nur loka. Memoru, tiu ĉi estas la Granda Ermo, kio etendiĝas je leŭgo post leŭgo sen termino”

“Ne grave,” diris Kugel. “Ni postulas nur kondukon trans la rivero, poste gvidan informon pri sekura vojo al la landoj de la sudo.”

La viro konsultis la aliajn inter sia grupo; ĉiuj kapneis. “Ne ekzistas tia vojo; la Montoj de Magnatz situas interloke.”

“Ĉu prave,” diris Kugel.

“Se mi kondukus vin flose trans la rivero,” daŭrigis la maljuna Busiako, “vi estus kvazaŭ jam mortinta, ĉar la regiono hantiĝas de érbroj kaj grúhoj. Via glavo estus senutila: vi portas nur la plej malfortan magion — tion mi scias ĉar ni Busiakoj flaras magion tiel kiel érbo flare ĉasas karnon.”

“Kiel do ni aliru nian celatan lokon?” postule demandis Kugel.

La Busiakoj montris malmultan intereson pri la demando. Sed la viro duavice plej aĝa sub la plej maljuna, ekrigardante al Derŭi Korim, havis subitan ideon, kaj rigardis trans la riveron kvazaŭ pripensante. La strebo baŭdaŭ elĉerpis lin, kaj li kapneis en malsukceso.

Kugel, observante zorge, demandis, “Kio konfuzas vin?”

“Problemo de nenia tre granda komplekso,” respondis la Busiako. “Ni spertas malmultan ekzercadon en logiko kaj ajna komplekseco obstaklas al ni. Mi nur hipotezas pri tio, kiujn inter viaj havaĵoj vi volonte interŝanĝus kontraŭ gvidado tra la arbaro.”

Kugel ridis bonanimege. “Bona demando. Sed mi posedas nur tion, kion vi vidas: nome vestojn, ŝuojn, mantelon kaj glavon, ĉio el kiuj necesas al mi. Kvankam, prave, mi scias sorĉeton kio produktas juvelan butonon aŭ du.”

“Tiuĵ estus malfortaj persvadoj. En proksima tombo juveloj troveblas en amaso tiom alta kiom mia kapo.”

Kugel frotis al si la mentonon pensante. “La donemo de la Busiakoj estas ĉie fama; eble vi kondukus nin preter tiun ĉi tombon.”

La Busiako faris geston de indiferenteco. “Se vi volas, kvankam ĝi apudas la loĝlokon de grandega patrino gido, nuntempe en sia [oestro](#).”

“Ni irados rekte al la sudo,” diris Kugel. “Do, lasu ke ni ekiru tuj.”

La Busiako daŭre tenadis sian rezisteman pozon. “Ĉu vi havas neniun instigilon por oferti?”

“Nur mian dankemon, kio estas afero neniel malgranda.”

“Kio do, pri la virino? Ŝi estas iom tromaldika, sed ne malbela. Pro tio, ke vi devas morti en la Montoj de Magnatz, kial malŝparu la virinon?”

“Prave.” Kugel turniĝis por rigardi al Derŭi Korim. “Eble ni povus aranĝi interkonsenton.”

“Kio?” ŝi kriis anhele pro kolerego. “Ĉu vi riskas sugesti tian aferon? Mi sindronigus min en la rivero!”

Kugel kondukis ŝin iomete for. “Oni ne nomas min Kugel la Ruza pro nenio,” li siblis en ŝian oreilon. “Fidu ke mi superruze venkos tiun ĉi [lun-bovidon](#)!”

Derŭi Korim rigardadis lin stude kun malfido, poste turniĝis for, larmoj de amara kolero fluantaj malsupren sur ŝiaj vangoj. Kugel alparolis la Busiakon. “Via propono klare estas pli ol duone saĝa; do nun, lasu ke ni ekiru.”

“La virino devas resti ĉi tie,” diris la Busiako, leviĝanta por stari. “Ni paŝados la sorĉitan vojeton kaj rigida disciplino necesas.”

Derŭi Korim faris decidan ekpaŝon al la rivero. “Ne!” kriis Kugel haste. “Ŝi havas [sentimentalan](#) sintenon, kaj volas observi, ke mi sekure survojiĝos al la Montoj de Magnatz, kvankam ke ĝi kondukos al neevitebla morto.”

La Busiako ŝultrolevis. “Ĉio same rezultas.” Li kondukis ilin sur la floson, ĵetis libere la ŝnuron, kaj per stango propulsis transriveren. La akvo ŝajnis neprofunda, la stango neniam enirante la akvon je pli ol unu aŭ du futoj. Ŝajnis al Kugel, ke nura transvado povus esti absolute simple.

La Busiako, observante, diris, “La rivero plenas de vitraj [reptilioj](#), kaj sengarda viro, enpaŝante, estus tuj atakata.”

“Ĉu prave!” diris Kugel, alrigardante la riveron dubeme.

“Ja prave. Kaj nun mi devas averti vin pri la vojeto. Ni renkontos ĉiujn tipojn de persvadoj, sed pro tio ke vi alte taksas la vivon, ne paŝu alien ol tien, kien mi kondukas.”

La floso atingis la transan riverbordon; la Busiako alpaŝis landen kaj sekurigis ĝin al arbo. “Venu nun, sekve post mi.” Li ekiris memfide for inter la arboj. Derŭi Korim sekvis, kun Kugel venante je la malantaŭo. La vojeto estis tiom malklara ke Kugel ne povis distingi ĝin disde la nesurpaŝita arbaro, sed la Busiako neniam hezitis. La suno, pendante malalte malantaŭ la arboj, povis esti vidata nur malofte. Do ili pluiradis, tra arbaraj senhomejoj kie ne eĉ birda kanto povis esti aŭdata kaj Kugel neniam certis pri la direkto laŭ kiu ili veturis.

La suno, pasante sian zeniton, komencis subeniri, kaj la vojeto fariĝis neniel pli klara. Kugel fine vokis antaŭen, “Ĉu vi certas pri la vojeto? Ŝajnas, ke ni turniĝas maldekstren kaj dekstren tute hazarde.”

La Busiako haltiĝis por ekspliki. “Ni el la arbaro estas senruza popolo, sed ni havas iun unuecan kapablon.” Li tuŝis al si la platan nazon signifoplene. “Ni povas flare detekti magion. La vojeto kiun ni sekvas estis ordonita en tempo tro antikva por la memoro, kaj montras sian direkton nur al tiuj kiaj ni mem.”

“Eblas esti tiel,” diris Kugel disputeme. “Sed ĝi ŝajnas esti tro disvagema, kaj kie troviĝas la timindaj kreituloj kiujn vi menciis. Mi ĝis nun vidis nur mikroton, kaj nenie estis mi flarinta la distingan odoron de la érbo.”

La Busiako kapneis signe de konfuziĝo. “Neiukiale ili elektis esti aliloke. Certe vi ne plendas, ĉu? Lasu, ke ni pluriri, antaŭ ol ili revenos.” Kaj li komencis refoje, sekvante vojeton neniom pli distingebla ol antaŭe.

La suno sinkis malalte. La arbaro maldensiĝis iomete; skarlataj radioj klinis laŭ la interspacoj, lumigante nodecajn radikojn, origante falintajn foliojn. La Busiako enpaŝis senarban loketon, kion li turniĝis triumfe. “Mi sukcesis konduki al nian celon!”

“Kiel tio?” postulis Kugel. “Ni ankoraŭ estas profunde en la arbaro.”

La Busiako fingre indikis trans la senarbejeto. “Ĉu vi ne atentis pri la kvar bone markitaj vojetoj?”

“Ŝajne tio estas la kazo,” Kugel agnoskis malvole.

“Unu el tiuj kondukas rapide al la suda rando. La aliaj kondukas en la arbarajn profundejojn, duiĝintaj varie laŭ siaj longoj.”

Derŭi Korim, strebe rigardanta inter la branĉoj, eksonigis akran eksklamon. “Jen, kvindek paŝoj for, estas la rivero kaj la floso!”

Kugel turnis minacan vizaĝesprimon al la Busiako. “Kio pri tio ĉi?”

La Busiako kapjesis solene. “Magia gardado mankas je tiuj kvindek paŝoj. Mi estus misplenumante mian devon se mi estus kondukinta nin laŭ la rekta direkto. Kaj nun —” Li iris al Derŭi Korim, prenis ŝian brakon, kaj turniĝis al Kugel. “Vi rajtas transiri la maldensejon, post kiam mi instruos vin pri kiu vojeto kondukas al la suda limo.” Kaj li okupiĝis per fiksi ŝnuron ĉirkaŭtalie al Derŭi Korim. Ŝi rezistis fervore, kaj venkiĝis nur per bato kaj blasfemo. “Tio ĉi estas por malebligi subitajn saltojn kaj forkurojn,” la Busiako diris al Kugel kun fiŝerca palpebrumo. “Mi ne estas tre rapida piede kaj kiam mi deziras virinon, mi malvolas ĉasi ŝin ien kaj tien. Sed vi volas hasti, ĉu ne? La suno subeniras, kaj post mallumiĝo la leŭkomorfoj ekaperas.”

“Nu do, kiu inter la vojetoj kondukas al la suda bordo?” Kugel demandis en malkaŝema maniero.

“Transiru la maldensejon kaj mi informos al vi. Kompreneble, se vi malfidas miajn instruojn, vi rajtas fari propran elekton. Sed memoru, mi jam strebe ekzercadis kontraŭ pago de vespa, maldikega

kaj sensanga virino. Je ĉi tiu momento nia kontrakto ekviniĝas.”

Kugel rigardis dubeme trans la maldensejo, poste al Derŭi Korim, kiu rigardadis en naŭze senespera malkredo. Kuge parolis ĝojige. “Nu, ĉio ŝajnas esti por la pleja bono. La Montoj de Magnatz estas fifame danĝeraj. Vi estas almenaŭ sekura kiu tiu ĉi malĝentila fripono.”

“Ne!” ŝi kriegis. “Liberigu min disde tiu ĉi ŝnuro. Li estas trompisto! Kugel la Ruza? Kugel la Naiva!”

“Tia parolo estas vulgara,” statis Kugel. “La Busiako kaj mi faris kontrakton, kio estas por diri, sanktan interkonsenton, kio devas esti plenumita.”

“Mortigu la brutulon!” kriis Derŭi Korim. “Apliku vian glavon! La rando de la arbaro ne povas esti malproksima!”

“Malĝusta vojeto eble kondukus en la mezon de la Grandega Ermo,” disputis Kugel. Li levis la brakon adiaŭe. “Multe pli bonas, ke vi laboraĉu por tiu ĉi trohara malĝentilulo ol riski mortiĝon en la Montoj de Magnatz!”

La Busiako ridetis en konsentemo, ektris proprete la ŝnuron. Kugel hastis trans la malplenejo kun la insultadoj de Derŭi Korim sonorantaj en liaj oreloj, ĝis oni ŝin silentigis per ia metodo kion li ne observis. La Busiako diregis, “Laŭ hazardo vi proksimiĝas al la ĝusta vojeto. Sekvu kaj vi baldaŭ atingos hom-loĝatan lokon.”

Kugel signalis per fina saluto, ekiris antaŭen. Derŭi Korim sonigis finan kriegon de insulta ridado: “Kugel la Ruza li nomas sin! Kia **ekstravaganca** ridindaĵo!”

Kugel pluiris laŭ la vojeto, iom maltrankviligita. “La virino estas mono-maniulino!” li diris al si. “Al ŝi mankas klareco kaj perceptemo; kiel mi estus povinta fari alimaniere, por ŝia bonfarto kaj por la propra? Mi estas raciemo personigita; estus mallogike, ke oni insistu kontraŭe!”

Apenaŭ cent paŝojn for de la maldensejo la vojeto eliris la arbaron. Kugel ekhaltis. Nur cent paŝoj? Li faltigis la lipojn. Laŭ iu kurioza cirkonstanco, tri aliaj vojetoj same eliris la arbaron apude, ĉiuj kuniĝintaj en unu sola proksime al lia starloko. “Interese,” diris Kugel. “Tentas, preskaŭ, ke mi reiru, por serĉi la Busiakon kaj elprenu ian eksplikon...”

Li fingrumis la glavon pensoplene, eĉ faris paŝon aŭ du retroire al la arbaro. Sed la suno estis malalta kaj ombroj plenigis la spacojn inter la nodecaj trunkoj. Dum Kugel hezitis, Firks malpacience tiris kelkajn el siaj pintoj kaj hokoj trans lian hepaton, kaj Kugel ekforlasis la ideon, ke li reeniru la arbaron.

La vojeto kondukis trans regiono senarba, kun montoj transirante la sudan ĉielon. Kugel paŝadis transen haste rapide, konscia pri la malhela ombro de la arbaro malantaŭa, kaj ankoraŭ malpaca en la menso. De tempo al tempo, je iu aparte maltrankvila penso, li laŭte manplat-frapis sian femuron. Sed kia misfaro! Li ja memevidente ordigis aferojn por la plejbono! La Busiako estis malkultura kaj stulta; kiel eblis, ke tiu estus trompinta lin? La koncepto ne eblas. Kaj rilate al Derŭi Korim, sendube ŝi baŭdaŭ al kutimiĝos al sia nova vivo...

Dum la suno malleviĝis malantaŭ la Montojn de Magnatz li aliris krudan vilaĝeton kaj taverson apud la vojkruc. Tiu ĉi estis iom forta konstruaĵo el ŝtono kaj dike segitaj lignotraboj, kun rondaj

fenestroj, ĉiu farita el cent bluaj celpunktoj. Kugel haltis ĉe la pordo, mense kalkulis siajn havaĵojn, kiuj malmultis. Poste li rememoris pri la juvelaj butonoj kiujn li estis prenintaj de Derŭi Korim, kaj laŭdis sin pri sia antaŭplanado.

Li puŝe trairis la pordon, enirante longan ĉambron en kio pendis malnovaj bronzaĵoj. La proprietulo estris ĉe mallonga bufedo, kie li verŝis grogojn kaj punĉojn al la tri viroj kiuj estis liaj nuntempaj klientoj. Ĉiuj turniĝis por fiksrigardi kiam Kugel eniris la ĉambron.

La proprietulo eldiris. “Bonvenon, veturisto; kio plaĉos al vi?”

“Unue, taso da vino, poste vespermanĝo kaj dormĉambro por unu nokto, kaj fine tiom ajn da informo pri la sudeniranta vojo, kion vi povas provizi.”

La proprietulo metis antaŭ si tason da vino. “Vespermanĝo kaj loĝejo sekvas baldaŭ. Rilate pri la sudenira vojo, ĝi kondukas en la estrejon de Magnatz, kio estas sufiĉa sciaĵo.”

“Magnatz, do, estas kreitulo timenda?”

La proprietulo gestis kapnee. “Viroj estas vojaĝintaj suden por neniam poste reveni. Neniu viro en komuna memoro venis norden. Mi povas diri nur tiom multe.”

La tri viroj kiuj staradis drinkantaj kapjesis en solena kunsento. Du estis kamparanoj de la loka regiono, dum la tria portis la altajn nigrajn botojn de profesia sorĉistin-ĉasisto. La unua kamparano signis al la proprietulo: “Verŝu por tiu misfortunulo tason da vino, je mia kosto.”

Kugel akceptis la tason kun miksitaj emocioj. “Mi drinkas dankeme, tamen mi aparte malpravigas la nomaĵon ‘misfortunulo’ por ke la virto de la vorto projekciĝu sur mian sorton.”

“Laŭ via volo,” respondis la kamparano indifere, “kvankam en tiuj ĉi melankoliaj tempoj, kiu estas iel alia?” Kaj dum ioma tempo la kamparanoj disputis pri la riparo de ŝtona barilo kiu apartigis siajn terenojn.

“La laboro estas peniga, sed la avantaĝoj grandas,” deklaris unu.

“Konsentite,” statis la alia. “Sed al mi la sorto estas jene: tuj kiam ni finus la taskon, la suno tuj tiam nigriĝus, tiel ke la tuta laboro estus por nenio.”

La unua gestis brak-svinge por moke malakcepti la argumenton. “Tiu ĉi estas risko kion ni devas antaŭakcepti. Atentu: mi drinkas vinon, kvankam ke mi eble ne daŭre vivos por fariĝi ebria. Ĉu tiu obstaklas min? Ne! Mi malakceptas la futuron; mi drinkas nun, mi ebriiĝos laŭ la estrado de cirkonstancoj.”

La proprietulo ridis kaj frapis la bufedo-tablon per la pugno. “Vi estas tiel ruza kiel Busiako, pri kiuj mi aŭdas, ke tendaro ilia proksimas. Ĉu eblas, ke la vojaĝanto renkontis ilin?” kaj li rigardis demande al Kugel, kiu kapjesis rezisteme.

“Mi renkontis tian grupon: krudaj anstataŭ ruzaj, miaopinie. Reference refoje pri la vojo suda, ĉu oni ĉi tie povas provizi specifan konsilon??”

La sorĉistin-ĉasiston diris raŭke, “Mi povas: evitu ĝin. Vi unue renkontos déodandojn avidajn

pri via karno. Poste situas la estrejo de Magnatz, apud kiu la déodandoj ŝajnus esti anĝeloj de kompato, se dekonu de la onidiroj veras.”

“Tio ĉi estas malkuraĝiga novaĵo,” diris Kugel. “Ĉu ekzistas neniu alia irejo al la landoj de la sudo?”

“Ja vere, iu ekzistas,” diris la sorĉistin-ĉasisto, “kaj mi rekomendas ĝin. Reiru norden laŭ la vojeto al la Granda Ermo, kaj iru orienten trans la etendejo de la arbaro, kio fariĝas ĉiam pli densa kaj pli timinda. Ne necesas diri, ke vi bezonos fortan brakon kaj piedojn kun flugiloj por eskapi la vampirojn, grúojn kaj leŭkomofojn. Post penetri ĝis la fora bordo de la arbaro vi devas turniĝi suden al la Valo de Dahrado, kie laŭ onidiro armeo da [baziliskoj sieĝas](#) la antikvan urbon Maŭr. Se vi sukcese trairus furiozan bataladon, la Granda Centra [Stepo](#) kuŝas je la transa flanko, kie troveblas nek manĝo nek akvo, kaj kiu estas ĉas-regiono de la pélgrejnoj. Transirante la stepon vi turnos la vizaĝon orienten, kaj nun vi vados tra serio de venenaj marĉoj. Trans tio kuŝas loko pri kio mi scias nenion krom ke ĝi nomiĝas la Lando de Malbonega Rememorado. Post transiri tiun regionon vi trovos vin iomete sude de la Montoj de Magnatz.”

Kugel pripensis momenton aŭ du. “La irvojo kiun vi priskribas, kvankam pli sekura kaj malpli peniga ol la rekte suda irejo, ŝajnas esti ege tro longa. Mi inklinas riski la Montojn de Magnatz.”

La unua kamarano stude rigardis lin kun miro. “Mi supozas, ke vi devas esti impona magiisto, plena preskaŭ kreve de sorĉaĵoj.”

Kugel respondis per ridetanta kapneo. “Mi estas Kugel la Ruza; neniu plia, neniu malplia. Kaj nun — vino”

La proprietulo baldaŭ alportis vespermanĝon: [raguo](#) de lentoj kaj landaj kraboj [garnita](#) de sovaĝaj [tub-aliumoj](#) kaj [mirtel-beroj](#).

Post la manĝado la du kamaranoj drinkis finan tason da vino kaj eliris, dum Kugel, la proprietulo kaj la sorĉistin-ĉasanto sidis antaŭ la fajro diskutante pri diversaj aspektoj de ekzistado. La sorĉistin-ĉasanto fine stariĝis por aliri sian dormoĉambron. Antaŭ ol foriri, li venis al Kugel, kaj parolis en senkaŝa maniero. “Mi atentis vian mantelon, kio estas el alta kvalito ne ofte vidata en tiu ĉi neprogresinta regiono. Ĉar vi estas tuj mortonta, kial ne donaci tiu ĉi mantelon al mi, kiu bezonas ĝin?”

Kugel abrupte malakceptis la proponon kaj ekiris al sia propra ĉambro.

Dum la nokto lin vekis skrapa sono proksime de la lita piedejo. Elsaltante sur siajn piedojn li kaptis personon ne tre altan. Kiam tirita elen en la lumon, la trudinto identiĝis kiel la pot-puriga knabo, ankoraŭ teneganta la ŝuojn de Kugel kiujn li evidente intencis ŝteli. “Kiel vi eksplikos tiun ĉi fiegaĵon?” postulis Kugel, manplate batante la knabon. “Parolu! Kiel vi aŭdacas provi tian agon!”

La pot-purigisteto petegis al Kugel, ke li ĉesu. “Kia diferenco tiel? Viro celanta la morton ne bezonas tiajn elegantajn piedvestojn!”

“Mi mem juĝos pri tio,” diris Kugel. “Ĉu vi atendas, ke mi marŝu nudpiede al mia morto en la Montoj de Magnatz? Vi ekiru for!” Kaj li sendis la mizeran knabon rule laŭ la longo de la halo.

Je la mateno ĉe matenmanĝo li priparolis la okazon al la proprietulo, kiu malmulte interesiĝis.

Kiam venis la tempo por pagi la konton, Kugel ĵetetis unu el la juvelaj butonoj sur la kontoron. “Aprezu, se vi bonvolas, ĝustan valoron por tiu ĉi juvelo, subtrahu mian konton kaj donu al mi la diferencon en oraj moneroj.”

La proprietulo stude aprezis la ornamaĵon, sulkigis la lipojn kaj klinis la kapon je unu flanko. “La tuto de ŝarĝoj al via konto precize egalas la valoro de tiu ĉi bagatelaĵo — neniu diferenco estas ŝuldata.”

“Kio?” ŝtormis Kugel. “Tiu ĉi klara akvamarino flankita de smeraldoj? Tio kontraŭ taso aŭ du da malaltkvalita vino, bovlo da **poriĝo** kaj dormo interrompita de la krima trudaĵo de via potpurigisto? Ĉu tie ĉi estas taverno aŭ rabista kaŝ-loĝejo?”

La proprietulo ŝultrolevis. “La prezoj estas iomete pli altaj ol la kutima ŝarĝo, sed mono putriĝanta en la poŝoj de mortintulo servas al neniu.”

Kugel post longe eltiris kelkajn orajn monerojn de la proprietulo kune kun pakaĵo da pano, fromaĝo kaj vino. La proprietulo venis al la pordo, fingre indikis. “Ekzistas nur unu sola vojeto, tiu kondukanta suden. La Montoj de Magnatz leviĝas antaŭ vi. Adiaŭ.”

Ne sen antaŭtimo, Kugel ekiris al la sudo. Dum ioma tempo la vojeto kondukis preter la kultivitejoj de la lokaj kamparanoj; poste, kiam la antaŭmontetoj kunpremiĝis je ambaŭ flankoj, la vojeto fariĝis unue pado, poste padeto serpente sekvanta sekan riverejon, apud densejoj el dornarbustoj, eŭforbio, **akileo**, **asfodelo**. Ĉe la supro de la monteto paralelante la pado situis malorda serio da malforte kreskantaj kverkoj, kaj Kugel, pensante plibonigi siajn ŝancojn por esti neobservata, grimpis al la monteta supro kaj daŭrigis paŝadi inter la ŝirmeco de la foliaro.

La aero estis klara, la ĉielo brile malhela bluo. La suno baraktis supren al la zenito kaj Kugel pensis pri la manĝaĵo kion li portis en sia saketo. Li sidigis sin, sed kiam li faris tion la moviĝo de saltete iranta malhela ombro atentigis al li la okulon. Lia sango ekfridiĝis. La kreitulo certe intencis sursalti lian dorson.

Kugel ŝajnis kvazaŭ li malatentis, kaj baldaŭ la ombro moviĝis antaŭen refoje: déodando, pli alta kaj pli peza ol li mem, nigra kiel meznokto escepte de havo de brilantaj blankaj okuloj, blankaj dentoj kaj ungoj, portanta **ŝelkojn** el ledo por suprenteni verdan veluran jupon.

Kugel debatis kun si la plej bonan reagon. Vid-al-vide, Brust-al-bruste, la déodando tirus lin en disajn pecojn. Kun la glavo preta, Kugel povus eble haki kaj puŝtranĉi kaj tenadi for la kreitulon ĝis ĝia avido por sango superregis ĝian timon de doloro kaj ĝi ĵetus sin antaŭen senatente pri vundoj. Eble Kugel pli rapidus je la piedoj, kaj povus pli malproksimiĝi je la kreitulo, sed nur post longa kaj streba postsekvigo... Ĝi glitis antaŭen refoje, por stari malantaŭ dispeciĝanta rokelstaraĵo malproksima je dudek paŝoj for de tie, kie Kugel sidadis. Tuj post ĝi malaperis, Kugel kuris al la rokelstaraĵo, saltis al la supron. Tie ĉi li levis pezan ŝtonon kaj kiam la déodando venis ŝtelire je la subo, ĵetegis ĝin malsupren sur la dorson de la kreitulo. Ĝi falis por kuŝi piedbaraktante, kaj Kugel saltis suben por aldoni la finmortigon. La déodando tiris sin al la roko kaj siblis en hororo al ekvido de la nuda tranĉilego de Kugel. “Detenu vian tranĉon,” ĝi diris. “Vi gajnos nenion kontraŭ mia morto.”

“Nur la kontentiĝon, ke mi mortas iun, kiu planis elvori min.”

“Plezuro sterila!”

“Malmultaj plezuroj estas aliaj,” diris Kugel. “Sed dum vi vivas, informu min pri la Montoj de Magnatz.”

“Ili estas tiel, kiel vi vidas: severaj montoj el antikva nigra roko.”

“Kaj kio pri Magnatz?”

“Mi havas nenian scion pri iu ajn tian estulon.”

“Kio? La viroj de la nordo tremas je la nura nomo!”

La déodando tiris sin iomete pli supren. “Tio ja povas esti. Mi aŭdis la nomon, kaj konsideras ĝin nenio pli ol legendo antikva.”

“Kial veturantoj iras suden kaj neniuj iras norden?”

“Kial iu ajn volu veturi norden? Rilate pri tiuj venantaj suden, ili provizis nutron por mi kaj miaj kunuloj.” Kaj la déodando tir-puŝis sin supren je minimumo. Kugel levis grandegan ŝtonon, tenis ĝin supren, ĵetfaligis ĝin forte sur la nigran estulon, kiu falis retroen, piedbatante malforte. Kugel prenis alian ŝtonon.

“Haltu!” vokis la déodando en flustra voĉo. “Domaĝu min, kaj mi helpos vin al plua vivo.”

“Kiel okazus tio ĉi?” demandis Kugel.

“Vi volas veturi suden; aliaj kiaj mi enloĝas kavernojn laŭ la longo de la irejo: kiel vi eskapu ilin krom se mi gvidu vin laŭ irejoj kiujn ili malofte vizitas?”

“Vi povas fari ĉi tion?”

“Se vi konsentus ne forpreni de mi la vivon.”

“Bonege. Sed mi devas aranĝi sekur-certigilon; pro via sangavido vi eble ignorus nian konsenton.”

“Vi jam vundegis min; kian pluan sekur-certigilon vi bezonas?” kriis la déodando. Kugel malgraŭe ligis la brakojn de la kreitulo kaj aranĝis ligaĵon ĉirkaŭ la dika nigra kolo.

Tiel aranĝite ili iradis, la déodando lamante kaj saltetante, kaj montrante direktojn al Kugel laŭ ĉirkaŭira paŝado super specifaj kavernoj.

La montoj leviĝis pli alten; ventoj ekmuĝis kaj eĥis tra la ŝtonaj kanjonoj. Kugel daŭre demandadis la déodandon rilate al Magnatz, sed ricevis nur la opinion, ke Magnatz estis kreitulo de fabeloj.

Finfine ili atingis sablan platejon alte super la malataj landoj, kiujn la déodando nomis loko for de la zono de sia propra klano.

“Kio situas transe?” demandis Kugel.

“Mi havas nenian priscion; ĉi tie estas la limo de mia vagado. Nun liberigu min kaj iru sur la propran vojon, kaj mi revenos al mia popolo.”

Kugel kapneis. “Nokto estas ne tre malproksime. Kio malebligos al vi, ke vi ne sekvu kaj ataku min refoje? Pli saĝe, ke mi vin mortigu.”

La déodando ridis malĝoje. “Tri aliaj sekvadas nin. Ili restis malproksimaj nur ĉar mi mane signalis, ke ili restu iom for. Mortigu min kaj vi neniam vekiĝos por vidi la matenan sunon.”

“Ni plue veturados kune,” diris Kugel.

“Laŭ via deziro.”

Kugel kondukis ilin suden, la déodando lamante je la malantaŭo. La valo fariĝis abismo kun plafono el grandaj ŝtonegoj, kaj rigardante malantaŭen Kugel vidis nigrajn formojn movantajn inter la ombroj. La déodando ridetis signifoplene al Kugel. “Estus pli saĝe ke vi haltu tuj; kial atendi ĝis mallumiĝo? Morto venas kun malpli da hororo dum la lumo ankoraŭ brilas.”

Kugel diris nenian respondon, sed instigis antaŭen kun ĉioma rapido. La vojeto eliris la valon, grimpis al alta herbejo kie la aero ventis malvarmete. Larikoj kaj káobaboj kaj rezin-cedroj kreskis ambaŭflanke, kaj rivereto fluadis inter gresojn kaj herbojn. La déodando komencis montri signojn de maltrankviliĝo, ektirante al sia ligaĵo, lamante kun troe ŝajna malkapablo. Kugel malpovis kompreni ajnan kialon por la montrado: la ĉirkaŭa regiono, krom por la loĝado de la déodandoj, ŝajnis sen minaco. Kugel fariĝis malpacienca. “Kial vi malhastas? Mi esperas trovi montan gastejon antaŭ ol la veno de mallumo. Via hezitado kaj lamado malhelpas min.”

“Estus dece, ke vi estis pripensanta tion antaŭ ol vi vundegis min per ŝtonego,” diris la déodando. “Preter ĉio, mi ne akompanas vin laŭ elekto propra.”

Kugel rigardis malantaŭen. La tri déodandoj kiuj antaŭe ŝteliris inter la rokoj nun postsekvis plene senkaŝe. “Ĉu vi havas nenian regopovon super la hororaj apetitoj de viaj kunuloj?” Kugel postulis.

“Mi havas nenian regopovon super la propra,” respondis la déodando. “Nur la fakto de miaj rompitaĵoj membroj fortentas al mi, ke mi eksaltu cele je via gorĝo.”

“Ĉu vi volas vivi?” demandis Kugel, metante la manon signife sur la glavon tenilon.

“Ĝis certa limo, kvankam ne kun tiom fervora deziro kiel faras veraj homoj.”

“Se vi valoras vivadon eĉ minimumege, ordonu viajn kunulojn, ke ili turniĝu iri for, ke ili rezignu sian malbonintencan ĉasadon.”

“Estus senutila ekzerco. Kaj konsiderante ĉion, kio estas vivo al vi? Rigardu, antaŭ vi turas la Montoj de Magnatz!”

“Ha!” murmuris Kugel. “Ĉu vi ne statis, ke la pridiro de la regiono estis nur fabela?”

“Precize; sed mi ne pludiris pri la naturo de la fabelo.”

Dum ili paroladis, venis rapida suspiro tra la aero; ekrigardante ĉirkaŭen Kugel vidis, ke la tri déodandoj estis falintaj, trapenetritaj de sagoj. De apuda arbareto elpaŝis kvar junaj viroj en brunaj ĉasistaj vestaĵoj. Ili estis el helaj, freŝaj vizaĝaspektoj, brunaj haroj, bona staturo, kaj ŝajnis montri bonamikan sintenon. La plej antaŭa vokis, “Kiel okazis, ke vi venas el la senhoma nordo? Kaj kial vi marŝas apud tiun timindan estulon de la nokto?”

“Mistero troveblas en neniuj viaj du demandoj,” diris Kugel. “Unue, la nordo ne estas senhoma, kelkaj centoj da homoj ankoraŭ restas vivantaj. Kaj rilate pri tiu ĉi nigra hibrido de demono kaj kanibalo, mi dungis ĝin por konduki min sekure tra la montoj, sed ĝi servadoj ne al mi plaĉas.”

“Mi faris ĉion kion vi atendis de mi,” deklaris la déodando. “Liberigu min laŭ nia interkonsento.”

“Jen laŭ via volo,” diris Kugel. Li malligis la rimenaron kio sekuris la gorĝon de la kreitulo, kaj ĝi lamis for, rigardante malame trans la ŝultro. Kugel faris signan geston al la estro de la ĉasistoj; tiu parolis vorton al siaj kunuloj; ili levis siajn pafarkojn kaj pafis mortige la déodando per sagoj.

Kugel gestis per abrupta kapjeso de aprobo. “Kio pri vi mem? Kaj kio pri Magnatz kies reputacio malsekurigas la montojn al veturado?”

La ĉasistoj ridis. “Nura legendo. Antaŭ longe terura kreitulo nomata Magnatz ja vere ekistis, kaj honore je la tradicio ne de la Vilaĝo Vul ankoraŭ nomas unu el niaj membroj por servi kiel Gardisto. Sed tio ĉi estas la tuto de kredemo kion la rakonto meritas.”

“Strange,” diris Kugel, “ke la tradicio ekzercas tiom vastan influon.”

La ĉasistoj ŝultrolevis indifere. “Nokto proksimiĝas; estas tempo por turniĝi hejmen. Vi bonvenas kuniĝi kun ni, kaj ĉe Vul estas taverno kie vi povas ripozi tranokte.”

“Kun ĝojo mi akceptas akompanadon kun vi.” La grupo ekiris laŭ la vojeto. Dum ili marŝis Kugel enketis pri la vojo sudenira, sed la ĉasistoj ofertis malmultan helpon. “Vilaĝo Vul situas sur la bordo de Lago Vul, kio ne navigeblas pro ĝiaj ĝirakvoj, kaj malmultaj el ni esploris la montojn en la sudo. Oni diras, ke ili estas senhomaj kaj malgrandiĝas fronte al malfavora griza senvivejo.”

“Ĉu eblas, ke Magnatz vagadas la montojn trans la lago?” demandis Kugel delikate.

“Tradicioj estas silentaj tiuteme,” respondis la ĉasistoj.

Post marŝado longa je horo, la grupo atingis al Vul, vilaĝo bonprospera surprize al Kugel. La loĝejoj estis solide konstruitaj el ŝtono kaj arbotrabo, la stratoj estis bonorde aranĝitaj kaj bone drenitaj; ekzistis publika merkato, grenejo, halego, tenejo, kelkaj malgrandaj tavernoj, kaj kelke da modeste luksaj domegoj. Dum la ĉasistoj suprenmarŝis la straton, viro alvokis ilin. “Grava informo! La Gardisto pereis!”

“Ĉu vere?” demandis la estro de la ĉasistoj kun akra intereso. “Kiu servas dum la intertempo?”

“Tiu estas Lafel, filo de la vilaĝestro — kiu alia?”

“Ja kiu alia?” rimarkis la ĉasisto, kaj la grupo pasis pretere.

“Ĉu la posteno de Gardisto tiel alte estimindas?” demandis Kugel.

La ĉasisto ŝultrolevis. “Ĝi plej bone priskribas kiel ceremonia sinekuro. Konstanta ceremoniulo sendube elektiĝos morgaŭe. Sed atentu en la pordo de la halo!” Kaj li fingre indikis al diketa larĝ-ŝultra viro portanta brunan, felo-randitan robon kaj nigran du-faldan ĉapelon. “Jen Hajlam Ŭiskod, la vilaĝestro mem. Ho, Ŭiskod! Ni estas renkontintaj veturanton el la nordo!”

Hajlam Ŭiskod alproksimiĝis, kaj salutis al Kugel kun ĝentileco. “Bonvenon! Nekonatuloj estas nov-interesaĵoj; nia gasto-bonvenemo ofertiĝas al vi!”

“Mi ja dankas vin,” diris Kugel. “Mi neniel atentis tian afablecon en la Montoj de Magnatz, kion la tuta mondo rigardas kun horora timego.”

La vilaĝestro ridadetis. “Misaprezoj estas kutimaj ĉiuloke; vi ja eble trovos kelkajn el niaj kutimoj strangetaj kaj tromalnovaj, ekzemple nia Atento pri Magnatz. Sed venu! Jen nia plej bona taverno. Post ol vi estos establinta vin ni manĝos.”

Kugel kondukiĝis al komfortan ĉambron, meblita per diversaj konvenaĵoj, kaj post nelonge, pura kaj refreŝigita, li kuniĝis al Hajlam Ŭiskod en la komuna ĉambro. Bonapetitiga vespermanĝo portiĝis antaŭ lin, kune kun flakono da vino.

Post la manĝado la vilaĝestro kondukis Kugelon turisme tra la vilaĝo, kio ĝuis plaĉan pejzaĝon super la lago.

Tiu ĉi nokto ŝajnis esti speciala okazo; ĉie stangolampoj sendis supren langoj de fajro, dume la popolo de Vul paŝadis la stratojn, paŭzantaj por interdiskuti en malgrandaj grupetoj kaj grupoj. Kugel demandis la kialon por la memevidenta aktiveco. “Ĉu okazas pro la morto de via Gardisto?”

“Jen la kazo,” diris la vilaĝestro. “Ni traktas niajn tradiciojn kun plena seriozeco, kaj la elektado de nova Gardisto estas afero de publika debatado. Sed observu: jen nia publika tenejo, kie la komuna abundo kolektiĝas. Ĉu vi volas rigardi internen?”

“Mi agos laŭ via plezuro,” diris Kugel. “Se vi deziras inspekti la komunan oron, mi ĝoje akompanos vin.”

La vilaĝestro tiregis malferme la pordon. “Ĉi tie estas multe pli ol oro! En tiu ĉi ujo estas juveloj; tiu rako tenas antkivajn monerojn. Tuj volvaĵoj estas luksaj silkoj kaj broditaj [damaskoj](#); je la flanko estas kaso da valoraj spicoj, eĉ pli valoraj likvoroj, kaj subtilaj pastoj, kies valoro preteras ajnan aprezon. Sed maldecas, ke mi uzu tiujn fanfaronajn terminojn al vi, veturisto kaj viro sperta, kiu estas rigardinta veran riĉecon.”

Kugel insistis ke la riĉaĵoj de Vul estis neniel malfierindaj. La vilaĝestro riverencis plaĉite kaj ili iris plue al [esplanado](#) apud la lago, kio nun estis granda malluma etendejo lumigita de febla stellumo.

La vilaĝestro indikis pri kupolo subtenata kvin cent futoj supren en la aero fare de maldika kolono. “Ĉu vi povas konjekti la funkcion de tiu konstruaĵo?”

“Tio ŝajnas esti la postenejo de la Gardisto,” diris Kugel.

“Prave! Vi estas viro bonatenta. Domaĝe ke vi tiom hastas kaj ne povas resti ioma tempo en

Vul!”

Kugel, konsiderante sian malplenan monujon kaj la riĉaĵojn en la tenejo, faris mildigan geston. “Mi ne malavidas tian loĝetadon, sed por diri malkaŝe, mi veturas en stato monomanka, kaj estus devigita serĉi pagantan dungigĝon. Mi scivolas pri la ofico de Gardisto, kion laŭ mia kompreno estas posteno iom prestiĝa.”

“Tiel ĝi ja estas,” diris la vilaĝestro. “La propra filo deĵoras la atentadon hodiaŭ nokte. Malgraŭ tio, ne ekzistas kialo pro kio vi ne memprezentiĝu kiel taŭga kandidato por la posteno. La postulataj laboroj ne penigas; fakte la posteno estas afero iom sinekura.”

Kugel fariĝis konscia pri maltrankvilaj moviĝoj fare de Firks. “Kaj la [lukroj?](#)”

“Ili bonegas. La Gardisto ĝuas grandan prestiĝon ĉi tie en Vul, ĉar, en pure ceremonia senco, li gardas nin ĉiujn kontraŭ danĝero.”

“Ili estas, specife, kio?”

La vilaĝestro paŭzis por kolekti la memoron, kaj kalkulis ĉiun sur la fingroj. “Unue, li proviziĝas per komforta gardoturo, complete kun kusenoj, optika instrumento per kiu foraj objektoj ŝajnas esti proksime, braĝujo por provizi hejton kaj genie dezajnita komunikad-sistemo. Pluse, liaj manĝaĵo kaj drinkaĵo estas el la plej alta kvalito kaj proviziĝas senpage, je lia plezuro kaj laŭ lia elekto. Pluse, li ĝenerale proviziĝas per la kroma titolo ‘Gardanto de la Publika Tenejo’, kaj por simpligi aferojn, al li estas fidata pri la proprieteco super kaj la rajto elspezi la tutan riĉaĵaron de Vul. Kvare, li rajtas elekti por sia edzino tiun junulinon kiun li trovas plej allogan. Kvine, li nomiĝas per la titolo ‘Barono’ kaj devas esti salutata per profunda estimado.”

“Ĉu vere, ĉu vere,” diris Kugel. “La posteno ŝajnas esti konsiderinda. Kiujn respondecojn ĝi postulas?”

“Ili estas tiel, kiel la [nomenklaturiko](#) sugestas. La Gardisto devas gardadi, ĉar tiu ĉi estas unu el la antikvaj kutimoj kiujn ni observas. La devoj apenaŭ estas penigaj, sed ili devas nenial esti fuŝitaj, ĉar tio signifus pri farso, kaj ni estas serioza popolo, eĉ tiam, kiam temas nur pri niaj strangaj tradicioj.”

Kugel kapjesis pensoplene. “La cirkonstancoj estas rekte simplaj. La Gardisto gardas; nenio povus esti pli klare dirata. Sed kiu estas Magnatz, en kiu direkto oni atendu ke li estus trovata, kaj kiel li estu identigita?”

“Tiu ĉi estas demandoj havantaj neniom fortan aplikeblecon,” diris la vilaĝestro, “ĉar mankas, teorie, ekzisteco je la kreitulo.”

Kugel ekrigardis supren al la turo, retroen al la komunuma tenejo. “Mi ĉimomente proponas min mem por la posteno, kondiĉe ke ĉio estas tiel, kiel vi statas.”

Firks tuj aplikis serion da kripligaj doloregoj al Kugel sur la internajn organojn. Kugel ekkurbiĝis faldiĝe, ektenis la abdomenon, rektiĝis, kaj dirante pardonpetojn al la konfuzita vilaĝestro, translokiĝis iomete je unu flanko. “Paciencon!” li petegis al Firks. “Memregadon! Ĉu vi havas nenian komprenon pri realismoj? Mia monujo malplenas; atendiĝas longaj leŭgoj antaŭaj! Por veturadi kun ajna grado de rapideco, mi devas regajni mian forton kaj replenigi mian monujon. Mi planas laboradi

je tiu ĉi posteno nur tiom longe por fari ambaŭ, tuj poste ni iros haste al Almerio!”

Firks kontraŭvole malpliigis la montradojn, kaj Kugel reiris al tiu loko kie la vilaĝestro atendadis.

“Ĉio estas tiel, kiel antaŭe,” diris Kugel. “Mi ĵus konsultis kun mi mem kaj kredas ke mi povas adekvate plenumi la devojn de la posteno.”

La vilaĝestro kapjesis. “Plaĉas al mi aŭdi tion. Vi trovos mian prezentadon de la faktoj preciza je ĉiu esenca detalo. Ankaŭ mi konsultis min mem, kaj mi rajtas sekure diri, ke neniu alia persono de la urbeto aspiras al posteno tiom estimata, kaj mi tial nomas vin la Gardisto de la Urbeto!” Ceremonie la vilaĝestro prezentis oran kolumon, kion li pendigis ĉirkaŭ la kolo de Kugel.

Ili iradis al la taverno, kaj dum ili iris, la popolo de Vul, atentante la oran kolumon, prezentegis sin al la vilaĝestro kun urĝaj demandoj. “Jes,” estis lia respondo. “Tiu ĉi ĝentilulo montris siajn kapablojn, kaj mi jam nomis lin Gardisto de la Urbeto!”

Aŭdante la novaĵon, la popolo de Vul fariĝis vaste donema, kaj gratulis al Kugel kvazaŭ li jam estis ĉeloĝanto dum la tuto de lia vivo.

Ĉiuj transiris al la tavernon; vino kaj spicita viando elmetiĝis; [ŝalm-ludistoj](#) aperis kaj okazis ĝentila dancado kaj ĝojigado.

Dum la daŭrigado de la vespero Kugel ekvidis ege belan junulinon dancantan kun juna viro kiu estis ano de la ĉasistaro. Kugel atentigis la vilaĝestron, direktis lian atenton al la junulino.

“Ho jes: la feliĉiga junulino Marlinka! Ŝi dancas kun la junulo kiun, laŭ mia kredo, ŝi intencas edzigi.”

“Ĉu eble ŝiaj planoj sinofertas al ŝanĝiĝo?” demandis Kugel signifoplene.

La vilaĝestro palpebrumis ruze. “Ĉu vi trovas ŝin loga?”

“Jes ja, kaj ĉar tio ĉi estas apanaĝo de mia ofico, jen mi deklaras tiun ĉi feliĉigan estulinon mia edziniĝontino elektinta. Lasu, ke la ceremonioj estu tuj plenumataj!”

“Ĉu tiel rapide?” demandis la vilaĝestro. “Ho nu, la varma sango de juneco permesas nenian prokraston.” Li signalis la junulinon kaj ŝi dancis feliĉe transen al la tablo. Kugel stariĝis, faris profunde kurbiĝan riverencon. La vilaĝestro parolis. “Marlinka, la Gardisto de la Urbeto trovas vin dezirinda kaj volas havi vin por sia edzino.”

Marlinka ŝajnis unue surprizita, poste amuzita. Ŝi ekrigardis volupte al Kugel, kaj genue riverencetis. “La Gardisto honoras min multe.”

“Krome,” sonis la vilaĝestro, “li devigas, ke la geedziga ceremonio estu plenumata tuj ĉimomente.”

Marlinka rigardis dubeme al Kugel, poste super la ŝultro al la juna viro kun kiu ŝi estis dancinta. “Nu bone,” ŝi diris. “Laŭ via volo.”

La ceremonio plenumiĝis, kaj Kugel trovis sin edzigita al Marlinka, kiu, je pli proksima studrigardado, li trovis ŝin estulino el feliĉiga animeco, ĉarmaj kutimoj kaj ekskvizita aspekto. Li brakumis ŝin ĉirkaŭtalie. "Venu," li flustris, "lasu ke ni glitu for dum ioma tempo kaj soleni la geedzecon."

"Ne tiom baŭdaŭe," flustris Marlinka. "Mi devas havi tempon por ordigi min; mi troe ekscitiĝis!" Ŝi liberigis sin, kaj dancis for.

Okazadis plua bankedado kaj ĝojigado, kaj je sia multa malplezuro Kugel observis, ke Marlinka refoje dancadis kun la junulo al kiu ŝi antaŭe estis edziniĝonta. Dum li rigardis ŝi brakumis tiun ĉi junan viron kun ĉiu ŝajneco de amemo. Kugel marŝis antaŭen, haltigis la dancon, prenis sian novedzinon flanken. "Tia konduto apenaŭ decas; vi jam estis edziniĝinta nur horon!"

Marlinka, kaj surprizita kaj senĉagrena, ridis, poste malridetis, poste ridis refoje kaj promesis konduti kun plia dececo. Kugel provis konduki ŝin al sia ĉambro, sed ŝi refoje deklaris la momenton netaŭga.

Kugel enspiris profundan suspiron esprime pri ĉagreniĝo, sed trovis konsoliĝon en la rememorado de siaj kromaj apanaĝoj: libero rilate al la konservejo, ekzemple. Li kliniĝis al la vilaĝestro. "Ĉar mi nun satas la nomata gardisto de la publika konservejo, estas nur prudente, ke mi familiarigu min detale pri la trezoro, kiun mi ŝarĝiĝis gardadi. Se vi estus tiom helpema, ke vi transdonu la ŝlosilojn, mi iros por fari rapidan kalkulon."

"Eĉ pli bone," diris la vilaĝestro, "Mi akompanos vin, kaj faros tion, kion mi povas por esti helpema."

Ili transiris al la konservejon. La vilaĝestro malŝlosis la pordon kaj tenis lumilon. Kugel eniris, studis la valoraĵojn. "Mi vidas, ke ĉio estas en ordo, kaj eble rekomendindas, ke mi atendu ĝis post stabiliĝos la kapo antaŭ ol komenci detalan kalkulon. Sed dum la intertempo — " Kugel iris al la juvelejo, selektis kelkajn juvelojn, kaj komencis meti ilin en sian zonsakon.

"Momenton," diris la vilaĝestro. "Mi timas, ke vi malkonvenigu vin mem. Baldaŭ vi mezuriĝos por vestoj el riĉa ŝtofo, decaj por via rango. La riĉaĵoj plej konvene konserviĝas ĉi tie en la konservejo; kial penigi vin per la pezeco, aŭ riski la eblecon de perdo?"

"Ioma senco estas en viaj vortoj," rimarkis Kugel, "sed mi volas ordoni la ekkonstruon de domo superirigardanta la lagon kaj mi bezonos riĉaĵon por pagi la kostojn de konstruado."

"Je deca tempopaso, je deca tempopaso. La efektiva laboro apenaŭ povas komenci antaŭ ol vi estos pristudinta la ĉirkaŭajn landojn kaj elektinta la plej feliĉigan situejon."

"Prave," konsentis Kugel. "Mi povas vidi, ke estos viglaj tempoj en la antaŭo. Sed nun — ni reiru al la tavernon! Mia edzino estas tro-modesta kaj nun mi toleros neniom da plua prokrastado!"

Sed je ilia reveno Marlinka nenie troveblis. "Preterdube ŝi iris por beligi sin en voluptaj vestaĵoj," sugestis la vilaĝestro. "Estu pacience!"

Kugel kunpremis la lipojn en malplaĉeco, kaj plue agaciĝis pro trovi ke la juna ĉasisto estis ankaŭ foririnta.

La feliĉigado pliiĝis iom-post-iom, kaj post multaj tostoj, Kugel fariĝis iomete konfuzita, kaj portiĝis supren al sian ĉambron.

Frue en la mateno la vilaĝestro alfrapis la pordon, kaj eniris je la voko de Kugel. “Ni devas nun viziti la gardo-turon,” diris la vilaĝestro. “La filo propra gardis super Vul ĉi nokton pasintan, ĉar nia tradicio postulas senĉesan atentemon.”

En malĝentila humoro Kugel vestis sin kaj sekvis la vilaĝestron elen en la malvarmeta matena aero. Ili marŝis al la gardo-turon, kaj Kugel miris pri kaj ĝia alteco kaj la eleganta simpleco de ĝia dezajno, la maldika fosto leviĝanta supren en la aero je kvincent futoj por subteni la kupolon.

Ŝnura **eskalo** estis la sola rimedo por supreniri. La vilaĝestro komencis supreniri kaj Kugel sekvis sube, la eskalo svingiĝanta kaj tremetanta en tia maniero, ke ĝi kaŭzis kapturiniĝon al Kugel.

Ili atingis la kupolon sekure kaj la laca filo de la vilaĝestro subeniris. La kupolo mebliĝis laŭ iom malpli lukse ol atendita de Kugel, kaj fakte ŝajnis preskaŭ severe senmebla. Li atentigis pri tiu ĉi fakto al la vilaĝestro, kiu statis ke la mankoj facile ripareblas. “Nur informu pri viaj bezonoj: ili estos pritraktataj!”

“Nu do: mi deziras pezan tapiŝon por la planko — kolorvariaĵoj el verdo kaj oro eble estus plej feliĉigaj. Mi bezonos pli elegantan litseĝon, el plia larĝeco ol tiu prihontinda plataĵo kiun mi vidas kontraŭ la muro, ĉar mia edzino Malinka trapasos multon da ŝia tempo ĉi tiel. Ŝranko por juveloj kaj valoraĵoj tie, ujon por dolĉaĵoj tie, pleto por parfumitaj oleoj tie. Ĉe tiu ĉi loko mi bezonos tableton kun rimedo por malvarmetigi vinojn.”

La vilaĝestro agordis pri ĉio. “Estos tiel, kiel vi diras. Sed nun ni devas diskuti viajn devojn, kiuj tiel simplas, ke ili preskaŭ bezonas nenian detaligon: vi devas garde atenti kontraŭ Magnatz.”

“Tion ĉi mi komprenas, sed kiel antaŭe, flanktema penso leviĝas al mi: por labori je pleja efikeco, decas ke mi scii pri tio, kion aŭ kiun mi devos priatenti. Magnatz eble marŝadus senobstakle laŭ la esplanado se mi estus malkapabla rekoni lin. Kia do, estas lia aspekto?”

La vilaĝestro kapneis. “Mi ne povas diri; la informo perdiĝis en la nebuleco de la epokoj. La legendo raportas nur, ke li estis trompita kaj konfuzita de sorĉisto, kaj portita for.” La vilaĝestro iris al la observa fenestro. “Atentu: jen estas optika aparato. Funkcianta laŭ genia principo, ĝi ŝveligas kaj detaligas tiujn vidaĵojn al kiuj oni ĝin direktas. De tempo al tempo vi eble elektos studrigardi ĉefaĵojn de la regiono. Jen for estas Monto Tamsuo; sube estas Lago Vul kie neniu povas veturi boate pro vorticoj kaj suĉaj ĝirakvoj. Je tiu ĉi direkto estas Padagro Intermonto, kondukanta orienten en la lando Merco. Vi povas apenaŭ distingi tiun honorigan kairnon ordonitan de Guzpah la Granda kiam li kondukis ok aremojn por ataki al Magnatz. Magnatz starigis alian kairnon — vidu tiun grandan monteton en la nordo? — por kovri iliajn distiritajn mortintaĵojn. Kaj jen estas la fendo kiun Magnatz elrompis tra la montoj por ke malvarmetiga aero povu ĉirkaŭbloviĝi en la valo. Trans la lago situas certaj titanaj ruinoj, kie Magnatz havis sian palacon.”

Kugel stude rigardis la apartajn ĉeflokojn tra la optika vidilo. “Magnatz estis, laŭ ĉiuj signoj, kreitulo el vasta potenco.”

“Tiel statas la legendoj. Nun, fina afero. Se Magnatz aperus — ridinda imagaĵo, kompreneble — vi devus tiri tiun ĉi stangon, kiu sonorigas la grandan gongon. Niaj leĝoj malpermesegas sonorigadon

de la gongo, krom je ekvido de Magnatz. La puno kontraŭ tia krimo estas ege severa; kaj fakte, la lasta Gardisto malfidis je sia alta ofico per senhonte sonorigadanta la gongon. Ne necesas diri, ke li prijuĝiĝis severe, kaj post li distiriĝis en pecojn fare de trans-kruciĝo de ĉenoj, liajn fragmentojn oni ĵetis en ĝirakvon.”

“Kia stulta estulo!” rimarkis Kugel. “Kial forelekti riĉaĵaron tiom multan kontraŭ tiel triviala amuziĝo?”

“Ni ĉiuj samopinias,” statis la vilaĝestro.

Kugel malridetis. “Mi konfuziĝas pri lia ago. Ĉu li estis juna viro, ke li cedis tiel facile al frivola voletto?”

“Ne eĉ tiu ĉi **pledo** povas diriĝi senkulpige pri li. Li estis saĝulo el okdek jaroj, dum sesdek el kiuj li servadis la urbeton kiel la Gardisto.”

“Lia konduto fariĝas eĉ pli nekredebla,” estis la mirigita respondo de Kugel.

“Ĉiuj en Vul sentas same.” La vilaĝestro frotis la manojn rapide. “Mi kredas, ke ni diskutis ĉiun el la esencaĵoj; Mi nun foriros kaj lasos vin al la ĝuado de viaj devoj.”

“Unu momenton,” diris Kugel. “Mi insistas pri certaj ŝanĝiĝoj kaj plibonigoj: la tapiŝo, la ŝranko, la kusenoj, la pleto, la litseĝo.”

“Kompreneble,” diris la vilaĝestro. Li klinis la kapon super la relo, laŭte diregis instrukciojn al tiuj subaj. Estis neniuj tuja respondo, kaj la vilaĝestro fariĝis malplaĉigita. “Kia agacaĵo!” li diregis. “Ŝajnas, ke mi mem devas plenumi la aferon.” Li komencis grimpi suben laŭ la ŝnura eskalo. Kugel vokis posten al li, “Bonvolu sendi supren mian edzinon Marlinka, ĉar estas certaj aferoj, kiujn mi volas kontesti kun ŝi.”

“Mi serĉos ŝin tuj,” diregis la vilaĝestro trans sia ŝultro.

Kelkajn minutojn poste aŭdiĝis grincado de la granda **pulio**; la eskalo subentiriĝis je la fino de la ŝnuro kiu subenis ĝin. Rigardante de super la flanko, Kugel vidis, ke kusenoj estis pretaj por leviĝi. La dika ŝnuro subteninta la eskalon skue tiriĝis tra la pulio, portante supren maldikan ŝnureton — apenaŭ pli forta ol forta fadeno — kaj sur per ĉi fadenego la kusenoj leviĝis. Kugel stude rigardis ilin kun malaprobo; ili estis malpuraj kaj polvokovrataj, kaj neniel el la kvalito, kion li antaŭimadis. Ja certe li insistos pri meblaĵoj pli bonkvalitaj ol tiel ĉi! Eble la vilaĝestro intencis, ke tiuj ĉi nur servu kiel anstataŭaĵoj dumtempaj ĝis tiam, kiam kusenoj el deca eleganteco povus esti provizataj. Kugel kapjesis: tio ĉi memevidente estis la situacio.

Li ĉirkaŭrigardis al la horizonto. Magnatz nenie videblis. Li svingis la brakojn unu/du fojojn, paŝadis tien kaj reen, iris por subenrigardi al la placo, kie li atendis trovi, ke artistoj kolektadis la akcesoraĵojn kiujn li mendis. Sed estis nenia ajn tia aktiveco; la urbetanoj ŝajnis esti farantaj siajn kutimajn aferojn. Kugel ŝultrolevis, iris por fari pluan serĉon de la horizonto. Kiel antaŭe, Magnatz malvideblis.

Unu fojon plu li alrigardis la placon. Li malridetis, **strabis**: ĉu tiu estis lia edzino Marlinka pretermarŝanta kune kun juna viro? Li fokusigis la optikan aparaton sur la supra korpformo: estis ja Marlinka, kaj la juna viro kiu tenis al ŝi la kobuton kun insolenta intimeco estis la ĉasisto al kiu ŝi

estis iame fianĉiniĝita. Kugel kunprenis la mandiblon pro kolerego. Tia maniero de konduto ne rajtas plue okazadi! Kiam Marlinka prezentos ŝin, li estos parolanta emfaze pri la temo.

La suno atingis la zeniton; la ŝnuro tremetadis. Rigardante de super la flanko Kugel vidis, ke lia tagmeza bankedaĵo suprentiriĝis en korbo, kaj li kunfrapis la manojn antaŭĝue. Sed la korbo, kiam li levis la ŝtofon, enhavis nur duonon da pano, pecon da maĉorezista viando, falkonon da akveca vino. Kugel fiksrigardis al la pribedaŭrinda provizaĵo kun ŝoko. Li sensalivigis la gorgon, vokis suben por ekhavi la eskalon. Ŝajnis, ke neniu lin aŭdis. Li vokis pli laŭte. Unu aŭ du urbetanoj suprenrigardis kurioze, kaj preterpasis cele al propraj aferoj. Kugel ektiris kolere al la ŝnuro. La maldika fadenego estis senfina rondiraĵo, kapabla teni proksimume la pezecon de korbo da manĝaĵo.

Pensoplene Kugel sidiĝis kline, kaj taksis la situacion. Poste direktigante la optikan aparaton refoje al la placo li serĉis por trovi la vilaĝestron, la sola viro al kiu li povus turni sin por gajni plaĉiĝon.

Malfrue en la posttagmezo, Kugel hazarde observis la pordon de la taverno, ĝuste tiam kiam la vilaĝestro ŝancelade elvenis, memevidente multe levita per vino. Kugel vokis atentige malsupren; la vilaĝestro ekhaltis, ĉirkaŭrigardis por la fonto de la voĉo, kapneis en konfuzeco, pluiradis trans la placo.

La suno dekliviĝis de trans Lago Vul; la ĝirakvoj estis spiraloj el brunruĝo kaj nigro. Lia vespermanĝaĵo alvenis: telero da boligitaj **poreoj** kaj bovlo da poriaĵo. Li alrigardis ĝin kun malmulta intereso, poste iris al la flanko de la kupolo. “Sendu supren la eskalon!” li vokis. “Mallumo venas! En la manko de lumo, estas senutile serĉrigardadi por Magnatz aŭ por iu ajn!”

Kiel antaŭe liaj rimarkoj malatentiĝis. Firks ŝajne subite ekkomprenis pri la situacio kaj aplikis kelkajn akrajn dolorojn sur la viceroj de Kugel.

Kugel trapasis malkomfortan nokton. Dum festantoj eliris la tavernon Kugel vokis al ili kaj pridiris sian sorton, sed samefike li estus povinta resti silenta.

La suno aperis super la montoj. La matenmanĝo de Kugel estis el meza kvalito, sed neniel takseblis je la nivelo pridirita de Hajlam Ŭiskod, la duobla-lingva vilaĝestro de Vul. En kolerego, Kugel kriegis ordonojn al tiuj subaj, sed malatentiĝis. Li enprenis profundan spiron: ŝajnis, ke li lasiĝis kun nur la propraj kapabloj. Sed ĉu grave tio? Ĉu li estis Kugel la Ruza senkiale? Kaj li konsideris diversajn rimedojn por malsupreniri de la turo. La linio per kiu lia manĝaĵo leviĝis estis ege tro maldika. Se duobligita kaj reduobligita por ke ĝi tenu lian pezecon, ĝi provizus, je maksimumo, kvaronon de la distanco al la grundo. Liaj vestoj kaj ledaĵoj, se ŝiritaj kaj interligitaj, eble provizus pluan dudekon da futoj, lasante ke li pendu meze en la aero. La fosto de la turo ofertis nenian piedlokon. Kun decaj iloj kaj sufiĉe da tempo li eble povus **ĉizi** ŝtuparon laŭlonge de la turo, aŭ eĉ elĉizi for la turon en ĝia tuto, eventuale malgrandigante ĝin ĝis malalteco de sur kiu li povus subensalti al la teron... La projekcio ne estis farebla. Kugel sidiĝis velke en la kusenojn malesperante. Ĉio nun estis klara. Li trompiĝis. Li estis kaptito. Kiom longe restis la antaŭa Gardisto ĉe sia ofico? Sesdek jarojn? La antaŭaĵo estis neniel ĝojiga.

Firks, samopiniante, stabis furioze per pinto kaj hoko, aldonante al la plorindaĵoj de Kugel.

Tiel pasadis tagoj kaj noktoj. Kugel fikspensadis longe kaj malbonhumore, kaj primeditadis la popolon de Vul kun grandega malŝato. Foje li konsideris, ke li sonorigadu la grandegan gongon, kiel

lia antaŭulo estis devigata fari — sed rememorante la punon, li sindetenis.

Kugel fariĝis intime scioplena pri ĉiu aspekto de urbeto, lago kaj pejzaĝo. Je matenoj la lago kovriĝis de dikaj nebuloj; post du horoj venteto forpuŝis ilin flanken. La ĝirakvoj suĉadis kaj ĝemis, svingiĝante ien kaj tien, kaj la fiŝkaptistoj de Vul veturis apenaŭ pli ol la longeco de siaj boatoj for de la bordo. Kugel progresis por rekoni ĉiujn el la vilaĝanoj, kaj lernis la proprajn kutimojn de ĉiu. Marlinka, lia perfida edzino, transiris la placon ofte, sed tre malofte pensis por turni sian rigardon supren. Kugel atentis detale pri la kabaneto kie ŝi loĝis kaj turnis al ĝi konstantan observadon tra la optika aparato. Se estus, ke ŝi flirte sekskuniĝadis kun la juna ĉasisto, ŝia kaŝado estis rimarkinde efika, kaj la malhela suspekto de Kugel neniam proviĝis.

La manĝaĵoj neniam pliboniĝis je kvalito kaj ne malofte forgesiĝis entute. Firks estis persiste plendema, kaj Kugel paŝadis inter la limoj de la kupolo kun ĉiam pli nervozaj paŝlongoj. Baldaŭ post sunsubiro, post aparte doloriga punplendado fare de Firks, Kugel ekhaltis en sia paŝado. Rimedo por malsupreniri la turon estis afero simplega! Kial li prokrastis tiom longe? Kugel la Ruza, ridindaĵo!

Li distiris ĉiun fragmenton da ŝtofo provizata de la kupolo por fari striojn, kaj el la faritaĵoj plektis ŝnuron longa je dudek futoj. Nun li devis atendi ĝis la urbeto kvietiĝos: ankoraŭ horon aŭ du poste..

Firks atakis al li fojon plu, kaj Kugel elkriis. “Pacon, **skorpio**, ĉinokte ni eskapos tiun ĉi tureton! Viaj agoj preteras la neceso!”

Firks rezignis pri sia montrado, kaj Kugel iris por studi la placon. La nokto estis malvarmeta kaj nebuleca: ideala por lia celo, kaj la popolo de Vul frue enlitiĝis.

Kugel zorge levis la ŝnureton per kiu leviĝadis lia manĝaĵo; duobligis, reduobligis kaj reduobligis ĝin refoje kaj tiel produktis kablون sufiĉe fortan por ke ĝi lin subtenu. Li ligis rondon ĉe unu ekstremo, fiksas la alian al la pulio. Post unu fina rigardo ĉirkaŭ la horizonto, li mallevis sin trans la flanko. Li malsupreniris ĝis la fino de la kablo, puŝis sin en la rondon kaj sidis svingiĝante je kvarcent futoj super la placo. Al unu fino de lia dudek-futa plektaĵo li alligis lian ŝuon por esti pezaĵo, kaj post kelkaj ĵetoj, cele trafis rondiron ĉirkaŭ la fosto de la kolono, kaj tiris sin proksimen. Kun senlima zorgado li elglitigis sin libere, kaj uzante la plektaĵon kiel bremson, malrapide glitis suben al la grundo. Li ekiris rapide al la ombroj kaj remetis al li la ŝuojn. Ĝuste tiam, kiam li stariĝis, la pordo de la taverno svingiĝis malferme kaj elen ŝanceliĝis Hajlam Ŭiskod, multe malbonigita pro drinkado. Kugel ridetis malfeliĉige kaj sekvis la ŝancelantan vilaĝestron en flank-strateton.

Sola bato kontraŭ la malantaŭon de la kapo sufiĉis; la vilaĝestro falis en fosaĵon. Kugel tuj sursaltis lin, kaj per lertmovaj fingroj prenis liajn ŝlosilojn. Irante nun al la publika konservejo, li malfermis la pordon, glitmoviĝis internen kaj plenigis sakon per ĝemoj, moneroj, falkonoj de altprezaj parfumoleoj, artaĵoj, kaj simile.

Revenante al la strato Kugel portis la sakon al kajo apud la lago, kie li kaŝis ĝin sub reto. Nun li iradis al la kabaneto de lia edzino Marlinka. Ŝtelirante apud la muroj, li venis al malfermita fenestro, kaj paŝanta internen trovis sin en ŝia ĉambro.

Ŝi vekigis pro liaj manoj ĉe ŝia gorĝo. Kiam ŝi provis kriegi li ŝtopis ŝian spiradon. “Jen mi,” li siblis, “Kugel, via edzo! Ellitiĝu kaj venu kun mi. Via unua sono estos via fina!”

En granda teruro, la knabino obeis. Je la ordono de Kugel, ŝi surmetis mantelon ĉirkaŭ la ŝultroj kaj fiksis sandalojn sur la piedoj. “Kien ni iras?” ŝi flustris en trema voĉo.

“Ne grave. Venu nun — tra la fenestro. Faru nenian sonon!”

Staranta ekstere en la mallumo Marlinka turnis horor-ŝokan ekrigardon al la turo. “Kiu deĵoras la gardadon? Kiu gardas super Vul kontraŭ Magnatz?”

“Neniu deĵoras gardade,” diris Kugel. “La turo estas malplena!”

Ŝiaj genuoj faldiĝis; ŝi velkis al la grundon. “Supren!” diris Kugel. “Supren. Ni devas iradi!”

“Sed neniu deĵoras gardade! Tio ĉi nuligas la sorĉon eldiritan de la magiisto kontraŭ Magnatz, kiu ĵuris tiam reveni, kiam ĉesos la priatentado!”

Kugel suprentiris la knabinon al stariĝo. “Tio ĉi neniel estas zorgafero mia propra; mi forĵuras respondecon. Ĉu vi ne provis trompi kaj viktimiti min? Kie estis miaj kusenoj? Kie la bonega manĝaĵo? Kaj mia edzino — kie estis vi?”

La knabino ploris en la manojn, kaj Kugel kondukis ŝin al la kajo. Li tiris proksimen boaton de fiŝkaptisto, ordonis ŝin eniri, enĵetis sian forprenaĵaron.

Malligante la boaton, li instalas la remilojn kaj remis elen sur la lago. Marlinka sentis ŝokan timon. “La ĝirakvoj dronigos nin! Ĉu vi perdis la rezonkapablon?”

“Tute neniel! Mi estis studinta la ĝirakvojn kun zorgo kaj scias precize la limojn de ĉiu.”

Elen sur la surfaco de la lago moviĝis Kugel, kalkulante ĉiun tiron de siaj remiloj. “Ducent paŝojn orienten... Cent paŝojn norden... Ducent paŝojn orienten... Kvindek paŝojn suden...”

Do Kugel remadis dum je dekstre kaj maldekstre de ili soniĝis la suĉado de ĝiranta akvo. Sed la nebulo kuniĝis por malvidigi la stelojn kaj Kugel devis elĵeti la ankron. “Ĉi tie sufiĉe bonas,” li diris. “Ni nun sekuras, kaj restas multe kuŝanta inter ni.”

La knabino retretis velke al ŝia ekstremo de la boato. Kugel paŝis al la pobo kaj sidis apude. “Jen mi, via edzo! Ĉu vi ne ĝojegas pri tio, ke ni fine estas solaj? Mia ĉambro ĉe la gastejo estis multe pli komforta, sed tiu ĉi boato sufiĉos.”

“Ne,” ŝi plorĝemis. “Ne tuŝu min! La ceremonio estis sensignifa, trompo por persvadi vin, ke vi servu kiel Gardisto.”

“Por sesdek jaroj eble, ĝis mi sonorigados la gongon pro pura senesperaĵo?”

“La afero ne estis mia faraĵo! Mi kulpas nur pro ĝojigado! Sed kio okazos al Vul? Neniu rigardas, kaj la sorĉdiro estas rompita!”

“Tiom multe pli malbona por la malfidela popolo de Vul! Ili estas perdintaj sian trezoron, ilian plej belan virgulinon, kaj kiam tagiĝos, tiam Magnatz ekmarŝos al ili.”

Marlinka sonigis akran krion, kio mufligiĝis en la nebulo. “Neniam parolu la malbenitan nomon!”

“Kial ne? Mi kriegos ĝin trans la akvo! Mi informos al Magnatz, ke la sorĉaĵo estas for, ke li nun povas veni por sia venĝo!”

“Ne, ne, bonvolu ne!”

“Do vi devas konduki al mi tiel, kiel mi atendas.”

Plorante la virino obeis, kaj fine malforta ruĝa lumo filtrante tra la nebulo indikis pri sunleviĝo. Kugel stariĝis en la boato, sed ĉiuj identigaj lokoj ankoraŭ kaŝiĝadis.

Plua horo pasis; la suno nun estis supra. La popolo de Vul estos trovantaj ke ilia Gardisto estas for, kaj kun li ilia trezoro. Kugel ete ridis, kaj nun venteto levis la nebulojn, malkovrante la ĉeflokojn kiujn li estis parkerintaj. Li saltis al la pruo, tiregis al la ankra ŝnuro, sed je lia agaciĝo la ankro estis alkroĉiginta sin.

Li ektiris, penegis, kaj la ŝnuro malstriketiĝis iomete. Kugel tiris kun la tuto de sia forto. De sube venis granda vezikado. “Girakvo!” kriis Marlinka en teruro.

“Neniu ĝirakvo ĉi tie,” anhelis Kugel, kaj ektiregis fojon plu. La ŝnuro ŝajnis malstriketiĝi kaj Kugel entiris la ŝnuron. Rigardante de super la flanko li trovis, ke li fiksrigardadas al enorma pala vizaĝo. La ankro estis kaptiĝinta en naztruo. Dum li rigardis, la okuloj palpebrumis malfermiĝe.

Kugel ĵetis for la ŝnuron, saltis por ekteni la remilojn, freneze remis al la suda lagbordo.

Mano tiel granda kiel domo leviĝis el la kavo, serĉpalpis. Marlinka kriegis. Okazis grandega kirlado, fortega puŝaĵo da akvo kiu ĵetis la boaton al la bordo kiel lignopeceton, kaj Magnatz sidiĝis supren en la mezo de Lago Vul.

De la vilaĝo venis la sono de la averta gongo, freneza eksonorigado.

Magnatz puŝegis sin al la genuoj, akvo kaj kotŝlimo verŝana de lia vasta korpo. La ankro penetranta lian naztruon ankoraŭ pendis tiuloke, kaj densa nigra fluido fluis el la vundo. Li levis grandan brakon, platfrapis agacite al la boato. La alfrapo ĝetis supren muron da ŝaŭmo dronigante la boaton, elverŝante trezoraĵojn, sendante Kugelon kaj la knabinon rule falantaj tra la nigra profundeco de la lago.

Kugel piedsvingis kaj puŝadis, kaj pelis sin al la kirlata surfaco. Magnatz jam gajnis starpozon kaj estis rigardanta al Vul.

Kugel naĝis al la strando, ŝancele marŝis landen. Marlinka jamdronis, kaj estis nenie videbla. Trans la lago Magnatz estis vadanta malrapide al la vilaĝo.

Kugel atendis neniom pli longe. Li turniĝis kaj kuris kun la tuto da sia rapido supren laŭ la montoflanko.





Ĉapitro 4

La Sorĉisto Fejresm

La montoj estis forlasitaj malantaŭe: la mallumaj interkrutaĵoj, la laĝetoj, la eĥoemaj krutaĵsuproj — ĉio nun estis nigra masivaĵo en la nordo. Dum ioma tempo Kugel vagis tra regiono konsistanta el malaltaj rondaj montetoj havantaj la koloron kaj teksturon de malnova ligno, kun arbaretoj de blu-nigraj arboj kiuj densis laŭ la krutaĵ-randoj. Poste li venis al malklara vojeto kiu kondukis lin suden laŭ longaj kurbiĝoj kaj deklivoj, kaj fine malfermiĝis super vasta malklara ebenejo. Dekstre je duono de mejlo leviĝis linio de altaj krutaĵoj, kiuj tuj logis lian atenton, kaŭzante al li dolore hantiĝan senton de falsa rememoro. Li rigardadis tute senkomprena. Je iu tempo en la pasinteco li estis konanta tiujn ĉi krutaĵojn: kiel? kiam? Lia memoro provizis nenian respondon. Li sidigis sin sur malalta likeno-kovrita roko por ripozi, sed nun Firks, la kontrolanto kiun Jukonu la Ridanta Magiisto estis enmetinta inter la >visceroj de Kugel, fariĝis malpacienca kaj admonis per stimula ekdoloro. Kugel eksalte stariĝis, ĝemante pro laciĝo kaj skuante sian pugnon al la sudockcidento, la supozebla direkto al Almerio. “Jukonu, Jukonu! Se mi povus repagi dekonon da viaj ofendoj, la mondo juĝus min kruela!”

Li ekiris laŭ la vojeto, sube de la krutaĵoj kiuj tuŝis lian animon per tiom akraj sed neblaj rememoraĵoj. Malproksime sube etendiĝis la ebenejo, pleniganta tri kvaronojn de la horizonto per koloroj multe tiaj kiajn montris la likena roko kiun Kugel estis ĵus forlasinta: nigraj makuloj de arbaroj; griza disfalaĵo el ruinoj plenigis tutan valon; nerimarkindaj strioj de griz-verdeco, **lavend-blauo**, griz-bruno; la plumba brileteco de du grandaj riveroj malaperiĝantaj en la nebuleta malproksimo.

La mallonga ripozo refreŝigis lin neniom, faris nur ke liaj artikoj malfleksemiĝu; li marŝis lame, kaj la zonsako frot-dolorigis al li la kokson. Eĉ pli maltrankviliga estis la malsato kiu enpremis lian stomakon. Jen pluaj repagindaĵoj por kalkuli kontraŭ la konto de Jukonu kiu estis deviginta Kugelon al misio tiom **frivola**: Jukonu, pri kiu necese agnoskiĝas ke li provizis amuleton kiu povas ŝanĝigi tiajn ordinarajojn kiaj herbo, ligno, korno, haro, humo kaj simile en nutran pastaĵon. Bedaŭrinde — kaj tiu ĉi estis indiko pri la pika humoro de Jukonu — la pastaĵo daŭre entenis la guston de sia originalaĵo, kaj dum sia trapaso inter la montoj Kugel estis malofte gustumanta ion ajn pli ĝueblan ol **eŭforbion**, **cóleuson**, **simfiton**, branĉetojn kaj **gajlojn** de kverko, kaj unufoje, kiam ĉio alia malsukcesis, certajn forĵetaĵojn malkovritajn en la kaverno de barbohava táuno. Kugel estis manĝinta nur minimume; lia longa nedika figuro jam fariĝis osteca; liaj vango-ostoj elstaris kiel **davitoj**; la nigraj brovoj kiuj antaŭe emis esprimi ja bonhumore nun kuŝis plataj kaj senspiritaj. Vere, vere, ja devigis ke Jukonu repagi multon! Kaj Kugel, dum li pluiris, disputis la precizan kvaliton de tiu venĝo kiun li prenis se iam ajn li estus trovonta vojon revenan al Almerio.

La piedvojo svingiĝis malsupren al larĝa ŝtona ebenejeto kie la vento estis gravurinta mil groteskajn figurojn. Stude rigardanta la regionon Kugel kredis percepti regulecon inter la **eroditaj** formoj, kaj haltis por froti sian longan metonon dum li konsideris. La desegnaĵo montris ege egan subtilecon — tiome subtila fakte, ke Kugel malcertis ĉu ĝi ne eble devenus el sia propra imago. Proksimiĝante, li detektis pluajn kompleksaĵojn, kaj eĉ pluajn ene de tiuj kompleksaĵoj: helicoj, konusoj, volutoj, diskoj, kurbaĵoj, fleksigitaj sferoj; tordecoj kaj fleksecoj; pintaĵoj, korformaĵoj, longigitaj pintsuproj: la plej ellaborita kaj delikata rok-gravurado pripensebla, memevidente nenia hazarda efiko de la vetero. Kugel malridetis en konfuziĝo, malkapabla imagi motivon por tiom

kompleksa projektego.

Li pluiris kaj momenton poste aŭdis voĉojn, kun la interfrapadon de iloj. Li ekhaltis, aŭskultis singarde, poste iris plu, elvenis por trovi aron el kvindek viroj havantaj diversajn altecojn ekde tri colojn ĝis dek du futojn. Kugel alproksimiĝis sur timoplenaj piedoj, sed post nur ekrigardi la viroj neniom lin atentis, daŭrigantaj siajn laborojn per ĉizi, erodi, skrapa, **sondi** kaj poluri kun dediĉa entuziasmo.

Kugel rigardis kelkajn minutojn, poste aliris la laborestron, viro tri futojn alta kiu staris ĉe **pupitro** pristudanta la planojn antaŭ li kuŝigitajn, komparante ilin kontraŭ la labora progresado helpe de genie desegnata optika aparato. Ŝajnis ke li observis ĉion samtempe, vokante instrukciojn, admonante kontraŭ eraroj, instruante la malplej lertaj pri la uzado de iliaj iloj. Por ekzempligi siajn rimarkojn, li uzis mirinde etendeblan fingron, kiu etendis tridek futojn por frapeti al sekcio de roko, por rapide grati diagramon, kaj same rapide maletendiĝi.

La laborestro malproksimiĝis unu/du paŝojn, dummomente plaĉita pro la laboro progresanta, kaj Kugel venis antaŭen. “Kia komplika strebado estas tiu ĉi kaj kio estas ĝia objekto?”

“La laboro estas tia kiel vi vidas,” respondis la laborestro en voĉo de penetra ĉionscio. “El natura roko ni produktas specifigitajn figurojn, je la ordono de la sorĉisto Fejresm ... Nu do!” La krio estis vokita al viro tri futojn plialta ol Kugel, kiu estis frapanta la ŝtonon per pinta martelego. “Mi detektas troan memfidon!” La montrofigro pafiĝis antaŭen. “Estu ege zorga ĉe tiu ĉi interfacio; ĉu vi observis pri kiel la roko emas fendiĝi? Frapu ĉi tie per bato el la sesa intenseco al la vertikalo, uzante duone firman tenofortecon; ĉe tiu ĉi loko alfrapon el la kvara intenseco **ingveno**-direkte; poste uzu kvaron-grandan feran bántilon por eligi la svánĝon.”

Kun la laboro refoje progresanta ĝuste, li reokupiĝis pri siaj planoj, balancante la kapon kun grimaco de malplaĉeco. “Ege tro malrapide! La metiistoj laboras kvazaŭ en drogita **torporo**, aŭ montras **mulan** stultecon. Nur hieraŭ Dadeo Fesadil, li jene kiu altas je tri éloj kaj portas verdan kaptukon, uzis fiézilan foston el la dek naŭa grandeco por gravuri bidon de eta renversita kvarfolio.”

Kugel balancis nee la kapon en surprizo, kvazaŭ li estis neniam aŭdinta pri tiom stultega misfaro. Kaj li demandis: “Kio instigas tiun ĉi superordinaran rok-gravuradon?”

“Mi ne scias por diri,” respondis la laborestro. “La laboro estis progresanta tricent dek ok jarojn, sed dum tiu tempo Fejresm neniam klarigis siajn motivojn. Ili devas esti akraj kaj specifaj, ĉar li faras ĉiutagajn inspektojn kaj rapidemas indiki erarojn.” Nun li turnis flanke por konsulti kun viro tiom alta kiom la genuo de Kugel, kiu voĉis malcertecon pri la klineco de certa voluto. La laborestro, konsultante indekson, solvis la aferon; poste li turniĝis refoje al Kugel, ĉifoje kun sinteno de fakta **aprezo**. “Vi aspektas kaj sagaca kaj lerte vigla; ĉu vi eble ŝatus preni dungigĝon? Al ni mankas kelkaj metiistoj el la kategorio de duon-éla alteco, aŭ, se vi preferas pli fortajn manifestaĵojn, ni povus agrable dungi prov-lernan ŝton-rompiston alta je dek ses éloj. Via alteco estas ŝanĝata laŭ ajna direkto, ekzistas egala oportuno por promociiĝo. Kiel vi vidas, mi estas viro kvar élojn alta. Mi atingis la rangon de Frapanto en unu jaro, Muldisto de Ŝablonoj en tri, Helpanta Ĉéjdo en dek, kaj nun mi estas servinta kiel Ĉefa Ĉéjdo por dek naŭ jaroj. Mia antaŭulo altis je du éloj, kaj la Ĉefa Ĉéjdo antaŭ ol li estis dek-éla viro.” Li daŭrigis por kalkuli la avantaĝojn de la laboro, kiu inkludis nutron, ŝirmon, narkotaĵojn laŭ propra elekto, privilegiojn en la **nimfarejo**, stipendon komencantan je dek tércoj tage, certajn pluajn avantaĝojn inkluzive de la servicoj de Fejresm kiel **aŭguristo** kaj **ekzorcisto**. “Krome, Fejresm subtenas konservejon kie ĉiuj rajtas riĉigi sian intelekton. Mi mem

prenas instrukciadon pri Insekta Identigado, la Heraldiko de la Reĝoj de Malnova Gomaz, Ĉiukuna Ĉantado, Praktika [Katalepsio](#) kaj Ortodoksa Doktrino. Vi neniam trovos mastron pli doneman ol Fejresm la Sorĉisto!”

Kugel detenis sin rideti pri la entuziasmo de la Ĉefa Ĉejdo; tamen, lia stomako estis bolumanta pro malsato kaj li ne rifuzis la oferton aŭtomate. “Mi neniam antaŭe konsideris tian karieron,” li diris. “Vi citas avantaĝojn pri kiuj mi ne sciis.”

“Vere; ili ne estas ĝenerale sciataj.”

“Mi ne povas tuj diri jes aŭ ne. Ĝi estas decidaĵo konsekvenca al kio decas, mi kredas, ke mi konsideru laŭ ĉiuj ĝiaj aspektoj.”

La Ĉefa Ĉejdo donis profundan kapjeson de kunsento. “Ni kuraĝigas niajn metiistojn al prikonsiliĝo, kiam ĉiu frapo devas efiki por la dezirata rezulto. Por ripari malĝustaĵon kio eraras je nur la dikeco de fingra ungo la tuta bloko devas esti forprenota, nova bloko ĝustigota en la ujon de la malnova, post kiam ĉio komencos je denove. Ĝis tiam kiam la laboro reatingos sian antaŭan staĝon, nimfarejaj privilegioj malpermesiĝas al ĉiuj. Sekve, ni deziras neniajn oportunemajn aŭ impulsemajn novulojn en la grupo.”

Firks, subite komprenanta ke Kugel proponis atendigon, faris prezetaĵojn tre ege dolorigajn. Tenante sian abdomenon, Kugel iris malproksimete for kaj dum la Ĉefa Ĉejdo rigardis konfuzita, disputadis arde kun Firks. “Kiel mi progresu antaŭen sen nutro?” La respondo de Firks estis tranĉa moveto de siaj hokpintoj. “Maleble!” ekkriis Kugel. “La amuleto de Jukonu eble sufiĉas laŭ teorio, sed mi povas enstomakigi neniom plu da eŭforbio; rememoru, se mi falos mortinta sur la piedvojo, vi neniam kuniĝos refoje kun via kamarado en la basenoj de Jukonu!”

Firks rekonis la justecon de tiu argumento kaj malgraŭvole fariĝis kvieta. Kugel reiris al la pupitro, kie la Ĉefa Ĉejdo jam estis distrigita pro la malkovro de granda [turmalino](#) kontraŭiganta la fluadon de certa komplika helico. Postlonge, Kugel sukcesis gajni lian atenton. “Dum mi konsideras la oferton de dungaĵo kaj la konfliktajn avantaĝojn de malaltiĝo kaj plialtiĝo, mi bezonos litseĝon sur kiu mi ripozu. Mi ankaŭ volas testi la [apanaĝojn](#) de vi preparolitajn, eble dum periodo de unu tago aŭ pluse.”

“Via [prudento](#) laŭdindas,” diris la Ĉefa Ĉejdo. “La popolo hodiaŭa-tempa emas decidigi sin al kursoj kiujn ili poste bedaŭras. Ne estis tiel en mia juneco, kiam sobreco kaj bonjuĝado superis. Mi aranĝos por ke vi permesiĝu eniri la ŝlositan vilaĝon, kie vi rajtos provi la veron de ĉiuj miaj pridiroj. Vi trovos Fejresmon strika sed justa, kaj nur tiu viro kiu frapaĉus la rokon sezorge gajnus kialojn por plendi. Sed observu! Jen venas Fejresm la Sorĉisto faranta sian tagan inspektion!”

Proksimiĝante laŭ la piedvojo venis impon-statura viro portanta volumenegan blankan robon. Lia vizaĝa esprimo estis favora; lia hararo estis kiel flava kokida plumaro; liaj okuloj rigardis supren kvazaŭ plaĉe distrita en kontemplado de neeldirebla sublimaĵo. Liaj brakoj sopra-poze interkrucis, kaj li iris sen moviĝo de siaj gamboj. La laboristoj, demetante siajn ĉapelojn kaj riverencantaj en kuneco, ĉantis respektoplenan saluton, al kiu Fejresm respondis per kapkliniĝo. Ekrigardante Kugelon, li paŭzis, faris rapidan inspekteton pri la laboro ĝis nun finita, kaj glitis sen hasto al la pupitro.

“Ĉio aspektas akcepteble ekzakta,” li diris al la Ĉefa Ĉejdo. “Mi kredas ke la polureco de la

subflanko de Surfac-projekciaĵo 56-16 estas malmoleta kaj mi detektas malgrandan fendeton sur la dua ligiĝo de la dek-naŭa pint-helico. Inter tiuj du cirkonstancoj neniu ŝajnas grave signifa kaj mi rekomendas nenian pun-reagon.”

“La malplaĉigaĵoj estos riparotaj kaj la senzorgaj metiistoj discipliniĝos: tiel por minimuma reago!” kriis la Ĉefa Ĉejdo en kolera pasio. “Nun mi volas konigi al vi homon kiu eble membriĝos al nia dungitaro. Li pretendas nenian sperton pri la lerto, kaj pripensados antaŭ ol decidi sian membriĝon. Se li tiel elektas, mi antaŭvidas la kutiman periodon laborante kiel rubaĵ-kolektisto, antaŭ ol li estu fidota pri ilo-akrigado kaj prepara fosado.”

“Jes, tio agordus kun nia kutima praktiko. Tamen ...” Fejresm glitis facile antaŭen, prenis la maldekstran manon de Kugel kaj faris rapidan aŭguron sur la fingrongoj. Lia facila esprimo sobriĝis. “Mi vidas kontraŭismojn el kvar varioj. Tamen klaras ke via plej taŭga kapablo troviĝas alie ol en la tranĉado kaj formado de roko. Mi rekomendas ke vi serĉu alian kaj pli kongruan dungiĝon.”

“Bone dirita!” kriis la Ĉefa Ĉejdo. “Fejresm la Sorĉisto montras sian seneraran altruismon! Por ke mi mem ne malbonfaru mi nuligas mian oferton pri dungo! Ĉar neniu celo nun povas esti servita per kuŝi sur litseĝo aŭ testado de apanaĝoj, ne necesas ke vi plu malŝparu tempon neregajneblan.”

Kugel faris amaran esprimon. “Aŭgura rito tiom simpla povus emi al erara rezulto.”

La Ĉefa Ĉejdo etendis sian montrofingron tridek futojn vertikale en pasie kolera kontraŭstaro, sed Fejresm respondis per paca kapjeso. “Tiu ĉi ja veras, kaj mi agrable farus pli multampleksan aŭguron, malgraŭ tio ke la procezo bezonus inter ses ĝis ok horojn.”

“Tiom longe?” demandis Kugel ŝokita.

“Tio estus la pleja minumumo. Unue vi estus verŝita kap-ĝis-piede per la [intestoj](#) de freŝe-mortigitaj strigoj, poste subakvigita en varmeta baseno enhavanta kvanton da sekretaj [organikaj](#) substancoj. Mi devas, kompreneble, [karbigi](#) la etan piedfingron de via maldekstra piedo, kaj [dilati](#) vian nazon sufiĉe por enlasi eksploran skarabon, ke li studu la cirkvitojn kondukantajn al kaj ree de via [sensorio](#). Do lasu ke ni iru al mia aŭgureja ĉambro, por ke ni komencu la procezon en rapida tempo.”

Kugel tiris al sia mentono, kaptita inter la du elektoj. Fine li diris, “Mi estas singarda viro, kaj devas pripensi eĉ la elektindecon de tia aŭguro; tial, mi bezonos kelkajn tagojn da trankvilo kaj medita [somnialeco](#). Via vilaĝo kaj la apuda nimfarejo ŝajnas provizi la kondiĉojn necesajn por tia stato; sekve —”

Fejresm indulge kapneis. “Singardo, kiel ajna virto, povas esti prenata ĝis ekstremo. La aŭguro devas komenci tuj.”

Kugel provis disputi plu sed Fejresm estis rigide insista, kaj post momenton glitis for laŭ la piedvoĵeto.

Kugel senespere iris flanken, konsideranta unue iun planon, poste alian. La suno alproksimiĝis la zeniton, kaj la metiistoj komencis prognoze interdiskuti pri kiaj viandoj prezentiĝos por ilia meztaga manĝo. Finfine la Ĉefa Ĉejdo faris indikon; ĉiuj submetis siajn ilojn kaj amasiĝis ĉirkaŭ la vagoneto kiu enhavis la manĝaĵaregon.

Kugel amik-ŝerce alvokis ke li povus persvadiĝi al partopeno en la manĝado, sed la Ĉefa Ĉejdo rifuzis tion konsideri. “Kiel en ĉiuj de la agadoj de Fejresm, precizeco de konsekvencoj devas superi. Estus nepenseble malegala afero ke kvindek kvar viroj eble manĝus porciojn preparitajn por kvindek tri.”

Kugel povis elpensi neniun taŭgan rediron, kaj sidis silenta dum la rok-hakistoj maĉadis al viandaj **pasteĉoj**, fromaĝoj kaj sala fiŝviando. Ĉiuj malatentis lin krom unu, kvaron-éla viro kies donemo multe superis ties staturo, kaj kiu elektis apartigi por Kugel porcion de siaj manĝaĵoj. Kugel respondis ke li neniom malsatis, kaj stariĝanta ekvagis for tra la prilaboratejo, esperante trovi iun forgesitan stokon de manĝaĵoj. Li serĉiris ien kaj tien, sed la rubaĵ-kolektistoj jam estis forprenintaj ĉiun eron da substanco fremda al la desegnaĵo. Kun apetito nesatigita Kugel alvenis la centron de la nuntempa prilaboraĵo kie, dise kuŝantan sur gravurita disko, li ekvidis tre strangan vivaĵon: esence iu ĝelata globo enhavanta ŝajne-naĝantaj lumajn polvojn, kaj el kio kelkaj travideblaj tuboj aŭ tentakloj etendiĝis malgrandigantaj ĝis nenieco. Kugel kliniĝis antaŭen por studi la estulon, kiu pulsadis kun malrapida interna ritmo. Li alpuŝis ĝin trude per sia fingro, kaj brilaj etaj flagroj ondetis for de la kontakta punkto. Interese: bestaĵo el unikaj kapabloj!

Prenanta pinglon el siaj vestoj, li puŝis pike al tentaklo, kiu eligis ofenditan pulson de lumo, dum la oraj punktetoj en ĝia substanco ondis impulse tien kaj reen. Scivoligita eĉ pli ol antaŭe, Kugel apudigis sin, kaj dediĉis sin al eksperimentado, prove puŝanta ie kaj tie, observanta la kolerajn ekbrilojn kaj flagretojn kun granda amuziĝo.

Nova ideo okazis al Kugel. La estulo montris kvalitojn sugestajn pri ambaŭ **celenterulo** kaj **eĥinodermulo**. Eble iu surtera **nudibraĥulo**? Molusko senegita de sia ŝelo? Pli grave, ĉu la estulo manĝeblas?

Kugel elprenis sian amuleton, aplikis ĝin al la centra globo kaj al ĉiu el la tentakloj. Li aŭdis nek sonoron nek zumon: la estulo estis netoksa. Li prenis elinge sian tranĉilon, provis detranĉi unu el la tentakloj, sed trovis la substancon tro risorteca kaj dura por tranĉi. Proksime situis portebla hejtilo, tenata ĉiam arda por forĝi kaj akriĝi la ilojn de laborantoj. Li levis la estulon kaj situigis ĝin super la fajro. Li rostis ĝin zorge, kaj post ol li juĝis ĝin sufiĉe kuirita, provis ĝin manĝi. Fine, post variaj kaj maldignaj streboj, li ŝtope enpuŝis la tutan estulon malsupren ene de sia gorĝo, trovanta ĝin sen gusto aŭ nutra volumeno.

La ŝton-gravuristoj estis revenantaj al sia laboro. Kun signifoplena regardesprimo al la laborestro Kugel ekforiris laŭ la piedovojo.

Nemalproksime situis la loĝejo de Fejresm la Sorĉisto: longa malalta konstruaĵo surmuntita de kupoloj el kupro, **glimo**, kaj brile blua vitro. Fejresm mem sidis ripoze antaŭ la loĝejo, distre rigardanta la valon kun trankvila kaj ĉion-rilata bonanimo. Li levis manon en kalma saluto. “Mi esperas por vi plaĉajn vojaĝojn kaj sukceson en ĉiuj viaj futuraj provaĵoj.”

“La bonvolon mi nature taksas altvalora,” diris Kugel kun iom da amareco. “Vi estus povinta, tamen, provizi pli signifoplenan servicon per dividi porcion de via tagmeza manĝaĵo.”

La trakvila bonvolemo de Fejresm daŭris kiel antaŭe. “Tiu ĉi estus agado de misfara altruismo. Tro plena donemo putrigas la aldonaton kaj malentuziasmigas lian laboremon.”

Kugel eligis amaran ridon. “Mi estas viro el feraj principoj, kaj mi ne plendos, eĉ malgraŭ tio,

ke pro manko de ajna pli bona manĝaĵo, mi estis devigata vori grandan travideblan insekton kiun mi trovis ĉe la kora centro de via rok-gravuraĵo.”

Fejresm rapide turniĝis kun subite intensa esprimo. “Iun grandan travideblan insekton, vi diras?”

“Insekto, epifito, molusko — kiu scias? Ĝi tiel aspektis kiel nenia estulo kiun mi ĝis nun vidis, kaj ĝia gusto, eĉ post zorge kuriri ĝin sur la forno, ne estis distinga.”

Fejresm ekŝvebis sep futojn en la aero, por turni la plenan povecon de sia rigardo malsupren al Kugel. Li parolis en malalta raspa voĉo: “Pridiru tiun estulon en plena detalo!”

Miranta pri la severeco de Fejresm, Kugel obeis. “Ĝi estis jene kaj jene en sia amplekso.” Li indikis per la manoj. “En sia koloro ĝi estis gelata travidebleco enŝprucita de nekalkuleblaj oraj punkteroj. Tiuj ĉi flagris kaj pulsitis tiam kiam la estulo estis maltrankviligita. La tentakloj ŝajnis fariĝi diafanaj kaj malaperis ansataŭ ol finiĝi. La estulo montris certan malbonhumoran volemecon, kaj ingestado proviĝis malfacila.”

Fejresm mane tiraĉis al sia kapo, kroĉante la fingrojn inter la flava plumeco de siaj haroj. Li ruligis siajn okulojn ĉielen kaj eligis tragikan plorkrion. “Aĥ! Kvin cent jarojn mi laboradis por allogi ĉi tiun estulon, malesperanta, dubanta, cerbumadanta je noktoj, tamen neniam forlasanta la esperon pri tio ke miaj kalkuloj ĝustis kaj mia granda talismano pravis. Kaj tiam, kiam finfine ĝi aperas, vi surfalas ĝin por nenia alia celo ol satigi vian malloge troan manĝemegon!”

Kugel, iom senkuraĝigita pro la kolero de Fejresm, emfazis sian mankon de malicemo. Fejresm rifuzis esti moligita. Li atentigis ke Kugel estis trude pasanta sen permeso kaj pro tio rezigninis sian rajton pledi senkulpecon. “Via nura ekzistado estas kulpaĵo, pliigita per tio ke vi portis la malplaĉan fakton al mia atento. Bonvolo instigis min al toleremo, kion mi nun konas kiel eege erara.”

“En tia kazo,” statis Kugel kun digneco, “Mi tuj forestiĝos de vi. Mi esperas por vi bonan fortunon por la restaĵo de la tago, kaj nun, adiaŭ.”

“Ne tiel haste,” diris Fejresm en la plej malvama voĉtonono. “Precizeco estis altrudita; la malbono kiu tiel estiĝis devigas kontraŭ-agon por validigi la Leĝon de Ekvilibro. Mi povas difini la gravecon de via ago ĉimaniere: se mi eksplodigus vin ĉimomente en la plej minimumegajn el viaj parteroj, la tiela repago mezuruiĝus unu dekmilionon da via ofendaĵo. Pli rigora repago necesiĝas.”

Kugel parolis en granda maltrankvileco. “Mi komprenas ke ago konsekvenca estis farata, sed rememoru! mia partopreno estis en sia bazo neformala. Mi postule deklaras unue mian absolutan senkulpecon, due mian mankon de kriminala voleco, kaj trie miajn elkorajn pardonpetojn. Kaj nun, ĉar al mi restas multaj leŭgoj marŝendaj, mi faros —”

Fejresm faris komandan geston. Kugel eksilentiĝis. Fejresm entiris profundan spiron. “Vi malkomprenas la katastrofon kiun vi trudis al mi. Mi eksplikos, por ke vi ne miru pro la rigoraĵoj kiuj atendas vin. Kiel mi jam skizis, la alveno de la estulo estis la suprema rezulto de mia granda strebado. Mi prognozis ĝian naturon pere de studado de kvardek du mil raraj libroj, ĉiuj skribitaj en kripta lingvo: tasko kiu bezonis cent jarojn. Dum posta cento da jaroj mi ellaboris desegnaĵon por instigi ke ĝi involviĝu en sin mem kaj preparis precizan specifigan planon. Sekve mi amasigis ŝton-tranĉistojn, kaj tra periodo de tricent jaroj donis solidan formon al mia desegnaĵo. Pro tio ke simileco

entenas similecon, la variaĵoj kaj interfandiĝoj kreas supra-brakiĝadon el ĉiuj lokoj, kvalitoj kaj intervaloj en krizalidrójda kirilaĵo, eventuale ekcitantanta potencigon de pro-úbieta kanalaĵo. Hodiaŭ okazis la kunkateniĝo; la ‘estulo’, kiel vi ĝin nomas, survolviĝis al sin mem; en via idiota malico vi elvoris ĝin.”

Kugel, kun iomete da malhumileco, atentigis ke la ‘idiota malico’ kion menciis la maltrankvila sorĉisto estis fakte nura malsato. “Ajnakaze, kiel tiu ĉi ‘estulo’ tiom eksterordinaras? Aliaj egale malbelaj troveblas en la reto de ajna fiŝkaptisto.”

Fejresm rektigis sian starpozon al sia plena staturo, rigardis malice malsupren al Kugel. “La ‘estulo’,” li diris en grata voĉo, “estas TUTECO. La centra globo estas spaca ĉiomo, vidata inverse. La tuboj estas **vorticoj** kondukantaj al diversaj epokoj, kaj la teruraĵoj kiujn vi okazigis per viaj enpuŝoj kaj instigoj, viaj boligado kaj maĉado, neniel imageblas!”

“Kio pri la efikoj de digestado?” enketis Kugel delikate. “Ĉu la diversaj komponaĵoj de spaco, tempo kaj ekzisteco daŭre tenus siajn identecojn trapasinte la longon de mia interna kanalo?”

“Bah. La koncepto ege naivas. Sufiĉas diri ke vi estis kaŭzinta damaĝon kaj estigis seriozan tension en la **ontologia** teksaĵo. Seneviteble estas devigate ke vi restarigu la ekvilibron.”

Kugel etendis siajn manojn. “Ĉu ne eblas ke eraro okazis? Ke la ‘estulo’ estis nenio pli ol pseŭdo-TUTECO? Aŭ ĉu imageblas ke la ‘estulo’ povus per ia rimedo ellogiĝi fojon plu?”

“La du unuaj teorioj malkonsiderindas. Rilate al la lasta, mi devas konfesi ke certaj panikaj riparoj memprezentadas en mia menso.” Fejresm faris mangeston, kaj la piedoj de Kugel afiksiĝis sur la grundo. “Mi devas iri al mia aŭgurejo por lerni la plenan signifon de la maltrankviligaj eventoj. Post ioma tempo mi revenos.”

“Je kiam mi estos malfortega pro malsato,” diris Kugel maltrankvilete. “Fakte, peceto da pano kaj mordaĵo da fromaĝo estus malokazigintaj ĉiujn eventojn pri kiuj mi nun riproĉiĝas.”

“Silenton!” tondris Fejresm. “Ne forgesu ke via puno atendas decidon; estas supralime impertinente riskema ke oni agacu personon jam baraktantan tenadi al si prudentan kalmon!”

“Lasu min diri almenaŭ jene,” respondis Kugel. “Se vi estus revenonta de via aŭgurado por trovi min mortinta kaj sekigita ĉi tie sur la piedvoĵeto, vi estus malŝparinte multan tempon decidanta inter puno-rimedojn.”

“Reestabli vivpovon estas magrandanta tasko,” diris Fejresm. “Diversaĵo el mortoj per kontrastaj procedoj ja eble partoprenus en via pridecido.” Li komencis iri al sia aŭgurejo, poste turniĝis kaj faris malpaciencaĵon geston. “Sekvu, estos pli facile manĝigi vin ol reveni al la vojo.”

La piedoj de Kugel fariĝis liberaj denove kaj li sekvis Fejresmon tra larĝa arko en la aŭgurejon. En granda ĉambro kun grizaj elklinaj muroj, lumigita de tri-koloraj **pluredroj**, Kugel elvoris la manĝaĵon kion Fejresm kaŭzis aperi. Dumtempe Fejresm apartiĝis al sia laborĉambro, kie li okupigis sin en aŭgurado. Dum pasis la tempo Kugel fariĝis malripozema, kaj trifoje proksimiĝis al la arka enirejo. Je ĉiu okazo Prezentaĵo venis por lin deteni, unue en formo de alstatanta ĥulo, sekve zigzaga fajrbrilo de energio, kaj fine dudekopo da rebrilaj purpuraj vespoj.

Malkuraĝigita, Kugel aliris benkon, kaj sidis kun kubutoj sur longaj gamboj, manoj sube de sia

mentono.

Fejresm finfine reaperis, lia robo sulkohava, la fajna flava plumetaĵo de sia hararo malnetigita en multaj pintetoj. Kugel malrapide leviĝis por stari.

“Mi lernis la ĉeestejon de TUTECO,” diris Fejresm, en voĉo tia kia sonfrapoj de grandega gongo. “Indigne ofendita, elprenanta sin de via stomako, ĝi retrosaltis milionon da jaroj en la pasintecon.”

Kugel faris solemnan kapneon. “Permesu min oferti mian simpation, kaj mian konsilon, kio estas: neniam malesperu! Eble la ‘estulo’ elektos preterpasi ĉi tiun lokon refoje.”

“Via babilaĉo ekĉesu! TUTECO devas troviĝi. Venu.”

Kugel kontraŭvole sekvis Fejresmon en malgrandan ĉambron kun muroj blue kahelitaj, kun alta kupolo el blua kaj oranĝa vitro kiel ĝia plafono. Fejresm fingre indikis al nigra disko en la mezo de la planko. “Staru tie.”

Kugel maĝojete obeis. “En certa senco, mi kredas ke —”

“Silenton!” Fejresm antaŭvenis. “Atentu pri ĉi objekto!” Li montris eburan sferon tiel granda kiel du pugnoj, gravurita ege detale. “Jene vi vidas la desegnaĵon de kio mia granda laboraĵo devenis. Ĝi esprimas la simbolan signifon de NENIECO al kio TUTECO devas necese alfiksi sin, laŭ la Dua Leĝo de Kriptorójdaj [Afinecoj](#) de Kratinjao, pri kiu vi eble jam familiaras.”

“Ne en ĉiu aspekto,” diris Kugel. “Sed ĉu mi rajtas demandi pri viaj intencoj?”

La buŝo de Fejresm moviĝis montri malvarmetan rideton. “Mi estas baŭldaŭe provonta iun el la plej potencaj sorĉaĵoj iam ajn evoluigitaj: sorĉo tiom malfacile traktebla, tiom malmola, kaj interagema, ke Fandeaĵo, Ĉefa Sorĉisto de la Granda Motolamo, malpermesis ĝian uzon. Se mi povus ĝin regi, vi estus ekpuŝata milionon da jaroj en la pasintecon. Tie vi loĝados ĝis vi sukcesos je via misio, post kiam vi rajtus reveni.”

Kugel rapide ekpaŝis de sur la nigra disko. “Mi ne estas taŭga viro por tiu ĉi misio, kio ajn ĝi povas esti. Mi fervore urĝas al la uzo de iu alia!”

Fejresm ignoris la rezonegon. “La misio, kompreneble, estas porti la simbolon al TUTECO.” Li elprenis kunpremaĵon el griza molpapero. “Por helpigi vian serĉadon, mi provizas al vi tiun instrumenton kiu relatigas ĉiujn eblajn vokaĵojn al ĉiu elpensebla sistemo de signifoj.” Li puŝis la retaĵon en orelon de Kugel, kie ĝi rapide interkonektis sin al la nervo de sona esprimado. “Nun,” diris Fejresm, “vi bezonus aŭskulti strangan lingvon dum nur tri minutoj por fariĝi lerta en ĝia uzo. Kaj nun, plua objekto por plibonigi la eblecon de sukceso: tiu ĉi ringo. Atentu la juvelon: se vi estus alproksimiĝanta je leŭgo al TUTECO, eke movigantaj lumetoj ene de la juvelo vin gvidos. Ĉu ĉio klaras?”

Kugel respondis per kapĵeso malgraŭa. “Ekzistas plua afero por esti konsiderata. Supozu ke viaj kalkulaĵoj erarus kaj ke TUTECO estus retroirinta nur naŭcent mil jarojn en la pasintecon: kion se tiel? Ĉu mi devu elspezi mian vivon en tiu eble barbara epoko?”

Fejresm malridetis malplaĉita. “Tia situacio postulas eraron granda je dek procentoj. Mia sistemo de komputado malofte enlasas malprecizecon pli grandan ol unu procento.”

Kugel komencis aritmetiki, sed nun Fejresm gestis al la nigra disko. “Reiru! Kaj ne moviĝu poste, aŭ vi plisuferus pro tio!”

Ŝvito eliĝanta de siaj glandoj, genuoj tremantaj kaj subfleksiĝantaj, Kugel reiris al la loko prigestiga.

Fejresm retretis al la fora ekstremo de la ĉambro, kie li enpaŝis helicon el ora tubo, kio risortis spriale supren por teni lian korpon. De sur skribtablo li prenis kvar nigrajn diskojn, kiujn li komencis ĵete intermiksi kaj ĵongli kun tiom mirinda lerteco ke ili malfokusiĝis je la vido de Kugel. Fejresm finfine ekĵetis for la diskojn; **girantaj** kaj radumantaj ili ŝvebis en la aero, grade drivantaj al Kugel.

Fejresm sekve prenis blankan tubon, premis ĝin firme kontraŭ siajn lipojn kaj parolis sorĉan ĉanton. La tubo ŝvelis kaj rondiĝis en grandan globon. Fejresm tordigis la ekstremon malfirmige kaj krianta tondran sorĉon, ĵetegis la globon al la girantaj diskoj, kaj ĉio eksplodis. Kugel estis ĉirkaŭita, ektenita, ektirita en ĉiuj direktoj eksteren, kunpremita same fortege: la suma rezulto, ekpuŝo laŭ direkto kontraŭa al ĉio, kun **impeto** egalforta je tajdo de miliono da jaroj. Inter blinde brilantaj lumoj kaj distorditaj vidaĵoj Kugel estis transportata el de sia konscio.



Kugel vekigis en brileco el orange-ora sunlumo, de radia kvalito kian li neniam antaŭe spertis. Li kuŝis sur sia dorso rigardanta supren en ĉielon el varmeta bluo, el pli facila tono kaj mola teksturo ol la **indiga** ĉielo de sia propra tempo.

Li provis brakojn kaj gambojn kaj trovanta nenian difekton, sidiĝis rekta, poste leviĝis malrapide al siajn piedojn, palpebrante en la malfamiliara lumeco.

La regiona tersurfaco estis ŝanĝiĝinta nur minimume. La montoj ĉe la nordo estis pli altaj kaj akraj, kaj Kugel ne povis distingi tion, de kiu direkto li elvenis — aŭ, pli ĝuste — de kiu li estos elvenonta. La loko de la projekto de Fejresm nun estis malalta arbaro el plume malpezaj verdaj arboj, sur kiuj pendiĝis arojn da ruĝaj beroj. La valo estis kiel antaŭe, malgraŭ tio ke la riveroj fluadis laŭ malsamaj serpentumoj kaj tri grandaj urboj videblis ĉe diversaj distancoj. La aero bloviĝetanta supren el la valo portis strange maldoĉetan **aromon** miksita kun antikva elspiraĵo el putriĝeto kaj **ŝimo**, kaj ŝajnis al Kugel ke strangeta **melankolio** pendiĝis en la aero; fakte, li pensis ke li aŭdis muzikon: malrapida plenda melodio, sufiĉe malĝoja por larmigi liajn orelojn. Li serĉis la fonton de la muziko, sed ĝi fadis kaj malaŭdebliĝis dum li ĝin serĉis, kaj nur tiam kiam li ĉesis provi aŭskulti ĝi revenetis.

Por la unua fojo Kugel rigardis al la deklivoj kiuj leviĝis en la okcidento, kaj nun la sento de neebbla rememoro pli fortis eĉ ol antaŭe. Li tiris al sia mentono pripensante. La tempo estis miliono da jaroj antaŭ ol tiu alia okazo dum kiam li ekvidis la deklivojn, kaj sekve, laŭ difine, devas esti la unua. Sed ĉi fojo devas ankaŭ esti la dua fojo, ĉar li ja bone rememoris sian unuan sperton pri tiuj deklivoj. Aliflanke, ne estas eble kontraŭi la logikon de tempo, kaj laŭ tia pensado tiu ĉi vido antaŭas la alian. Estas paradokse, pensis Kugel: ja enigme! Kiu sperto estis provizinta la senton de familiareco je ambaŭ okazoj?... Kugel forlasis la subjekton pro ĝia malprofiteco kaj komencis turni for kiam moviĝo atentigis lian okulon. Li rigardis refoje supren al la fronto de la deklivoj, kaj la aero subite plenis kaj luksis per la muziko kiun li estis aŭdinta antaŭe, muziko pri korŝireco kaj ekzalta malespero. Kugel rigardadis mirigite. Granda flugilhava estulo portanta blankan robon flugilumis altĉiele laŭ la faco de la deklivo. La flugiloj estis longaj, ripaj per nigra **ĥitino**, kovritaj de griza

membrano. Kugel rigardis kun admirego dum ĝi onde enflugis kavernon alte en la faco de la deklivo.

Gongo sonoris, kies direkton Kugel ne povis **determini**. Super-**harmonoj** soniĝis skue trapasante la aeron, kaj kiam ili mortis, la apenaŭ aŭdebla muziko fariĝis preskaŭ neaŭdebla. De malproksime trans la valo venis unu el la Flugilhavaj Estuloj, portanta homan figuron, kies aĝo kaj sekso Kugel ne povis distingi. Ĝi ŝvebis apud la deklivo kaj lasis fali sian pezaĵon. Kugel pensis aŭdi mallaŭtan krion kaj la muziko estis malĝoja, digna, sonora. La korpo ŝajnis fali malrapide malsupren el la granda alteco kaj frapis fine ĉe la bazo de la deklivo. La Flugilhava Estulo, malteninte la korpon, glitis al alta rando, kie ĝi faldis siajn flugilojn kaj staris tiel kiel viro, rigardadanta trans la valo. Kugel fuĝis velke malantaŭ roko. Ĉu li estis vidita? Li ne povis certiĝi. Li ellasis pezan suspiron. La malĝoja ora mondo de la pasinteco ne estis laŭ lia plaĉo; ju pli rapide li foriru des pli bone. Li ekzamenis la ringon kion Fejresm estis provizinta, sed la juvelo montriĝis kiel malbrila vitro, kun neniuj el la ekmovaj rebriletaĵoj kiuj indikus la direkton al TUTECO. Estis tiel, kiel Kugel pritimis. Fejresm estis erariĝinta en siaj kalkuladoj kaj Kugel povos neniam reveni al sia propra tempo.

La led-klapa sono de flugiloj instigis lin enrigardi la ĉielon. Li velke retretis en tian kaŝecon kiam ofertis la roko. La muziko de malĝojeco ŝvelis kaj suspiris for, dum en la lumo de la subiranta suno la flugilhava estulo ŝvebis apud la deklivo kaj maltenis sian viktimon. Poste ĝi surteriĝis ĉe rando kun granda mola klapado de flugiloj kaj eniris la kavernon.

Kugel stariĝis kaj kuris kaŭre malsupren laŭ la piedvojo tra la sukkena krepusko.

La piedvojeto postnelonge eniris areton da arboj kaj tie ĉi Kugel paŭzis por faciligi sian spiradon, post kiam li antaŭeniris singardeme sen hasto. Li transiris regioneton el kultivita tero sur kiu staris neokupita kabaneto. Kugel konsideris ĝin por nokta ŝirmejo, sed imagis vidi malhelan figuron rigardantan de la interno kaj ĝin preterpasis.

La piedvojeto kondukis for de la deklivoj, trans ondaj herbaj montetoj, kaj tuj antaŭ ol krepusko cedis al nokto Kugel atingis vilaĝon ĉe bordo de lageto.

Kugel alproksimiĝis singarde, sed kuraĝiĝis pro la signoj de neteco kaj bona bintenado. En parko apud la lageto staris **pavilono** eble por muziko, **mimado** aŭ **deklamado**; ĉirkaŭ la parko estis etaj mallarĝaj domoj kun altaj gabloj, la krestoj de kiuj leviĝis kiel ornamaĵoj kurbrandaĵoj. Kontraŭ la lageto situis pli granda konstruaĵo, kun ornama fronto el plektita ligno kaj **emajlitaj** tabuloj el ruĝo, bluo kaj flavo. Tri altaj gabloj servis por ĝia tegmento, la centra supra rando tenanta delikate gravuritan panelon, dum la du ĉe ambaŭ flankoj tenis seriojn de etaj sferaj bluaj lampoj. Ĉe la antaŭo estis larĝa **pergolo** ŝirmanta benkojn, tablojn kaj malferman spacon, ĉio lumigita de ruĝaj kaj verdaj ventumil-formaj farjringoj. Ĉi tie la urbetanoj distriĝis ripoze, enspirantaj incenson kaj trinkantaj vinon, dum junuloj kaj junulinoj petolis en strangaspekta danco el altaj gambosvingoj, laŭ muziko de **flutoj** kaj **koncertino**.

Plikuraĝigita de la serenceco de la vidaĵo, Kugel alproksimiĝis. La vilaĝanoj estis el tipo kiam li neniam ajn renkontis, malalte statura, kun ĝenerale grandaj kapoj kaj longaj moviĝemaj brakoj. Ilia haŭto profunde oranĝis same kiel **potirono**; iliaj okuloj kaj dentoj estis nigraj; iliaj haroj, same nigraj, pendis glate ĉe ambaŭ flankoj de la vizaĝoj de la viroj por finiĝi en aroj da bluaj bidoj. Kontraste, la virinoj volvigis siajn harojn ĉirkaŭ blankaj ringoj kaj stangetoj, por sume fariĝi desegnaĵoj pli ol iomete kompleksaj. La vizaĝaspektoj pezis ĉe mandibloj kaj vango-ostoj; la longaj aparte lokitaj okuloj subenvelkis komikaspekte ĉe la flankaj anguloj. La nazoj kaj oreloj estis longaj kaj eksterordinare respondis al muskola regado, donante grandegan vivecon al la vizaĝoj. La viroj portis

falbalarajn jupojn, brunajn manteletojn, kap-ornamaĵojn konsistantajn el larga nigra disko, nigra cilindro, alia malpligranda disko, surmuntita de ora piketo. La virinoj portis nigrajn pantalonojn, brunajn jakojn kun emajlitaj diskoj ĉe la umbiliko, kaj ĉe ambaŭ gluteoj falsan voston el verdaj aŭ ruĝaj plumoj, eble indikiloj pri edzina rango.

Kugel paŝis en la lumon de la ventumilformaj fajringoj; ekĉesis ĉiuj paroloj. Nazoj fariĝis rigidaj, okuloj rigardegis, oreloj tordiĝadis en kuriozeco. Kugel ridetis al dekstro kaj maldekstro, svingetis siajn manojn laŭ memfide ĉarma saluto-gesto, kaj prenis sidlokon ĉe senhoma tablo.

Estis murmuroj de mira surprizo ĉe la diversaj tabloj, tro kvietaj por atingi la orelojn de Kugel. Post nelonge unu el la pliaĝuloj stariĝis kaj alproksimiĝante al la tablo de Kugel parolis frazon, kiun Kugel trovis nekomprenebla, ĉar pro malsufiĉa amplekso la reteto de Fejresm ankoraŭ malsukcesis doni signifon. Kugel ridetis ĝentile, etendis dise siajn manojn en gesto de senkapablo. La rangulo parolis fojon plu, en iom pli akra voĉtono, kaj refoje Kugel indikis sian malkapablon kompreni. La rangulo gestis malplaĉecon per subita tordiĝo de la oreloj kaj turniĝis for. Kugel signis al la proprietulo, indikis fingre la panon kaj vinon sur apuda tablo kaj gestis sian deziron ke samaĵoj portiĝu al li.

La proprietulo voĉis demandon kion, malgraŭ ĝia nekomprenebleco, Kugel povis diveni. Li elprenis oran moneron, kaj, plaĉigita, la proprietulo turniĝis for.

Konversacioj rekomencis ĉe la diversaj tabloj kaj post nelonge la vokaĵoj portis signifon al Kugel. Manĝinte kaj trinkinte, li stariĝis kaj marŝis al la tablo de tiu rangulo kiu unue alparolis lin, kie li riverencis respektplene. “Ĉu mi permesiĝas kune sidiĝi ĉe via tablo?”

“Certe; se vi tiel volas. Sidiĝu.” La rangulo indikis sidlokon. “Pro via konduto mi supozis ke vi ne nur surdas kaj mutas, sed ankaŭ kulpas je mensa subkapablo. Nun klaras, almenaŭ, ke vi aŭdas kaj parolas.”

“Mi ankaŭ pretendas raciemon,” diris Kugel. “Kiel veturanto de fora lando, nescia pri viaj kutimoj, mi kredis ke estus saĝe rigardadi kviete kelkajn momentojn, pro timo ke mi faru barbarajon.”

“Genie sed strange,” estis la respondo de la rangulo. “Tamen, via konduto ofertas neniun evidentegan malaĵon kontraŭan al ortodokseco. Ĉu mi rajtas pridemandi la urĝecon kio portas vin al Farŭeno?”

Kugel alrigardis sian ringon; la kristalo estis malbrila kaj senaktiva: TUTECO evidente alilokis. “Mia hejmlando estas malalkultura; mi vojaĝas por ke mi lernu la modojn kaj stilojn de pli ĝentilaj popoloj.”

“Vere!” La rangulo pripensadis la aferon dum momento, kaj kapjesis en iom hezita aprobo. “Viaj vestoj kaj korpoformo estas el tipo malfamiliara; kie situas tiun ĉi hejmlando via?”

“Ĝi kuŝas en regiono tiom malproksimega,” diris Kugel, “ke neniam ĝis ĉi tiun momenton eksciis mi pri la lando Farŭano!”

La oreloj de la rangulo platiĝis en surprizo. “Kio? Glora Farŭano, nekonata? la grandegaj urboj Impergo, Ĥarŭo, Raverĝando — ĉiuj ne priaŭditaj? Kiel pri la famega Semberso? Certe la famo de Semberso estis atinginta vin? Ili elpelis la stelo-piratojn; ili portis la maron al la Lando de

Platformaĵoj; la belegeco de la Palaco Pandaro preteras ajnan pridireblon!”

Kugel malĝoje neis per kapo. “Nenia ajn onidiro pri tiu eksterordinara grandiozaĵo jam alvenis miajn orelojn.”

La rangulo gestis malbonhumore per naza ekmoviĝo. Kugel klare estis stultulo. Li diris abrupte: “Aferoj estas tiel kiel mi diras.”

“Mi dubas nenion,” diris Kugel Cugel. “Fakte, mi konfesas malklerecon. Sed informu min plu, ĉar mi eble devus loĝadi longe en tiu ĉi regiono. Ekzemple, kio pri la Flugilhavaj Estuloj kiuj loĝas en la deklivo? Kia tipo de estulo estas ili?”

La rangulo fingromontris ĉielen. “Se vi estus havanta la bonokulojn de nokturna títvító vi eble distingus malhelan lunon kiu ĉirkaŭiras la teron, kaj kiu ne videbliĝas krom tiam kiam ĝi ĵetas sian ombron sur la sunon. La Flugilhavaj Estuloj estas loĝantoj de tiu ĉi malhela mondo kaj ilia ver-vera naturo ne estas konata. Ili servas la Grandan Dion Jeliseo en tiu ĉi maniero: kiam ajn venas la tempo por ke viro aŭ virino morti, la Flugilhavaj Estuloj informiĝis fare de senespera signalo ellasata de la nómo de tiu mortanto. Ili tuje malsupreniras al la malbonsortulo kaj forportas lin al siaj kavernoj, kio vere konsistas el magia portalo enkondukanta al la benita lando Bjisomo.”

Kugel kliniĝis malantaŭen, nigra brovo levita en iome dubema arko. “Vere, vere,” li diris, en voĉo kiun la rangulo trovis nesufiĉe verŝajna.

“Povas ekzisti nenia dubo pri la vereco de la faktoj kiel mi ilin statis. Ortodokseco devenas de tiu ĉi aksioma fondaĵo, kaj la du sistemoj estas inter si fortigantaj: sekve ĉiu estas duoble validigita.”

Kugel malridetis. “La afero sendube estas tiel kiel vi indikas — sed ĉu la Flugilhavaj Estuloj senerare precizas en la elektado de siaj viktimoj?”

La rangulo frapis la tablon agacite. “La doktrino ne rifuteblas, ĉar tiuj kiujn la Flugilhavaj Estuloj forprenas ne vivas plu, ne eĉ kiam ili ŝajnas esti en la plej bona sano. Agnoskite, ilia falo sur rokojn emas igi al morto, sed tio estas la kompatato de Jeliseo kiu elektas doni rapidan estingiĝon, ansataŭ lasi daŭradi eble doloregan ŝankron. La sistemo estas tute benigna. La Flugilhavaj Estuloj elvokas nur la baldaŭ-mortontojn, kiuj poste puŝiĝos tra la deklivoj en la benitan landon Bjisomon. Hazardafoje heretiko disputas kontraŭe kaj en tiaj kazoj — sed mi certas ke vi same prenas la ortodoksan vidpunkton?”

“Tutkore,” Kugel asertis. “La dogmoj de via kredaĵo prov-montreble ĝustas.” Kaj li drinkis profunde de sia vino. Ĝuste tiam kiam li subenmetis la pokalon murmuro de muziko flustris tra la aero: kordaĵo senlime doĉa, senlime melankolia. Ĉiuj sidantaj sube de la pergolo fariĝis silentaj — malgraŭ tio ke Kugel estis malcerta pri tio ĉu li fakte estis aŭdinta la muzikon.

La rangulo kliniĝis iom pli proksimen, kaj trinkis el sia propra poklao. Nur post tio li rigardis supren. “La Flugilhavaj Estuloj transpasas ĉimomente.”

Kugel tiris pensoaspkete al sia mentono. “Kiel oni defendas sin kontraŭ la Flugilhavaj Estuloj?”

La demando estis mallerte dirata; la rangulo esprimis kolervizaĝe, ago kio inkludis antaŭakurbiĝon de la oreloj. “Se oni destinas baldaŭe al morto, la Flugilhavaj Estuloj aperas. Se ne, al li kialo por timo mankas.”

Kugel kapjesis kelkajn fojojn. “Vi estas klariginta mian konfuzon. Morgaŭ — pro tio ke vi kaj mi memevidente montras la plej bonan sanon — ni elektu marŝi supren laŭ la monteto kaj malrapide vagadi ien kaj tien apud la deklivo.”

“Ne,” diris la rangulo, “kaj pro tiu ĉi kialo: la atmosfero ĉe tia altaĵo malsanigecas; homo riskas enspiri **haladzon**, kio sekvigas damaĝon al la sano.”

“Mi komprenas perfekte,” diris Kugel. “Ĉu ni forlasu tiun ĉi malĝojan subjekton? Por la nuna momento ni vivas kaj kaŝiĝas iomete per la grimpoplantoj kiuj surkovras la pergolon. Lasu ke ni manĝu kaj drinku kaj atentu la feliĉaĵojn. La junuloj de la vilaĝo dancas kun granda vigleco.”

La rangulo eltrinkis tute sian pokalon kaj stariĝis. “Vi rajtas fari propravole; sed por mi, estas la kutima tempo por mia Rita Memhumiligo, tiu ĉi agado estante integra parto de nia kredo.”

“Mi faros ion simil-naturan post tempo ioma,” diris Kugel. “Mi esperas por vi la ĝuadon de via rito.”

La rangulo eliris la pergolon kaj Kugel lasiĝis sola. Post nelonge certaj junuloj, logataj de kuriozeco, kuniĝis al li, kaj Kugel eksplikis sian ĉeestecon je plua fojo, kvankam kun malplia emfazo pri la barbara krudeco de sia hejmlando, ĉar kelkaj junulinoj jam aniĝis la grupon, kaj Kugel stimuliĝis pro ilia ekzotika koloro kaj la viveco de iliaj sintenoj. Multa vino proviziĝis kaj Kugel estis persvadita provi la piedsvingan, saltantan ĉilokan dancon, kion li plenumis sen malhonorigo. La ekzercado portis lin apude al aparte alloga junulino, kiu anoncis ke ŝi nomiĝas Ĵiaml Vraz. Kiam finiĝis la danco, ŝi metis sian brakon ĉirkaŭ lia talio, kondukis lin returne al la tablo, kaj sidigis sin sur lian sinon. Tiu ĉi ago de familiareco ekcitis nenian evidentan malaprobbon inter la aliaj grupanoj, kaj Kugel kuraĝigis plu. “Mi jam ne aranĝis pri lito-ĉambro; eble decas ke mi faru tion antaŭ ol la tempo malfruiĝos.”

La junulino signalis la gastigiston. “Ĉu eblas ke vi rezervis ĉambron por ĉi tiu ĉizil-vizaĝa nekonatulo?”

“Ja vere; mi montros ĝin por lia aprobo.”

Li gvidis Kugelon al plaĉa ĉambro ĉe la grundnivela etaĝo, tio havanta litseĝon, necesujon, tapiŝon kaj lampon. Sur unu muro pendiĝis murtapiŝon purpure kaj nigre plektitan; sur alia estis montraĵo de aparte malbela bebo kiu ŝajnis kaptita aŭ kunpremita ene de travidebla globo. La ĉambro plaĉis al Kugel; li anoncis tion al la gastigisto kaj returnis al la pergolo, kie nun la festantoj jam komencis disiri. La junulino Ĵiaml Vraz ankoraŭ restis, kaj ŝi bonvenigis Kugelon kun varmeteco tia kia malestigis lian finan restaĵeton de singardemo. Post plua pokalo da vino, li kliniĝis proksime al ŝia orelo. “Eble mi trofruemas; eble mi troindulgas mian memfieron; eble mi malobservas la kutiman ĝentil-konduktismon de la vilaĝo — sed ĉu ekzistas kialo pro kiu ni ne aliru mian ĉambron, kaj tie amuzigi nin mem?”

“Nenian ajn,” diris la junulino. “Mi jam ne edziniĝis kaj ĝis tiu tempo mi rajtas konduki laŭ mia propra plaĉo, ĉar tiel estas nia kutimo.”

“Bonege,” diris Kugel. “Ĉu vi volas iri antaŭ ol mi, aŭ marŝi prudente ĉe la malantaŭo?”

“Ni iru kune; ne ekzistas neceso por ŝteliremo!”

Kune ili aliris la ĉambron kaj tie faradis kelkajn erotikajn ekzercadojn, post ol kiam Kugel kolapsis en dormego tute elĉerpita, ĉar al li tago ja estis elprenada.

Dum la meznoktaj horoj li vekigis por trovi ke Ĵiaml Fraz jam antaŭe eliris la ĉambron, fakto kiu en lia dormemo kaŭzis al li nenian maltrankviliĝon kaj li returnis al sia dormado.

La bruo de la pordo kolere ekmalfermigita vekis lin; li leviĝis por sidi sur la litseĝo por trovi ke la suno ankoraŭ ne leviĝis, kaj **delegitaro** estrita de la rangulo lin rigardis kun hororo kaj abomeno.

La rangulo celigis longan tremantan fingron tra la malheleco. “Mi pensis detekti **herezan** opinion; nun la fakto estas konata! Atentu: li dormas kun nek kap-kovraĵo nek sanktiga ŝmiraĵo sur la mentono. La junulino Ĵiaml Vraz raportas ke dum sia amkonduado tiu knajlo neniam ajn alvokis al Jeliseo por peti ties aprobon!

“Hereze, preter ajna dubo!” deklaris la aliaj deligitaranoj.

“Kion alian ni atendu de alilandano?” demandis la rangulo malestimege. “Atentu! eĉ nun li rifuzas gesti la sanktan signon.”

“Mi ne konas la sanktan signon!” Kugel rezonegis laŭte. “Mi scias nenion pri viaj ritoj! Tiu ĉi ne estas herezo, ĝi estas simpla nescio!”

“Mi ne povas kredi tiel,” diris la rangulo. “Nur hieraŭ-vespere mi **krokizis** la naturon de ortodokseco.”

“La situacio **aflikte** ofendas,” diris aliulo en voĉo aŭgure melankolia. “Herezo ekzistas nur pro prutriĝo de la **Lobo** de Decismo.”

“Tio ĉi estas nekuracebla kaj ĉiame mortiga malsanego,” diris alia, ne malpli funebre.

“Vere! Domaĝe, tro vere!” suspiris unu kiu staris apud la pordo. “Malbonfortuna viro!”

“Venu!” vokis la rangulo. “Necesas ke ni traktu la aferon tuj.”

“Vi ne laborigu vin,” diris Kugel. “Permesu ke mi vestu min kaj mi foriros la vilaĝon neniam revenonte.”

“Por disigi vian abomenan doktrinon aliloke? Neniel!”

Kaj nun Kugel kaptiĝis kaj tiriĝis tute nuda elde la ĉambro. Ekstere trans la parko li estis marŝigata, kaj al la pavilono ĉe la centro. Kelkaj el la grupo starigis entenan barilon formitan el lignaj stangoj sur la platformo de la pavilono kaj en tiun entenilojn li puŝiĝis. “Kion vi faras?” li elkriis. “Mi deziras nenian parton de viaj ritoj!”

Li ignoriĝis, kaj staris rigardanta elde la interspacoj de la entenilo dum kelkaj el la vilaĝanoj sendis supren grandan balonon el verda papero malpezigita per varma aero, portanta tri verdajn ventumilformajn fajrujojn sube.

Sunleviĝo montriĝis malforte en la okcidento. La vilaĝanoj, ĉio jam aranĝita je ilia plaĉo, foriris ĝis la rando de la parko. Kugel provis grimpi elde la entenilo, sed la lignaj stangoj estis el tia

grandeco kaj interspaco kia lasis al li nenian teneblecon.

La ĉielo heliĝis; alte supere brulis la verdaj fajrujoj. Kugel, kaŭranta kaj anser-haŭta pro la matena malvarmeteco, marŝis ien kaj tien laŭ la longeco de la entenilo. Li ekhaltis tiam, kiam de malproksime alvenis la hanta muziko. Ĝi laŭtiĝis, ŝajne ĝis la tuje proksima limo de aŭdebleco. Alte en la ĉielo aperis Flugilhava Estulo, blankaj roboj trene flagrantaj. Malsupren ĝi glitis, kaj la artikoj de Kugel fariĝis malstrikta kaj malfortaj. La Flugilhava Estulo ŝvebis super la entenilo, faliĝis, enfaldis Kugelon ene de sia blanka robo, provis porti lin supren. Sed Kugel jam ekaltenis stangon de la entenilo kaj la Flugilhava Estulo flugilumis senefike. La stango grincis, ĝemis, fendiĝis. Kugel baraktadis eskape elde la sufoka robo, tiregis al la stango kun histeria forto; ĝi ekrompiĝis kaj ŝplitiĝis. Kugel ekprenis fragmenton, stabis al la Flugilhava Estulo. La akra stango **punkciis** la blankan robon, kaj la Flugilhava Estulo flankenbatis Kugelon per flugilo. Kugel ektenis unu el la ĥitinaj ripoj kaj per fortega strebo tordis ĝin renverse, tiel ke la substanco fendiĝis kaj rompiĝis kaj la flugilo pendis ŝirita. La Flugilhava Estulo, konsternita, faris grandan saltegon kiu portis kaj sin mem kaj Kugelon elen sur la pavilonon, kaj nun ĝi saltetadis tra la vilaĝo trenante sian rompitan flugilon.

Kugel kuris malantaŭe albatadante ĝin per bastoneto kiun li trovis surgrunda. Li ekvidis la vilaĝanojn rigardantaj kun miro; iliaj buŝoj larĝis kaj malsekis, kaj eblis ke ili estis kriegantaj sed li aŭdis nenion. La ora suno leviĝis super la foraj montoj; la Flugilhava Estulo subite turnis alfronti Kugelon, kaj Kugel sentis la koleron de ĝiaj okuloj, kvankam la vizaĝo, se tio ekzistis, estis kaŝata sube de la mantelo de la robo. Singena kaj anhela, Kugel staris senatake, kaj nun li fariĝis atenta pri tio ke li staris preskaŭ sendefende kontraŭ la ŝanco ke aliaj surfalu lin el la ĉielo. Do nun li kriis malbenon al la estulo kaj turnis reire al la vilaĝo.

Ĉiuj jam forfuĝis. La vilaĝo estis senhoma. Kugel ridis laŭte. Li aliris la gastejon, kovris sin en siaj vestoj, **buke** surmetis sian glavon. Li eliris en la tavernan ĉambron, kaj enrigardante la monujon, trovis kelkon da moneroj kiujn li transirigis al sia saketo, apud la ebura reprezentaĵo de NULECO. Li reiris eksteren: pli bone ke li foriru dum neniuj proksimas por lin deteni. Flagreto de lumo logis lian atenton: la ringo sur lia fingro rebriletadis per dekduoj da fluantaj sparketoj, kaj ĉiuj indikis retrodirekte laŭ la piedvoĵeto, al la deklivoj.

Kugel kapneis lace, kontrolis la ekmoviĝantajn lumojn unu fojon plu. Sen **ambigueco** ili direktis lin retroire laŭ la vojo de kiu li estis veninta. La kalkulaĵoj de Fejresm, preter ĉio, estis ĝustaj. Decis ke li agu decide, kontraŭ tio ke TUTECO refoje drivu for de lia tenebleco.

Li atendis nur tiom longe por ke li trovu hakilon, kaj hastis supren laŭ la piedvoĵeto, sekvante la rebriliĝantajn sparkojn de la ringo.

Nemalproksime de tie kie li ĝin lasis, li alproksimiĝis la Flugilhan Estulon, nun sidanta sur roko apud la vojo, la kapuĉo tiritita kovre ĝian kapon. Kugel prenis ŝtonon, ĵetegis ĝin al la estulo, kiu kolapsis en subitan polvon, lasante nur disfalaĵon el blanka ŝtofo por anonci la fakton de ĝia ekzisteco.

Kugel pluiris laŭ la vojo, prenante tiajn kaŝlokojn kiajn memprezentis, sed sen efiko. Supere svebis Flugilhavaj Estuloj, flugilumantaj kaj falflugantaj. Kugel faris defende per la hakilo, hakante al la flugiloj, kaj la estuloj forflugis alte, rondirante supere.

Kugel **konsultis** la ringon kaj kondukiĝis supren laŭ la piedvojo, la Flugilhavaj Estuloj ŝvebante tuj supere. La ringo interne sparkadis kun la intenseco de sia mesaĝo: jen situis TUTECO, sidanta

ripoze sur roko!

Kugel entenis krion de anima ĝojego kiu leviĝis en lia gorĝo. Li elprenis la eburan simbolon de NULECO, kuris antaŭen kaj aplikis ĝin al la [gelatenecan](#) centran globon.

Kiel Fejresm jam asertis, [adheriĝo](#) estis tuja. Je la kontakto Kugel sentis la dissolviĝadon de tiu sorĉo kiu lin katenis al la antikva epoko.

Jen falflugo, molbatado de grandaj flugloj! Kugel falbatiĝis grunden. Blanka ŝtofo ĉirkaŭvolvis lin, kaj pro unu mano tentanta NULECON li malkapablis svingi sian hakilon. Tiu ĉi nun fortiriĝis el sia teno. Li maltenis NULECON, ektenis rokon, piedbatadis, iel liberigis sin, kaj risortis al sia hakilo. La Flugilhavaj Estuloj ektenis NULECON kaj kun TUTECO adheranta, portis ĝin supren al kaverno alta en la deklivoj.

Grandaj fortoj tiradis al Kugel, girantaj en ĉiuj direktoj samtempe. Estis muĝado en liaj oreloj, flagrado de violaj lumoj, kaj Kugel falis milionon da jaroj en la futuron.

Le regajnis la konscion ene de la blue kahelita ĉambro kaj kun piko de fortodora [likvoro](#) sur siaj lipoj. Fejresm, klinante super li, batetis lian viaĝon, verŝis pluan likvoron en lian buŝon. “Vekiĝu! Kie estas TUTECO? Kiel estas vi reveninta?”

Kugel puŝis lin flanken, suprensidiĝis sur la litseĝo.

“TUTECO!” muĝis Fejresm. “Kie ĝi estas? Kie estas mia talismano?”

“Mi eksplikos,” diris Kugel en voĉo densa. “Mi havis ĝin en mia tenado, kaj ĝi fortiriĝis fare de flugilhavaj estuloj en la servico de la Granda Dio Jeliseo.”

“Diru, diru!”

Kugel rakontis la cirkonstancojn kiuj lin kondukis unue al gajno kaj sekve al perdo de tio kion Fejresm serĉis. Dum li parolis, la vizaĝo de Fejresm malsekiĝadis en bedaŭro kaj liaj ŝultroj subfleksiĝis. Je la fino li marŝigis Kugelon esteren, en la malhelan ruĝan lumon de malfrua posttagmezo. Kune ili studrigardis la deklivojn kiuj nun staregis morne kaj senvive super ili. “Al kiun kaverton flugis la estuloj?” demandis Fejresm. “Montru ĝin, se vi kapablas!”

Kugel indikis fingre. “Jen, aŭ tiel ŝajnus. Ĉio estis konfuzaĵo, ĉio kunfalaĵo el fugiloj kaj blankaj roboj ...”

“Restu ĉi tie.” Fejresm eniris sian laborĉambron kaj post nelonge revenis. “Mi donas al vi lumon,” li diris, kaj mane transdonis al Kugel malvarman blankan fajron ligatan al arĝenta ĉeno. “Pretigu vin.”

Al la piedoj de Kugel li ĵetis pilketon kiu rompiĝis en vorticon, kaj Kugel portiĝis [vertiĝ](#)-sente supren al tiu dispeciĝanta rando kiun li indikis al Fejresm. Apude estis malhela malfermiĝo de kaverno. Kugel turnis la flamon internen. Li vidis polvan enirejon, larĝa je tri paŝoj kaj pli alta ol li povis etende tuŝi. Ĝi kondukis en la deklivon, tordiĝanta iomete al flanko. Ĝi ŝajnis malplena de ajnaj vivaĵoj.

Tenanta la lampon antaŭ si Kugel malrapide moviĝis laŭ la irejo, la koro batadante pro timo

pri io kion li ne povis difini. Li ekhaltis: muziko? Rememoro de muziko? Li aŭskultis kaj povis aŭdi nenion: sed kiam li provis paŝi antaŭen tiam timo kramfigis al li la gambojn. Li tenis alte la lanternon kaj stude rigardis elen laŭ la polva irejo. Kien ĝi kondukis? Kio restis pretere? Polva kaverno? Demona lando? La benita lando de Bjisom? Kugel antaŭeniris malrapide, ĉiuj sencoj atentemegaj. Sur bretaĵo li ekvidis ŝrumpitan brunan sferaĵon: la talismano kiun li estis portanta en la pasintecon. TUTECO jam delonge apartigis sin kaj foriris.

Kugel zorge levis la objekton, kiu estis rompiĝema pro aĝi je miliono da jaroj, kaj reiris al la dekliva bretaĵo. La vortico, je komando de Fejresm, portis Kugelon returne al la grundo.

Timegante la koleran reagon de Fejresm, Kugel ofertis la seke ŝrumpiĝintan talismanon.

Fejresm rigardis ĝin, tenis ĝin inter dikfingro kaj montfringro. “Ĉu jen ĉio?”

“Estis nenio kroma.”

Fejresm lasis la objekton fali. Ĝi frapis kaj tuj fariĝis polvo. Fejresm rigardis al Kugel, prenis profundan enspiron, poste turniĝis kun gesto de ne parolebla frustriĝo kaj marŝis reen al sia aŭgurejo.

Kugel dankeme moviĝis for laŭ la piedvoĵeto, preter la laboristoj starantaj en anksia grupo atendanta ordonojn. Ili okulumis Kugelon moroze kaj du-éla viro ĵetis rokon. Kugel gestis ŝultroleve kaj daŭrigis sian iradon laŭ la piedvoĵo. Postnelonge li pasis la lokon de la vilaĝo, nun sovaĝejo surkreskita de tordformaj maljunaj arboj. La lageto estis malaperinta kaj la grundo estis malmola kaj seka. En la valo estis ruinoj, sed neniu el tiuj ĉi indikis la lokojn de la praaj urboj Impergo, Ĥarŭo kaj Raverĝando, nun malaperiĝintaj preter memoro.

Kugel marŝadis suden. Malantaŭ li la deklivoj miksiĝis kun **brumo** kaj poste perdiĝis al vidkapablo.



Ĉapitro 5

La Pilgrimoj

Parto 1

Ĉe la Gastejo

Dum la plejparto de unu tago Kugel veturis trans morna senhomejo kie nenio kreskis krom sal-herbo; poste, nur kelkaj minutoj antaŭ ol sunsubiro, li venis al la bordo de larĝa malrapida rivero, apud kio kuniris vojo. Je duona mejlo malproksime je lia dekstro staris alta konstruaĵo el ligno-traboj kaj malhela bruna **stuko**, ŝajne ia gastejo. La vidaĵo ege plaĉis al Kugel, ĉar li estis manĝinta nenion tiun tutan tagon, kaj trapasis la antaŭan nokton en arbo. Dek minutojn poste li puŝis malferme la pezan per fero binditan pordon, kaj eniris la gastejon.

Li staris en vestiblo. Je ambaŭ flankoj estis diamantforme vitritaj fenestraĵoj, sune bruligitaj lavend-kolore pro tempopaso, kie la suno dissendis mil refraktaĵojn. El la komuna ĉambro venis feliĉa zumado de voĉoj, la klakado de argilo kaj vitro, laodoro de antikva ligno, vaksita plafontabulo, ledokaj boletantaj kaldronoj. Kugel paŝis antaŭen kaj trovis dudekon da viroj kune sidantaj ĉirkaŭ fajro, drinkante vinon kaj interŝanĝantaj la vastan paroladon de veturantoj.

La proprietulo staris malantaŭ la kontoro: diketa viro apenaŭ pli alta ol la ŝultro de Kugel, kun alt-kupola kalva kapo, nigra barbo pendants je futo sub lia mentono. Liaj okuloj estis elstaraj kaj pezpalpebraj; lia esprimo estis tiom kalma kiom la fluado de la rivero. Responde al la demando de Kugel pri ĉambro li dubeme tiris al si la nazon. “Mi jam tro-okupiĝas, kun pilgrimoj sur la vojo al Ertze-Damaĥo. Tiuj, kiujn vi vidas sur la benkoj estas ne eĉ duono de ĉiuj, kiujn mi devas enĉambrigi ĉi tiun nokton. Mi subenmetus litaĉon en la halo, se tiokontentigus vin; mi povas fari nenion plian.”

Kugel sonigis suspiron de nervoza malplaĉeco. “Tio ĉi malsukcesas plenumi miajn esperojn. Mi ege deziras privatan ĉambron kun litseĝo el bona kvalito, fenestron elrigardantan super la rivero, pezan tapiŝon por mufla la kantojn kaj sloganojn de la pot-ĉambro.”

“Mi timas ke vi estos malesperigata,” diris la proprietulo sen emocio. “La sola ĉambro tiele priparolebla jam okupiĝas, fare de tiu viro kun la flava barbo sidanta tie for: iu nomata Lodermulĉ, ankaŭ veturanta al Ertze-Damaĥo.”

“Eble, je pledo pri krizo, vi povus persvadi lin forlasi la ĉambron kaj okupi la litaĉon kiel mia anstataŭulo,” sugestis Kugel.

“Mi dubas, ke li kapablas pri tia **abnegacio**,” la proprietulo respondis. “Sed kial vi mem ne demandu? Mi diras malkaŝe, ke mi mem ne volas ekparoli pri la afero.”

Kugel, rigardanta la fortajn aspektojn de Lodermulĉ, liajn muskolajn brakojn kaj la iom **maldegnema** maniero laŭ kiu li aŭskultis la paroladon de la pilgrimoj, emis samsenti kun la gastigisto en ties opinio pri la karaktero de Lodermulĉ. “Ŝajnas, ke mi devas okupi la litaĉon. Nu, pri mia vespermanĝo: mi postulas birdviandon, dece **farĉitan**, ŝnurete kunligitan, rostitan kaj garnitan, kune kun kiuj ajn flank-teleraĵoj pri kiuj via kuirejo kapablas.”

“Mia kuirejo estas troŝarĝita kaj vi devas manĝi lentajn kun la pilgrimoj,” diris la gastigisto. “Unu sola viandbirdo haveblas, kaj tiu ĉi refoje rezerviĝis al la mendo de Lodermulĉ, por ties vespera

bonmanĝado.”

Kugel ŝultrolevis malplaĉite. “Nenia afero. Mi forlavos la polvon de veturado for de la vizaĝo, kaj poste akceptu pokalon da vino.”

“Ekstere ĉe la malantaŭo estas fluanta akvo kaj longfosaĵo foje uzata por tiu ĉi celo. Mi provizas **ungventojn**, bonodorajn oleojn kaj varmajn tolojn kontraŭ plusa prezo.”

“La akvo sufiĉos.” Kugel paŝadis eksteren al la malantaŭo de la gastejo kie li trovis basenon. Post lavado li ĉirkaŭrigardis kaj atentiĝis pri malgranda murhava **ŝedo**, forte konstruita el lignotrabo. Li komencis reiri al la gastejo, poste haltis, refoje konsideris la ŝedon. Li transiris la interspacon, malfermis la pordon, rigardis internen; poste, okupita pri pensado, li reiris al la komuna ĉambro. La gastigisto servis al li pokalon da spicita vino, kiun li portis al aparta benko en loko ne atentologa.

Lodermulĉo demandiĝis pri ties opinio pri la tiel-nomata Funerpaŝaj Evangelistoj, kiuj, rifuzante meti siajn piedojn sur la grundon, plenumadas la proprajn aferojn sur strikto-ŝnuroj. En kruta voĉo Lodermulĉo malkovris la falsiĝojn de tiu ĉi aparta doktrino. “Ili kalkulas la aĝon de la tero je dudek naŭ epokoj, anstataŭ je la kutima dudek tri. Ili proponas, ke por ĉiu kvadrata élo da grundo, du kaj kvarono milionoj da homoj estas mortintaj kaj forlasintaj sian polvon, tiel farantaj malsekan kaj ĉielokan tavolon da léĉ-ŝimo, sur kiu estas blasfeme, ke oni paŝu. La argumento havas surfacan kredeblecon, sed konsideru: la polvo de unu sekigita mortintula korpo, dise falinta trans unu kvadrata élo, dikus je unu tridek-tria parto de colo. La tuto, tial, kalkuleblas je unu mejlo da kunpremita mortintula polvo por kovri la ter-surfaco, kio memevidente falsas.”

Iu membro de la kulto, kiu, sen rimedo al siaj kutimaj ŝnuroj, paŝadis en malkonvenaj ceremoniaj ŝuoj, faris ekscititan kontraŭdiregon. “Vi parolas kun nek logiko nek kompreno! Kiel vi povas esti tiel absoluta?”

Lodermulĉo levis la tufajn brovojn en malagrabra malplezuro. “Ĉu mi fakte devas detale ekspliki? Ĉe la bordo de la oceano, ĉu klifo alta je unu mejlo sekvas la interfacon de lando kaj maro? Ne. Ĉie estas malegaleco. Promontoroj etendas en la akvon; pli ofte strandoj el pura blanka sablo troviĝas. Nenie estas la masivaj amasegoj el griz-blanka polvaĵo sur kies ekzistado la doktrinoj de via kulto dependas.”

“Sensignifaj stultaĵoj!” kraĉe diris la Funerpaŝisto.

“Kion?” postule demandis Lodermulĉo, ŝveligante la masivan bruston. “Mi ne al kutimiĝis pri mokiĝo!”

“Nenia mokaĵo, sed malmola kaj konkreta kontraŭdiro de via dogmismo. Ni asertas, ke porcio de la polvo bloviĝas en la oceanon, porcio pendiĝas entenite en la aero, porcio falas tra fendoj por plenigi subterajn kavernojn, kaj plua porcio sorbiĝas fare de arboj, gresoj kaj iuj insektoj, tiel por ke malpli ol duono de mejlo da antaŭula sedimento kovras la teron, sur kio estas **sakrilegie**, ke oni paŝu. Kial estas klifoj ne ĉie videblaj? Pro tiu akveco elsprita de nekalkuleblaj homoj el la pasinteco! Tiu ĉi estas levinta la oceanon je preciza egaleco, tiel ke neniu deklivo aŭ klifego povas troviĝi; kaj en tiuj ĉi kuŝas la falsiĝo via propra.”

“Ba,” grumblis Lodermulĉo, turniĝante for. “Ie ekzistas eraro inter viaj konceptoj.”

“Neniel!” asertis la evangelisto, kun tia fervoro kio distingas ties tipon. “Tial, el respekto por la

mortintularo, ni paŝadas supere, sur ŝnuroj kaj randoj, kaj kiam ni devas veturi, ni uzas sanktigitajn piedovestojn.”

Dum la konversacio Kugel foriris la ĉambron. Nun iu lun-vizaĝa junuleto portanta la ŝirmĉemizo de kelnero alproksimis la grupon. “Ĉu vi estas la estimata Lodermulĉ?” li demandis al la persono antaŭe indikita.

Lodermulĉ turniĝis side en sia seĝo. ”Mi estas tiu.”

“Mi portas mesaĝon, de kiu estas portinta certan sumon da mono ŝuldata al vi. Li atendas en la eta ŝedo malantaŭ la gastejo.”

Lodermulĉ malridetis malkredeme. “Ĉu vi certas, ke tiu persono postulis pri Lodermulĉ, Provosto de Urbeto Barlig?”

“Ja prave, sinjoro, la nomo estis specife tiel.”

“Nu, kiu viro portis la mesaĝon?”

“Li estis alta viro, portanta volumenegan kapuĉon, kaj pridiris sin kiel unu inter viaj intimuloj.”

“Ĉu prave,” pripensis Lodermulĉ. “Tajzog, eble? Aŭ imageble estas Krednip... Kial tiu ne venis al mi rekte? Sendube ekzistas ia bona kialo.” Li puŝis sian propran pezecon al starpozo. “Mi supozas, ke mi devas enketi.”

Li marŝis peze el la komunan ĉambron, ĉirkaŭiris la gastejon, kaj rigardis tra la malhela lumo al la ŝedo. “Ho tie!” li vokis. “Tajzog? Krednip? Elvenu!”

Estis neniuj respondo. Lodermulĉ iris por fiksrigardi en la ŝedon. Tuj kiam li estis enpaŝinta, Kugel venis ĉirkaŭe de la malantaŭo, puŝfrapege fermis la pordon, tiris firme la ŝlos-trabon kaj tenilojn.

Preteratentante la muflitan alfrapadon kaj kolerajn elvokojn, Kugel reiris al la gastejo. Li serĉis la gastigiston. “Jen ŝanĝiĝo inter la aranĝoj: Lodermulĉ estas vokita for. Li bezonos nek sian ĉambron nek sian rostitan birdviandon kaj ĝentile urĝis, ke mi akceptu ambaŭ!”

La gastigisto tiris al si la barbon, iris al la pordo, rigardis ien kaj tien laŭ la vojo. Malrapide li revenis. “Eksterordinare! Li pagis por kaj ĉambro kaj birdviando, kaj prezentis nenian aranĝon pri retroago.”

“Ni aranĝis akordon laŭ nia kuna interplaĉo. Por rekompensi vin pri la kroma laboro, mi nun pagas plusajn tri tercojn.”

La gastigisto ŝultrolevis, prenis la monerojn. “Estas tute same al mi. Venu, mi kondukos vin al la ĉambro.”

Kugel detale rigardis la ĉambron kaj bone plaĉiĝis. Baldaŭ lia vespermanĝo serviĝis. La rostita birdviando superis ajnan plendemon, kiel faris ankaŭ la plusaj teleroj menditaj de Lodermulĉ kaj kiujn la gastigisto inkludis kun la manĝaĵaro.

Antaŭ ol enlitiĝi Kugel promenis malantaŭ la gastejon kaj konvinkis sin ke la trabo ĉe la pordo de la ŝedo estis en bona ordo kaj ke la raŭkaj krioj de Lodermulĉ malprobable logus priatenton. Li alfrapis akre sur la pordon. “Pason, Lodermulĉ!” li vokis severe. “Jen mi, la gastigisto! Ne muĝegu tiom laŭte; vi agacos miajn gastojn dum ilia dormado!”

Sen atendi respondon, Kugel reiris al la komunan ĉambron, kie li eniĝis al konversacio kun la estro de la pilgrima bando. Tiu ĉi estis Garstang, viro maldika kaj strikta, kun vaksa haŭto, delikata kranio, kapuĉaj okuloj, preciza nazo tiom maldika ke ĝi tralumiĝis tiam, kiam turnita kontraŭ lumilo. Alparolante lin kiel viro sperta kaj multe leginta, Kugel demandis pri la vojo al Almerio, sed Garstang klinis al kredo ke la regiono tute estis imagaĵo.

Kugel asertis kontraŭe. “Almerio estas regiono aparta; mi mem ĵuras pri tio.”

“Via scio, tial, estas plia ol mia propra,” deklaris Garstang. “Tiu ĉi rivero estas la Ask; la lando ĉiflanka estas Sudun, transe estas Lelieŭs. En la sudo kuŝas Ertze-Damaĥo, kien vi estus saĝa veturi, de tie eble okcidente trans la Arĝenta Dezerto kaj la Maro Songeno, kie vi eble povus plue enketi.”

“Mi faros tiel, kiel vi sugestas,” diris Kugel.

“Ni, piaj Gilfiganoj ĉiuj, celas al Ertze-Damaĥo kaj la Puriga Rito ĉe la Nigra Obelisko,” diris Garstang. “Ĉar la vojo kondukas tra senhomejoj ni bandiĝis kune kontraŭ la érboj kaj gidoj. Se vi volus aniĝi en la grupo, por dividi kaj privilegiojn kaj limojn, vi estus bonvena.”

“La privilegioj memevidentas,” diris Kugel. “Kaj ĉu pri la limoj?”

“Nur ke oni obeu la komandojn de la estro, kio estas diri, mi mem, kaj kontribuu porcion da la elspezoj.”

“Mi konsentas, sen kondiĉe,” diris Kugel.

“Bonege! Ni marŝos morgaŭe je sunleviĝo.” Garstang montris kelkajn aliajn membrojn de la grupo, kiuj nombris je kvindek sep. “Jen estas Vitz, anoncisto por nia eta bando, kaj tie sidas Kazmir, la teoriisto. La viro kun feraj dentoj estas Arlo, kaj li kun la blua ĉapelo kaj arĝenta buko estas Vojnod, sorĉisto de ne malgranda reputacio. For el la ĉambro estas la estiminda Lodermulĉ, kune kun preterdube pia Subukjul. Eble ili celas detiri, unu al alia, la konvinkojn. La du kiuj ludas per ĵetkuboj estas Parso kaj Salanavje. Jen estas Haŭnt, jen Krej.” Garstang nomis kelkajn aliajn, dirante iliajn atribuojn. Kaj fine Kugel, plendante pri laciĝo, foriris al sian ĉambron. Li malstreĉiĝis sur la litseĝo kaj tuj ekdormis.

Dum la mallumegaj horoj li suferis aŭdan interrompon. Lodermulĉ, fosinte en la plankon de la ŝedo, poste tunel-fosinte sub la muro, liberigis sin, kaj tuj ekiris al la gastejon. Unue li provis malfermi la pordon de la ĉambro de Kugel, kiun Kugel jam zorge ŝlosis.

“Kiu estas tie?” demandis Kugel.

“Malfermu! Estas mi, Lodermulĉ. Tiu ĉi estas la ĉambro kie mi volas dormi!”

“Neniel,” deklaris Kugel. “Mi pagis prince altan prezon por akiri liton, kaj eĉ devis atendi dum la gastigisto eligis antaŭan ĉeestinton. Portu vin for; mi suspektas, ke vi ebrias; se vi deziras pluan festadon, veku la vin-serviston.”

Lodermulĉ piedfrape forpaŝadis. Kugel kuŝiĝis malantaŭen refoje.

Baldaŭ li aŭdis la frapadon de batoj, kaj la krion de la gastigisto kiam Lodermulĉ ektenegis al li la barbon. Lodermulĉ eventuale peliĝis el la gastejo, per la kuna strebado de la gastigisto, ties edzino, la portisto, la pot-knabo kaj aliaj; post kiam Kugel dankeme reendormiĝis.

Antaŭ sunleviĝo la pilgrimoj, kune kun Kugel, ellitiĝis kaj prenis sian matenmanĝon. La gastigisto ŝajnis iom malfeliĉa en ties humoro, kaj montris kontuzojn, sed li faris neniujn demandojn al Kugel, kiu siavice instigis nenian konversacion.

Matenmanĝite, la pilgrimoj amasiĝis en la vojo, al kiuj aniĝis Lodermulĉ, kiu estis trapasinta la notkon paŝadante foren kaj reen sur la vojo.

Garstang faris kalkulon de la grupo, poste blovis grandan sonegon sur sia fajfilo. La pilgrimoj marŝis antaŭen, trans al ponto, kaj ekiris laŭ la suda bordo de la Ask al Ertze-Damaĥo.

La Flosa sur la Rivero

Tri tagojn la pilgrimoj antaŭeniris apud la Ask, je noktoj formantaj malantaŭ barilo eldirita fare de la sorĉisto Vojnod el cirklaĵo el eburaj fendaĵoj: antaŭzorgo necesa, ĉar trans la barilaj stangoj, apenaŭ videblaj per la lumstrioj de la fajro, estis kreituloj anksiaj por kuniĝi kun la bando: déodandoj mole pledantaj, érboj ŝanĝantaj la starpazon de kvar-pieda al dupieda, komfortaj nek en unu, nek en la alia stilo. Je iu fojo, gido provis supersalti la barilon; je alia okazo tri húnoj kune strebis por puŝi kontraŭ la fostojn — retropaŝante, ekkurante antaŭen, por alfrapi kun ekmuĝoj de granda provego, dum interne la pilgrimoj rigardadis fascinitaj.

Kugel paŝis proksimen, por tuŝi flamantan fajrstangon al unu el la puŝantaj formoj, kaj gajnis kriegon de furiozeco. Grandega griza brako ekpuŝiĝis tra la interspaco; Kugel saltis retroen por sia vivo. La barilo eltenis kaj post nelonge la kreituloj haltis por interkvereli kaj foriris.

Vespere je la tria tago la bando venis al la kunfluiĝo de la Ask kun granda malrapida rivero kiun Garstang identigis kiel la Skamandro. Proksime staris arbaro el altaj báldamoj, pinoj kaj kverkoj. Kun la helpo de proksimaj hakistoj arboj estis faligitaj, **stucitaj**, portitaj al la rando de la akvo, kie flosa konstruiĝis. Kun ĉiuj el la pilgrimoj survenintaj, la flosa per fostoj moviĝis elen al meza fluado de kie ĝi drivis facile en silento.

Kvin tagojn la flosa moviĝis sur la larĝa Skamandro, foje preskaŭ for de vido de la flankbordoj, foje glitante proksime apud la fragmitoj kiuj bordis la randon. Kun nenio pli bona por fari, la pilgrimoj sindonis al longaj disputadoj, kaj la diverseco de opinioj pri ĉiu afero estis rimarkinda. Duonatempe, la parolado esploris metafizikajn arkanaĵojn, aŭ la subtilaĵojn de la Gilfigisma principaro.

Subukjul, la plej pia el la pilgrimoj, deklaris sian kredon detale. Esence, li profesis la ortodoksan Gilfigan teozofion, en kio Zo Zam, la ok-kapa dio, kreinte la Kosmon, fortranĉis sian piedfingron, kio fariĝis Gilfig, dum la gutoj da sango disiĝis por fariĝi la ok gentoj de la homaro. Roremaŭnd, skeptikisto, atakis la doktrinion: “Kiu kreis tiun ĉi hipotezan ‘kreiston’ proponitan de vi? Ĉu alia ‘kreisto’? Estus multe pli simple proponi la finan faraĵon: ĉi kaze, palpebrumantan sunon kaj mortantan teron!” Al kio Subukjuo citis la Gilfigan Tekston por sia kraŝprema **refuto**.

Iu nomata Bluner forte proponis kredon sian propran. Li kredis, ke la suno estas kelo en la

korpo de grandega dio, kiu estas kreinta la kosmon laŭ procedo analoga al la kreskado de likeno laŭ surfaco de roko.

Subukjulo konsideris la tezon tro-detalega: “Se la suno estus kelo, kio do devus esti la naturo de la tero?”

“Animalkelo akiranta nutradon,” respondis Bluner. “Tiaj dependejoj estas sciataj aliloke kaj ne necese vokas primiradon.”

“Kio do atakas la sunon?” demandis Vitz kolermoke. “Ĉu alia animalkelo simila al la tero?”

Bluner komencis detalan eldiradon pri sia principaro, sed baldaŭ interrompiĝis fare de Praliksus, alta maldika viro kun penetrantaj verdaj okuloj. “Aŭskultu min; mi scias ĉion; mia doktrino estas simpleco mem. Vasta nombro da kondiĉoj eblas, kaj estas eĉ pli granda nombro da maleblecoj. Nia kosmo estas ebla kondiĉo: ĝi ekzistas. Kial? Tempo senlimas, kio estas same diri, ke ĉiu ebla kondiĉo devas eventuale okazi. Ĉar ni loĝas en tiu ĉi aparta ebleco kaj scias pri neniu alia, ni arogas al ni mem la kvaliton de unuopeco. Je la vero, ia ajn universo kio estas ebla okazas eventuale, ĉu baldaŭ ĉu poste, ne unufoje sed multfoje, ekzistos.”

“Mi klinas al simila doktrino, kvankam estante pia Gilfigano,” deklaris Kazmir la teoretisto. “Mia filozofeco antaŭsupozas sinsekvon da kreintoj, ĉiu absoluta en sia propra rajto. Por diri paralele al la multscia Praliksus, se iu dio eblas, ĝi devas ekzisti! Nur maleblaj dioj ne ekzistus! LA ok-kapa Zo Zam kiu fortranĉis sian Dian Piedfingron estas ebla, do tial ekzistas, kiel estas atestita per la Gilfigajn Tekstojn!”

Subukjulo palpebrumis, malfermis la buŝon por paroli, poste malfermis ĝin refoje. Roremaŭnd, la skeptikulo, turnis sin for por inspekti la akvon de la Skamandro.

Garstang, sidanta ĉe flanko, ridetis pensoplene. “Kaj vi, Kugel la Ruza, ĉi foje vi estas entenema. Kia estas via kredo?”

“Ĝi estas iom rudimenta,” Kugel konfesis. “Mi asimilis diversecon de vidpunktoj, ĉiu aŭtoritata en sia propra rajto: de la pastroj de la Templo de Telelogoj; de sorĉita birdo kiu beke prenis mesaĝojn el skatolo; de nemanĝanta retretisto kiu trinkis botelon da rosa eliksiro kion mi ofertis al li kiel ŝerco. La rezultaj vizioj estis kontraŭdiraj sed el granda profundeco. Mia mond-plano, tial, estas [sinkretisma](#).”

“Interese,” diris Garstang. “Lodermulĉ, kiel diras vi?”

“Ha,” graŭlis Lodermulĉ. “Atentu pri tiu ĉi ŝiro en mia vesto; mi tute malkapablas ekspliki ĝian estiĝon! Mi eĉ pli konfuzas pri la ekzisteco de la universo.”

Aliaj parolis. Vojnod la sorĉisto difinis la sciitan kosmon kiel la ombro de regiono regata de fantomoj, ili mem dependaj por sia ekzisteco sur la psikaj energioj de homoj. La pia Subukjulo denunciis tiun ĉi skemon kiel kontraŭa al la Protokoloj de Gilfig.

La disputado daŭris longe. Kugel kaj unu aŭ du aliaj inkluzive de Lodermulĉ tediĝis kaj ekestigis ludon de bonŝanco, uzante ĵetkubojn kaj kartetojn kaj kalkulilojn. La vetaĵoj, komence moderaj, poste kreskiĝis. Lodermulĉ unue venkis minimume, poste perdis ĉiam pli grandajn sumojn, dum Kugel venkis je vetaĵo post vetaĵo. Lodermulĉ baldaŭ ĵetis suben la ĵetkubojn kaj ektirante la

kubuton de Kugel skuis in, tiel elfaligante kelkajn kromajn ĵetkubojn el la manumo de lia jako. “Nu do!” muĝegis Lodermulĉ, “kion ni trovas tie ĉi? Mi pensis, ke mi detektis friponadon, kaj jen estas la pravmontraĵo! Redonu mian monon tuj ĉimomente!”

“Kiel vi povas diri tiel” demandis Kugel. “Kiel vi montris friponadon? Mi portas ĵetkubojn — kio pri tio? Ĉu mi estu devigata ĵeti mian propran en la Skamandron, antaŭ ol partopreni en ludo? Vi insultas mian reputacion!”

“Mi zorgas neniel pri tio ĉi,” respondegis Lodermulĉ. “Mi nur deziras la redonon de mia mono.”

“Ne eble,” diris Kugel. “Malgraŭ ĉiom da via fanfarono vi pruvis nenan **malversacion**.”

“Pruvaĵon?” muĝegis Lodermulĉ. “Ĉu necesas, ke estu plua? Atentu pri tiuj ĉi ĵetkuboj, tute malrektaj, kelkaj kun la samaj markaĵoj sur tri flankoj, aliaj rulante nur per granda forto, tiom pezaj ili estas je unu rando.”

“Kuriozaĵoj nur,” eksplikis Kugel. Li indikis pri Vojnod la sorĉisto, kiu estis rigardante. “Jen estas viro tiom akre vidante kiom li estas lertpensa je la cerbo; demandu pri ĉu kontraŭleĝa interŝanĝo estis evidenta.”

“Nenio estis evidenta,” deklaris Vojnod. “En mia prijuĝo Lodermulĉ faris tro-hastan akuzon.”

Garstang venis antaŭen, kaj aŭdis la disputadon. Li parolis en voĉo kaj ĵuĝa kaj konsila: “Fido estas necesega inter bando kiel la nia, kamaradoj kaj piaj Gilfiganoj ĉiuj. Ne povas esti ajna suspekto pri trompado! Certe, Lodermulĉ, vi estas misjuĝinta nian amikon Kugel!”

Lodermulĉ ridis raŭke. “Se tio ĉi estas konduto de piuloj, estas ja bonfortune ke mi ne enmiksiĝis kun ordinaraj homoj!” Kun tiu ĉi rimarko, li portis sin al angulo de la floso kie li sidigis sin kaj fiksis al Kugel esprimrigardadon de minaco kaj malŝatego.

Garstang kapneis en maltrankvileco. “Mi timas, ke Lodermulĉ ofendiĝis. Eble, Kugel, se en spirito de amikeco vi estus redoninta lian oron —”

Kugel faris firman rifuzon. “Estas afero de la principoj. Lodermulĉ atakis al mi la plej valoran posedaĵon, kio estas diri, mian honoron.”

“Via ĝentileco estas laŭdinda,” diris Garstang, “kaj Lodermulĉ kondukis malĝentile. Tamen, por la kazo de bon-kamaradeco — ne? Nu, mi ne povas disuti la punkton. Ha hum. Ĉiam estas etaj malfacilaĵoj por agaci nin.” Kapneante li foriris.

Kugel altiris siajn vet-gajnaĵojn, kune kun la ĵetkuboj kiujn Lodermulĉ estis faligintaj el lia brakumo. “Maltrankviliga okazo,” li diris al Vojnod. “Tedulo, tiu ĉi Lodermulĉ! Li ofendis ĉiujn; ĉiuj ekŝiĝis de la ludado.”

“Eble ĉar ĉiom da la mono estas en via posedo,” Vojnod sugestis.

Kugel inspektis siajn gajnaĵojn kun esprimo de surprizo. “Mi neniam suspektis ke ili estis tiom multaj! Ĉu eble vi akceptus tiun ĉi sumon por ŝpari al mi la strebadon de ĝia portado?”

Vojnod konsentis kaj porcio de la gajnaĵoj ŝanĝiĝis inter manoj.

Post nelonge, dum la flosa drivis pace laŭ la rivero, la suno spertis alarmigan pulson. Purpura filmo formiĝis sur la surfaco kiel korodaĵo, poste dissolviĝis. Kelkaj el la pilgrimoj kuris tien kaj reen en alarmiĝo, kriante: “La suno ekmallumiĝas! Pretigu vin por la malvarmo!”

Garstang tamen tenis supren la manojn konsoligante. “Trankviliĝu, ĉiuj! La tremeto jam pasis, la suno estas kiel antaŭe!”

“Pensu!” urĝis Subukjul kun granda memfido. “Ĉu Gilfig permesus tian kataklismon, eĉ dum ni veturas por adori ĉe la Nigra Obelisko?”

La grupo kvietiĝis, kvankam ĉiu havis sian personan interpreton de la okazo. Vitz, la parolisto, vidis analogion al la malklariĝo de vizado, kiu eble povus kuraciĝi pere rapida palpebrumado. Vojnod deklaris: “Se ĉio plenumiĝas bone ĉe Ertze-Damaĥo, mi planas dediĉi la sekvajn kvar jarojn da vivado al plano por replenigi la viglecon de la suno!” Lodermulĉ nur faris ofendan diraĵon pri la temo, ke li tute malzorgas ĉu la suno ekmallumiĝu, kun la pilgrimoj lasataj palpe serĉi sian vojon al la Purigaj Ritoj.

Sed la suno brilis plu kiel antaŭe. La flosa drivis laŭ la granda Skamandro kie la bordoj estis nun tiom malaltaj kaj senvegetaĵaj, ke ili ŝajnis foraj malhelaj linioj. La tago pasis kaj la suno ŝajnis fali ripoze en la riveron men, projekcianta grandan brunruĝan rebrilon kiu grade fariĝis malbrila kaj malluma kiam la suno malaperis.

En la krepusko fajro konstruiĝis, ĉirkaŭ kio la pilgrimoj amasiĝis por manĝi sian vespermanĝon. Estis diskutado pri la alarmiga ekmalbriliĝo de la suno, kaj multa hipotezado laŭ [eskatologiaj](#) linioj. Subukjul rezignis for ĉiujn respondecojn pri vivo, morto, la futuro kaj pasinteco al Gilfig. Hakst, tamen, deklaris ke li sentus pli trankvile se Gilfig estis antaŭe montrinta pli ekspertan regadon super aferoj de la mondo. Dum ioma tempo la parolado fariĝis intensa. Subunkjul akuzis Hakst-on pri nur supraĵa kompreno dum Haksto uzis tiajn vortojn kiaj “trokredema” kaj “blinda memhumiligo”. Garstang intermetis sin por montri ke ĉiuj faktoj ankoraŭ ne sciiĝis, kaj ke la Purigaj Ritoj ĉe la Nigra Obelisko eble klarigus la situacion.

La postan matenon grandega barilo vidiĝis antaŭe: linio da fortikaj fostoj obstaklantaj veturadon de la rivero. Ĉe unu loko sola estis trapasado ebla, kaj eĉ tiu ĉi truo estis malfermita fare de peza fera ĉeno. La pilgrimoj permesis la floson drivi proksimen al tiu ĉi interspaco, poste faligis la ŝtonego kiu servis kiel ankro. El apuda kabaneto aperis [zeloto](#), kun longaj haroj kaj ostecaj membroj, portanta eluzitan nigran robon kaj svinganta feran stangecon. Li kuris risorte laŭlonge sur la fostaro por rigardi minace suben al tiuj sur la flosa. “Retroiru, retroiru!” li diregis. “Trapasado sur la rivero estas sub mia regado; mi permesas neniujn iri!”

Garstang paŝis antaŭen. “Mi almozas vian indulgon! Ni estas grupo da pilgrimoj, celintaj la Purigajn Ritojn ĉe Ertze-Damaĥo. Se estus necese, ni pagus prezon por pasi la fostaron, kvankam ni fidis, ke vi doneme malpostulos vian imposton.”

La zeloto eligis kriaĉon de raŭka ridado kaj svingis sian feran stangecon. “Mi impoŝto ne povas esti malpostulata! Mi postulas la vivon de la plej malvirta persono inter via bando — krom se unu inter vi povas montri satige al mia plaĉo sian virton!” Kaj kun la gamboj apartigitaj, nigra robo flagranta en la vento, li staris minace fiksrigardanta suben al la flosa.

Inter la pilgrimoj okazis kirliĝo de maltrankvileco, kaj ĉiuj rigardis timete unu al la alia. Estis

murmuro, kiu baldaŭ fariĝis konfuzaĵo el asertoj kaj pretendoj. La emociaj tonoj de Kazmir fine sonoris el tio. “Ne eblas esti mi kiu plej malvirtas! Mia vivo estadis milda kaj strikta kaj dum la vetludado mi preteratentis malnoblan avantaĝon.”

Alia anoncis: “Mi estas eĉ pli virta, kiu manĝas nur sekajn legomojn pro timo pri vivopreno.”

Alia: “Mi estas el eĉ plia ĝentileco, ĉar mi vivtenas nur sur la sekigitaj ŝeloj de tiuj samaj legomoj, kaj arboŝelo kio estas falinta de arboj, pro timo detrui eĉ vegetaĵan vitalecon.”

Alia: “Mia stomako rifuzas vegetaĵojn, sed mi subtenas la samajn ekzaltitajn ideojn kaj permesas nur kadavraĵon pasi la lipojn.”

Alia: “Mi iam naĝis trans lago el fajro por informi maljunan virinon ke la katastrofo kion ŝi timis malprobable okazos.”

Kugel deklaris: “Mia vivo estas senĉesa humileco, kaj nenio deflankigas min en mia dediĉemo al justeco kaj egaleco, eĉ kvankam mi spertas malbonojn pro miaj streboj.”

Vojnod estis ne malpli sindefendema: “Mi estas sorĉisto, prave, sed mi dediĉas mian lertecon nur al la mildigon de publika suferado.”

Nun estis la vido de Garstang: “Mia virto estas el la plej esenca tipo, estante distilita el la ĉiostudado de la epokoj. Kiel mi povu esti alia ol virta? Mi estas senpasia pri la ordinaraj motivoj de la homaro.”

Fine ĉiuj estis parolintaj krom Lodermulĉ, kiu staradis je la flanko, amara rideto sur lia vizaĝo. Vojnod indikis lin per fingro. “Parolu, Lodermulĉ! Provu vian virton, aŭ estu juĝita la plej malvirta, kun la konsekvenca perdo de via vivo!”

Lodermulĉ ridis. Li turniĝis, faris grandegan salton kiu portis lin al foran membron de la fostaro. Li barakte grimpis al la supro, kaj eltirante sian glavon, minacis la zeloton. “Ni ĉiuj estas malvirtaj kune, vi same kiel ankaŭ ni, pro via perforto per tiu ĉi absurda cirkonstanco. Malstriktegi la ĉenon, aŭ pretigu vin alfronti mian glavon.”

La zeloto ĵetis alte la brakojn. “Mia kondiĉo plenumiĝis; vi Lodermulĉ, ĵus montris vian virton. La floso rajtas plue iradi. Pluse, ĉar vi uzas vian glavon defende de honoro, mi nun donacas al vi tiun ĉi ŝmiraĵon, kiu post apliko al via glavo ebligas ĝin tranĉi tra ŝtalo aŭ roko tiel facile kiel tra butero. Iru for do, kaj estu ke ĉiuj profitos de la purigaj devotaĵoj!”

Lodermulĉ akceptis la ŝmiraĵon kaj revenis al la flosan. La ĉeno malstreĉiĝis kaj la floso glitis sen obstaklo preter la fostaro.

Garstang proksimiĝis al Lodermulĉ por diri sian porciigitan aprobon pri ties ago. Li pluse diris averton: “Ĉi okaze ago senpensa, eĉ preskaŭ malobeema, kondukis al la ĝenerala bonfarto. Se simila cirkonstanco okazos en la futuro estus bone, ke vi akceptu konsilon de aliaj el provita saĝeco: mi mem, Kasmir, Vojnod aŭ Subukjul.”

Lodermulĉ gruntis senzorge. “Laŭ via volo, tiom longe kiom la prokrasto kaŭzus al mi neniom da malkonveneco.” Kaj Garstang estis devigita resti plaĉita pri tio.

La aliaj pilgrimoj rigardadis Lodermulĉ-on kun malplaĉiĝo, kaj tiris sin iom for, tiel ke Lodermulĉ sidadis sola ĉe la antaŭa parto de la floso.

Posttagmezo venis, poste sunsubiro, vespero kaj nokto; kiam mateno alvenis estis trovita, ke Lodermulĉ malaperis.

Estis ĝenerala nekompreneo. Garstang faris enketojn, sed neniu povis lumigi la misteron, kaj estis neniu ĝenerala kunopinio pri kio fakte okazigis la malaperon.

Estis strange, ke la foriro de la malpopulara Lodermulĉ neniel reestigis la originalan bonhumoron kaj komunuman senton al la grupo. Post tio, ĉiu el la pilgrimoj sidadis malĝoje silentaj, turnante suspektajn rigardojn al dekstro kaj maldekstro; ne plu estis ludoj, nek filozofiaj diskutoj, kaj la anonco de Garstang, ke Ertze-Damaĥo distancis antaŭe je veturado de nur unu plua tago vekis nenian entuziasmon.

Ertze-Damaĥo

La lastan nokton sur la floso preskaŭa simileco de la malnova kamaradeco revenis. Vitz la parolisto prezentis kelke da vokaj ekzercoj kaj Kugle montris alt-genuan petolan dancon kiu kutimas al la **omar**-kaptisto de Kaŭĉikŭo, kie li trapasis la junecon. Vojnod siavice prezentis malmulton da simplaj transformiĝoj, kaj poste montris etan arĝentan ringon. Li signalis al Hakst. “Tuŝu tiun ĉi per la lango, premu ĝin al via fronto. Post fari tiel, trarigardu.”

“Mi vidas **procesion!**” eksklamis Hakst. “Viroj kaj virinoj nombrantaj centojn, kaj milojn, pretermarŝantaj. Mia patrino kaj mia patro paŝadas antaŭe, poste la geavoj — sed kiuj estas la aliaj?”

“Viaj antaŭuloj,” deklaris Vojnod, “ĉiu en sia kutima vestaro, retroen al la praa homonkulo el kiu ni ĉiuj devenas.” Li retiris la ringon, kaj etendante en sian poŝon elprenis malbrile bluan kaj verdan juvelon. “Rigardu nun, dum mi forĵetas tiun ĉi juvelon en la Skamandron!” Kaj li ĵetis la juvelon for trans la flankon. Ĝi flagretis tra la aero kaj plonĝis en la malhelan akvon. “Nun, mi nur faldas malferme la manplaton, la juvelo revenas!” Kaj ja, dum la bando rigardis ekestis malseka briletado trans la fajrlumo kaj la juvelo ripozis sur la manplato de Vojnod. “Kun tiu ĉi juvelo oni neniam devas timi malriĉecon. Prave, ke la juvelo estas el neniu granda valoro, sed li povas vendi ĝin ripetade... Kion alian mi montru al vi? Eble tiun ĉi etan amuleton. Konfesite, ĝi estas erotika akcesoraĵo, ĝi elvokas intensan emocion en tiu persono al kiu ĝi direktiĝas. Oni devas esti zorgema en ĝia aplikado; kaj ja, mi havas ĉi tie nemalhavindan helpilon: juvelaĵo en la formo de kapra kapo, farita laŭ la ordono de Imperiestro Dalmasmus la Kompata, por ke li ne dolorigu la sentivojn de siaj dek mil **konkubinoj**... Kio alia povas mi montri? Lasu min konsideri... Ho, jen! Korno el singulara kvalito. Kiam puŝita en la buŝon de kadavro, ĝi stimulas la eldiron de dudek finaj vortoj. Enmetita en kadavran orelon ĝi permesas la transiron de informo en la senvivan cerbon... Kion alian mi havas? Jes, ja: malgranda objekto kiu portis al mi multan plezuron!” Kaj Vojnod montris pupon kiu prezentis heroan deklamadon, kantis iom diboĉan kanton kaj instigis konversacion kun Kugel, kiu kaŭris proksime en la antaŭo, rigardanta ĉion kun ega atentemo.

Post longe Vojnod laciĝis pri sia montrado, kaj la pilgrimoj unu-post-aliaj ripozigis sin por dormi.

Kugel kuŝadis maldorme, manoj malantaŭ la kapo, fiksrigardante supren al la steloj, pensante pri la neatendite multa aro da magiaj instrumentoj kaj iloj de Vojnod.

Kiam li certis ke ĉiuj domas, li stariĝis kaj inspektis la dormantan formon de Vojnod. La saketo estis sekure ŝlosita kaj intermetita sube de la brako de Vojnod, ĝuste tiel kiel Kugel atendis. Irante al la eta stokejo, kie varoj teniĝis li eltiris kvanton da **lardo**, kion li miksis kun faruno por fari blankan ŝmiraĵon. El fragmento da peza papero li faldis etan skatolon, kion li plenigis per la ŝmiraĵo. Poste li reiris al sia dormloko.

La sekvan matenon li aranĝis ke Vojnod, kvazaŭ hazarde, vidu lin aplikante sian glavon per la blanka ŝmiraĵo.

Vojnod tuj fariĝis hororigita. “Ne povas esti! Mi ŝokiĝas! Domaĝe, kompatinda Lodermulĉ!”

Kugel signalis ke li silentiĝu. “Kion vi diras?” li murmuris. “Mi nur prizorgas mian glavon kontraŭ rusto.”

Vojnod kapneis kun nekontraŭebla decidegemo. “Ĉio estas klara! Por nura gajno vi murdis Lodermulĉ-on! Mi havas nenian elektorajton krom ke mi diru informon al la ŝtelistoĉasistoj ĉe Ertze-Damaĥo!”

Kugel faris petegan geston. “Ne hastu tiom! Vi miskomprenis ĉion; mi malkulpas!”

Vojnod, alta saturna viro kun purpura haŭtkoloro sub la okuloj, longa mentono kaj alta pinĉita fronto, suprentenis la manon. “Mi neniam estis tia ulo kia toleras hommortigon. La principo de egalvaloro devas aplikiĝi en tiu ĉi kazo, kaj **rigora** repago estas deviga. Je minimumo, la malbonfaronto ne rajtas profiti de sia ago!”

“Ĉu vi referas pri la ŝmiraĵo?” demandis Kugel delikate.

“Precize,” diris Vojnod. “Justeco postulas nenion malplian.”

“Vi estas severa viro,” eksklamis Kugel maltrankvile. “Mi havas nenian elekton krom rezigni al via juĝado.”

Vojnod etendis la manon. “La ŝmiraĵon do, kaj ĉar vi memevidente ege suferas pro bedaŭro, mi diros nenion plian pri la afero.”

Kugel kunpremis la lipojn pripensade. “Nu tiel estu. Mi jam benis la propran glavon. Tial mi ofertas la restaĵon interŝanĝe kontraŭ via erotika akcesoraĵo kaj ĝia kromaĵo, kune kun kelkaj trivialaj talismanoj.”

“Ĉu mi aŭdas prave?” ŝtormis Vojnod. “Via arogo superas trans ĉio! Tiaj efikigaĵoj superas ajnan prezon!”

Kugel ŝultrolevis. “Tiu ĉi ŝmiraĵo estas neniel objekto de ordinara komerco.”

Post disputado Kugel transdonis la ŝmiraĵon kontraŭ ricevo de tubo kiu projekcias bluan koncentraĵon ĝis distanco de kvindek paŝoj, kune kun volvlibro listiganta dek ok fazojn de la Láganeta Ciklo; kaj kun tiuj ĉi objektoj li devis esti kontenta.

Post nelonge la randaj runinoj de Ertze-Damaĥo aperis sur la okcidenta riverbordo: antikvaj kamparaj domegoj nun falintaj kaj izolaj inter trokreskintaj ĝardenoj.

La pilgrimoj funkciigis pelstangojn por persvadi la floson al tiu akvorando. En la distanco aperis la pinto de la Nigra Obelisko, je kio ĉiuj eligis ĝojan krion. La floso moviĝis diagonale trans la Skamandro kaj baldaŭ alkajiĝis ĉe unu el la dispeciĝantaj malnovaj kajoj.

La pilgrimoj kuretis landen, por kuniĝi ĉirkaŭ Garstang, kiu alparolis la grupon: “Estas kun vasta plaĉo ke mi trovas min disigita de respondeco. Jen! La sankta urbo kie Gilfig eldiris la Gneŭistan Dogmon! kie li venkegis Kazeŭon kaj denunciis la Sorĉistinon Enksa! Ne maleblas, ke la sanktaj piedoj surpaŝis tiun ĉi suban grundon!” Garstang faris dramigan geston al la grundo, kaj la pilgrimoj, rigardanta suben, movetadis la piedojn nerveze. “Tio estu kiel estas, ni estas ĉi tie kaj ĉiu el ni devas senti eksŝarĝiĝon. La vojo estis teda kaj ne sen danĝero. Kvindek naŭ komencis antaŭen de la Valo Folgsŭo. La homoj Bamiŝ kaj Randol kaptiĝis fare de grŭhoj ĉe Sagma Herbejo; ĉe la ponto trans la rivero Ask, Kugel aniĝis al ni; sur la Skamandro ni perdis Lodermulĉon. Nun ni nombras kvindek sep, kamaradoj ĉiuj, provitaj kaj verigitaj, kaj estas malĝojiga afero disigi nian asociadon, kion ni ĉiuj memoros por ĉiam!

“Du tagojn poste la Purigaj Ritoj komenciĝos. Tiuj kiuj ne estas forspezintaj ĉiom da sia mono ludante —” ĉimomente Garstang turnis akran rigardon al Kugel “— povas serĉi komfortajn gastejojn por loĝigi sin. La malriĉigitaj devas strebi tiel, kiel li plej bone povas. Nun nia vojaĝo estas ĉe ĝia fino; ni ĉi tiel disiĝas kaj iras niajn proprajn direktojn, kvankam ĉiuj necese rekunvenos du tagojn poste ĉe la Nigra Obelisko. Bonfartu ĝis tiu tempo!”

La pilgrimaro nun disiĝis, kelkaj paŝadantaj laŭ la bordo de la Skamandro al proksima gastejo, aliaj turniĝante flanken kaj irantaj al la urba mezo.

Kugel proksimiĝis al Vojnod. “Mi fremdas al tiu ĉi regiono, kiel vi scias; ĉu eble vi povas rekomendi gastejon el granda komforto kontraŭ malmulta kosto.”

“Ja,” diris Vojnod. “Mi celas al ĝuste tia ĉi gastejo; la Hotelo Antikva Dástra Imperio, kio okupas la terenon de antaŭa palaco. Krom ke la situacio ŝanĝiĝis, komfortega lukseco kaj ekskvizitaj viandoj ofertiĝas kontraŭ neniuj granda kosto.”

La pridiraĵo renkontis la aprobon de Kugel; la du ekiris for tra la avenuoj de malnova Ertze-Damaĥo, preter aretoj da stukaj dometoj, poste tra regionoj kie neniuj konstruaĵoj staris kaj la avenuoj faris malplenan ŝaktabulon, poste en distrikton el grandiozaj domegoj ankoraŭ enloĝataj: tiuj ĉi situigitaj iom for inter detalegaj ĝardenoj. La popolo de Ertze-Damaĥo estis sufiĉe bonaspektaj, eĉ se iom pli olivahaŭtaj ol la popolo de Almerio. La viroj portis nur nigraj, striktaj pantalonoj kaj vestoj kun nigraj tuf-pilkoj; la virinoj estis lukse belegaj en roboj el flavo, ruĝo, oranĝo kaj purpurruĝo, kaj iliaj pantofloj brilis kun oranĝaj kaj nigraj zekinetoj. Bluaj kaj verdaj estis maloftaj, estante malbonŝancigaj koloroj, kaj purpuro signifis pri morto. La virinoj montris altajn plumojn en la hararo, dum la viroj portis modajn nigrajn diskojn, iliaj kapsuproj montritaj tra centra truoj. Rezina balzamo ŝajnis esti tre ege laŭmoda, kaj ĉiuj kiujn Kugel renkontis eksudis odoron de alooj aŭ mirhoj aŭ kárcinto. Entute, la popolo de Ertze-Damaĥo ŝajnis neniom malpli kulturoplenaj ol tiuj de Kaŭĉikŭo, kaj iom pli vitalaj ol la malviglaj civitanoj de Arzenome.

Antaŭe aperis la Hotelo Antikva Dástra Imperio, ne multe for de la Nigra Obelisko mem. Malplaĉe je ambaŭ Kugel kaj Vojnod, la ĉambraro jam tute okupiĝis, kaj la atendisto rifuzis al ili eniron. “La Purigaj Ritoj jam logis ĉiujn tipojn da piuloj,” li eksplikis. “Vi estus bonfortunaj por trovi loĝejon de ajna speco.”

Tiel la afero pruviĝis: de gastejo al gastejo iris Kugel kaj Vojnod, por esti rifuzitaj en ĉiu kazo. Fine, ĉe la okcidenta ĉirkaŭejo de la urbo, ĉe la efektiva rando kun la Arĝenta Dezerto, ili akceptiĝis de granda taverno el iom malestiminda aspekto: la Gastejo de la Verda Lampo.

“Ĝis dek minutoj antaŭe mi ne povus loĝigi vin,” deklaris la proprietulo, “sed la ŝtelistĉasistoj kaptis du personojn kiuj loĝis ĉi tie, nomantaj ilin molpieduloj kaj denaskaj friponoj.”

“Mi fidas, ke tia ne estas la ĝenerala inklinado de via klientaro?” demandis Vojnod.

“Kiu povas diri?” respondis la gastigisto. “Mia komerco estas provizi manĝaĵojn kaj drinkaĵojn kaj loĝĉambrojn; nenio alia. Brutuloj kaj kontraŭ-kulturuloj devas manĝi, drinki kaj dormi, neniom malpli ol erudituloj kaj zelotoj. Ĉiaj estis trapasintaj laŭ okazo tra miaj pordoj, kaj preter ĉio, kion mi scias pri vi?”

Krepusko estis falanta kaj sen plua disputo Kugel kaj Vojnod loĝigis sin ĉe la Ŝildo de la Verda Lampo. Freŝigintaj sin ili aliris la komunan ĉambron por sia vespera manĝo. Tiu ĉi estis halo el granda dimensio, kun tempo-nigrigitaj plafonaj traboj, planko el malhelaj brunaj kaheloj, diversaj fostoj kaj kolonoj el tranĉe difektita ligno ĉiu tenanta lampon. La klientaro estis varia, kiel la proprietisto jam sugestis, montranta diversajn kostumojn kaj vizaĝ-kolorojn. Dezertuloj maldikaj kiel serpentoj, portanta ledajn ĉemizegojn, sidis ĉe unu flanko; ĉe la alia estis kvar kun blankaj vizaĝoj kaj silkaj ruĝaj kapsupraj harligaĵoj kiuj parolis neniam eĉ unu vorton. Laŭlonge de la kontoro ĉe la malantaŭo sidis grupo da bravuloj en brunaj pantalonoj, nigraj manteloj kaj ledaj beretoj, ĉiu kun sfera juvelo pendanta per ora ĉeno de sia orelo.

Kugel kaj Vojnod konsumis manĝon el mezbona kvalito, kvankam iom krude prezentita, poste sidis drinkante vinon kaj konsiderante pri kiel trapasi la vesperon. Vojnod decidis ekzerci sin pri krioj de pasio kaj piaj frenezoj por esti montrataj ĉe la Purigaj Ritoj. Kugel tiam petis lin, ke li pruntedonu ties talismanon de erotika stimulado. “La virinoj de Ertze-Damaĥo montriĝas bonaspekta, kaj kun la helpo de la talismano mi pliigos mian scion pri iliaj kapabloj.”

“Neniel,” diris Vojnod, brakumante sian sakon tuj kontraŭ la flanko. “Miaj kialoj bezonas nenian plidetaliĝon.”

Kugel surmetis malbonhumoran grimacon. Vojnod estis viro kies grandiozaj personaj konceptoj ŝajnis aparte ekstremaj kaj malplaĉaj, pro kialo de lia malsanŝajna, trodika kaj saturna aspekto.

Vojnod malplenigis sian pokalon, kun trodetala ŝparemo kion Kugel trovis krome agaca, kaj stariĝis. “Mi nun aliros la ĉambron por ripozi.”

Turniĝante for, bravulo fanfarone marŝanta trans la ĉambro ŝancelis lin. Vojnod ekdiris akre acidan instrukcion, kiun la bravulo elektis ne preteratenti. “Kiel vi riskas uzi tiajn vortojn al mi! Prenu glavon por sindefendi, aŭ mi detranĉos la nazon for de via vizaĝo!” Kaj la bravulo elprenis la propran glavon.

“Laŭ via volo,” diris Vojnod. “Unu momenton dum mi serĉos mian glavon.” Kun palpebrumo al Kugel, li benis sian glavon per la ŝmiraĵo, poste turniĝis al la bravulo. “Pretigu vin por la morto, mia bonkunulo!” Li saltis grandioze antaŭen. La bravulo, atentinta la preparojn de Vojnod, kaj komprenante ke li alfrontas magion, staris senkapabla pro teruro. Kun kirla svingo Vojnod trapenetris lin, kaj viŝis sian glavon sur la ĉapelon de la bravulo.

La kunuloj de la mortigito ĉe la kontoro eke stariĝis, sed haltis kiam Vojnod kun granda kalmo turniĝis por alfronti ilin. “Zorgu, vi kokoj de fekaĵa monteto! Atentu la sorton de via kunulo! Li mortis per la povo de mia magia glavo, kio estas el sendifektebla metalo kaj tranĉas rokon kaj ŝtalon kiel buteron. Atentu!” Kaj Vojnod eksvingis tranĉe al fosto. La tranĉilego, frapante feran tenilon, rompiĝis en dek du pecojn. Vojnod staradis senreage, sed la kunuloj de la bravulo ondis antaŭen.

“Kio do pri via magia tranĉilego? Niaj glavoj estas el ordinara ŝtalo sed mordas profunde!” Kaj en unu momento Vojnod estis distranĉata en pecojn.

La bravuloj nun turniĝis por fronti al Kugel. “Kio je vi? Ĉu vi volas kunsporti la sorton de via kamarado?”

“Neniel!” deklaris Kugel. “Tiu ĉi viro estis nur mia servisto, portanta mian saketon. Mi estas magiisto; observu tiun ĉi tubon! Mi projekcius bluan koncentraĵon al la unua viro kiu minacus min!”

La bravuloj ŝultrolevis, turniĝis for. Kugel prenis la saketon de Vojnod, poste gestis al la proprietisto. “Estu bona, mi petas, kaj forprenu tiujn ĉi kadavrojn; kaj portu pluan pokalon da spicita vino.”

“Kio pri la konto de via kamarado?” demandis la proprietulo agacite.

“Mi pagos ĝin entute, ne timu.”

La kadavroj portiĝis al la malantaŭo de la konstruaĵaro; Kugel konsumis finan pokalon da vino, poste retretis al sian ĉambron, kie li diskuŝigis la enhavojn de la sako de Vojnod. La mono iriĝis en lian propran monsaketon; la talismanojn, amuletojn kaj instrumentojn li pakis en sian propran sakon; la ŝmiraĵon li ĵetis flanken. Kontenta pri la laboro de la tago, li malstreĉiĝis sur la litseĝo, kaj baldaŭ dormis.

La sekvan tagon Kugel travagadis la urbon, grimpante la plej altan el la ok montetoj. Ĉe dekstro kaj maldekstro fluadis la granda Skamandro. La avenuoj de la urbo markis kvadratajn blokojn da ruinoj, malplenaj senhomejoj, la stukitajn dometojn de la malriĉaj kaj la palacojn de la riĉaj. Ertze-Damaĥo estis la plej granda urbo en la spertado de Kugel, multe pli vasta ol ajna de Almerio aŭ Askolajs, kvankam nuntempe la pli granda parto kuŝis disfalinta en putriĝanta ruineco.

Revenanta al la centra sekcio, Kugel serĉis la budon de profesia geografiisto, kaj paginte la prezon demandis pri la plej sekura kaj rapida irvojo kondukanta al Almerio.

La saĝulo donis nenian hastan aŭ malbone-konsideritan respondon, sed elprenis kelkajn mapojn kaj direktolibrojn. Post profunda konsiderado li turnis al Kugel. “Jen mia konsilo. Sekvu la Skamandron norde al la Ask, iru laŭ la Ask ĝis vi trovos ponton el ses fostegoj. Tie turnu la vizaĝon al la nordo, iradu trans la Montoj de Magnatz, kie vi trovos antaŭ vi tiun arbaron nomatan la Granda Ermo. Iru okcidenten tra tiu ĉi arbaro kaj aliru la bordon de la Norda Maro. Tie vi devas konstrui boateton kaj fidi pri la forto de vento kaj kurento. Se hazarde vi atingus la Landon de la Falanta Muro, estus facila veturado suden al Almerio.”

Kugel faris malpacientan geston. “Esence, tiu ĉi estas la vojo per kiu mi venis. Ĉu estas neniu alia vojo?”

“Iu ja ekzistas. Senzorga bravulo eble elektus riski la Arĝentan Dezerton, per kiu li trovos la

Maron Songeno, trans kio restas la netranspasebla senvivejo de regiono tuŝanta al Orienta Almerio.”

“Nu do, tio ĉi ŝajnas farebla. Kiel mi transiru la Arĝentan Dezerton? Ĉu estas vagonaroj?”

“Por kia celo? Estas nenioj por aĉeti la varojn tiel portatajn — nur rabistoj kiuj preferas proprajigi la vendotaĵojn. Minimuma forteco el kvardek viroj estus necesa por timigi la rabistojn.”

Kugel foriris la budon. Ĉe proksima taverno li drinkis flaskon da vino kaj konsideris pri kiel plej bone amasigi fortularon el kvardek viroj. La pilgrimoj, kompreneble, nombris je kvindek ses, ne kvindek kvin, post la morto de Vojnod; tamen, tia bando servus ja bone ...

Kugel drinkis pli da vino kaj konsideris plu.

Fine li pagis lian konton kaj turnis siajn paŝojn al la Nigra Obelisko. “Obelisko” eble estis misnomo: la objekto estanta granda dentego el solida nigra ŝtono starana cent futojn super la urbo. Ĉe la bazo kvin statuoj gravuriĝis, ĉiu frontanta malsaman direkton, ĉiu la Ĉefa Adepto de iu aparta sekto. Gilfig frontis la sudon, liaj kvar manoj prezentantaj simbolojn, liaj piedoj surtretantaj la kolojn de ekstazaj adorantoj, kun piedfingroj tre longaj kaj kurbiĝanta supren, por indiki elegantecon kaj delikatecon.

Kugel petis informon de apuda atendanto. “Kiu, rilate al la Nigra Obelisko, estas Ĉefa Hierarĥisto, kaj kie li troviĝu?”

“Prikursisto Hulmo estas tiu individuo,” diris la atendisto kaj indikis belegan konstruaĵon proksiman. “En tiu juvel-kovrita strukturo lia sanktejo povas troviĝi.”

Kugel pluiris al la konstruaĵo indikata kaj post multe da emfazegaj deklaroj estis kondukata en la ĉeestecon de Prikursisto Hulm: viro el mezaj jaroj, iomete dika kaj ronda je la vizaĝo. Kugel gestis al la sub-hierarĥo kiu tiom malvole kondukis lin ĉi tien. “Iru; mia mesaĝo estas por la Prikursisto sola.”

La Prikursisto faris signalon; la hierarĥo foriris. Kugel paŝetis antaŭen. “Ĉu mi povas paroli sen timo pri esti kaŝe aŭdata?”

“Tiel estas la kazo.”

“Unue sciu,” diris Kugel, “ke mi estas potenca sorĉisto. Atentu: tubo kiu projekcias bluan koncentraĵon! Kaj jen, volvlibro listanta okdek fazojn de la Láganeta Ciklo! Kaj tiu ĉi instrumento: korno kiu permesas mortintulon paroli, kaj uzata laŭ alia maniero, permesas informon estu transsendata en la kadavran cerbon! Mi posedas aliajn miraĵojn multegajn!”

“Ja interesaj,” murmuris la Prikursisto.

“Mia dua malkovraĵo estas jena: je iu tempo mi servis kiel la miksisito de **incensoj** ĉe la Templo de Teleologoj en fora lando, kie mi eksciis ke ĉiu el la sanktaj gravuraĵoj tiel konstruiĝis por ke la pastroj, je okazo de grava neceso, povus fari agojn ŝajne tiajn de la dio mem.”

“Kial tiu ĉi ne estu la kazo?” demandis la Prikursisto milde. “La dio, kontrolante ĉiun aspekton de ekzistado, persvadas la pastrojn, ke ili faru tiajn agojn.”

Kugel konsentis pri la proponaĵo. “Ĉu mi tial rajtas supozi ke la aspektoj gravuritaj en la Nigra Obelisko estas iom similaj?”

La Prikursisto ridetis. “Pri kiu el la kvin vi specife referencas?”

“Specife pri la prezentaĵo de Gilfig.”

La okuloj de la Prikursisto fariĝis senemociaj; li ŝajnis pripensadi.

Kugel indikis la diversajn talismanojn kaj instrumentojn. “Page kontraŭ iu servico mi donos kelkajn el tiuj ĉi magiaĵoj en la zorgadon de tiu ĉi ofico.”

“Kio estas la servico?”

Kugel eksplikis detale, kaj la Prikursisto kapjesis pensoplene. “Fojon plu, se vi volas, montru viajn magiajn varojn.”

Kugel faris.

“Ĉu tiuj estas la tuto de via aparataro?”

Kugel kontraŭvole montris la erotikan stimulilon kaj eksplikis la funkcion de la kroma talismano. La Prikursisto kapjesis, entuziasme ĉifoje. “Mi kredas, ke ni povas interkonsenti; ĉio ĉi estas tiel kiel la ĉiopova Gilfig volas.”

“Ĉu konsentite do?”

“Ni ja interkonsentas!”

La sekvan matenon la grupo da kvindek kvin pilgrimoj amasiĝis ĉe la Nigra Obelisko. Ili riverencegis antaŭ la aspekto de Gilfig, kaj preparis plue fari siajn adorojn. Subete la okuloj de la aspekto ekbrilis fajre kaj la buŝo malfermiĝis. “Pilgrimoj!” sonis latunan voĉon. “Iru kaj plenumu mian instruon! Trans la Arĝenta Dezerto vi devas veturi, al la bordo de la Maro Songeno! Tie vi trovos sanktejon, antaŭ kio vi devos riverencigi vin. Iru! Trans la Arĝentan Dezerton, kun ĉioma rapido!”

La voĉo kvietiĝis. Garstang parolis en tremanta voĉo. “Ni aŭdas, ho Gilfig! Ni obeas!”

Ĉi saman momenton Kugel saltis antaŭen. “Ankaŭ mi aŭdis tiun ĉi mirindaĵon! Ankaŭ mi faros la veturon! Venu, ni ekiru for!”

“Ne tiel rapide,” diris Garstang. “Ni ne povas kuradi saltete kaj saltege kiel derviŝoj. Vivtenaj varoj bezoniĝos, kaj ankaŭ ŝarĝobestoj. Por tiuj ĉi necesoj bezoniĝos mono. Kiuj do partoprenos mondane??”

“Mi ofertas du cent tercojn!” “Kaj mi, sesdek tercojn, la tuto el mia riĉeco!” “Mi, kiu perdis naŭdek tercojn ludante kun Kugel, posedas nur kvardek tercojn, kiujn min nun kontribuas.” Kaj tiel fariĝadis la afero, kaj eĉ Kugel donis sesdek kvin tercojn al la komuna monaro.

“Bone,” diris Garstang. “Morgaŭ do mi faros aranĝojn, kaj la sekvan tagon, se ĉio plenumiĝas bone, ni forlasos Ertze-Damaĥo per la Malnova Okcidenta Portalo!”

En la mateno Garstang, kun helpo de Kugel kaj Kazmir, ekiris por akiri la necesajn ekipaĵojn. Ili direktiĝis al vojaĝ-vara vendokorto, situigita sur unu el la nun malplenaj lokoj, ĉirkaŭita de la **bulvaroj** de la malnova urbo. Muro el kotaj brikoj miksitaj kun fragmentoj de gravuritaj ŝtonoj ĉirkaŭis la stokejon, de kie venis sonoj: plorado, vokoj, profundaj muĝoj, gorgaj graŭloj, bojoj, kriegoj kaj muĝegoj, kaj forta multpartaodoro, kombinita el **amoniako**, **fojno**, dek du da tipoj da sterko, la putreco de malnova viando, ĝenerala acideco.

Trapasante portalon la veturantoj eniris oficon kio superrigardis la centran korton, kie kaĝoj, kaĝegoj kaj baritaj kortetoj entenis bestojn el tia diverseco ke Kugel miris.

La korto-estro venis antaŭen: alta, flavhaŭta viro, multe cikatrata, al kiu mankis la nazo kaj unu orelo. Li portis robon el griza ledo zonita ĉe la talio kaj altan konusan nigran ĉapelon kun flugilaj oreloklapoj.

Garstang deklaris la kialon de la vizito. “Ni estas pilgrimoj kiuj devas veturi trans la Arĝenta Dezerto, kaj volas lui porto-bestojn. Ni nombras je kvindek aŭ iom pli, kaj atendas veturon longan je dudek tagoj en ambaŭ direktoj kun eble kvin tagoj trapasataj en niaj devotoj: lasu, ke tiuj ĉi informoj gvidu vin en via pensado. Nature ni atendas nur la plej durajn, plej laboremajn kaj facilanimajn bestojn el via stoko.”

“Ĉio ĉi estas bone,” diris la brutisto, “sed mia prezo por luo estas identa kun mia prezo por vendo, do vi rajtas egale havu la plenan bonon el via mono, en la formo de posedakto pri la bestoj menciitaj en la kontrakto.”

“Kaj la prezo?” demandis Kazmir.

“Tio ĉi dependas de via elekto; ĉiu besto valoras je malsama prezo.”

Garstang, kiu estis stude rigardanta la kortegon, kapneis en malplaĉo. “Mi konfesas pri konfuzo. Ĉiu besto estas el malsama tipo, kiu neniu ŝajnas akordi kun bone-difinitaj kategorioj.”

La brutisto agnoskis ke tiel estis la kazo. “Se vi volas aŭskulti, mi povas ekspliki ĉion. La rakonto meritas daŭran fascinon, kaj helpos vin pri la tenado de viaj bestoj.”

“Ni duoble profitos per aŭdi vin do,” diris Garstang dankeme, kvankam Kugel estis faranta gestojn de malpacienca.

La brutisto iris al breto, elprenis lede binditan foliaron. “En pasinta epoko Freneze Reĝo Kut ordonis **menaĝerion** kiel neniu alia, por sia privata mirado kaj la ŝok-miro de la mondo. Lia sorĉisto, Folinens, tial produktis grupon da bestoj kaj **teratuloj** unikaj, kombinante la plej sovaĝan varion el vivo-semeroj; por la rezulto kion vi vidas.”

“La menaĝerio persistis tiom longe?” demandis Garstang mirante.

“Ja ne. Nenio de Freneza Reĝo Kut nun ekzistas krom la legendo, kaj la esplorlibro de la sorĉisto Folinens —” nun li fingre frapetis la ledan foliaron “— kio priskribas ties strangegan sistemon terminaron. Kiel ekzemple —” li malfermis la foliaron. “Nu — hmm. Jen estas deklaro, iom malpli specifa ol la aliaj, en kiu li pridetalas la duon-viroj, malpli ol mallonga aro da observoj:

GIDO: hibrido el viro, gargojlo, hŭórlo, saltanta insekto.

DÉODANDO: gulo, basilisko, viro.

ÉRBO: urso, viro, lánk-lacerto, demono.

GRÚHO: viro, okulega vesperto, la malovta húno.

LEŬKOMORFO: nekonata.

BÁZILO: félinodoro, viro, (vespo?).

Kazmir kunfrapis la manojn ŝokite. “Ĉu estas, do, ke Folinens kreis tiun ĉi kreitulojn je la posta malavantaĝo de la homaro?”

“Certe ne,” diris Garstang. “Tio ŝajnas esti malpli ol ekzerco en sencela pensado. Dufoje li konfesas pri scivolo.”

“Tiel ankaŭ mi opinias, en tiu ĉi aparta kazo,” diris la brutisto, “kvankam aliloke li estas malpli dubinda.”

“Kiel estas tiuj ĉi kreituloj antaŭ ni konektitaj al la menaĝerio?” demandis Kazmir.

La brutisto ŝultrolevis. “Alia el la ŝercaĵoj de la Freneza Reĝo. Li liberigis la tutan bestaron en la ĉirkaŭaj kamparoj, je la ĝenerala maltrankviliĝo. La kreituloj, donitaj per ĉionmiksema fekundeco, fariĝis pli anstataŭ malpli strangeĝaj, kaj nun ili vagadas la Ebenejon de Oparono kaj la Arbaregon Blánŭaltan multnombre.”

“Nu do, kio pri ni?” demandis Kugel. “Ni deziras ŝarĝobestojn, facilanimaj kaj malmultekostaj laŭ prizorgado, anstataŭ monstroj kaj kuriozaĵoj, sendepende de kiom ajn prisciindaj.”

“Kelkaj el mia granda stokaro kapablas pri tiu ĉi uzado,” diris la brutisto dignoplene. “Tiuj ĉi postulas la plej altajn prezojn. Aliflanke, kontraŭ nur unu terco vi rajtas posedi long-kola, grand-abdomena kreitulo el miriga voremo.”

“La prezo logas,” diris Garstang kun bedaŭro. “Kontraŭsorte, ni bezonas brutojn por porti manĝaĵon kaj akvon trans la Arĝenta Dezerto.”

“Ĉi okaze ni devas elekti pli detale.” La brutisto turnis por studi sian brutaron. “La alta besto sur du gamboj eble estas malpli feroca ol li ŝajnas ... ”

Eventuale grupo da brutoj nombrantaj dek kvin elektiĝis, kaj prezo estis interkonsentigita. La brutisto portis ilin al la portalo; Garstang, Kugel kaj Kazmir akceptis posedecon kaj gvidis la dek kvin male interkonformajn kreitulojn laŭ malhasta paŝado tra la stratoj de Ertze-Damaĥo, al la Okcidenta Portalo. Ĉi tie Kugel lasiĝis por zorgadi, dum Garstang kaj Kazmir iris por aĉeti vivtenaĵojn kaj aliajn necesaĵojn.

Antaŭ ol noktiĝis ĉiuj preparoj finiĝis, kaj je la sekva mateno, kiam la unua brunruĝa lumstrio da sunlumo frapis la Nigran Obeliskon, la pilgrimoj ekiris for. La estoj portis korbojn da manĝaĵo kaj vezikojn da akvo; la pilgrimoj ĉiuj portis novajn ŝuojn kaj larĝ-randajn ĉapelojn. Gasrtang

malsukcesis dungi gvidiston, sed akiris mapon de la geografisto, kvankam ĝi indikis malpli ol etan cirklon nomata “Ertze-Damaĥo” kaj pli grandan lokon markita “Maro Songeno”.

Kugel estis donita unu el la bestoj por ke li gvidu, kreitulo kun dek du gamboj, longa je dudek futoj, kun eta stulte ridetanta hominfana kapo kaj flavbruna felo kovranta ĉion. Kugel trovis la taskon agaca, ĉar la besto elspiris fiodore sur lian nukon, kaj kelkfoje sekvis tiom proksime, ke ĝi surpaŝis liajn kalkanojn.

El la kivndek sep pilgrimoj kiuj depaŝis la flosan, kvardek naŭ formarŝis al la sanktejo sur la strandoj de la Maro Songeno, kaj tiu nombro estis preskaŭ tuj malpliigita al kvardek ok. Iu Tokharen, paŝante de sur la vojo por respondi al voko de la korpo, pikiĝis de monstra skorpio, kaj ekkuris norden per grandegaj saltoj, kriante raŭke, ĝis baldaŭ li malaperis el vido.

La tago trapasiĝis sen plua malbono. La lando estis seka griza malplenejo, dise sternita per flintoj, permesante ke nur ferherbaĉo povu vivtenadi. Je la sudo estis aro da malaltaj montetoj, kaj Kugel pensis percepti unu aŭ du formojn starantajn senmove sur la supro. Je sunsubiro la karavano haltis; kaj Kugel, rememorante la rabistojn kiuj laŭ reputacio loĝadis en la regiono, persvadis al Garstang, ke li deĵorigu du gardistojn: Lipelt kaj Mirĉ-Masen. Kiam venis mateno ili estis for, lasante nenian postsignon, kaj la pilgrimoj alarmiĝis kaj sentis sin subpremataj. Ili staris en nervoze malvasta grupo rigardantaj en ĉiujn direktojn. La dezerto kuŝis plata kaj malhela en la malforta, malalta lumo de sunleviĝo. Je la sudo estis kelkaj montetoj, nur iliaj molaj surfacoj lumigitaj; aliloke la lando kuŝis plata ĝis la horizonto.

Post nelonge la karavano ekiris, kaj nun estis nur kvardek ses. Kugel, kiel antaŭe, dungiĝis por konduki la longan multgamban beston, kiu nun komencis okupi sin per ripete puŝfrapi per sia vizaĝo al la skapoloj de Kugel.

La tago trapasiĝis sen malbonhazardo; mejloj antaŭaj fariĝis mejloj malantaŭaj. Unue marŝadis Garstang, kun fostego, poste venis Vitz kaj Kazmir, sekvataj de kelkaj aliaj. Poste venis la ŝarĝobrutoj, ĉiu kun sia aparta silueto: unu malalta kaj serpenta; alia alta kaj dubranĉa, preskaŭ el homa formeco, krom por la kapo, kio estis alta kaj maldika kiel la ŝelo de [limulo](#). Alia, konvekso ĉe la dorso, ŝajnis resalti aŭ petoli sur siaj ses rigidaj gamboj: alia estis kiel ĉevalo kovrata de blankaj plumoj. Post la ŝarĝobrutoj sekvis en hazarda interspaco la pluaj pilgrimoj, kun Bluner kutime marŝanta en la malantaŭo, tial akorde kun la troigita humileco al kio li kutimis. Ĉe la haltejo tiun ĉi vesperon Kugel elprenis la etendeblan barilon, iam la posedaĵo de Vojnod, kaj encirkligis la grupon per fortika baraĵo.

La sekvan tagon la pilgrimoj transiris aron da malaltaj montoj, kaj ĉi tie ili suferis atakon fare de rabistoj, sed ŝajnis esti ne pli ol esplora bataleto, kaj la sola suferinto estis Hakst kiu spertis vundon ĉe la kalkano. Sed pli serioza afero okazis du horojn poste. Pasinte sub deklivo, ŝtonego liberiĝis, por ruliĝi tra la karavano, mortigante ŝarĝobruton, kaj ankaŭ Andel-on la Funerpaŝa Evangelisto kaj Roremaŭnd-on la Skeptitkisto. Dum la nokto Hakst mortiĝis ankaŭ, evidente venenita de la armilo kio vundis lin.

Kun malĝoje seriozaj vizaĝoj la pilgrimoj ekiris for, kaj preskaŭ tuj atakiĝis de kaŝejo fare de la rabistoj. Bonhazarede la pilgrimoj estis atentaj, kaj la rabistoj malorde forĉasiĝis kun dek du el ili mortigitaj, dum la pilgrimoj perdis nur du: la viroj Krej kaj Magaĥen.

Nun estis grumblado kaj malĝojaj rigardoj tuniĝis orienten al Ertze-Damaĥo. Garstang levis la

falintajn esperojn: “Ni estas Gilfiganoj; Gilfig parolis! Sur la strandoj de la Maro Songeno ni serĉos la sanktan sanktejon! Gilfig estas ĉiom-saĝa kaj ĉiom-kompata; tiuj kiuj falas en lia servo estas tuj transportataj al la paradiza Gamamejro! Pilgrimoj! Okcidenten!”

Trovante kuraĝon la karavano refoje ekiris, kaj la tago pasiĝis sen plua malboniĝo. Dum la nokto tamen, tri el la ŝarĝobruoj eskapis siajn tenilojn kaj eltendariĝis, kaj Garstang estis devigata anonci malgrandigitajn porciojn por ĉiuj.

Marŝante la sepan tagon, Tilfoks manĝis manplenon da venenaj beroj kaj mortis spasmante, je kiu okazo lia frato Vitz, la parolisto, furioze freneziĝis kaj kuris supren laŭ la linio da ŝarĝobestoj, blasfemante Gilfigon kaj svinge tranĉante la akvovezikojn per sia tranĉilo, ĝis Kugel fine lin mortigis.

Du tagojn poste la **marasma** bando venis al akvofonto. Spite kontraŭ la averto de Garstang, Salanvje kaj Arlo ĵetis sin suben kaj trinkegis grandaglute. Preskaŭ tuj ili ektenis al si la stomakon, strangoliĝis sufoke, iliaj lipoj estante la koloro de sablo, kaj baldaŭ ili mortis.

Semajnon postan dek kvin viroj kaj kvar bruoj venis de super monteto por vidi trans la trankvila akvo de la maro Songeno. Kugel travivis, kaj ankaŭ Garstang, Kazmir kaj Subukjul. Antaŭ ili situis marĉo, en kion fluis malgrandega rivereto. Kugel testis la akvon per la amuleto pruntita al li de Iŭkoŭnu, kaj anoncis ĝin sana. Ĉiuj trinkegis ĝis sato, manĝis fragmitojn ŝanĝitajn al nutra sed sengusta substanco per tiu sama amuleto, poste dormis.

Kugel, pliatentigita pro senco de danĝero, saltis supren, por observi malbonaŭguran moviĝon inter la fragmitoj. Li atentigis siajn kunulojn, kaj ĉiuj pretigis siajn armilojn; sed kio ajn kaŭzis la moviĝon alarmiĝis kaj retretis. La tempo estis meza posttagmezo; la pilgrimoj paŝadis suben al la morna strando por taksi la situacion. Ili rigardis norden kaj suden sed trovis neniun signon pri la sanktejo. Homoj koleriĝis; okazis kverelo kion Garstang sukcesis trankviligi nur per strebado plej persvadema. Balĉ, kiu estis vaginta supren laŭ la strando, revenis tre ekcitate: “Vilaĝo!”

Ĉiuj ekis antaŭen plenaj de espero kaj avido, sed la vilaĝo, kiam la pilgrimoj proksimiĝis, montriĝis kiel ja tre malbona afero, eta kuna aro da dometaĵoj enloĝataj de lacertaj homoj kiuj montris la dentojn kaj svingadis vipecajn bluajn vostojn en minaca defio. La pilgrimoj formoviĝis laŭ la strando, kaj sidis sur herbotufoj rigardanta la malaltan ondoŝaŭmon de la Maro Songeno.

Garstang, **debila** pro la mankoj suferitaj, parolis unue. Li provis aldoni feliĉecon al la voĉo. “Ni alvenis, ni triumfis super la terura Arĝenta Dezerto! Nun ni bezonas nur trovi la sanktejon, fari niajn devotajn piaĵojn; ni rajtas poste reiri al Ertze-Damaĥo kaj ĝui futuron el certigita ĝojado!”

“Ĉio ĉi bonas,” grumblis Balĉ, “sed kie troviĝos la sanktejo? Ĉe dekstre kaj maldekstre estas la sama morna strando!”

“Ni devas fidi al la gvidado de Gilfig!” deklaris Subukjul. Li gratis sagon sur pecon de ligno, tuŝis ĝin per sia sankta rubando. Li vokis: “Gilfig, ho Gilfig! Gvidu nin al la sanktejo! Mi tial ĵetas alte sagohavan indikilon!” Kaj li ĵetis la peceton alte supren en la aeron. Kiam ĝi surgrundiĝis, la sago indikis suden. “Suden ni devas iri!” kriis Garstang. “Suden al la sanktejo!”

Sed Balĉ kaj kelkaj el la aliaj rifuzis respondi. “Ĉu vi ne vidas, ke ni elĉerpiĝis ĝis alfronti morton? Miaopinie, decas ke Gilfig estu jam gvidinta niajn paŝojn al la sanktejo, anstataŭ forlasi nin

al necerteco!”

“Gilfig ja gvidis nin!” respondis Subukjul. “Ĉu vi ne atentis pri la indiko de la sago?”

Balĉ sonigis ronkon de sardona ridado. “Ajna branĉeto ĵetita alten devas subveni, kaj ĝi montrus suden same facile kiel norden.”

“Vi blasfemas al Gilfig!” Subukjul retroiris hororigite.

“Tute ne; mi malcertas, ke Gilfig aŭdis vian instruon, aŭ eble vi lasis al li malsufiĉan tempon por reagi. Ĵetu supren la branĉeton cent fojojn; se ĉi indikas suden je ĉiu okazo, mi marĉos suden haste.”

“Nu do,” diris Subukjul. Li refoje vokis al Gilfig kaj ĵetis supren la peceton, sed kiam ĝi frapis la grundon, tiam la sago indikis norden.

Balĉ diris nenion. Subukjul palpebrumis, poste fariĝis ruĝa je la vizaĝo. “Gilfig indikis al ni jam unu fojon, kaj konsideras tion sufiĉe.”

“Mi restas nekonvinkita,” diris Balĉ.

“Kaj mi.” “Kaj mi.”

Garstang suprentenis la brakojn petege. “Ni jam venis tiom longe; ni strebegis kune, ĝojis kune, batalis kaj suferis kune — ne lasu, ke ni nun falu en disputadon!”

Balĉ kaj la aliaj nur ŝultrolevis. “Ni ne blinde kuris suden.”

“Kion do vi faru? Ĉu iri noden? Aŭ reiri al Ertze-Damaĥo?”

“Ertze-Damaĥo? Sen manĝaĵo kaj kun nur kvar ŝarĝobruoj? Ba!”

“Do lasu, ke ni pluiru suden serĉe por la sanktejo.”

Balĉ faris pluan mule obstinan ŝultrolevon, je kio Subukjul koleriĝis. “Tiel estu! Tiuj kiuj sudeniros staru je tiu ĉi flanko, tiuj kiuj kuniĝas je Balĉ je tiu fora!”

Garstang, Kugelel kaj Kazmir alpaŝis al Subukjul; la aliaj restis kun Balĉ, grupo nombra je dek unu, kaj nun ili komencis flustri inter si, dum la kvar fidelaj pilgrimoj rigardadis anticipe je io malbona.

La dek saltis stariĝante. “Adiaŭ.”

“Kien vi iras?” demandis Garstang.

“Ne grave. Serĉu vian sanktejon se vi devas; ni iros trakti proprajn aferojn.” Kun la plej mallonga el elblaj adiaŭoj ili marŝis al la vilaĝon de la lacertuloj, kie ili buĉis la virajn, [fajlis](#) la dentojn de la inaj, vestis ilin en vestaĵoj el fragmitoj, kaj instalis sin kiel lordoj de la vilaĝo.

Garstang, Subukjul, Kazmir kaj Kugel dumtempe veturis suden laŭ la strando. Je noktiĝo ili bivakis kaj vespermanĝis per moluskoj kaj kraboj. Je la mateno ili trovis ke la kvar restantaj

ŝarĝbrutoj foriris, kaj nun ili estis solaj.

“Estas la volo de Gilfig,” diris Subukjul. “Ni devas nur trovi la sanktejon kaj morti!”

“Kuraĝon!” murmuris Garstang. “Ne lasu, ke ni venkiĝos de malespero!”

“Kio alia restas? Ĉu ni iam ajn refoje vidos la Valon Folgeŭs?”

“Kiu scias? Lasu nin unue faru niajn devotojn ĉe la sanktejo.”

Je tio ili ekiris plu, kaj marĉis la restaĵon de la tago. Je noktiĝo ili tro lacis por fari ion ajn pli ol fali velke sur la sablon de la strando. La maro etendiĝis antaŭ ili, plata kiel tablo, tiom kalma ke la subiranta suno speguligis sian precizan aspekton anstataŭ brilan strion. **Pektenoj** kaj kraboj refoje provizis malgrandan vespermanĝeton, post kio ili komfortigis sin por dormi sur la stando.

Iam post la unuaj horoj de la nokto Kugel vekiĝis pro sono de muziko. Eksidante, li rigardis trans la akvo por trovi ke fantoma urbo aperis por ekzisti. Maldikaj turoj ĵetiĝis en la ĉielon, lumigitaj de brileraj punketoj de blanka lumo kiuj drivis malrapide supren kaj malsupren, tien kaj reen. Sur la vojoj promenis la plej feliĉa el homaroj, portantaj palajn lumantajn vestaĵojn kaj bolvantaj kornojn de delikata sono. Barĝo suramasigita de silkaj kusenoj, movita de enorma velo el **cejan**-blua siko, drivis pretere. Lampoj ĉe la pruo kaj pobostango lumigis ferdekon plen-plenan de festantoj: kelkaj kantantaj kaj ludantaj **liutojn**, aliaj drinkantaj el pokaloj. Kugel dolore volis partopreni en ilia ĝojo. Li baraktis leviĝi ĝis la genuoj, kaj elvokis. La festantoj subenmetis siajn instrumentojn kaj fiksrigardis al li, sed nun la barĝo jam drivis pretere, tirata de la granda blua velo. Baldaŭ la urbo flagis kaj malaperis, lasante nur la malluman noktan ĉielon.

Kugel rigardadis en la nokton, lia gorĝo dolorante pro tia bedaŭro kian li neniam antaŭe spertis. Je lia surprizo li trovis sin staranta ĉe la rando de la akvo. Apude estis Subukjul, Garstang kaj Kazmir. Ĉiuj fiksrigardis unu al alia tra la mallumo, sed interŝanĝis neniujn vortojn. Ĉiuj revenis supren sur la strando kie baldaŭ ili domiĝis sur la sablo.

Tra la tuto de la sekva tago estis malmulta konversacio, kaj eĉ reciproka evitado, kvazaŭ ĉiu el la kvar volis esti sola kun siaj pensoj. De tempo al tempo unu aŭ alia rigardis duon-sopire al la sudo, sed neniu ŝajnis esti en humoro por forlasi la lokon, kaj neniu parolis pri foriro.

La tago pasiĝis dum kiam la pilgrimoj ripozis en duon-toporo. Sunsubiro venis, kaj nokto; sed neniu el la grupo elektis dormi.

Dum la meza vespero la fantoma urbo reaperis, kaj ĉinokte bankedo okazadis. Artfajraĵa spektaklo el mirinda detaleco burĝonis en la ĉielo: **Puntoj**, retoj, stel-eksplozadaj el ruĝo kaj verdo kaj bluo kaj arĝento. Laŭlonge de la promenejo venis parado, kun fantom-junulinoj vestitaj en **irizaj** vestaĵoj, fantom-muzikistoj en volumegaj vestaĵoj el ruĝo kaj oranĝo kaj petolantaj fantomo-**arlekenoj**. Dum horoj la sono de festado drivis trans la akvo, kaj Kugel vadis en la akvon por stari ĝis-genuo profunda, kaj ĉi tie li rigardadis ĝis la vestado kvietiĝis kaj la urbo fadis el vido. Kiam li turnis for, la aliaj sekvis lin reen al la strando.

Je la sekva tago ĉiuj estis malfortaj pro malsato kaj soifo. En raŭka voĉo Kugel murmuris, ke ili devas pluirigi sian mision. Garstang kapjesis kaj diris raŭke: “Al la sanktejo, la sanktejo de Gilfig!”

Subukjul kapjesis. La vangoj de lia iame grasa vizaĝo marasmis; liaj okuloj surhavis tavolojn

kaj aspektis nebule. “Jes,” li raslis. “Ni jam ripozis; pluen ni devas iri!”

Kazmir kapjesis preteratente. “Al la sanktejo!”

Sed neniuj komencis iri plu suden. Kugel vagis supren trans la tajda zono kaj sidigis sin por atendi noktiĝon. Rigardante dekstren li vidis homan skeleton ripozantan laŭ pozo ne malsimila ol lia propra. Ektremante, Kugel turniĝis maldekstren kaj jen estis dua skeleto, tiu ĉi rompita de tempopaso kaj la sezonoj, kaj trans tio ankoraŭ alia, tiu estanta nur amaso da ostoj.

Kugel levis sin stari kaj kuris ŝancelante al la aliaj. “Rapide!” li vokis. “Dum forto ankoraŭ restas al ni! Al la sudo! Venu, antaŭ ol ni mortos, kiel tiuj aliaj kies ostoj restas supere!”

“Jes, jes,” murmuris Garstang. “Al la sanktejo.” Kaj li tiregis sin por stari. “Venu!” li vokis al la aliaj. “Ni iras suden!”

Subukjul levis sin vertikale, sed Kazmir, post senforta provo, falis reen. “Ĉi tie mi restas,” li diris. “Kiam vi atingos la sanktejon, [propetu](#) al Gilfig pro mi; ekspliku ke la hipnota sorĉo superregis la forton de mia korpo.”

Garstang volis resti por petegi, sed Kugel indikis pri la subiranta suno. “Se ni restus ĝis mallumo, ni perdiĝus! Morgaŭ nia forto estus elĉerpita!”

Subukjul prenis la brakon de Garstang. “Ni devas esti for, antaŭ ol noktiĝo.”

Garstang diris finan petegon al Kazmir. “Mia amiko kaj kunulo, voku vian forton. Kune ni estas venintaj, de fora Valo Folgeŭs, sur floso malsupren laŭ la Skamandro, kaj trans la hororan dezerton! Ĉu ni devas apartiĝi antaŭ ol atingi la sanktejon?”

“Venu, al la sanktejo!” ronkis Kugel.

Sed Kazmir turnis la vizaĝon for. Kugel kaj Subukjul kondukis Garstang for, kun larmoj fluantaj malsupren sur liaj velkintaj vangoj; kaj ili ŝanceliĝis suden laŭ la strando, evitigantaj la okulojn for de la klara mola surfaco de la maro.

La maljuna suno subeniris kaj supren-reflektis ventumilforman koloraĵon. Alta sternaĵo el nubopecetoj lumiĝis feliĉe flava sur strange bronz-bruna ĉielo. La urbo nun aperis, kaj pli ol ĉiam antaŭe ĝi grandiozis, kun pintoturoj reflektantaj la lumon de sunsubiraro. Laŭ la promenejo marŝis gejunuloj kun floroj en la hararo, kaj foje ili haltis por fiksrigardi al la triopo kiu paŝadis laŭ la longo de la strando. Sunsubiro fadis; blankaj lumoj brilis de la urbo, kaj muziko drivetis trans la akvo. Dum longa tempo ĝi sekvis la tri pilgrimojn, finfine fadanta en la distanco kaj mortanta. La maro kuŝis malplena je la okcidento, reflektante kelkajn finajn kolorojn el brunaj kaj oranĝaj briletoj.

Ĉirkaŭ tiam la pilgrimoj trovis [rojon](#) da freŝa akvo, kun beroj kaj sovaĝaj prunoj kreskantaj apude, kaj ĉi tie ili ripozis la nokton. Je la mateno Kugel kaptis viŝon kaj ĉasis krabojn sur la strando. Plifortiĝintaj, la tri daŭre iradis suden, ĉiam serĉante por vidi la sanktejon, kion Kugel nun preskaŭ atendis vidi, tiel intensaj estis la sentoj de Garstang kaj Subukjl. Kaj ja, dum la tagoj preterpasis, estis la devota Subukjul kiu komencis malesperi, dubi la sincerecon de la komando dirita al Garstang, dubi la esencan virton de Gilfig mem. “Kio gajniĝas per tiu ĉi dolorega pilgrimado? Ĉu Gilfig dubas nian devotemon? Certe ni jam provis nin per ĉeesti la Purigan Riton; kial li sendis nin tiom for?”

“La saĝaj rimedoj de Gilfig estas nepenetreblaj,” diris Garstang. “Ni jam venis tiom for; ni devas serĉi plu kaj plu kaj plu!”

Subukjul ekhaltis, por rigardi malantaŭen laŭ la vojo jam survenita. “Jen mia propono. Ĉe tiu ĉi loko, lasu ke ni starigu altaron el ŝtonoj, kio fariĝos nia sanktejo; lasu, ke ni tiam plenumu riton. Kun la devigo de Gilfig plenumita, ni rajtos turniĝi norden, al la vilaĝo kie niaj kunuloj loĝas. Tie, feliĉe ni rekaptu la ŝarĝobrutojn, kaj replenigu niajn stokojn, kaj ekiru trans la dezerto, eble por alveni refoje al Ertze-Damaĥo.”

Garstang hezitis. “Estas multo rekomendinda en via propono. Tamen —”

“Boato” kriis Kugel. Li fingre montris al la maro kie je distanco de dunona mejlo naĝis fiŝkaptista boato puŝita de kvadrata velo pendants de longa fleksebla velstango. Ĝi pasis malantaŭ promontoro kiu situis unu mejlon sude de tie kie la pilgrimoj staradis, kaj nun Kugel indikis pri vilaĝo iom for sur la strando.

“Bonege!” deklaris Garstang. “Tiuj ĉi popoloj eble estus kunulaj Gilfiganoj, kaj tiu ĉi vilaĝo la loko kie troviĝus la sanktejo! Ni aliru!”

Subukjul tamen timis. “Ĉu priscio de la sanktaj tekstoj povus esti penetrantaj tiom for?”

“Ni ege singardu,” diris Kugel. “Ni devas [gvatadi](#) kun granda zorgemo.” Kaj li gvidis lin laŭ kaŝa irejo tra arbaro el [tamarikoj](#) kaj larikoj, al loko de kie ili povis gvatadi malsupren al la vilaĝo. La kabanetoj konstruiĝis krude el nigra ŝtono kaj enloĝiĝis de popolo el feroĉa aspekto. Nigraj hararoj en spikoj ĉirkaŭis rondajn argil-kolorajn vizaĝojn; spikaj nigraj dikaj haregoj kreskadis de sur felaj ŝultroj kiel epoletoj. Dentegoj elstaris de la buŝoj de ambaŭ viroj kaj virinoj kaj ĉiuj interparolis per raŭkaj kriegoj. Kugel, Garstang kaj Subukjul tiris sin retron kun la pleja zorgemo, kaj kaŝite inter la arboj, diskutis per voĉoj mallaŭtaj. Garstang finfine malkuraĝiĝis kaj trovis nenion por ke li esperu. “Mi elĉerpiĝis, spirite kaj ankaŭ korpe; eble ĉi tie mi mortos.”

Subukjul rigardis norden. “Mi reiros por riski la sorton sur la Arĝenta Dezerto. Se ĉio bonus, mi alvenus refoje al Ertze-Damaĥo, aŭ eĉ al la Valo Folgeŭs.”

Garstang turniĝis al Kugel. “Kaj kion faros vi, ĉar la sanktejo de Gilfig estas nenie trovebla?”

Kugel fingre indikis al kajo kie kelke da boatoj alligiĝis. “Mi celas al Almerio, trans la Maro Songeno. Mi proponas, ke mi kaŝprenu boaton kaj veturi surmare okcidenten.”

“Mi do vin adiaŭas,” diris Subukjul. “Garstang, ĉu vi venos?”

Garstang kapneis. “Tro malproksimas. Mi certe mortus sur la dezerto. Mi transiros la maron kun Kugel kaj portu la Vortojn de Gilfig al la popolo de Almerio.”

“Adiaŭ, do, ankaŭ al vi,” kaj Subukjul turniĝis rapide por kaŝi la emocion sur sia vizaĝo kaj komencis foriri al la nordo. Kugel kaj Garstang rigardis la duran formon foriradi en la distanco kaj malaperi. Ili turniĝis al konsiderado pri la kajo. Garstang estis dubema. “La boato ŝajnas sufiĉe markapabla, sed ‘kaŝpreni’ estas ‘ŝteli’: ago specife malrekomendita de Gilfig.”

“Neniu problemo ekzistas,” diris Kugel. “Mi metos orajn monerojn sur la kajon, je kvanto egale valora je la boato.”

Garstang donis dubeman konsenton. “Kio do pri manĝaĵo kaj akvo?”

“Post havigi al ni la boaton, ni iros laŭ la marbordo ĝis ni povos akiri necesajojn, post kiam ni veturos surmare rekte okcidenten.”

Pri tio ĉi Garstang konsentis kaj la duopo ekokupis sin per gvatado de la boatoj, taksante unu kontraŭ alia. La fina elekto estis fortika afero longa je ĉirkaŭ dek aŭ dek du paŝoj, sufiĉe larĝa, kun eta [kajuto](#).

Je krepuskiĝo ili ŝteliris suben al la kajo. Ĉio estis kvietaj: la fiŝkaptistoj jam reiris al la vilaĝon. Garstang suriris la boaton kaj raportis ĉion en bona ordo. Kugel komencis malligi la ŝnurojn, kiam de la limo de la kajo venis sovaĝa elkrio kaj dekduo da la haraj vilaĝanoj venis peze alkurantaj.

“Ni perdiĝas!” kriis Kugel. “Kuru por la propra vivo, aŭ pli bone, naĝu!”

“Maleble!” deklaris Garstang. “Se tio ĉi estas la morto, mi renkontos ĝin kun tiom da digno kiom me eblas!” Kaj li grimpis supren al la kajo. Rapide ili ĉirkaŭiĝis de homoj el ĉiuj aĝoj, logitaj de la vigla bruo. Unu, pliaĝa estrarano de la vilaĝo, demandis en severa voĉo: “Kion faras vi ĉi tiel, ŝtelirante sur nia kajo, kaj pretigantaj ŝteli boaton?”

“Nia celo estas afero simplega,” diris Kugel. “Ni volas transiri la maron.”

“Kio?” muĝis la estrarano. “Kiel tio eblas? La boato portas nek manĝaĵon nek akvon, kaj malsufiĉe ekipiĝas. Kial vi ne venis al ni por ekspliki viajn bezonojn?”

Kugel palpebrumis kaj interŝanĝis rigardon kun Garstang. Li ŝultrolevis. “Mi parolos senkaŝe. Via aspekto kaŭzis al ni tian alarmon ke ni ne kuraĝis riski.”

La diraĵo instigis miksitan amuzon kaj surprizon inter la homamaso. La grupa parolisto diris: “Ni ĉiuj konfuziĝas; bonvolu ekspliki.”

“Nu,” diris Kugel. “Ĉu mi rajtas diri absolute senkaŝe?”

“Certe ja!”

“Kelkaj eroj de via aspekto [impresas](#) nin pri sovaĝeco kaj krueleco: viaj elstaraj dentegoj, la nigra kolhararo kio ĉirkaŭas viajn vizaĝojn, la kriegemo de via parolo — por nomi nur kelkajn aferojn.”

La vilaĝanoj ridis malkredeme. “Kia sensencaĵo!” ili kriis. “Niaj dentoj longas por ke ni povu ŝiri la duran viŝviandon per kiu ni subtenas vivadon. Ni portas niajn hararojn tiel por kontraŭadi certan specion de ofendega insekto, kaj pro tio, ke ni ĉiuj estas iomete surdaj, eble ni emas parolegi. Esence ni estas ĝentila kaj kompata popolo.”

“Precize tiel,” diris la maljuna estrarano, “kaj por montri ĉi tion, morgaŭ ni enŝarĝos nian plej bonan boaton kaj sendos vin for kun espero kaj bonvolo. Hodiaŭ nokte okazos bankedon honorigan pri vi!”

“Jen ĉi tie estas vilaĝo el vera sanktumo,” deklaris Garstang. “Ĉu vi estas, laŭ ajna hazardo, adorantoj de Gilfig?”

“Ne; ni riverencigas nin mem antaŭ la fiŝ-dio Job, kies bonefiko ŝajnas egali al ajna alia. Sed venu, lasu ke ni supreniros al la vilaĝo. Ni devas fari preparojn por la bankedo.”

Ili supreniris ŝtupojn tranĉitajn el la roko de la klifo, kio eliris al loko lumigita de dekduo flamantaj torĉoj. La estrarano indikis pri kabaneto iom pli larĝa ol la aliaj: “Jen kie vi trapasos la nokton; mi dormos aliloke.”

Garstang refoje instigiĝis pridiri la kompatemon de la fiŝkaptista popolo, je kio la estrarano klinis la kapon. “Ni provas akiri spiritan unuecon. Fakte, ni simboligas tiun ĉi idealon per la ĉefa manĝaĵo de niaj ceremoniaj bankedoj.” Li turniĝis, kunfrapis la manojn. “Lasu, ke ni preparos”

Granda kaldrono estis pendigita super tristango; ligna bloko kaj buĉ-hakilo aranĝiĝis, kaj nun ĉiu el la vilaĝanoj, marŝante preter la bloko, forhakis fingron kaj ĵetis ĝin en la potegon.

La estrarano eksplikis: “Per tiu ĉi simpla rito, en kio ni nature atendas ke vi partoprenu, ni montras nian komunan heredon kaj nian interdependecon. Venu, ni paŝu por eniri la vicon” Kaj Kugel kaj Garstang estis lasataj nenium elekton krom ke ambaŭ forigu fingron kaj ĵetu ĝin en la poton kun la aliaj.

La bankedo daŭris longe dum la nokto. Matene la vilaĝanoj plenumis sian promeson. Unu aparte markapabla boato doniĝis kaj estis provizata per necesajoj, inkluzive de manĝaĵo restanta de la antaŭnokta bankedo.

La vilaĝanoj amasiĝis sur la kajo. Kugel kaj Garstang diris pri sia dankemo, post Kugel hisis supren la velon kaj Garstang ĵetis for la kajoligajn ŝnurojn. Vento plenigis la velon, la boato moviĝis elen sur la faco de la Maro Songeno. Grade la landbordo unuiĝis kun la malklareco de distanco, kaj la du estis solaj, kun nur la nigra metala rebrilado de la akvo je ĉiuj flankoj.

Tagmeziĝis, kaj la boato movis en baze profunda malpleneco: akvo sube, aero supre; silento en ĉiuj direktoj. La posttagmezo estis longa kaj torpora, malverŝajna kiel sonĝo; kaj la melankolia majesteco de sunsubiro sekviĝis de krepusko el la koloro de akvigita vino.

Ŝajnis, ke la vento iom-post-iom plifortiĝis tra la tuta nokto dum ili vele glisadis okcidenten. Je sunleviĝo la vento mortis kaj kun veloj flagrantaj senefike ambaŭ Kugel kaj Garstang dormis.

Ok fojojn la ciklo ripetiĝis. Matene de la naŭa tago, malalta landborda linio vidiĝis antaŭe. Dum la meza posttagmezo ili stiris la pruan de ilia boato tra malforta ondoŝaŭmo supren sur larĝan blankan strandon. “Ĉu ĉi tie estas Almerio?” demandis Garstang.

“Tiel mi kredas,” diris Kugel, “sed pri kiu kvartalo mi malcertas. Arzenomej eble situas norde, okcidente aŭ sude. Se la arbaro tie estas tiu kio superkovras Orientan Almerion, estus pli saĝe, ke ni preterpasu je flanko, ĉar ĝi portas malbonaŭguran reputacion.”

Garstang fingre indikis laŭ la marbordo. “Atentu: alia vilaĝo. Se la popolo ĉi tie estas tiaj kiaj tiuj trans la maro, ili helpos al ni pri la nia vojo. Venu, ni iru informi pri niaj deziroj.”

Kugel detenis for. “Eble estus pli saĝe, ke ni gvatadu, kiel antaŭe.”

“Por kia celo?” demandis Garstang. “Je tiama okazo ni nur tiel nin mem misinformis kaj konfuzis.” Li antaŭiris gvide laŭ la strando cele al la vilaĝo. Alproksimiĝante ili povis vidi homojn

moviĝantaj trans la centra placo: facilmovaj or-haraj homoj, kiuj parolis inter si en voĉoj tiaj kia muziko. Garstang aliris ĝoje, atendante bonvenigon eĉ pli kortuŝan ol tiu kiun li ricevis ĉe la alia marbordo; sed la vilaĝanoj kuris antaŭen kaj ilin kaptis sub retoj. “Kial vi faras tion ĉi?” demandegis Garstang. “Ni estas nekonatoj kaj planas nenian malbonon!”

“Vi estas nekonatoj; ĝuste tiel,” diris la plej alta el la or-haraj vilaĝanoj. “Ni adoras tiun nedeturneblan dion kiu nomiĝas Dangot. Nekonatuloj estas laŭ difino aŭtomate herezuloj, kaj tial ni faras ke ili manĝiĝu de la sanktaj simioj.” Kaj dirinte tion ili komencis treni la retojn kun Kugel kaj Garstang trans la akraj ŝtonpecoj de la marbordo dum la belaj infanoj de la vilaĝo dancis ĝoje je ambaŭ flankoj.

Kugel sukcesis elpreni la tubon kiun li akiris de Vojnod kaj elblovis bluan koncentraĵon al la vilaĝanoj. Ŝoke surprizitaj, ili falis grunden kaj Kugel povis elbarakti sian eskapon el la reto. Tirante la glavon li saltis antaŭen kaj tranĉis por ke Garstang liberiĝu, sed nun la vilaĝanoj reordiĝis. Kugel refoje uzis sian tubon, kaj la vilaĝanoj forkuris en malĝojega dolorego.

“Iru Kugel,” diris Garstang. “Mi estas maljunulo, el malmulta vivforto. Eskape forkuru; serĉu sekuron, kun ĉiuj miaj bondeziroj.”

“Tio estus mia normala instinkto,” Kugel konfesis. “Sed tiuj ĉi homoj simulas min al idealismo preter ajna praktiko; do baraktu el la reton; ni retretos kune.” Refojeli ŝprucigis ŝokan doloron per la blua projekciaĵo, dum Garstang liberigis sin, kaj la paro forkuris laŭ la longo de la strando.

La vilaĝanoj ĉasis kun **harpunoj**. Ilia unua ĵeto penetris al Garstang tra la dorso. Li falis sen sono. Kugel eke turniĝis, cele direktis la tubon, sed la sorĉaĵo jam elĉerpiĝis, kaj nur blueta klaraĵo aperis. La vilaĝanoj tiris retroen la brakojn por ĵeti duan **salvon**; Kugel vokis malbenon, flankensaltis kaj ekkurbiĝis, kaj la harpunoj flugis preter li en la sablon de la strando. Kugel skuis la pugnon unu finan fojon, poste ekis sur la piedoj kaj forkuris en la arbaron.



Ĉapitro 6

La Kaverno en la Arbaro

Tra la Antikva Arbaro venis Kugel, ŝtelire paŝon post paŝo, paŭzante ofte por aŭskulte atendi la rompiĝon de branĉeto aŭ kvietan piedpaŝon aŭ eĉ la bloveton de elspiro. Lia zorgemo, kvankam ĝia malrapidigo de lia irado, estis nek hipoteza nek malpraktika; aliuloj travagadis la arbaron havantaj anksiojn kaj dezirojn ege kontraŭaj al liaj propraj. Tute tra iu terura krepusko li estis forkurinta kaj fine postlasinta paron da déodandoj; je alia okazo li devis eke haltii tuje ĉe rando de gresa senarbejeto kie staradis leŭkomorfo pripensanta: post kiam Kugel fariĝis eĉ pli avertema ol ĉiam antaŭe, ŝtelirante de arbo al arbo, observe kaj aŭskulte serĉema pri ĉio, ekkuranta kiel sago trans malplenaj lokoj kun la plej ege delikata paŝmaniero, kvazaŭ kontakto kun la grundo dolorigus al li la piedojn.

Meze je iu posttagmezo li venis al etan malsekan senarbejton ĉirkaŭitan de nigraj mádeŭro-arboj, altaj kaj tiel malbonaŭgure aspektaj kiel pastroj kapuĉe kapkaŝitaj. Kelke da ruĝaj lumstrioj oblikve penetrantaj la malplenejon lumigis solan torditan cidonian arbon, kie pendiĝis striaĵo da **pergameno**. Staranta for inter la ombroj Kugel studis la malplenejon longatempe, poste paŝanta antaŭen li prenis la pergamenon. En kramfaj literoj mesaĝo indikiĝis:

Zarejdiz la Saĝulo faras doneman oferton! Tiu, kiu trovas tiun ĉi mesaĝon, rajtas senpage postuli unu horon da bonjuĝa konsilado. Kaverno kondukanta en monteton situas proksime; la Saĝulo troveblas interne.

Kugel studis la pergamenon kiel puzlon. Granda demando pendis en la aero: Kial Zarejdis disdonus el sia trezoro da scioj kun tia senzorga malavaro? Aferoj ŝajne senpagaj malofte egalas la reklamon; laŭ iu kaŝita maniero aŭ alia la Leĝo de Ekvivalenco devas venki. Se Zarejdiz ofertus konsiladon — malatentante la pretendon de absoluta altruismo — li atendis gajni ion valoran: je minimumo pliigon de la memestimo, aŭ informon pri malproksimaj okazaĵoj, aŭ ĝentilan laŭdiradon de poemego, aŭ tiele similan servadon. Kaj Kugel relegis la mesaĝon, lia pridubo kreskanta. Li estus forĵetanta la pergamenon al flanko se ne estus, ke li sentis veran kaj tujan bezonegon por havi informon: specifan scion pri la plej sekura vojo al la domo de Iŭkoŭnu, kune kun rimedo por senhelpigi la Ridantan Magiiston.

Kugel rigardis ĉiudirekte, serĉante la monteton referencitan de Zarejdiz. Trans la senarbejo la grundo ŝajnis plialtiĝi, kaj levante la okulojn Kugel atentis pri tordaj branĉoj alte situataj, kvazaŭ kelkaj dáobadoj kreskis sur alta grundo.

Kun maksimuma singardemo Kugel antaŭiris tra la arbaro, kaj baldaŭ haltiis pro subita suprenpuŝaĵo el griza roko kronita de arboj kaj vinoj: sendube la monteto citita.

Kugel staris tirante al si la mentonon, montrante la dentojn en grimaco de dubemo. Li aŭskultis: kvieto, tuta kaj plena. Restante inter la ombroj li pluiris ĉirkaŭ la monteton, kaj post nelonge trovis la kaverton: arka truo kondukanta en la rokon, alta tiom kiel homo, kaj larĝa kiom liaj etenditaj brakoj. Supere pendis ŝildo surskribita en malnetaj literoj:

ENIRU: ĈUIJ BONVENAS!

Kugel rigardis iun direkton kaj alian. Nenia vidaĵo aŭ aŭdaĵo estis en la arbaro. Li faris kelkajn zorgajn paŝojn antaŭen, strebe enrigardis la kavernon, por trovi nur mallumecon.

Kugel paŝis retroen. Spite al la afabla urĝeco de la ŝildo, li sentis nenian inklinon por puŝi sin antaŭen, kaj kurbiĝante por kaŭri li rigardadis intense al la kaverno.

Dek kvin minutoj pasis. Kugel ŝanĝetis la pozon; kaj nun, je dekstre, li ekvidis viron alproksimiĝantan, movantan per zorgemo apenaŭ malpli ĉio-rimeda ol lia propra. La nova venanto estis el meza staturo kaj portis la krudajn vestojn de kamparano: griza pantalone, rust-kolora ĉemizo, klina bruna ĉapelo kun la antaŭrando puŝita suben. Li havis rondan, iom maldelikatan vizaĝon, kun nazo arbostump-forma, malgrandaj okuloj tre aparte lokitaj, peza mentono sternita de brun-griza kreskaĵo nerazita. Tenata en lia mano estis pergamenajo tia kian Kugel jam trovis.

Kugel malrapide stariĝis. La nov-alveninto haltiis, poste venis antaŭen. “Vi estas Zarejdiz? Se jes, konu min por esti Fabeln la drog-hebisto; mi serĉas riĉan kampeton da sovaĝaj aliumoj. Plue, mia filino sopirumas kaj ripozemas kaj ne plu portas la dorso-korbon; do —”

Kugel levis la manon. “Vi eraras; Zarejdiz restas en sia kaverno.”

Fabeln fermetis la okulojn ruzopense. “Kiu do estas vi?”

“Mi estas Kugel: kiel vi, serĉanto de enlumiĝo.”

Fabeln kapjesis plenkomprenane. “Ĉu vi jam konsultis al Zarejdiz? Ĉu li ĝustas kaj fidindas? Ĉu li postulas nenian prezon kiel ŝajne diras lia reklamo?”

“Prave, en ĉiu detalo,” diris Kugel. “Zarejdiz, kiu ŝajne ĉionscias, parolas el la pura ĝojo pri transdonado de informoj. Miaj perpleksaĵoj jam solviĝis.”

Fabeln studis lin flankrigarde. “Kial do vi atendadas apud la kaverno?”

“Ankaŭ mi estas drogherbisto, kaj mi elpensas novajn demandojn, specife pri proksima senarbejo plena de sovaĝaj aliumoj.”

“Ĉu vere!” diregis Fabeln, klakante la fingrojn agacite. “Elpensu zorge, kaj dum vi aranĝas viajn frazojn, mi paŝos internen kaj demandas teme pri la laceco de mia filino.”

“Laŭ via volo,” diris Kugel. “Tamen, se vi volas prokrasti, mi bezonas nur malmultan tempon por aranĝi miajn demandojn.”

Fabeln faris geston de bonkoreco. “En tia mallonga intertempo, mi jam estos enirinta la kavernon, elirinta kaj jam for, ĉar mi estas viro el rapidemo borda je hasto.”

Kugel riverencis. “Tiukaze, iru nun.”

“Mi estos rapida.” Kaj Fabeln marŝis en la kavernon. “Zarejdiz?” li vokis. “Kie Zarejdiz la Saĝulo? Mi estas Fabeln; mi volas meti certajn pridemandojn? Bonvolu elveni!” Lia voĉo grade mufligis. Kugel, aŭskultante zorge, aŭdis la malfermiĝon kaj fermiĝon de pordo, kaj poste estis silento. Pensoplene li komfortigis sin por atendi.

Minutoj trapasis, kaj horo. La ruĝa suno subenmoviĝis en la posttagmeza ĉielo kaj pasis malantaŭ la monteto. Kugel maltrankviliĝetis. Kie Fabeln? Li klinis la kapon: ĉu refoje la sono de pordo malfermiĝanta kaj fermiĝanta? Ja vere, kaj jen Fabeln: ĉio do estis bone!

Fabeln rigardis el la kavernon. “Kie estas Kugel la drogherbisto?” Li parolis en raŭka, malpacienca voĉo. “Zarejdiz rifuzas sidiĝi ĉe la bankedo nek pridiskuti aliumojn, krom en la plej ĝeneralaj terminoj, ĝis post vi prezentos vin.”

“Bankedo?” demandis Kugel kun ekintereso. “Ĉu la donemo de Zarejdiz etendiĝas tiom multe?”

“Ja vere: ĉu vi ne notis la halon da murtapiŝoj, la tranĉe skulptitajn pokalojn, la arĝentan bovlegon?” Fabeln parolis kun ia saturna emfazo kiu konfuzis Kugel-on. “Sed venu; mi malpacienas, kaj ne volas atendi. Se vi jam manĝis, mi tion informos al Zarejdiz.”

“Tute ne,” diris Kugel, kun digneco. “La humiligo vundus min brule, se mi estus tiel malhonorinta al Zarejdiz. Gvidu antaŭen; mi postsekvos.”

“Venu do.” Fabeln turniĝis; Kugel sekvis lin en la kavernon, kie liaj naztruoĵoj ekofendiĝis pro naŭza odoro. Li paŭzis. “Ŝajne mi detektas fiodoron — ion kiu afektas min malplaĉe.”

“Mi detektis la saman,” diris Fabeln. “Sed trapasonte la pardon tiu fiodoro ĉesos!”

“Mi fidas je tio,” diris Kugel malagrabla. “Ĝi detruus al mi la apetiton. Kien do —”

Dum li parolis, eka svarmo de etaj rapidaj korpoj sursaltis lin, malseketaj je haŭto kaj difektitaj per la odoro kiun li trovis tiom ege malplaĉa. Estis konfuza sonaro el alt-piĉaj voĉoj; lia glavo kaj zonsako fortiriĝis; pordo malfermiĝis; Kugel ĵetiĝis en malaltplafonan tunelon. En lumo de flagranta flava flamo li vidis liajn kaptintojn: kreituloj el alteco duone lia propra, palaj je haŭto, pintaj je vizaĝo, kun oreloj sur supro de la kapo. Ili paŝadis kun iometa antaŭklina kurbiĝo, kaj iliaj genuoj artikis renverse je tiu direkto kutima inter veraj homoj, kaj iliaj piedoj, en sandaloj, ŝajnis esti molaj kaj supraj.

Kugel rigardis ĉirkaŭen konfuzite. Apude kaŭris Fabeln, rigardanta lin kun malamego miksita kun malica memplaĉo. Kugel vidis nun ke metala bando ĉirkaŭis la kolon de Fabeln, al kiu fiksiĝis longa metala ĉeno. Ĉe la fora ekstremo de la fosita ĉambro kaŭre sidis maljuna viro kun longaj blankaj haroj, same ligita per kolringo kaj ĉeno. Eĉ dum Kugel rigardis ĉirkaŭ si, la ratuloj klape fermis ringon ĉirkaŭ lian propran kolon. “Haltu!” eksklamis Kugel en konsterniĝo. “Kion vi intencas fari tiel ĉi? Mi malŝategas tian pritraktadon!”

La ratuloj puŝegis al li kaj kuris for. Kugel vidis, ke longaj skvamaj vostoĵoj pendis de iliaj pintformaj postaĵoj, kiuj elstaris atentinde el la nigraj ĉemizegoj kiujn ili portis.

La pordo malfermiĝis; la tri homoj estis solaj.

Kugel turniĝis kolere al Fabeln. “Vi trompis min; vi kondukis min al kaptiĝon! Tio ĉi estas serioza ofendo!”

Fabeln eligis amaran ridon. “Ne malpli serioza ol la trompo kion vi praktikis kontraŭ mi. Per via fripona agaĉo, mi kaptiĝis; mi tial certigis, ke vi ne eskapu.”

“Tio ĉi estas malhoma malico!” muĝis Kugel. “Mi certigos, ke vi ricevu decan repagon!”

“Ba,” diris Fabeln. “Ne agacu min per viaj plendoj. Ĉiuokaze, mi ne logis vin en la kavernon pro nura malico.”

“Ĉu ne? Ĉu vi havas pluan **perversan** motivon?”

“Estas simple: la ratuloj estas ja ruzaj! Kiu ajn logus du aliajn en la kavernon gajnus sian liberecon. Vi nombriĝas kiel unu atingon en mia konto; mi bezonas produkti duan kaj mi liberiĝos. Ĉu ne prave, Zarejdiz?”

“Nur en larĝa senco,” respondis la maljunulo. “Vi ne rajtas nombri tiun ĉi viron inter viaj kontaĵoj; se justeco estus absoluta ambaŭ vi kaj li plenumus mian konton; ĉu ne miaj pergamentoj logis vin ambaŭ al la kaverno?”

“Sed ne internen!” deklaris Fabeln. “Jen situas la delikata interdistingo kiu devas decidiĝi! La ratuloj kunsentas, kaj tial vi ne liberiĝis.”

“Ĉi kaze,” diris Kugel, “mi tial asertas posedon de vi kiel gajno en mia konto, ĉar mi sendis vin en la kavernon por testi la cirkonstancojn tie alfrontotajn.”

Fabeln ŝultrolevis. “Ĉi tio estas afero kion vi devas disputi kun la ratuloj.” Li malridetis kaj palpebrumigis siajn etajn okulojn. “Kial mi ne asertu, ke mi mem nombriĝu kontraŭ la konto propra? Tio estas argumento asertinda.”

“Ne tiel, ne tiel,” soniĝis altpiĉa voĉo de malantaŭ la kadro. “Ni nombras nur tiujn gajnojn provizitajn post **konfiskiĝo**. Fabeln nombriĝas kontraŭ nenies konto. Li tamen juĝiĝis por havi unu gajnon: nome, la persono Kugel. La sumo de Zarejdiz nombriĝas je nulo.”

Kugel palpis la kolringon ĉirkaŭ la kolo. “Kio do, se ni malsukcesas provizi du gajnojn?”

“Unu monato estas via daŭro; ne pli. Se vi malsukcesus dum tiu tempopaso, vi elvoriĝus.”

Fabeln parolis en voĉo de **sobra** kalkulado. “Mi kredas ke mi jam preskaŭ liberiĝas. Malproksima je neniu granda distanco atendadas la filino. Ŝi jam subite malpacientiĝis pri sovaĝaj aliumoj kaj pro tio senvaloras en mia domo. Decas, ke per ŝia agado mi estu liberigata.” Kaj Fabeln kapjesadis kun peza memplaĉeco.

“Estus interese, ke mi rigardu viajn metodojn,” Kugel rimarkis. “Kie precize ŝi estu trovebla kaj kiel ŝi estu alvokata?”

La esprimo de Fabeln fariĝis kaj ruza kaj disputema. “Mi diros al vi nenion! Se vi volas nombri gajnojn, elpensu la rimedon mem!”

Pro malplaĉito kaj malestimo, Kugel turniĝis al Zarejdiz. “Kaj kio estas la bazo de via metodo?”

Zarejdiz mangestis al tabulo sur kio kuŝis strioj de pergamento. “Mi ligas persvadajn mesaĝojn al flugilohavaj semoj, kiu poste liberiĝas en la arbaro. La metodo estas el priduba utileco, logante preterpasantojn al la buŝo de la kaverno, sed persvadante ilin ne pli antaŭen. Mi timas, ke mi havas nur kvin tagojn por vivadi. Se mi nur havus miajn libraĵojn, miajn skrib-foliojn, miajn labor-librojn!

Kiajn sorĉojn, kiajn sorĉojn! Mi ege distirus tiun ĉi fositan tunelaron ek de unu ekstremo ĝis la alia; mi ŝanĝus ĉiun el tiuj hom-**ronĝuloj** al brulaĵo el verda fajro. Mi punus al Fabeln repage pro tio, ke li ruze trompŝtelis de mi ... Hm. Ĉu la Girigilo? Ĉu eble la Suferiga Jukado de Lugŭajlro?"

“La Ŝorĉo de Senespera Encistigo havas siajn proponantojn,” sugestis Kugel.

Zarejdis kapjesis. “La ideo havas multon por esti rekomendata ... Sed tiu ĉi estas senespera sopiro: miaj sorĉoj fortiriĝis kaj forportiĝis al iu sekreta loko.”

Fabeln ekronkis kaj turniĝis flanken. De malantaŭ la kadro aŭdiĝis akre altpiĉa admono: “Bedaŭroj kaj **ekskuzoj** estas malbonaj anstataŭaĵoj por gajnoj kontraŭ via ŝuldo. Agu kiel Fabeln! Jam li fanfaronas pri unu gajno kaj planas duan por la morgaŭo. Jen tia tipo kian ni prefere kaptas!”

“Mi kaptis lin!” asertis Kugel. “Ĉu vi ne havas juĝokapablon? Mi sendis lin en la kavernon; decas pri li, ke oni **kreditu** mian konton!”

Zarejdis kriegis koleran proteston. “Neniel tio! Kugel distordas la kazon! Se pura justeco estus farata, ambaŭ Kugel kaj Fabeln nombrus kredite al mia konto!”

“Ĉio estas kiel antaŭe!” eldiris la altpiĉa voĉo.

Zarejdis ĵetis supren la manojn kaj rekomencis skribi pergamenaĵojn kun furioza atentego. Fabeln kurbe sidiĝis sur **skabelon** kaj sidadis en kalma pripensado. Kugel, rampanta preter li, piede forbatis skabelan kruron kaj Fabeln falis al la planko. Li stariĝis, risortis al Kugel, kiu ĵetis la skabelon al li.

“Ordon!” vokiĝis la altpiĉa voĉo. “Ordo estiĝus aŭ punoj trudiĝos!”

“Kugel malstabiligis la skabelon, por rule faligi min,” plendis Fabeln. “Kial li ne puniĝas?”

“Estis nur la plej hazarda misokazo,” insistis Kugel. “Miaopinie, la kolerema Fabeln meritas esti metata en senkomunan ĉambron, por almenaŭ du, aŭ pli dece, tri semajnoj.”

Fabeln komencis kraĉe parolumi, sed la altpiĉa voĉo malantaŭ la kadro postulis pri silento de ĉiuj.

Manĝaĵo baldaŭ alportiĝis, telero da kaĉo ofende odora. Post la manĝo ĉiuj devis rampi tra strikta tunel-labirinto ĉe iome pli malata nivelo, kie li kateniĝis ĉene al la muro. Kugel senkonsciigis en malfacila dormado, el kio li poste vekiĝis pro traporda voko al Fabeln; “La mesaĝo alportiĝis — ĝi legiĝis kun multa atento.”

“Bona novaĵo!” respondis la voĉo de Fabeln. “Morgaŭ mi povos trapaŝadi la arbaron kiel libera viro!”

“Silenton!,” grakis Zarejdis el la mallumo. “Ĉu mi devas tage skribi pergamenojn por ĉies bono krom mia propra, nur por kuŝi sendorme je noktoj pro via fia fanfaronado?”

“Ha ha!” gorĝe ridis Fabeln. “Aŭdu la voĉon de la senefika sorĉisto!”

“Sopire pro miaj perditaj libroj!” ĝemis Zarejdis. “Vi estus kantanta malsaman melodion!”

“En kiu kvartalo oni ilin trovu?” demandis Kugel zorge.

“Pri tio, vi devas demandi tiujn ĉi fiodorajn múridae-ulojn; ili ekkaptis min senatentan.”

Fabeln levis la kapon por plendi. “Ĉu vi planas interŝanĝi rememoraĵojn tra la tuta nokto? Mi volas dormi.”

Zarejdiz, kolerega, komencis riproĉi al Falben en tiel atakema maniero, ke la ratuloj ekkuris en la tunelon kaj trenis lin for, lasante ke Kugel kaj Fabeln restis solaj.

Je la manteno Fabeln manĝis sian kaĉon kun granda rapido. “Nu do,” li vokis al la kadro, “malligu tiun ĉi kolringon, por ke mi eliru por voki la duan el miaj gajnoj, Kugel estante la unua.”

“Ba,” murmuris Kugel. “Fifame!”

La ratuloj, neniom atentante la protestojn de Fabeln, ĝustigis la kolringon eĉ pli strikte ĉirkaŭ lia kolo, almetis ĉenon kaj fortiris lin rampe sur manoj kaj genuoj, kaj Kugel lasiĝis sola.

Li provis sidiĝi rekte, sed la malseka humo premis kontraŭ lia kolo, kaj li kurbiĝis suben por apogi sin surkubute. “Malbenitaj ratuloj! Iel mi devas eviti ilin! Malsame de Fabeln, mi havas nenian domhomaron ellogeblan, kaj la efikeco de la pergamenoj de Zarejdiz estas dubinda ... Konjekteble, tamen, aliaj povas preterpasi proksime, en la sama maniero kiel Fabeln kaj mi.” Li turniĝis al la kadro, malantaŭ kio sidadis atent-okula observisto. “Por ke mi logu la necesajn du gajnaĵojn, mi volas atendi ekster la kaverno.”

“Tio permesiĝas,” anoncis la observisto. “Kontrolado, kompreneble, devas esti rigora.”

“Kontrolado estas komprenebla,” konsentis Kugel. “Mi petas, tamen, ke la ĉeno kaj kolringo estu forprenitaj de mia kolo. Kun kontrolilo tiom memevidenta, eĉ la plej facile trompebla ulo certe turniĝos for.”

“Estas io en tio, kion vi diras,” agnoskis la observisto. “Sed kio ekzistus por obstakli vin de forkuro?”

Kugel sonigis iom streban ridon. “Ĉu mi aspektas kiel homo kiu rompus fidaĵon? Krome, kial mi faru tion, kiam mi povas facile allogi gajnon post gajno por mia konto?”

“Ni faros certajn ĝustigojn.” Momenton poste kelkaj el la ratuloj svarmis en la tunelon. La kolringo malstriktiĝis de ĉirkaŭ la kolo de Kugel, lia dekstra gambo ekteniĝis kaj arĝenta stangeto martele frapiĝis tra lia kalkano, al kiu, dum Kugel elkriis pro doloro, ĉeno sekuriĝis .

“La ĉeno nun estas ne atentovoka,” deklaris unu el liaj kaptistoj. “Vi povas nun stari antaŭ la kaverno kaj logi preterpasantojn tiel, kiel ajn vi povas.”

Ankoraŭ ĝemante en dolorado Kugel rampis supren tra la labirinto kaj en la kaverno-buŝon, kie Fabeln sidis, ĉeno ĉirkaŭ lia kolo, atendante la alvenon de sia filino. “Kien vi iras?” li demandis suspekteme.

“Mi iras por paŝadi antaŭ la kaverno, por enlogi preterpasantojn kaj direkti, ke ili eniru internen!”

Fablen sonigis maldolĉan grunton, kaj elrigardis for tra la arbaroj.

Kugel iris por stari antaŭ la kaverno-buŝo. Li rigardis ĉiujn direktojn, poste sonigis melodian vokon. “Ĉu iu paŝadas proksime?”

Li ricevis neniun respondon, kaj komencis paŝadi ien kaj reen, la ĉeno tintante sur la grundo.

Moviĝado tra la arboj: la flagretado de flava kaj verda ŝtofo, kaj jen venis la filino de Fabeln, portante korbon kaj hakilon. Je ekvido de Kugel ŝi paŭzis, post tio heziteme alproksimiĝis. “Mi serĉas Fabeln, kiu petis specifajn aferojn.”

“Mi akceptos ilin,” diris Kugel, etendante manon por la hakilo, sed la ratuloj atentis kaj tiregis lin rapide retroen en la kavernon. “Ŝi devas meti la hakilon sur tiun foran ŝtonon,” ili siblis en la orelon de Kugel. “Iru elen kaj tiel informu ŝin.”

Kugel lamis elen refoje. La knabino rigardis lin konfuzite. “Kial vi saltegis retroen en tiu maniero?”

“Mi diros tion al vi,” diris Kugel, “kaj ĝi estas plua stranga afero, sed unue vi devas meti viajn korbon kaj hakilon sur tiun ŝtonon, kie la vera Fabeln baldaŭ alvenos.”

El la kaverna interno venis murmuro de kolera protesto, rapide sufokita.

“Kio estis tiu sono?” demandis la knabino.

“Faru tion per la hakilo, kiel mi ordonis, kaj mi sciigos ĉion.”

La knabino, konfuzita, prenis la hakilon kaj korbon al la loko designita, poste revenis. “Nu, kie estas Fabeln?”

“Fabeln mortis,” diris Kugel. “Lian korpon nun posedas malica spirito; ne surbaze de ajna kialo obeu ĝin: jen mia averto.”

Je tiu ĉi Fabeln eligis grandegan muĝon, kaj vokis el la kavernon. “Li mensogas, li mensogas. Venu tien ĉi, en la kavernon!”

Kugel tenis supren la manon haltsigne. “Neniel. Estu singarda!”

La knabino fiksrigardis en miro kaj timo al la kaverno kie nun Fabeln aperis, farante plej sincer-ŝajnajn gestegojn. La knabino paŝis retroen. “Venu, venu!” kriis Fabeln. “Eniru la kavernon!”

La knabino kapneis, kaj Fabeln en furiozeco provis detiri mallige sian ĉenon. La ratuloj trenis lin haste retroen en la ombrojn, kie Fabeln baraktis tiom vigle, ke la ratuloj necese devis mortigi lin kaj treni lian korpon for en la labirinton.

Kugel aŭskultis atente, poste turniĝis al la knabino kaj kapjesis. “Ĉio nun bonas. Fabeln lasis kelkajn valorajojn en mia prizorgado; se vi volas paŝadi en la kavernon, mi transdonos ilin al vi.”

La knabino neis kape en konfuziĝo. “Fabeln posedis nenion valoran!”

“Bonvolu inspekti la objektojn.” Kugel ĝentilege gestis, ke ŝi eniru la kavernon. Ŝi paŝis

antaŭen, rigardegis internen, de kie la ratuloj ektenis ŝin kaj tiris ŝin malsupren en la labirinton.

“Jen gajno unua kontraŭ mia konto,” diris Kugel internen. “Ne forgesu registri tion!”

“La nombriĝo merite registriĝis,” venis voĉo de interne. “Unu plue tia kaj vi liberiĝos.”

La restaĵon de la tago Kugel paŝadis tien kaj reen antaŭ la kaverno, rigardante al iu direkto kaj alia inter la arboj, sed vidis neniun. Je noktiĝo li tiriĝis reen en la labirinton kaj karceriĝis en la sama malaltnivela tunel-ĉambro kie li jam trapasis la antaŭan nokton. Nun ĝi okupiĝis de la filino de Fabeln. Nuda, [kontuzita](#), la okuloj esprimantaj nenion, ŝi rigardadis fikse al li. Kugel provis interŝanĝon de konversacio, sed ŝi ŝajnis senkapabla pri parolado.

La vespermanĝa kaĉo serviĝis. Dum Kugel manĝis, li rigardis la knabinon kaŝe. Ŝi estis neniel malloga, kvankam nun disordigita kaj kote ŝmirita. Kugel rampis proksimen, sed nun la odoro de la ratuloj tiom fortis ke lia volupto malpliĝis, kaj li tiris sin retroen.

Dum la nokto okazis kaŝa sono en la labirinto: skrapa, grata, grinca sono. Kugel, palpebrumanta dormete, levis sin sur kubuto, por vidi sekcion de la planko kliniĝi supren, lasante ke eksudo de fuma flava lumo strii sur la knabinon. Kugel elkriis; en la labirinton rapidis fremdaj ratuloj portantaj [tridentojn](#), sed li malfruis: la knabino jam ŝteliĝis.

La ĉilokaj ratuloj tre ege koleris. Ili levis la ŝtonon, kriegis malbenojn kaj blasfemojn en la truon. Aliaj aperis, portantaj sitelojn da fiodoraĵo, kaj tiujn ĉi ili elverŝis en la truon, kun plua insultegado. Unu ofendite eksplikis al Kugel. “Aliaj estuloj loĝas malsupre; ili trompŝtelas de ni je ĉiu oportuno. Iun tagon ni elprenos venĝon; nia pacienco ne estas neelĉerpebla! Ĉi tiun nokton vi devas dormi aliloke, kontraŭ ke ili provu pluan trudon.” Li malstriktigis la ĉenon de Kugel, sed nun li vokiĝis al tiuj kiuj glue fermadis la truon en la planko.

Kugel moviĝis kviete al la enirejo, kaj kiam la atento de ĉiuj distriĝis, li glitis elen en la pasaĝejon. Preninte supren la ĉenon, li rampis laŭ tiu direkto kiun li kredis kondukanta al la surfaco, sed trovante flankan pasaĝejon li konfuziĝis. La tunelo kliniĝis malsupren kaj, fariĝante mallarĝa, striktiĝis al liaj ŝultroj; poste ĝi malaltiĝis, premante malsupren de la plafono tiel, ke li devis movi verme antaŭen, tiranta sin per la kubutoj.

Lia foresto ekatentiĝis; de malantaŭe soniĝis grinc-krioj de kolerego, dume la ratuloj hastis ien kaj tien.

La tunelo faris akre tordan turniĝon, je kruta angulo laŭ kiu Kugel trovis sin malkapabla tordi la korpon. Movante verme kaj eke, li enpremis sin en novan korpo-teniĝon, kaj nun li ne povis moviĝi. Li elspiris kaj kun la okuloj ŝvelantaj de la kapo, li ekpuŝegis sin ien kaj supren, kaj trenis sin en koridoraĵon malpli striktan. En galerieto li trovis fajro-globon, kion li portis kun si.

La ratuloj alvenadis pliproksimen, kriegantaj ordonegojn. Kugel puŝis sin en flank-koridoraĵon kiu malfermiĝis al stoko-ĉambro. La unuaj objektoj renkontitaj de liaj okuloj estis sia glavo kaj monsaketo.

La ratuloj kuris amase en la ĉambrom kun tridentoj. Kugel hakis kaj tranĉis kaj pelis ilin grinckriante retroen al la ekstera koridoro. Ĉi tie ili amasiĝis, irantaj eke ien kaj tien, vokante altpiĉajn minacojn internen al Kugel. Foje unu ekkuris antaŭen por montri morde la dentojn kaj svingpuŝi sian tridenton, sed post kiam Kugel mortigis du el tiuj ĉi, ili retroiris malantaŭen por

interkonsulti en malaltaj tonoj.

Dum la paŭzeto, Kugel okupis sin puŝante kelkajn pezajn ŝrankojn kontraŭ la enirejo, tiel gajnante por si momenton por ripozeti.

La ratuloj premis antaŭen, piedbatis kaj ŝovis. Kugel puŝis sian glavon tra interspaco, eligante dolorkrion de intensa malkomforto.

Unu parolis: “Kugel, elvenu! Ni estas kompata popolo kaj tenas nenian malicon. Vi havas unu gajnon kontraŭ via ŝuldo, kaj baldaŭ sendube akiros pluan, kaj tiel liberiĝos. Kial vi malkonvenigu nin ĉiujn? Ne ekzistas kialo, en esence malkonvena interrilato, ke ni ne adoptu sintenon kamaradan. Elvenu, do, kaj ni provizos viandon por via matena kaĉo.”

Kugel parolis ĝentile. “Ĉimomente mi tro maltrankvilas por pensi klare. Ĉu mi aŭdis, ke vi planas liberigi min sen plua ŝuldo aŭ malfacileco?”

Okazis flustra konversacio en la koridoro, poste venis la respondo. “Estis ja dirado tiele efika. Nun deklariĝas, ke vi estas libera, do venu kaj iru laŭ via volo. Malobstakligu la enirejon, ĵetu suben vian glavon, kaj elvenu!”

“Kian garantion vi povas oferti al mi?” demandis Kugel, aŭskultante atentege ĉe la blokita enirejo.

Estis altpiĉaj *ĉit-ĉit*-sonaj flustroj, poste venis la respondo: “Neniu garantio necesas. Ni nun foriras por ripozi. Elvenu, trapaŝadu la koridoron al via libereco.”

Kugel faris nenian respondon. Tenante alte la fajro-globon li turniĝis por inspekti la stoko-ĉambron, kiu entenis grandan stokon da ekzempleroj da vestoj, armiloj, iloj. En tiu ujo, kiun li jam puŝis kontraŭ la enirejo li atentiĝis pri aro da lede-binditaj libroj. Sur la fronto de la unua estis:

ZAREJDIZ LA SORĈISTO

Lia Labor-libro: Memgardu!

La ratuloj vokis fojon plu, en mildaj voĉoj: “Kugel, kara Kugel: kial vi ne jam elvenis?”

“Mi ripozas; Mi regajnas la forton,” diris Kugel. Li elprenis la libron, turnis la paĝojn, trovis indekson.

“Elvenu Kugel!” soniĝis la ordono, iom pli emfaza. “Ni havas ĉe ni poton da malsaniga vaporo kion ni planas eligi en la ĉambron kie vi tiom insistege soligas vin. Elvenu, aŭ cirkonstancoj estos pli malbonaj ĉe vi!”

“Paciencon,” respondis Kugel. “Lasu al mi tempon por ke mi ordigu la intelekterojn!”

“Dum vi ordigas viajn intelekterojn ni pretigas la poton da acido en kion ni planas subsurfacigi vian kapon.”

“Juste tiel, juste tiel,” diris Kugel senatente, atenta pri la labor-libro. Estis skrapa sono kaj tubo puŝiĝis en la ĉambron. Kugel ektenis la tubon, tordis ĝin por ke ĝi celas retroen en la koridoron.

“Parolu, Kugel!” venis la portentoplena ordo. “Ĉu vi elvenos, aŭ ĉu ni sendu grandan blovaĵon da toksa gaso en la ĉambron?”

“Al vi mankas tiu kapablo,” diris Kugel. “Mi rifuzas elveni.”

“Vi spertos la veron! Lasu, ke la gaso eksudi!”

La tubo pulsas kaj siblis; el la koridoro soniĝis krio de vasta dolora surprizo. La siblado ĉesis.

Kugel, ne trovinte tion kion li serĉis en la labor-tablo, eltiris libregon. Tiu ĉi portis la titolon:

ZARREJDIZ LA SORĈISTO

Lia Kolektego da Sorĉoj

~Memgardu!~

Kugel malfermis kaj legis; trovante aplikeblan sorĉon li tenis la fajro-globon proksime por ke ĝi pli bone lumigu la aktivigajn silabojn. Estis kvar linioj da vortoj, tridek unu silaboj entue. Kugel puŝegis ilin en sian cerbon, kie ili pezis tiel kiel ŝtonoj.


Ĉu estis sono malantaŭ li? En la ĉambron tra alia portalo venis ratuloj. Kurbiĝante malalte, blankaj vizaĝoj eke spasmantaj, oreloj platigitaj, ili ŝteliradis antaŭen, tridentoj tenataj horizontale.

Kugel minacis ilin per sia glavo, poste ĉantis tiun sorĉon kiu koniĝas kiel la Interno Eligita kaj Renversita, dum la ratuloj rigardegis konsternitaj. Okazis grandega distira sono: konvulsa leviĝo kaj tordiĝo dum la trapasejoj dislokiĝis, ŝpruce verŝantaj ĉion tra la arbaro. Ratuloj kuris grincosone kriegantaj tien kaj reen, kaj ankaŭ estis kurantaj blankaj estuloj kies naturo Kugel ne povis distingi per stellumo. Ratuloj kaj la bankuloj tene interbatalis kaj vundis feroce per ungoj unu la alian, kaj la arbaro pleniĝis de minaca dentomontrado kaj mordado, akraj dolorkrioj kaj etaj voĉoj elkriantaj.

Kugel moviĝis kviete for, kaj en mirtela densejo atendis finiĝon de la nokto.

Kiam sunleviĝo alvenis li reiris singarde al la monteto, esperante ke li ekposedu la sorĉaron kaj labor-libron de Zarejdiz. Estis multa rubaĵo, kaj multaj etaj kadavroj, sed la objektoj kiujn li deziris nenie troveblis. Bedaŭroplene Kugel turniĝis for kaj baldaŭ renkontis la filinon de Fabeln sidantan inter la [filikoj](#). Kiam li proksimiĝis, ŝi grincetis al li. Kugel kunpremis la lipojn, kapneis malaprobe. Li kondukis ŝin al proksima rivereto kaj provis lavi ŝin, sed je la unua oportuno ŝi tiris sin for kaj kaŝis sin sub roko.





Ĉapitro 7

La Domego de Iŭkoŭnu

La sorĉo estis la ‘Interno Eligita kaj Renversita’, tiom antikva ke ĝia deveno forgesiĝis. Iu nekonata Nubo-rajdisto el la Dudek Unua Epoko konstruis antikvan version; la duon-legenda magiisto Basil Nigrareto malakrigis ĝiajn konturojn, prilaborado daŭrigita de Veronifro la Milda kiu aldonis plifortigan resonadon. Arĥmando de Glaerio priskribis dek kvar el ĝiaj tordsilaboj; Fandeaŭ surlistigis ĝin en la ‘A’, aŭ ‘Perfektitaj’ kategorio en sia famega katalogego. En tiu ĉi maniero ĝi jam atingis la labor-tablon de Zarejdiz la Saĝulo, kie Kugel, enkarcerita sub monteto, trovis ĝin kaj elparolis ĝin aktive.

La rezultoj estas el drama efikego. La monteto disĵetis siajn enhavojn, disigante la **hamstradan** amasegaĵon de tiu ronĝula raso loĝanta sube; poste, elpuŝigante kaj reordigante, reformis ĝin laŭ la ekstera konturo originala.

Traserĉante la multevarian rubaĵon Kugel trovis objektojn el ĉiu tipo: vestoj malnovaj kaj novaj; ĉemizegoj, veŝtoj kaj manteloj; antikvaj senmanikaj ĉemizegoj; pantalonoj sonorilformaj laŭ la modo de Kaŭĉikŭo, aŭ **franĝ-** kaj **kvast-**havaj laŭ la modo de Malnova Romarĥo, aŭ **pigaj** kaj triangule tonditaj laŭ la ekstreme ornama Andrómaha modo. Estis botoj kaj sandaloj kaj ĉapeloj el ĉiu dezajno: plumoj, plumaroj, emblemoj kaj krestoj; malnovaj iloj kaj rompitaĵoj armiloj; pendornamaĵoj kaj ornametoj; koroditaj **filigranoj**, krustaj **kameoj**, juvel-ŝtonoj pri kiuj Kugel ne povis sindeteni de kolektado, eble malfruigante lian trovon de tio kion li serĉis: la labor-libroj de Zarejdiz, kiuj disĵetiĝis kun la restaĵo.

Kugel serĉadis longe. Li trovis arĝentajn bovlojn, eburajn kulerojn, **fajencajn** vazojn; mordaditajn ostojn kaj brilajn dentojn el multaj specoj, tiuj ĉi **scintilantaj** kiel perloj inter folioj — sed nenie troviĝis la libregoj kaj foliaroj kiuj eble helpus lin venki Iŭkoŭnu—n la Ridantan Magiiston. Eĉ nun, la instigista kreitulo de Iŭkoŭnu, Firks, kroĉis segiloformajn membrojn sur la hepaton de Kugel. Kugel fine elkriis: “Mi nur serĉas le plej rektan vojon al Arzenomej; vi baldaŭ kuniĝos al via kamarado en la baseno de Iŭkoŭnu! Intertempe ripozu; ĉu vi tiom agonie hastas?” Je kio Firks subite malfortigis sian premadon.

Kugel vagadis senespere tien kaj reen, rigardante inter branĉoj kaj sub radikoj, strabante en la arbarajn trairejojn, piedbatante inter la filikoj kaj muskoj. Jen ĉe la bazo de stumpo li vidis tion, kion li serĉis: aro da foliaroj kaj libroj, aranĝitaj en neta stako. Sur la stumpo sidis Zarejdiz.

Kugel paŝis antaŭen, la buŝo pinĉita pro malesperiĝo. Zarejdiz alrigardis lin kun serena sinteno. “Ŝajnas, ke vi serĉas iun perditan objekton. Tiu ĉi perdo, mi fidas, ne estas serioza?”

Kugel respondis per abrupta kapneo. “Kelkaj bagatelaĵoj ie perdiĝis. Lasu ilin putriĝadi inter la folioj.”

“Neniel!” deklaris Zarejdiz. “Pridiru la perdaĵojn; mi elsendos serĉantan **osciladon**. Vi ekhavos vian propraĵojn post nur momentoj!”

Kugel rifuzetis. “Mi ne implikos al vi tian trivialan aferon. Ni anstataŭe konsideru aliajn

aferojn.” Li indikis pri la stako da libregoj, sur kio Zarejdiz ĵus surmetis la piedojn. “Feliĉe via propra posedaĵaro estas sekura.”

Zarejdiz kapjesis kun kalma memplaĉo. “Ĉio nun bonas; mi maltrankviletas nun nur pri tiu malekvilibro kio misformas nian interrilaton.” Li tiam levis la manon kiam Kugel paŝis retroen. “Ne ekzistas kaŭzo por alarmo; fakte, tute renverse. Viaj agoj evitigis min de mortiĝo; la Leĝo de Ekvivalencoj estas malaranĝita kaj mi devas elpensi reciprokigon.” Li fingre kombis al si la barbon. “La repago, bedaŭrinde, devas esti plejparte simbola. Mi ja povus plenumi la tuton de viaj deziroj kaj ankoraŭ ne moveti pesilon kontraŭ la pezego de la bonfarego kion vi faris, kiel ajn senvole, por mi.”

Kugel fariĝis iom pli ĝojeta, sed nun Firks, refoje malpacienca, faris novan montradon. Ektenante al si la abdomenon Kugel elkriis: “Antaŭ ol ĉio, bonvolu elpreni la kreitulon kiu unge tranĉadas miajn vicerojn, estulon nomatan Firks.”

Zarejdiz levis la brovojn. “Kia tipo de estulo tiu ĉi estas?”

“Malestiminda objekto de fora stelo. Ĝi aspektas tiel, kiel pletaĵo, arbustaro, araneaĵo el blankaj pintoj, hokoj kaj ungetoj.”

“Afero el neniu granda malfacilo,” diris Zarejdiz. “Tiuj ĉi estuloj afekciiĝas de iomete primitiva rimedo de forpelado. Venu; mia loĝejo situas ne tre malproksime.”

Zarejdiz iris malsupren de la stumpo, kolektis siajn informilojn kaj ĵetis ilin alte en la aeron; ĉiuj flosis alte por flugi rapide super la arboj kaj for el vido. Kugel rigardis ilian malaperon kun bedaŭrado.

“Ĉu vi miras?” demandis Zarejdiz. “Estas nenio: la plej simpla el faroj kaj obstaklo kontraŭ la ardo de ŝtelistoj kaj kaŝirantoj. Lasu nin iri; ni devas forigi tiun ĉi estulon kiu kaŭzas al vi tian maltrankviladon.”

Li gvidis irejon inter la arboj. Kugel venis poste, sed nun Firks, sentante post fakto ke ĉio ne avantaĝas por li, faris furiozan proteston. Kugel, kurbiĝante duonfalde, saltetante flanken, devigis sin kuri ŝanceliĝe postsekve de Zarejdiz, kiu marŝadis sen eĉ ekrigardi malantaŭen.

Inter la branĉoj de enorme granda dáobado Zarejdiz havis sian loĝejon. Ŝtupoj leviĝis al peza pendanta branĉego kiu kondukis al [rustika](#) portiko. Kugel suprenrampis la ŝtuparon, elen sur la branĉegon, kaj en grandan kvadratan ĉambron. La meblaro estis kaj simpla kaj luksa. Fenestroj elrigardis al ĉiuj direktoj al la arbaro; dika tapiŝo kun dezajno el nigro, bruno kaj flavo kovris la plankon.

Zarejdiz invitis, ke Kugel eniru lian laborĉambron. “Ni finigos tiun ĉi agacaĵon tuj.”

Kugel stumblis post li kaj responde al gesto sidiĝis sur vitran koloneton.

Zarejdiz elprenis kadron el zinkaj strioj kion li aranĝis ĉe la dorso de Kugel. “Tio ĉi estas por informi al Firks, ke edukita sorĉisto ĉeestas: kreituloj el lia tipo ege malkomfortas pro zinko. Nun do, ia simpla [pocio](#): sulfuro, akvóstelo, tinkturo de zájĥ; certaj drogherboj: taŭrodorno, hílpo, kásaso, kvankam tiuj ĉi finaj estas eble ne nepre necesaj. Bonvolu trinki ... Firks, elvenu! Estu for, vi ekstertera bestaĉo! Elestiĝu! Aŭ mi kovros la tutan internon de Kugel per sulfuro kaj penetros lin per zinkaj stangetoj! Elvenu! Kio? Ĉu mi devas eligi vin inunde per akvóstelo? Venu elen; reiru al

Aĉernaron kiel ajn eble vi povos!”

Ĉe tiu minaco Firks kolere rezignis sian tenadon kaj eliris de la ventro de Kugel: plektaĵo el blankaj nervoj kaj ĉiroj, ĉiu kun sia hokungo aŭ kroĉpinto. Zarejdiz kaptis la estulon en zinka baseno kion li kovris per kadro el zinko.

Kugel, kiu jam perdis konsciecon, vekigis por trovi, ke Zarejdiz estis serene afabla, atendente lian resaniĝon. “Vi estas bonsorta viro,” Zarejdiz diris al li. “La kuraco estis nur minimume ĝustatempa. Estas la kutimo de tiu ĉi malicega diablulo etendi la ĉirohokojn ĉien tra la korpo, ĝis fine ĝi tenegas al la cerbo; post kiam vi kaj Firks fariĝus unu la sama. Kiel okazis, ke vi infektiĝis per la estulo?”

Kugel faris etan grimacon de malŝato. “Okazis ĉe la farado de Iŭkoŭnu la Ridanta Magiisto. Ĉu vi konas lin?” Ĉar Zarejdiz esprimis per alta ark-leviĝo de la brovoj.

“Ĉefe per lia reputacio pri humoro kaj groteskaj agadoj,” respondis la saĝulo.

“Li aĉas kiel klaŭna fiulo!” eksklamis Kugel. “Kontraŭ imagita insulteto li ĵetis min norden al la fora mond-ekstremo, kie la suno radas malalte kaj sendas malpli da varmo ol lampo. Iŭkoŭnu devas ĉiam ĝui siajn ŝercojn, sed nun mi havos ŝercon propran! Vi jam anoncis vian superplenan dankemon, kaj pro tio, antaŭ ol komenci al la ĉefa aro de miaj deziroj, ni venĝos nin plensufiĉe sur Iŭkoŭnu.”

Zarejdiz kapjesis pensoplene kaj fingre kombis la barbon. “Mi konsilos vin. Iŭkoŭnu estas memfiera kaj sensitiva viro. Lia plej vundebla loko estas la mem-estimo. Turnu al li vian dorson, portu vin mem al tute alia loko! Tiu ĉi ago de fiera malatento frapos al li ekdoloron pli ekskvizitan ol ajna alia malkomforto kiun vi povus aranĝi.”

Kugel malridetis. “La repago ŝajnas iom tro abstrakta. Se vi bonvolus elvoki demonon, mi donus al li instruojn rilate al Iŭkoŭnu. La afero estus tiel ĉe fino, kaj ni povus diskuti aliajn aferojn.”

Zarejdiz gestis nee per la kapo. “Ĉio ne estas tiom simpla. Iŭkoŭnu, estante mem lerte ruza, malprobable troviĝus neatenta. Li tiuj eksciis pri tiu, kiu instigis la atakon, kaj interrilatoj de malproksima ĝentileco kion ni ĝuadis ekfiniĝus.”

“Pfa!” mokis Kugel. “Ĉu Zarejdiz la Saĝulo timas identigi sin kun motivo de la justeco? Ĉu li palpebrumas kaj tiras sin flanken de iu tiom timema kaj sendecidema kiel Iŭkoŭnu?”

“En unu vorto — jes,” diris Zarejdiz. “Ajnamomente la suno povus ekesti malluma; mi malvolas trapasi tiujn ĉi finajn horojn interŝanĝante ŝercetojn kun Iŭkoŭnu, kies humoro detalemas multe pli ol mia propra. Do nun, atentu. Post unu minuto mi atentos pri aliaj devoj. Kiel fina signo de dankemo mi translokigos vin al tiu loko kiun ajn vi elektos. Kie ĝi estu?”

“Se tiu ĉi estas via plejbono, portu min al Arzenomej, ĉe la enfluejo de la rivero Zano en la Skaŭm-on!”

“Laŭ via deziro. Bonvolu paŝi sur tiun ĉi platformon. Eltenu la manojn jene ... Entenu profundan spiron, kaj dum la trapasado nek enspiru nek elspiru ... Ĉu vi pretas?”

Kugel jesis. Zarejdiz paŝis retroen, vokis sorĉon. Kugel ektiriĝis supren kaj for. Momenton

poste la grundo tuŝis liajn piedojn kaj li trovis sin paŝanta la ĉefan vojon de Arzenomej. Li enprenis profundan spiron. “Post ĉiuj tiuj malkomfortoj, ĉiuj sortoŝanĝoj, mi refoje estas en Arzenomej!” Kaj, kapneante pro miro, li rigardadis ĉirkaŭ si. La antikvaj konstruaĵoj, la terasoj superrigardantaj la riveron, la merkato: ĉio estis tiel kiel antaŭe. Ne tre malproksime estis la budo de Fianoŝtro. Turniĝe por montri la dorson por ke li restu nekontata, li promenis for.

“Kion fari nun?” li pripensadis. “Unue, novajn vestojn, poste la komfortojn de gastejo, kie mi povos pesi ĉiun aspekton de la nuna situacio. Kiam oni volas ridi kun Iŭkoŭnu, decas ke oni komencu la entreprenon kun ĉia zorgado.”

Du horojn poste, banita, hartondita, refreŝiĝinta, kaj portanta novajn vestaĵojn el nigro, verdo kaj ruĝo, Kugel sidiĝis en la komuna ĉambro de la Rivera Gastejo kun telero da spicaj kolbasoj kaj flakono da verda vino.

“Tiu ĉi afero de justa repago prezentas problemojn el ekstrema delikateco,” li pensadis. “Mi devas moviĝi kun zorgo!”

Li verŝis vinon el la flakono, manĝis kelkajn mordojn de la kolbasoj. Poste li malfermis sian saketon kaj elprenis etan objekton zorge volvitan en mola ŝtofo: la viola kaloto kiun Iŭkoŭnu deziris kiel similaĵo por tiu jam posedita. Li levis la kaloton al okulo sed haltis abrupte: ĝi montrus la ĉirkaŭejon en iluzio tiom bonfavora ke li eble neniam volos demeti ĝin. Kaj nun, pripensante la rebrilan surfacon, en lia menso ekestiĝis plano tiom genia, tiom teorie efektiva kaj tamen el malgranda danĝero, ke li tuj forlasis la serĉadon por ajna pli bona.

Esence, la plano estis simpla. Li prezentus sin al Iŭkoŭnu kaj ofertu la kaloton, aŭ pli fakte, kaloton el simila aspekto. Iŭkoŭnu komparus ĝin kontraŭ tiu jam posedata, por ke li testu la efikecon de la kunhavata paro, kaj post iame trarigardus ambaŭ. La malakordo inter la vera kaj falsa mondoj ŝancelus al li la cerbon kaj lasus lin senhelpa, je kiam Kugel farados tiajn rimedojn kiajn ajn ŝajnis profitodonaj.

Kie la miso en la plano? Kugel povis trovi neniun. Se Iŭkoŭnu malkovrus la anstataŭiĝon, Kugel devus nur oferti pardonpeton kaj prezentu la veran kaloton, kaj tiel mildigi la suspektemon de Iŭkoŭnu. En tute, la probableco de venko ŝajnis bonega.

Kugel finmanĝis siajn kolbasojn en malstreĉa humoro, ordonis duan flakonon da vino, kaj observis kun plezuro la vidkampon trans la rivero Zan. Ne necesis, ke li hastu; kaj prave, kiam traktante pri Iŭkoŭnu, impulsa agado estas serioza eraro, kiel li jam lernis.

La sekvan tagon, ankoraŭ trovinte neniun mison en sia plano, li vizitis vitro-bloviston kies laborĉambro establiĝis sur la strando de la Sakŭm ĉe mejlo oriente de Arzenomej, inter aro da flagrantaj flavaj bilibób-floroj.

La vitroblovisto inspektis la kaloton. “Ĉu preciza kopio, el sama formo kaj koloro? Neniu malgranda tasko, kun violo tiom pura kaj riĉa. Tia koloro estas ege peniga laboro por enmeti en vitron; ekzistas neniu specifa tintaĵo; ĉio devus esti afero el konjekto kaj hazardo. Malgraŭ ĉio — mi preparos fandaĵon. Ni trovos, ni trovos.”

Post kelkaj reprovadoj li produktis vitron el la necesa koloro, el kio li faris kaloton surface nedistingeblan de la magia lenso.

“Bonege!” deklaris Kugel. “Kaj nun, kiom via prezo?”

“Tian kaloton el viola vitro mi valoras je cent tercoj,” respondis la vitro-blovistion en ordinara maniero.

“Kio!” kriis Kugel kolerigita. “Ĉu mi ŝajnas tiom facile trompebla? La prezo troas.”

La vitroblovisto remetis siajn ilojn, pinĉilojn kaj fandujojn, montrante nenian zorgon pri la indigno de Kugel. “La universo evidentigas nenian stabilecon. Ĉio fleksas, ciklas, fluadas en kaj for; ĉio trapenetrigas de ŝanĝebleco. Miaj prezoj, kiuj estas instancoj de la kosmo, obeas la samajn leĝojn kaj varias laŭ la ansio de la kliento.”

Kugel paŝis retroen pro malplaĉo, je kio la vitroblovisto etendis manon kaj havigis al si ambaŭ kalotojn. Kugel eksklamis: “Kion vi planas?”

“Reporti la vitron al la fandujo; kion alian?”

“Kaj kio pri tiu kaloto kiu estas mia propraĵo?”

“Mi tenados ĝin kiel memoraĵo de nia konversacio.”

“Haltu!” Kugel ensuĉis profundan spiron. “Mi eble pagus vian troegan prezon se la nova kaloto estus tiom klara kiom la malnova.”

La vitroblovisto alrigardis unue unun, poste la alian. “Ĉe mia okulo ili samas.”

“Kio pri fokuso?” Kugel kontestis. “Tenu ambaŭ antaŭ ĉe via vidado, trarigardu ambaŭ, poste diru tiel same!”

La vitroblovisto levis ambaŭ kalotojn al la okuloj. Unu permesis vidadon en la Supermondon, la alia tralasis vidadon de Realeco. Ŝokita pro la malakordo, la vitroblovisto balancis, kaj estus falinta krom pro tio, ke Kugel subenis lin, kaj gvidis lin al benko.

Prenate la kalotojn, Kugel ĵetis tri tercojn sur la labor-tablon. “Ĉio estas ŝanĝiĝema, kaj tial viaj cent tercoj fleksiĝis por fariĝi tri.”

La vitroblovisto, tro kapturita por diri sensohavan respondon, murmuris kaj baraktetis levi manon, sed Kugel paŝadis el de la laborbudo kaj for.

Li reiris al la gastejo. Ĉi tie li surmetis siajn malnovajn vestojn, makulitajn kaj fenditajn de multa malmilda traktado, kaj ekiris laŭ la flanko de la Zan.

Marŝante li provpensis la proksimiĝantan konfrontiĝon, provante antaŭvidi ĉiun eblan deflankiĝon. Antaŭe, la sunlumo rebrilis tra la spiralaj turoj el verda vitro: la domo de Iŭkoŭnu!

Kugel haltis por suprenrigardi al la nekutima konstruaĵo. Kiam ofte dum lia veturado estis li imaginta sin starantan ĉi tie, kun Iŭkoŭnu la Ridanta Magiisto proksime atingebla!

Li grimpis la serpentan vojon el malhela bruna kahelo, kaj ĉiu paŝo pligis la striktecon de liaj nervoj. Li alproksimiĝis la pordon, kaj vidis sur la peza panelo objekton kion antaŭe li ne atentis: vizaĝo tranĉita en la antikva ligno, maldika vizaĝo pinĉita ĉe vango kaj mentono, la okuloj

Ŝokesprimaj, la lipoj tiritaj malantaŭen, la buŝo en frida momento de malespera krio aŭ eble en defio.

Starante kun mano levita por frapi la pordon, Kugel sentis malvarmiĝon surfali lian animon. Li paŝis retroen de la marasma ligna vizaĝo, turniĝis por sekvi la rigardon de la blindaj okuloj — trans la Zan kaj for super la malhelaj nudaj montetoj, ruliĝantaj kaj leviĝantaj tiom for kiom vido povis penetri. Li repensis sian planon da agadoj. Ĉu ekzistis miso? Danĝero al si mem? Neniu evidentiĝis. Se Iŭkoŭnu malkovrus la anstataŭiĝon Kugel povus simple konfesi konfuziĝon kaj prezenti la veran kaloton. Granda avantaĝo estis gajnebla kontraŭ malgranda risko! Kugel turniĝis reen, manfrapis sur la pezan panelon.

Minuto pasis. Malrapide la portalo svingiĝis malferme. Fluaĵo de malvarmeta aero bloviĝis elen, portante amaran odoron kion Kugel ne povis identigi. La sunlumo kliniĝante trans lia ŝultro pasis tra la portalo kaj falis sur la ŝtonan plankon. Kugel strebe rigardis en la vestiblon, malvolante eniri sen specifa invito. “Iŭkoŭnu!” li vokis. “Venu ĉi tien, por ke mi povu eniri vian domon! Mi deziras neniom plu da maljustaj akuzoj!”

Interne estis moviĝo, malrapida sono de piedoj. El ĉambro ĉe flanke venis Iŭkoŭnu, kaj Kugel pensis senti ŝanĝiĝon en lia sinteno. La granda mola flava kapo ŝajnis pli nestrikta ol antaŭe: la vangejoj pendiĝis, la nazo pendiĝis tiel kiel [stalaktito](#), la mentono estis apenaŭ pli ol [akno](#) sube de la granda ekspasmanta buŝo.

Iŭkoŭnu portis kvadratan brunan ĉapelon kun ĉiuj el la anguloj suprenklinitaj, bluzon el brun-kaj-nigre diamant-presita ŝtofo, malstriktan pantalonon el peza nigra bruna ŝtofo kun nigra brodaĵoj — belaspekta vestaro kion Iŭkoŭnu portis sengracie, kvazaŭ ĝi estis stranga al li, kaj malkomforta; kaj ja, li diris bonvenigon al Kugel kiun Kugel trovis stranga. “Nu, kunulo, kio estas via celo? Vi neniam lernos pri kiel surmarŝi plafonojn starante sur la manoj.” Kaj Iŭkoŭnu kovris sian buŝon per ambaŭ manoj por kaŝi etan ridon.

Kugel levis la brovojn en surprizo kaj dubo. “Tio ĉi ne estas mia celo. Mi venis pri irtasko el vasta signifo: nome, por raporti ke la misio kiun mi akceptis cele je via bono plaĉe finiĝis.”

“Bonege!” kriis Iŭkoŭnu. “Vi povas nun transdoni al mi la ŝlosilojn por la pano-ŝranko.”

“‘Pano-ŝranko’?” Kugel fiksrigardis surprizite. Ĉu Iŭkoŭnu freneziĝis? “Mi estas Kugel, kiun vi sendis norden al misio. Mi ĵus revenis kun la magia kaloto permesanta vidadon al la Supermondo!”

“Certe, certe!” kriis Iŭkoŭnu. “‘Brzm-szzst.’ Mi timas, ke mi estas malpreciza, inter tiom multe da kontrastaj situacioj; nenio samas kiel antaŭe. Sed nun mi ja bonvenigas vin. Kugel! Ĉio klaras. Vi iris antaŭen, vi venis reen! Kiel fartas amiko Firks? Bone, mi fidas? Mi jam delonge sopiris al lia kamaradeco. Bonega kunulo, Firks!”

Kugel rezigne jesis kun malmulta fervoro. “Jes, Firks ja estis amiko, neelĉerpebla fonto da kuraĝigado.”

“Bonege! Paŝu internen! Mi devas provizi refreŝigaĵojn! Kio estas via preferaĵo: ‘sz-mzsm’ aŭ ‘szk-zsm’?”

Kugel rigardis flanken al Iŭkoŭnun. Lia sinteno estis pli ol malordinara. “Mi malrekonas ambaŭ el la aferoj kiujn vi nomas, kaj tial rifuzos ambaŭ kun dankemo. Sed observu! La magia viola kaloto!” Kaj Kugel montris la vitran faraĵon kiun li akiris nur kelkajn horojn antaŭe.

“Bonege!” diregis Iŭkoŭnu. “Vi faris bone, kaj viaj translimaj faraĵoj — nomiĝas ekde nun nuligitaj. Sed donu al mi la kaloton! Mi devas meti ĝin al provado!”

“Kompreneble,” diris Kugel. “Mi respektoplene sugestas, ke por kompreni la plenan belegecon de la Supermondo, vi elprenu vian propran kaloton kaj trarigardu ambaŭ samtempe. Jen la ununura rekomendata metodo.”

“Prave, ja prave! Mia kaloto; nun kie tiu rezistema kanajlo estas kaŝinta ĝin?”

“‘Rezistema kanajlo’?” demandis Kugel. “Ĉu iu estis mislokiganta viajn valorajlojn?”

“Laŭ iu maniero de parolado.” Iŭkoŭnu sonigis sovaĝan altpiĉan ridadon, kaj suprensvingis ambaŭ piedojn for al flanko, falante peze al la planko, de kie li alparolis la ŝokitan Kugel-on. “Ĉio samas, kaj ne plu gravas, ĉar ĉio devas nun transspiri en la ‘mnz’ dezajno. Jes. Mi baldaŭ konsultos kun Firks.”

“Je la antaŭa tempo,” diris Kugel pacience, “vi elprenis vian kaloton el ŝranko en tiu fora ĉambro.”

“Silenton!” ordonis Iŭkoŭnu en subita agaciĝo. Li tiregis sin al stara pozo. “‘Szzz’! Mi ja bone atentis pri tio, kie la kaloto stokiĝas. Ĉio estas tute kunordigita! Sekvu min. Ni eltrovos la esencon de la Supermondo tuj!” Li eligis senmoderan ridadon azenoblekan, al kio Kugel fiksrigardis denove ege surprizita.

Iŭkoŭnu ŝancele trenmarŝis en la flank-ĉambron, revenis kun la skatoletto enhavanta sian magian kaloton. Li faris reĝan geston al Kugel. “Staradu precize ĉe tiu ĉi loko. Ne moviĝu, ĉar vi alte taksas Firks-on!”

Kugel riverencis obeeme. Iŭkoŭnu elprenis sian kaloton. “Nun — donu la novan objekton!”

Kugel transdonis la vitran kaloton. “Al viaj okuloj, ambaŭ samtempe, por ke vi ĝuu la plenan gloron de la Supermondo!”

“Jes! Tiel la afero estu!” Iŭkoŭnu levis la du kalotojn kaj aplikis ambaŭ al la okuloj. Kugel, atendante ke li falu paralizita de la malakordo, etendis por ekteni la ŝnuron kion li estis kunportinta por ke li kaptligu la sensomankan saĝulon; sed Iŭkoŭnu montris neniun signon de senhelpeco. Li rigardegis ien kaj tien, aĉe ridetanta en stranga maniero. “Belega! Belega! Vidaĵo el pura plezuro!” Li forprenis la kalotojn, metis ilin zorge en la skatoletto. Kugel rigardis malĝoje.

“Plaĉas al mi multe,” diris Iŭkoŭnu faranta sinuan geston per manoj kaj brakoj, kio kaŭzis al Kugel pluan konfuzon. “Jes,” Iŭkoŭnu pludiris, “vi faris bone, kaj la sensensa malico de via ofendo nun pardonigis. Nun la nura afero estas redono de mia nemalhavebla Firks, kaj tiucele mi devas meti vin en basenon. Vi estos subsurfaciĝita en deca likvaĵo por proksimume dudek ses horoj, kio ja eble sufiĉos por tenti al Firks, ke li eliru.”

Kugel grimacis. Kiel oni rezonu kun magiisto ne nur drola kaj disputema, sed ankaŭ freneza? “Tia subsurfaciĝo ja eble afektus min malagrabla,” li priatentigis zorge. “Multe pli saĝe, ke oni permesu al Firks pluan promenopovon.”

Iŭkoŭnu ŝajnis favore imponita de la sugesto, kaj esprimis sian ĝojon per ekdanci ekstreme

komplikan ĵigon, kion lifaris kun vigleco rimarkinda en viro el tiom mallongaj membroj kaj iom grase dika korpo. Li finis la montraĵon per granda saltego en la aeron, surgrundiĝante sur la kolon kaj ŝultrojn, kun la brakoj kaj gamboj svingiĝantaj kiel tiuj de renversita skarabo. Kugel rigardis fascinite, scivolante ĉu Iŭkoŭnu vivis aŭ mortis. Sed Iŭkoŭnu, palpebrumante iom, lertmove gajnis starantan pozon. “Mi devas perfektigi la precizajn premojn kaj puŝojn,” li pensis laŭte. “Alikaze estas pinĉiĝo. La éluktanco ĉi tie estas el malsama grandeco ol tio de ‘ssz-pntz’.” Li sonigis alian grandan gorĝan ridon, ĵetante malsupren la kapon, kaj rigardante en la malferman buŝon Kugel vidis, anstataŭ lango, blankan hok-ungon. Tiumomente li ekkomprenis la kialon por la strangega konduto de Kugel. Per iu rimedo, kreitulo simila al Firks jam enigis sin en la korpon de Iŭkoŭnu, kaj jam ektenis posedon de lia cerbo.

Kugel frotis al si la mentonon interesite. Jen situacio mirinda! Li aplikis sin al koncentrigita pensado. Estus gravege scii ĉu la kreitulo enadis al si la majstrecon super magio kio apartenis al Iŭkoŭnu. Kugel diris, “Via saĝeco mirigas min! Mi plenas de admiro. Ĉu vi aldonis al via kolektaĵo de magiaj kuriozaĵoj?”

“Ne; estas jam sufiĉa kvanto facile havebla,” deklaris la kreitulo, parolante tra la buŝo de Iŭkoŭnu. “Sed nun mi sentas bezonon por malstreĉiĝo. La evoluaĵo kiun mi elfaris momenton antaŭe faris, ke kvieteco necesas.”

“Simpla afero,” diris Kugel. “La plej efika metodo tiucela estas ĉirkaŭpremi kun ekstrema forto sur la Lobon de Direkta Volo.”

“Ĉu prave?” demandis la kreitulo. “Mi provos tiele; nu, kie troviĝas: jen la Lobo de Antivolo tie ĉi, la Kunvolvo de Subkomprena Prikonstruo — ‘Szzm’. Multo konfuzas min; neniam estis tiel sur Aĉernaro.” La kreitulo turnis al Kugel akran rigardon por trovi, ĉu la misdiro atentiĝis. Sed Kugel jam surmetis sintenon de senatenta tediĝo; kaj la kreitulo daŭre serĉis ordon inter la diversaj elementoj de la cerbo de Iŭkoŭnu. “Ho jes, tie ĉi: la Lobo de Direkta Volo. Nun, subite vigla ekpremo.”

La vizaĝo de Iŭkoŭnu striktiĝis, la muskoloj subfleksiĝis, la grasa korpo falis velke al la plankon. Kugel saltis antaŭen kaj en nura momento ligis la brakojn kaj gambojn kaj fiksis glu-strion trans la granda buŝo.

Nun Kugel dancis ĝojan saltaron sian propran. Ĉio estis bona! Iŭkoŭnu, ties domego, ties granda kolektaro da magiaj helpiloj haveblis nun al li mem! Kugel konsideris la senhelpan pezulon kaj komencis treni ĝin eksteren kie li povus konvene forhaki la grandan flavan kapon, sed rememoro pri la multaj indignoj, malkomfortoj kaj humiliĝoj kiujn li suferis kaŭze de Iŭkoŭnu instigis al li paŭzon. Ĉu Iŭkoŭnu atingi scioĉeson tiel rapide, kun nek kompreno nek bedaŭro? Tute ne!

Kugel trenis la senmovan korpon elen al la halon, kaj sidiĝis ĉe apuda benko por konsideradi.

Post nelonge la korpo moviĝis, malfermis la okulojn, provis malkuŝiĝi, kaj trovante tion ĉi nefarebla, turniĝis por stude rigardi al Kugel unue en surprizo, poste en kolero. El la buŝo venis komenco-provaj sonoj kiujn Kugel akceptis kun sendecida gesto.

Baldaŭ li leviĝis por stari, ekzamenis la ligojn kaj la buŝo-kovrilon, faris ĉion duoble sekura, poste komencis zorgan inspektadon de la domego, atenta pri kaptiloj, logiloj aŭ gravito-falaĵou kiujn la ŝercema Iŭkoŭnu eble estis establinta por supervenki aŭ subvenki trudantojn. Li estis aparte

atentema dum lia inspektado de la labor-ĉambro de Iŭkoŭnu, provante ĉiun lokon per longa stango, sed se Iŭkoŭnu estis aranĝinta kaptilojn aŭ trompilojn, neniu evidentiĝis.

Serĉante inter la bretoj de Iŭkoŭnu, Kugel trovis sulfuron, akvostelon, tinkturon de zinko kaj herbojn el kiuj li preparis sulfuran flavan eliksiron. Li trenis la malrigidan korpon en la labor-ĉambron, trinkigis la pocion, vokis ordonojn kaj persvadojn kaj fine, kun Iŭkoŭnu eĉ pli intense flava pro manĝado de sulfuro, kun akvostelo vapore eliĝanta la orelojn, kun Kugel anhelanta kaj ŝvitanta pro siaj propraj strebadoj, la kreitulo de Aĉernaro unge trenadis sin el de la anhelanta korpo. Kugel kaptis ĝin en granda ŝtona **pistujo**, dispremis ĝin per pistilo, dissolvis la tuton per koncentrita **vitriolo**, aldonis aromatan mérnaŭncon kaj forverŝis la rezultan ŝlimon en drentubon.

Iŭkoŭnu, baldaŭ rekonsciiĝante, fikis al Kugel rigardesprimon el maltrankviliga intenseco. Kugel medikamentis elblovon da deliro-pulvoro kaj la Ridanta Magiisto, rulante la okulojn, reiris al mensostato sendezira.

Kugle sidis klinopoze. Problemo ekzistis: kiel plej bone deteni la magiiston Iŭkoŭnu dum farado de la propraj repagadoj. Fine, trarigardinte kelkajn manlibrojn, li fermis daŭre la buŝon de Iŭkoŭnu per ŝmiraĵo el kuniga glusubstanco, sekurigis lian vivoforton per malkomplika sorĉo, post enkaĝigis lin en alta vitra tubo, kion li pendis de ĉeno en la vestiblo.

Sukcesinte je tio, kaj kun Iŭkoŭnu refoje konscia, Kugel paŝis retroen kun afabla rideto. “Jen fine, Iŭkoŭnu, aferoj komencas ordigi sin laŭ dececo. Ĉu vi memoras la maldignaĵojn kiujn vi okazigis al mi? Kiel malagrabla ili estis! Mi ja ĵuris, ke vi iam bedaŭros la cirkonstancojn! Mi nun komencas validigi la ĵuron. Ĉu mi klare komunikas?”

La esprimo tordante la vizaĝon de Iŭkoŭnu estis sufiĉa respondo.

Kugel sidigis sin kun pokalo de la plej bona flava vino posedata de Iŭkoŭnu. “Mi planas plenumi la aferon laŭ tiu ĉi maniero: mi kalkulos la sumon de tiuj suferoj kiujn mi spertis, inkluzive de tiaj preskaŭ nemezureblaj kvalitoj kiaj malvarmiĝoj, malvarmaj ventoj, insultoj, korŝiroj de timoplena atendado, malcertecoj, profundaj malesperoj, hororoj kaj naŭzoj, kaj aliaj nepridireblaj mizeroj, ne la plej malgranda el kiu estis la regadoj de la fiega Firks. El tiu ĉi tutaĵo mi subtrahas pro mia unua peketo, kaj eble unu aŭ du pluaj bonaĵoj, lasante imponan restaĵon da ŝuldego repagenda. Bonŝance, vi estas Iŭkoŭnu la Ridanta Magiisto: vi certe prenos sekan neofenditan amuzon el la situacio.” Kugel turnis demandan rigardon supren al Iŭkoŭnu, sed la responda rigardo estis neniel humora.

“Unu fina demando,” diris Kugel. “Ĉu vi aranĝis ajnajn kaŝ-kaptilojn aŭ log-kaptilojn en kiuj mi povus detruiĝi aŭ senmovebliĝi? Unu palpebrumo esprimos ‘ne’; du ‘jes’.”

Iŭkoŭnu nur fiksrigardis malestime el la tubo.

Kugel suspiris. “Mi vidas, ke mi devas kondukti singarde.”

Kunportante sian vinon en la grandan halon, li komencis al kutimi sin pri la granda aro da magiaj instrumentoj, objektoj, talismanoj kaj kuriozaĵoj: nun, por ĉiuj praktikaj celoj, sia propraĵaro. La rigardado de Iŭkoŭnu sekvis lin ĉie kun esprimo de atenda espero kio neniel trankviliĝis.

Tagoj trapasiĝis kaj la kaptilo de Iŭkoŭnu, se ajna tia ekzistis, restis neaktivigita, kaj Kugel finfine komencis kredi, ke neniu ekzistis. Dum tiu ĉi tempo li aplikis sin al la libregoj kaj foliaroj de

Iŭkoŭnu, sed kun malesperigaj rezultoj. Kelkaj el la libretoj estis skribitaj en antikvaj lingvoj, nelegeblaj alfabetoj aŭ **arkanaj** terminoj; aliaj eksudis sensaĵon el tia tuja danĝero ke Kugel tiumomente klapfermegis la kovrilon.

Li trovis, ke unu aŭ du el la laborlibroj cedis al lia kompreno-povo. Tiun ĉi li studis kun ega diligenteco, puŝegante silabon post tordiĝanta silabo en sian menson, kie ili bolumis kaj premadis kaj elpuŝadis al li la **tempiojn**. Nuntempe li kapablis enteni kelkajn el la plej simplaj kaj primitivaj sorĉoj, kelkajn el kiuj li provis ekzerce sur Iŭkoŭnu–n: rimarkinde inter kiuj estis la Suferiga Jukado de Lugŭajlro. Sed ĉefe Kugel malesperiĝis pro io kio ŝajnis esti fundamenta malkapablo. Multesukcesaj magiistoj povus enteni tri aŭ eĉ kvar el la plej potencaj efektiloj; por Kugel, akirante eĉ unu solan sorĉon estis tasko de eksterordinara malfacilo. Iun tagon, aplikante sorĉon de loko-interŝanĝo sur satinan kusenon, li renversis iujn el la tordsilaboj kaj estis mem ĵetita malantaŭen en la vestiblon. Agacita de la ridetaĉo de Iŭkoŭnu, Kugel portis la tubon al la antaŭo de la domo, almetis paron da teniloj sur kiuj li pendigis lampojn, kiuj poste lumigis la terenon antaŭ la domo dum la noktaj horoj.

Monato pasiĝis, kaj Kugel fariĝis iom pli memfida en sia okupado de la domo. Kamaranoj de proksima vilaĝo portis al li bienajn produktaĵojn, kaj repage Kugel faris tiujn malgrandajn servojn pri kiuj li povis. Je unu okazo la patro de Jins, la junulino kiu servis kiel aranĝisto de lia litĉambro, perdis valoran zon-bukon en profunda **cisterno**, kaj petegis Kugel–on, ke li elprenu ĝin. Kugel facile konsentis, kaj mallevis la tubon enhavantan Iŭkoŭnu–n en la cisternon. Iŭkoŭnu fine indikis la lokon de la zon-buko, kio poste reakiriĝis per **graplo**.

La **epizodo** instigis al Kugel, ke li elpensu aliajn uzojn por Iŭkoŭnu. Ĉe la Foiro Arzenomea iu ‘Konkurso de Groteskajoj’ estis okazigita. Kugel aranĝis, ke Iŭkoŭnu kontestu en la konkurso, kaj kvankam li malsukcesis gajni la ĉefan premion, liaj grimacoj malforgeseblis kaj logis multajn komentojn.

Ĉe la foiro Kugel renkontis Fianoŝtron, la vendisto de talismanoj kaj magiaj akcesoraĵoj kiuj estis origine sendinta Kugel–on al la domo de Iŭkoŭnu. Fianoŝtro rigardis humore surprizita de Kugel al la tubo enhavanta Iŭkoŭnu–n, kion Kugel transportadis reen al la domo en ĉaro. “Kugel! Kugel la Ruza!” eksklamis Fianoŝtro. “Onidiro do parolas prave! Vi estas la nova lordo de la domo de Iŭkoŭnu, kaj de lia granda amaso da instrumentoj kaj kuriozaĵoj!”

Kugel unue ŝajnis kvazaŭ li ne rekonis Fianoŝtron, poste parolis en la plej malvarma el voĉoj. “Ja prave,” li diris. “Iŭkoŭnu elektis partopreni malpli aktive en la aferoj de la mondo, kiel vi vidas. Malgraŭ tio, la domo estas labirinto el kaptiloj kaj pezaĵ-faligiloj; kelkaj malsatigitaj bestoj nokte paŝadas la terenon, kaj mi establis sorĉon de intensa violenteco por gardi ĉiun enirejon.”

Fianoŝtro ŝajne ne atentis pri la malproksigema sinteno de Kugel. Interfrotante siajn grase dikajn manojn, li demandis: “Ĉar vi nun regas vastan amason da kuriozaĵoj, ĉu vi vendos iujn el la malpli dezirindaj objektoj?”

“Mi havas nek neceson nek volon por fari tiel,” diris Kugel. “La monujoj de Iŭkoŭnu enhavas oron sufiĉan por daŭri ĝis tiam kiam la suno mallumiĝos.” Kaj ambaŭ viroj, laŭ la kutimo de la tempo, ekrigardis supren por taksu la koloron de la mortinta stelo.

Fianoŝtro faris ĝentilan geston. “Ĉi kaze, mi deziras al vi bonan tagon, kaj al vi ankaŭ.” Tiun ĉi lastan li diris al Iŭkoŭnu, kiu respondis nur per kolera esprimego.

Reveninta al la domo, Kugel portis Iŭkoŭnu–n en la vestiblon; post irante al la tegmento, klinis sur parapeto kaj rigardadis super la etendejo el montetoj kiuj ondadis for kiel **huloj** sur maro. Por la centa fojo li pripensadis la strangan mankon de antaŭpreparo de Iŭkoŭnu; devegas ke li, Kugel, neniel falu en similan eraron. Kaj li ĉirkaŭrigardis kun okulo por defendaj rimedoj. Supere leviĝis la spiralaj verdaj vitraj turoj; sube kliniĝis la krutaj tegmentosuproj kaj gabloj kiujn Iŭkoŭnu taksis arte plaĉaj. Nur la fronto de la antikva fortika domo ofertis enirejon al la domo. Laŭ la klinaj eksteraj randoj Kugel aranĝis tabulojn el sapo–ŝtono en tia maniero, ke iu grimpanta la parapetojn devas surpaŝi tiujn ĉi kaj ekgliti al sia morto. Se Iŭkoŭnu estus aranĝinta similan antaŭgardaĵon — jene taksis Kugel, li ne estus nun elrigardanta de alta vitra tubo.

Aliaj defendiloj ankaŭ li devas perfektigi: nome tiujn magiajn fontojn kiuj trovindas sur la bretoj de Iŭkoŭnu.

Revenante al la grandan halon, li manĝis bankedaĵon elmetitan de Jins kaj Skjava, liaj du belaj atendistinoj, kaj poste aplikis sin al liaj studoj. Ĉinokte ili temis pri la Sorĉo de Senespera Encistigo, reaga puno eble pli favorita en pli fruaj epokoj ol nuntempe, kaj la Agentilo de Fora Alsendo, per kio Iŭkoŭnu estis transportinta lin al la nordaj senhomejoj. Ambaŭ sorĉoj etis el nemalmulta potenco; ambaŭ bezonis sentiman kaj absolute precizan regadon, pri kiuj Kugel je la komenco timis, ke li neniam povus provizi. Malgraŭ tio li persistis, kaj fine sentis sin kapabla enteni aŭ unu aŭ la alia, je neceso.

Du tagojn poste, okazis tio kion Kugel jam atendadis: salutfrapo sur la pordo kio, kiam Kugel svingis malferme la pordon, indikis la malbonvenan ĉeestecon de Fianoŝtro.

“Bonan tagon,” diris Kugel sen bonhumoro. “Mi malsanetas, kaj devas peti, ke vi ĉimomente foriru.”

Fianoŝtro faris mildan geston. “Raporto pri via bedaŭrinda malsaniĝo diriĝis al mi, kaj tiom estis mia prizorgo, ke mi hastis ĉi tien kun **opiaĵo**. Permesu, ke mi paŝu internen —” tion dirante li puŝis sian grasan figuron preter Kugel “— kaj mi elverŝos la specifan dozon.”

“Mi suferas malkomforton de la animo,” diris Kugel signifoplene, “kio memprezentiĝas en ekagadoj de malicega kolero. Mi petegas, ke vi foriru, kontraŭ tio, ke en senregebla spasma, mi tranĉus vin en tri pecojn per mia glavo, aŭ pli malbone, elvokus magion.”

Fianoŝtro ekspasmetis maltrankviligite, sed daŭrigis en voĉo de nedeflankebla optimismo. “Mi same portas pocion efikan kontraŭ tiu malsano.” Li elprenis nigran flakonon. “Prenu solan gluton kaj viaj ansioj ne plu ekzistos.”

Kugel ektenis la tenilon de sia glavo. “Evidentiĝas, ke mi devas paroli sen ambiguo. Mi ordonas vin: foriru, kaj neniam revenu! Mi komprenas vian celon kaj mi avertas, ke vi trovos min malpli indulgeman malamikon ol estis Iŭkoŭnu! Do nun, ekiru for! Aŭ mi trudos sur vin la Sorĉon de la Makroiĝa Piedfingro, post kiam la preparolita membro ŝveliĝus ĝis la grandeco de domo.”

“Jen kaj tiel,” kriis Fianoŝtro furioze. “La masko tiriĝis flanken! Kugel la Ruza staras malkovrita kiel sendankemulo! Demandu vin: kiu instigis, ke vi elŝtelu la domogon de Iŭkoŭnu? Ja estas mi, kiu laŭ ĉiu kutimo rajtas partopreni porcion de la riĉaĵoj de Iŭkoŭnu!”

Kugel eltiris prezente sian glavon. “Mi jam aŭdis sufiĉon; nun mi agos.”

“Haltu!” Kaj Fianoŝtro levis alte la nigran flakonon. “Necesas nur ke mi ĵetu tiun ĉi botelon al la planko por eligi malsanigaĵon, al kiu mi estas imuna. Staru for, tial!”

Sed Kugel, furiozigita, alsaltis, por vundpuŝi sian glavon tra la levita brako. Fianoŝtro elkriis dolore, ĵetis la nigran botelon tra la aero. Kugel eksaltis por kapti ĝin kun granda movlerto; sed dumtempe, Fianoŝtro, saltante antaŭen, frapis al li grandan frapon, tiel ke Kugel ŝanceliĝis retroen kaj kolizis kontraŭ la vitra tubo entenanta Iŭkoŭnun–n. Ĝi kliniĝis fale al la ŝtona planko, frakasiĝis; Iŭkoŭnu rampis dolore for de la fragmentoj.

“Ha ha!” ridis Fianoŝtro. “Aferoj nun moviĝas en alia direkto!”

“Neniel!” diregis Kugel, elpremante tubon da blua koncentraĵo kiun li estis trovinta inter la instrumentoj de Iŭkoŭnu.

Iŭkoŭnu strebis per fragmento de vitro por tranĉi la fermilon ĉe siaj lipoj. Kugel elblovis venton da blua koncentraĵo kaj Iŭkoŭnu sonigis grandan strikt-lipan muĝon de maltrankviliĝo. “Lasu fali la vitron!” ordonis Kugel. “Turniĝu for por alfronti la muron.” Li minacis Fianoŝtron. “Vi ankaŭ!”

Kun granda zorgado li ligis la brakojn de siaj malamikoj, poste paŝanta en la grandan halon ekposedigis sin je la laborlibro kion li estis ĵus studinta.

“Kaj nun — ambaŭ iru eldomen!” li ordonis. “Moviĝu kun hasto! Eventoj nun malvolviĝos al decidega rezulto!”

Li devigis, ke la du marŝu al plata loko malantaŭ la domo, kaj staris iom aparte. “Fianoŝtro, via sorto estas meritaĵo multe meritita. Por via trompo, avaro kaj fiodoraj manieroj mi nun trudos sur vi la Sorĉon de Senespera Encistigo!”

Fianoŝtro plormuĝis kompatinde, kaj kolapsis al la genuoj. Kugel atentis neniom. Konsultante la laborlibron li ensorbis la sorĉon; poste li fingre indikis Fianoŝtron, kaj parolis la timindegajn silabojn.

Sed Fianoŝtro, anstataŭ sinki en la grundo, kaŭradis tiel kiel antaŭe. Kugel haste konsultis la laborlibron kaj vidis, ke erare, li interŝanĝis paron da tordsilaboj, tiel renversinte la kvaliton de la sorĉo. Kaj ja, dum lia ekkompreno pri ĉi eraro, je ĉiuj flankoj estis etaj sonoj, kaj antaŭaj viktimoj trans la epokoj estis nun elpuŝitaj supren de profundeco de kvardek mejloj, kaj ellasitaj sur la surfacon. Jen kuŝis ili, palpebrumante en senkomprenanta surprizŝoko; kvankam kelkaj kuŝadis rigidaj, tro torporaj por ajna reago. Iliaj vestoj estis jam kadukiĝintaj en polvon, kvankam la malpli longe encistigitaj ankoraŭ portis unu aŭ du tolaĉojn. Post nelonge ĉiuj krom la plej ŝokitaj kaj rigidaj faradis provetajn movojn, palpante la aeron, etendante manojn por teni al la ĉielo, mirigantaj pri la suno.

Kugel sonigis raŭkan ridon. “Ŝajnas, ke mi faris malĝuste. Ne grave. Mi ne misfaros duan fojon. Iŭkoŭnu, via puno estos tiel samkvalita kiel via ofendo, neniom pli, neniom malpli! Vi ĵetis min senpense al la nordaj senhomejoj, al lando kie la sunolumo strias deklive malalte trans la sudo. Mi faros same por vi. Vi trudis al mi Firks–on; mi trudos al vi Fianoŝtron. Estu ke vi kune paŝados strebe trans la tundroj, penetri la Grandan Ermon, baraktu preter la Montoj de Magnatz. Ne petadu; prezentu neniujn senkulpiĝojn: en tiu ĉi afero mi restas duregea. Staru kviete se vi ne deziras pluan trudon da blua ruinigo!”

Kugel nun aplikis sin al la Agentilo de Fora Alsendo, kaj establis la aktivigajn sonojn zorge en

sia menso. “Pretigu vin,” li vokis, “kaj adiaŭ!”

Post kiam li kantis elvoĉe la sorĉon, hezitante ĉe nur unu tordsilabo kie necerteco venkis lin. Sed ĉio bonis. De alte venis la klapsono kaj gorĝa elkrio, kaj preterpasanta demono estis haltigita mezfluge.

“Aperu, aperu!” vokis Kugel. “La celata loko estas kiel antaŭe: al la strando de la norda maro, kie la ŝarĝaĵo devas alveni vivanta kaj sekura! Aperu! Ektenu la indikitajn personojn kaj portu ilin laŭ la ordono!”

Granda flugila klapmovado frape puŝis la aeron; nigra formo kun malbelega vizaĝo rigardis suben. Ĝi subenetendis piedan ungaron; Kugel leviĝis kaj forportiĝis norden, malfide traktata jen duan fojon pro mislokita tordsilabo.



Dum tago kaj noko la demono flugadis, grumblante kaj muĝante. Iam post sunleviĝo Kugel ĵetiĝis suben sur strando kaj la demono tondiris for tra la ĉielo.

Estis silento. Je dekstre kaj maldekstre etendis la griza strando. Malantaŭe levis la antaŭstrandon kun kelkaj tufoj de sal-greso kaj tufherbo. Kelkajn jardojn for sur la strando kuŝis la dispecigita kaĝo en kiu Kugel antaŭan fojon portiĝis al tiu ĉi sama loko. Kun kapo klinita suben kaj brakoj ĉirkaŭtenantaj la genuojn, Kugel sidadis rigardante elen trans la maro.



Vortaro

- abism/o** Loko, en montoj aŭ en maroj, tiel profunda, ke ĝi ŝajnas senfunda: la aglo kvazaŭ falis en la abismon k tuj aspektis kiel muŝeto; esplori la oceanajn abismojn. 🗨️ faŭko.
- abnegaci/o** Volonta forlaso de propraj komfortaĵoj aŭ plezuroj, por la bono de aliuloj aŭ pro religiaj motivoj. 🗨️ rezigno, sindonemo.
- abomen/i** (tr) Malamegi pro fizike naŭzaj aŭ morale malplaĉegaj ecoj.
- adher/i** (ntr) Supraĵe gluiĝi sur io; supraĵe fiksiĝi pro ia speciala forto.
- afin/a** Prezianta similecojn de strukturo, humoro, karaktero kaj simile.
- aflikt/i** (tr) Kaŭzi severan kordoloron.
- akcesor/a** **1** Akompananta, sed ne necesa; neĉefa, kroma. **2** Helpa, kvankam malpli grava ol io alia. 🗨️ flanka, suplementa. ~**aj**o Objekto, ilo, meblo ks ne nepre necesa, sed oportuna por iu agado
- akile/o** Genro (Achillea el asteracoj) de plurjaraj herboj kun folioj de dentaj ĝis plume dividaj k kun densaj, plej ofte korimbe arigintaj, radiaj kapituloj, uzata por likvoroj kaj biteroj. ~*EB 360/15*; ~*BeE 194/15*
- akn/o** § Pli-malpli ruĝa svelaĵeto, pli-malpli longe videbla sur la haŭto. 🗨️ butono.
- aksiom/o** **1** Aserto, rigardata kiel evidenta per si mem aŭ ĝenerale akceptata. **2** Fundamenta aserto, el kiu oni eliras por pravi teoremojn.
- alkov/o** Enĉambra litniĉo, kelkafoje fermebla per kurteno aŭ pordo.
- alium/o** Genro (Allium el aliumacoj) de unu-, du- kaj plur-jaraj herboj kun tunika bulbo kaj kun umbelsimila infloresko; ĉirkaŭ 690 sp-oj, N-hemisferaj, plejparte kun fortaodoro specifa. **tuba aliumo** Specio de aliumo (A. fistulosum). Sin. tuboĉepo. 🗨️ ajlo, ampeloprazo, cepo, poreo, ŝenoprazo, ŝaloto.
- alo/o** Genro (Aloe el asfodelacoj) de sukulentaj plantoj kun longaj, dikaj, sukplenaj, elbazaj folioj kaj kun tubformaj floroj en grapolo aŭ spiko sur longa pedunklo; ĉirkaŭ 365 sp-oj el la tropikaj k subtropikaj regionoj de Afriko, Arabio kaj Kanarioj; multaj specioj kultivataj por ornamo. → agavo. ~*EB 56/123*; ~*BeE 205/13*
- amanit/o** Genro (Amanita el amanitacoj) de ombrelfungoj kun ringo kaj stipingo kaj kun blankaj lamenoj kaj sporaro; subkosmopolita g. de ĉ. 200 spspecioj. ~*EB 363/10,11*; ~*BeE 197/12*
- ambigu/a** Tia, ke ĝia signifo estas duba, aŭ ke ĝi povas havi du malsamajn sencojn.
- amoniak/o** **1** Alkala gaso kun tre pikantaodoro, NH₃, konsistanta el nitrogeno kaj hidrogeno. **2** Ties akva solvaĵo (enhavanta NH₄OH) kun samaodoro.
- amulet/o** Objekto, kiu per supozata magia efiko gardas sian portanton kontraŭ danĝero, malsano, sorĉo ktp.

anksi Sentanta aŭ prezentanta staton de intelekta perturbo kaj agitiĝo kun sento de antaŭkora premateco.

apanaĝ/o Tiuj donaĵoj de superulo al subulo aparte de la dunga salajro.

aprez/i (tr) Taksi la valoron de io aŭ la meritojn de ies agado.

arkad/o Ĉiu el la serio de arkoj, subtenataj de kolonoj, formanta pasejon kaj simile. ~EB 317/8; ~BeE 154/8

arkan/o ☉ Sekreta instruo aŭ rito, rezervita al inicitoj.

arleken/o Gaja burleskulo, origine rolulo en la itala komedio, konebla per sia multpeca bunta vesto. ☞ klaŭno, pajaco, pieroto, pulĉinelo. ~EB 289/35; ~BeE 124/30

arom/o Delikata, agrabla k subtila odoro de kelkaj plantoj aŭ aliaj substancoj.

asfodel/o Genro (Asphodelus el asfodelacoj) de plurjaraj herboj kun longformaj, triangulsekcaĵaj aŭ tubformaj folioj kaj kun blankaj aŭ hele ruĝetaj floroj en grapolo aŭ paniklo; kelkaj specioj pororname kultivataj.

atlant/o Granda skulptaĵo virfigura, kiu subportas entablementon, balkonon kaj simile. ☞ kariatido. ~EB 316/36; ~BeE 153/50

aŭgur/o Signo, interpretata por antaŭvidi estontan okazaĵon.

balkon/o **1** Plata elstaraĵo ĉe la fasado de domo, ĉirkaŭita per balustrado aŭ krado kaj komunikiĝanta kun la interno. **2** En teatro, ĉiu el la etaĝoj kun sidlokoj, inter la parteroj kaj la galerio. ~EB 296/17,18 39/69 252/93 10/12

balustrad/o **1** Vico da balustroj kun supra breto, ĉe la rando de teraso, balkono ks. **2** Ĉia analoga barilo aŭ apogilo, starigita por eviti defalon. ☞ apogrelo, manrelo, parapeto. ~EB 118/50; ~BeE 276/22

barĝ/o Platkarena, malalta, kargoporta barko aŭ ŝipo, uzata ordinaro en riveroj, havenoj k kanaloj. ~EB 211/25, 220/20,22 ; ~BeE 375/87

bark/o **1** Ĝenerala nomo de akvoveturilo pli malgranda ol ŝipo kaj pli granda ol boato, ordinaro pelata per veloj, kun aŭ sen motoro. ☞ daŭo, jakto, jolo, ĵonko, kutro, lugro, ŝalupo. **2** ⚓ Velŝipo kun tri aŭ pli da mastoj, kun jardoveloj sur ĉiu, krom la plej posta, kiu estas rigita per gafovelo: ~EB 215/29; ~BeE 374/21,23

bazilisk/o **1** Fabela reptilo, la reĝa specio de ĉiuj serpentoj, lacertoj ktp, kiu povas mortigi per nura rigardo. **2** ♂ Genro (Basiliscus) de lacertuloj el la familio de igvanedoj, kun haŭta kresto sur la dorso k la kapo. ☞ angviso, igvano, lacerto. ~EB 307/34; 350/30 ~BeE 145/37, 182/30

beat/a Ĝuanta perfektan feliĉon.

beret/o Ronda plata ĉapo el drapo, uzata origine de eŭskaj kampuloj, kaj poste de diverslandaj laboristoj, militistoj, policistoj kaj aliaj. → bireto. ~EB 31/43, 36/54; ~BeE 42/35

bracelet/o Ornamaĵo portata ĉirkaŭ manradiko, brako, aŭ maleolo. ☞ brakringo. ~EB 38/16; ~BeE 43/3

brod/i (tr) 1 Kudre ornami ŝtofon aŭ ledon per fadenoj. ☞ broki. 2 Desegni per tiaj fadenoj.

brum/o Malklariĝo de la atmosfero kun vidodistanco de pli ol unu kilometro.

bufed/o Tablo aŭ tabloforma meblo, provizita per manĝaĵoj disponeblaj por invititoj aŭ klientoj ĉe teatro, balo, stacidomo. ~EB 260/1-11; ~BeE 75/25

buk/o Metala kadreto kun movebla pinglo, por fiksi zonon, partojn de vesto, de ŝuo ktp. ~i buki (tr) Fiksfermi per buko ~EB 249/44

bukcen/o 1 𐌆 Antikva trumpeto ĉe la Romanoj. 2 ♂ Genro (Buccinum) de moluskoj el la klaso de gastropodoj, relative grandaj, konkohavaj, vivantaj ĉe la bordoj en malprofunda akvo. ☞ heliko, limako.

bukl/o 1 Spirale volviĝanta fasketo da haroj. ☞ tufo. 2 Ringoforme kurbigita fadeno, rubando, ŝnuro.

bulvard/o 1 Cirkla promenejo sur la loko de detruitaj remparoj. 2 Larĝa strato, borderita de arboj, en vivplena, komerca parto de urbo. ☞ aleo, avenuo.

bust/o 1 Supera parto de la homa korpo, kun la kapo kaj la brusto. 2 Skulptaĵo prezentanta ĉi tiun parton, ofte sen la brakoj. ☞ torso, trunko. → talio.

kame/o Gemo reliefe skulptita, en kiu oni utiligas la diversajn kolorojn de la tavoloj, por nuanci la diversajn partojn de la skulptaĵo. ☞ intajlo, gliptiko. ~EB 38/2

cedr/o Genro (Cedrus el pinacoj) de koniferaj, monoikaj arboj kun vintrodaŭraj pingloj, unuopaj sur junaj ŝosoj, pluropaj sur ŝosetoj, kaj kun konusoj staraj, cilindro- aŭ barel-formaj; 4 specioj el la montaroj de N Afriko ĝis Azio, forstumataj por neputrema ligno, ĝardene kultivataj por ornamo kaj liverantaj esencon. ~EB 356/65; ~BeE 190/65

cejan/o Specio de centaŭreo (Centaurea cyanus), tre konata trudherbo en grenkampoj de Eŭropo kaj Azio, kun intense ĉielbluaj floroj kaj lancetformaj folioj. → cejanbluo, ciano. ~EB 63/1; ~BeE 214/1

celenter-ul/o Primitiva marbesto kies sakforma korpo, ofte travidebla, naĝas per onda ritmo. ~EB 349/5; ~BeE 187/5

cidoni/o Genro (Cydonia el rozacoj) de falfoliaj trunkarbustoj kaj arboj kun simplaj, ovale korformaj, lanugaj folioj, kun kvinombraj, unuopaj rozaj aŭ roze blankaj floroj kaj kun fruktoj (berecaj ŝajndrupoj) bonodoraj, lanugaj, adstringaj. ~EB 357/18, 60/49/50; ~BeE 191/18, 211/52,53

cign/o ♂ Genro (Cygnus) de birdoj el la ordo de anseroformaj, kun tre longa fleksebla kolo, kun plumaro blanka ĉe iuj specioj: ☞ anaso, ansero. ~EB 257/46 343/16; ~BeE 84/54

cinabr/o Ruĝa sulfido de hidrargo, uzata kiel kolorilo, HgS.

cistern/o Rezervujo por pluvakvo, masonita en tero, por ke oni ĉerpu el ĝi, aŭ aranĝita sur la supro de konstruaĵo, por delasi la kolektitan akvon per tubaro. ~*EB* 64/54; ~*BeE* 80/4

ĉambelan/o Nobela oficisto, kiu zorgas pri la diversaj servoj en la ĉambro de suvereno. ☞ ĉambristo, kamerlingo.

ĉerk/o Kesto, en kiun oni metas la korpon de mortinto. ~*EB* 312/35; ~*BeE* 149/35

ĉir/o **1** Maldika, volva organo de grim paj plantoj, per kiu ili alkroĉiĝas. **2** ☞ Fadenforma apendica palpilo ĉe diversaj senvertebruloj, inter aliaj poliketoj, krinoidoj kaj brankiostomo. ☞ barbfadeno. ~*EB* 59/4, 80/4; ~*BeE* 209/4, 211/32

ĉiz/i (tr) ① Tajli aŭ kavigi per ĉizilo ĉian malmolan materion. ☞ ĉarpenti, haki, skulpti, cizeli. ~*EB* 115/71, 127/25; ~*BeE* 285/7

damask/o ④ Ŝtofo el silko, lino aŭ mercerizita kotono kun enteksitaj desegnoj, videblaj per rebrilo de lumo.

davit/o Turnebla argano sur ŝipoj, destinita por surakvigi, suprenlevi kaj pendigi boatojn. ~*EB* 216/45; ~*BeE* 376/27-30

debil \$ Perdinta siajn fortojn.

degn/i (ntr) Bonvoli, konsenti fari, sentigante tamen ian moŝtecan komplezon.

dekant/i (tr) Forverŝi likvon per iompostioma klinado de la ujo, ne movante la sedimenton, feĉon kaj similajn.

deklam/i Voĉlegi aŭ parkere reciti kun artisme taŭga tono.

deleg/i (tr) Sendi iun kiel reprezentanton. ~**itaro** Aro da delegitoj, komisiitaj por specifa tasko.

determin/i (tr) Precize fiksi ion necertan, indikante la limojn, inter kiuj tiu io estas entenata.

dilat/o Fenomeno, en kiu la amplekso aŭ la volumeno de gasa, likva aŭ solida substanco pligrandiĝas. ~**i** (tr) **1** Kaŭzi dilaton. **2** *Medicina termino*. Plilarĝigi orificon aŭ kavaĵon de organo; pligrandigi la diametron de dukto aŭ vaskulo.

dilem/o **1** Rezo, prezentanta alternativon inter du malsamaj aŭ kontraŭaj asertoj, kiuj ambaŭ kondukas al sama konkludo. **2** Alternativo, enhavanta du kontraŭajn proponojn, inter kiuj oni nepre devas elekti.

drapir/i (tr) Ornami, kovri per multfalda pendanta ŝtofo.

drol/a Komike stranga. Seke humora.

ebur/o Blanka kaj malmola substanco, kiu konsistigas la dentegojn de elefanto, hipopotamo, ktp.

ĉhinoderm-ul/o Iom primitiva marbesto kun karapaco kies stelforma korpo kroĉas sur rokoj. ~*EB* 349/11; ~*BeE* 187/11

eksces/o Ago transpasanta la limojn de modereco, sobereco, justeco, humaneco. ☞ diboĉo, maljustaĵo, perfortaĵo, supermezura.

ekskuz/i (tr) Prezenti motivon aŭ pretekston, por havigi pardonon pri kulpeto. ☞ senkulpigi.

ekskvizit/a Tre ege altkvalita laŭ artista desegno, materiala konstruo. Esprimanta la plej puran modon.

ekstravaganc/o Ago aŭ parolo kontraŭa al la komuna saĝo, sensenca strangaĵo. ~a Kontraŭa al la komuna saĝo, sence stranga.

ekzalt/i (tr) Tre eksciti, levante la sentojn ĝis alta grado de intenseco.

ekzorc/i (tr) Elpeli el vivanto malbonan spiriton, demonon ks, per magia formulo en formo.

eliksir/o 1 ☞ Likva medikamento, solvaĵo de unu aŭ pluraj substancoj en alkoholo. 2 Alkemia preparaĵo, por ŝanĝi metalojn en oron, aŭ por senfine daŭrigi la vivon. ☞ panaceo.

emajl/o Vitrosimila diverskolora substanco, per kiu oni kovras potojn, fajencon, metalon per bakado je alta temperaturo.

entablement/o Parto de konstruo, kiu apogiĝas sur la supro de kolonoj kaj ilin kunligas.

epifit/o Planto, kiu kreskas sur alia planto, sed ne nutras sin el tiu ĉi.

epizod/o 1 ♣ Akcesora agado, ne strikte ligita kun la ĉefa temo, en rakonto aŭ poemo: la lastaj ses libroj de Eneado estas plenaj de epizodoj. 2 Aparta kurioza fakto en historia aŭ grava okazintaĵo. ☞ incidento.

epolet/o ✂ Militista surŝultra ornamaĵo, ordinare montranta la rango. ~EB 247/6; ~BeE 38/38

erod/i (tr) Eluzi, elfroti, malakrigi, plej ofte per la frotado de vento, akvo aŭ kemiaĵo.

erik/o 1 Genro (Erica el erikacoj) de plantoj—daŭrafoliaj arbustetoj, tufarbustoj k kelkaj trunkarbustoj — kun folioj densaj, ĝenerale verticilaj, pingloformaj kaj kun floroj multanombraj, ofte malgrandaj, ruĝaj, blankaj aŭ flavaj, kloŝ-, kruĉ- aŭ tub-formaj, 4-nombraj, unuopaj aŭ en apeksaj umbeloj aŭ spikoj; ĉ. 735 sp-oj el Eŭropo, la Mediteranea regiono, Makaronezio kaj Afriko, multaj pororname kultivataj. ~EB 361/19 2 Ĉiu arbusteto aŭ arbusto el la genroj Erica kaj parencaj g-oj, precipe kaluno. ~ejo Nekulturata loko, kie kreskas precipe eriko.

erp/i (tr) Skrapi kampon, disrompante la terbulojn per tiucela instrumento. ~EB 68/35,36

eskal/o Vertikala ŝtuparo, plej ofte el du vertikalaj fostoj kun pluraj horizontalaj rungoj. ~EB 1/43, 216/14; ~BeE 125/8, 375/78

eskatologi/o ☹ Doktrino pri la fina sorto de la homoj k de la mondo. → apokalipso.

esplanad/o 1 ✂ Libera spaco, apartiganta citadelon disde la urbo. 2 Vasta ebena loko antaŭ monumentoj, por publika promenado.

eŭforbi/o Genro (Euphorbia el eŭforbiacoj) de plantoj, foje kaktosimilaj, foje laktosukaj, ofte kun

brilaj folioj. El la radiko de unu speco produktiĝas medikamento emetina.

eŭnuk/o Kastrita viro, servanta kiel gardisto de haremo, kiel oficisto en regnaj aferoj de Bizanca aŭ orientaj kortegoj, aŭ kiel kantisto.

fad/o ⚔ Fenomeno, konsistanta el sinsekvaj plimalfortiĝoj aŭ plifortiĝoj de aŭdebleco en radioriceviloj. **flagra ~o** Tre mallonge daŭranta kaj rapide intermitanta fado. **~i** (ntr) Malfortiĝi kaj malaperi pro fado.

fajenc/o **1** Speco de argila tero, el kiu oni faras ceramikaĵojn: la fajenco bakiĝas je 800° C. → grejso, porcelano. **2** Materialo, bakita kaj glazurita, farita el tiu tero.

fajf/i (tr: melodion kaj simile) Produkti akutajn sonojn muzikajn, blovante tra rondigitaj lipoj k laŭ kavigita lango.

fajl/i Ebenigi aŭ glatigi metalon, lignon k.a., skrapante ĝian supraĵon per fajlilo. ☞ cizeli. ~EB 134/8,22,23; ~BeE 293/20,32,34

falbal/o Larĝa rubando aŭ ŝtofostrio krispe alkudrita je la malsupro de robo, jupo, subjupo, por ĝin ornami. ~EB 32/30; ~BeE 35/50

falk/o ♂ Genro (Falco) de rabobirdoj kun malgranda korneca dento ambaŭflanke de la supra duonboko; unu specio (ĉasfalko) servas por ĉasi malgrandajn bestojn. ☞ aglo, akcipitro, milvo, nizo. ~EB 347/1-2; ~BeE 177/4

farĉ/o Hakita kaj spicita viando, legomaĵo aŭ fruktaĵo, kiun oni enmetas en la internon de bakota besto (ekz. ansero), de kuirota legomo (ekz. kukumoj, kukurbetoj, tomatoj ks), de alia kuirotaĵo, bakaĵo aŭ de ĉokoladaĵo. **~i** Plenigi la internon de manĝaĵo per farĉo.

feston/o **1** Ornama girlando el kunplektitaj floroj, folioj, branĉetoj, rubandoj ks kurbe pendanta inter du alkroĉopunktoj. **2** Ornamaĵo imitanta tiajn festonojn, en arkitekturo, potdekoracio kaj similaj. **3** Ornamaĵo de rando de ŝtofo, formita per regulaj arkoformaj dentetoj, ordinare broditaj: elegante festonita ĉemizo; unu el tiuj nepriskribeblaj tualetoj, kie punktoj kaj bantrozetoj, faldoj kaj festonoj kuniĝis en mirinda senordeco. **~i** (tr) Ornami per festonoj.

fatras/o Aro da ne plu utiligeblaj senvaloraĵoj en plena konfuzo. ☞ pelmelo, tohuvabohuo, miksofoto.

filigran/o **1** Delikata aĵura teksaĵo el oraj aŭ arĝentaj fadenoj. **2** Ⓟ Travidebla desegno, marko en papero. ~EB 38/16, 101/30; ~BeE 254/30

filik/o Plurjaraj herboj kun rizomo kaj plej ofte kun tre dividitaj folioj. ~EB 361/16

flak/o Malgranda kvanto da akvo aŭ alia likvo, staranta en surfaca kavo (ekz. sur vojo post pluvado).

flos/o **1** Aro aŭ kunaĵo da arbaj trunkoj, ĵetitaj en riveron por ke la fluo ilin transportu: ni hakos lignon, kaj ni sendos ĝin al vi per flosoj sur la maro. **2** Similspeca traba kunaĵo, konstruita por transporti homojn aŭ diversajn materialojn, aŭ kiel savaparato sur ŝipo ~EB 266/2, 221/45

flut/o 🎷 Blovinstrumento, konsistanta el ligna aŭ metala tubo kun truoj. ~EB 302/31; ~BeE 141/32

fojn/o Matura herbo, kiun oni falĉas kaj sekigas ĉe la suno, por ĝin konservi kiel nutraĵon por la brutoj. ~**kolora** Pale, hele flava. ~*EB 65/35-43*

foir/o Granda komerca kunveno, ofte kun distraĵoj, kiu okazas en fiksita periodo kaj loko por vendado de brutoj, agrikulturaĵoj, industriaĵoj ktp.

fragmit/o Plurjara herbo kiu kreskas ĉe marĉoj kaj ĉe marbordoj, kaj kies tigojn (longajn je kelkaj metroj) oni uzas por tegmentoj, balailoj, matoj, ktp.

frakas/i (tr) Perforte kaj brue disrompi, dispecigi.

franĝ/o Ornamo, konsistanta el dense kunmetitaj, libere pendantaj fadenoj, plejofte surkudrita sur galono k uzata por borderi randon de vesto, subon de tapeto, ŝalon ktp. ☞ fimbrio, galono, kvasto, peniko. ~*EB 52/12, 336/25; ~BeE 161/25*

frivol/a Malserioza, bagatela, vanta.

fut/o Mezurunuoj de longo, egala al tio de homa piedo.

gabl/o Supra triangula parto de muro, sur kiu sin apogas la firsta kaj mezaj partoj, laŭ la deklivo de la tegmento. ~*EB 39/15a, 116/3, 117/25; ~BeE 275/25, 44/11*

gagat/o Variaĵo de nigra, brila lignito, uzata por juveloj. ☞ grafito, diamanto.

gajl/o Ŝvelaĵo pro nenormala kreskado de planta histo, kaŭzita ĝenerale de parazitaj. ~*EB 82/34,37,40; ~BeE 235/38*

galber/o Komuna nomo por du similaj arbustoj (*Ilex coriacea* kaj *Ilex glabra*) el la familio ileksoj (*Aquifoliaceae*), ambaŭ kun nigraj beroj kaj el kiu oni faras mielan siropon.

gargojl/o Elstaranta kanaletoj, ofte skulptita en formo de vomanta besto aŭ homo, el kiu la akvo de tegmentoj falas eksteren, distance de la muroj. ☞ defluilo, vomtubo. ~*EB 317/30; ~BeE 154/31*

garn/i (tr) **1** (iu) Almeti ion al objekto, por ĝin ŝirmi aŭ plifortigi. **2** (iu) Almeti ion al objekto, por ĝin kompletigi laŭ ĝia destino. **3** (iu) Almeti akcesoraĵon al objekto, por ĝin ornami. **4** (io) Servi por garni.

gelaten/o **1** Senforma, travidebla, flaveta, duonsolida substanco (proteino sub formo de ĝelo), fandiĝanta ĉ. 25°C, ricevata per agado de varma akvo sur bestajn histojn (precipe ostojn). **2** Simila substanco, ekstraktata el iuj vegetaĵoj.

gir/i (ntr) Rondire turniĝi.

girland/o Ornama kunplektaĵo el floroj k folioj, en formo de kurba ĉeno. ☞ festono. ~*EB 289/17; ~BeE 124/14*

glim/o Silikata mineralo, kun metala brilo, facile tavoloĝanta je travideblaj lamenoj.

grapl/o ↕ **1** Speco de malgranda ankro kun multe da brakoj. **2** Similforma ilo, por hoki objektojn sur la fundo de rivero, lago ktp kaj eltiri ilin.

graŭli (ntr) Kolermurmuri, grumbli, murmuregi. Minaci hunde per gorĝa sono kaj levo de lipoj por montri dentojn.

grif/o Fabela besto kun aglaj kapo kaj flugiloj, kak leona korpo. ~EB 307/11; ~BeE 145/13

grog/o Varma drinkaĵo el brando aŭ rumo, sukerita akvo kaj citrono.

grotesk/a Presentanta formojn strangajn, eĉ monstrajn, kiuj elvokas la ridon.

gvat/i **1** Kaŝe, ŝtelume observi, atendi. **2** Deĵore observi.

haladz/o Malbonodora, malsaniga gaso, eliĝanta el putraĵo ktp.

hamstr/o ♂ Malgranda mamulo (Cricetus kaj parencaj genroj) el la ordo de ronguloj, kun vangoj ŝanĝiĝintaj al saketoj, en kiuj ĝi portas manĝaĵojn; ĝi ankaŭ kolektas manĝaĵojn por la vintro en subteraj kavaĵoj; loĝas en C k E Eŭropo k Azio: granda hamstro (Cricetus c.), kun mallonga vosto; ora hamstro (Mesocricetus auratus), kun preskaŭ nevidebla vosto; migra hamstro (Cricetulus migratorius), tre malgranda, kun mallonga vosto. ~i Amasigi al si provizojn, nutraĵojn, ofte en neleĝa maniero, precipe pro timo al krizo, striko, milito ktp. ☞ ŝakri. ~EB 351/16; ~BeE 184/19

hant/i (tr) Vizitadi tiel ke iu loko fariĝi timiga. Precipe (sed ne necese) temas pri fantomo. ~iĝa La sento de io nenatura.

harmon/o Oscilo, kies frekvenco estas entjera oblo de la baza frekvenco. **super~** Kromaj osciloj kaj duoble, kaj donone de la baza kaj aŭdata samtempe kun tio.

harpun/o Sagforma lanco, provizita per longa ŝnuro kaj uzata por kapti grandajn fiŝojn, balenojn ktp. ~EB 90/53-55, 309/3, 336/10; ~BeE 93/24, 146/3, 161/10

heliotrop/o Genro (Heliotropium el boragacoj) de plantoj—unu- kaj plur-jaraj herboj kaj arbustetoj — kun blankaj, hele bluaj aŭ viole rozaj, kelkfoje odoraj floroj unuopaj aŭ en skorpioida cumo.

heraldik/o Scienco pri la blazonoj.

herez/o Doktrino aŭ opinio, kontraŭa al iu religia dogmo k tial kondamnita de iu eklezio.

hiperbol/o **1** Δ Duagrada kurbo, kies fokusdiseco estas supera al 1. ☞ koniko. → sinuso.
2 ♣ Retorika figuro, konsistanta en esprimo pli drasta aŭ pli energia, ol la ideo, kiun oni intencas komprenigi.

homonkul/o Hometo, kiun alkemiistoj kreis en retorto.

hul/o Mara ondomovo estiĝanta sen ŝaŭmrompiĝo.

hitin/o Ĉefa konsistaĵo de la ekzoskeleto de la artropodoj. Ekzemple: krustacoj, araneoidoj, miriapodoj kaj insektoj.

hul/o Monstro kun homa formo kiu loĝas ĉe tombejoj kaj manĝas la korpojn de mortintuloj, eble pretermorta homo aŭ mortinta homa korpo enloĝata de malbona spirito.

ident/a Tiel sama, ke oni ne povas percepti ian diferencon.

impet/i (ntr) Forte k vive sin ĵeti antaŭen. ~o Granda puŝforto; energio de la antaŭenmovado.

implic/i (tr) Logike enteni, enhavi en si ion ne formale esprimatan.

impres/o Influo sur la sensoj aŭ la psiko. ☞ efekto. ~i (tr) Estigi, fari impreson sur.

imun/a 1 ♀ (pp organismo) Denaske aŭ (jen spontane, jen estige) akirinte rezistecon kontraŭ aparta mikrobo, veneno aŭ toksa. 2 ⚔ Ne respondeca antaŭ la leĝo, ŝirmata per leĝa privilegio. ☞ eksterteritoria. → tabua. 3 ⓘ Ŝirmata kontraŭ ia difekto, danĝero kaj simile pro sia konsisto, materialo, konstruiĝo aŭ antaŭpretigo.

incens/o Nomo de kelkaj specoj de rezinoj, brulantaj kun bonodora fumo kaj uzataj en religiaj ceremonioj. Sin. odorfumo. ☞ mirho, olibano, parfumo, stakto.

indig/o Malhelblua koloraĵo, antaŭe ekstraktita el indiguo, nuntempe sinteze preparita.

ingest/i Enigi en la stomakon per la buŝo.

ingven/o Parto de la korpo, inter la malsupro de la ventro kaj la femuro; fleksfaldo inter femuro kaj ventro.

intest/o Parto de la nutrokanalo de post la stomako ĝis la anuso. ~EB 22/14-22; ~BeE 23/17

iriz/a Prezenta tiajn kolorojn, kiuj sanĝiĝas laŭ la pozicio de la observanto.

jard/o Mezurunuo de longeco egala al tri futoj (iomete mapli ol metro).

jele/o Duonsolida k tremetanta maso, ricevita post malvarmiĝo de kuirita sukerita fruktosuko: ĵeleo el pomoj, riboj kaj similaj. ☞ konfitaĵo, gelatenaĵo.

ĵig/o Viva angla danco, kaj muzikpeco por tiu.

kaban/o Tre simpla dometo, konstruita el krudaj, ne ĉiam fortikaj materialoj, kaj uzata kiel provizora aŭ konstanta loĝejo.

kahel/o Plato el bakita k glazurita argilo aŭ simila materialo, uzata por pavimi aŭ tegi. ~EB 41/51; ~BeE 57/19

kajut/o Surŝipa aŭ enaviadila ĉambreto por ŝipanoj, pilotoj aŭ pasaĝeroj. ~EB 218/29,30; ~BeE 102/4

kaldron/o Granda metalvazo por kuiri, boligi kaj similaj. ☞ kuirvazo.

kalot/o Δ Segmento de sfero, limita de nur unu cirklo. ☞ zono

kandelabr/o Luksa plurbranĉa kandelingo.. ☞ lustro. ~EB 44/24, 312/56; ~BeE 52/10

kaprioli Kaprica, petola salto en kapra maniero.

karbig/i Transformi organikajn substancojn en karbon per varmo.

karneol/o ⊕ Ruĝa aŭ oranĝe ruĝa var. de kalcedono, uzata kiel juvelŝtono.

karusel/o **1** Festa turniro, kie kavaliroj aŭ rajdistoj turniĝe k artisme manovras. **2** Ĉia amuzilo, ĝenerale en kermesoj, bazita sur turniĝoj de sidiloj aŭ pseŭdoveturiloj; (ss) porinfana amuzilo, konsistanta el lignaj rajdobestoj kaj seĝoj, metitaj sur granda ronda plataĵo, kiu turniĝas ĉirkaŭ sia akso. ~EB 292/2; ~BeE 126/15

katalepsio Ĉeso de volaj movoj, kaŭzanta konservon de sinteno aŭ pozicio (en skizofrenio aŭ hipnoto).

kiraso/o **1** ☞ Metala, iufoje leda armaĵo, ŝirmanta la bruston kaj dorson. **2** ✂ Aro de ŝtalaj platoj, fiksitaj sur militŝipo por ĝin ŝirmi kontraŭ pafaĵoj. ☞ blendo. **3** Ĝenerala nomo de osta, korna, kalkeca aŭ kitina tegaĵo, konsistanta el unu aŭ pluraj pecoj, enfermanta la korpon de diversaj animaloj, ekz. testudo, krustacoj, kaj kies dorsa parto ofte nomiĝas karapaco. ~ulo Kavaleriano armita per kiraso. ~EB 310/38 & 76; ~BeE 147/38 & 76

kist/o § Tumoro, konsistanta el membrana veziko kaj entenanta likvon aŭ grasajon. ☞ cisto

kloŝ/o Ujo, kun ĝenerala formo de sonorilo, uzata kiel ŝirmilo aŭ kovrilo. ~EB 107/64; ~BeE 48/6

kobold/o ☉ Feo, kun ofte petola humoro.

kompendi/o Mallongigo de la tutaĵo de scienco aŭ doktrino.

koncertin/o Sesangula akordioneto. ~EB 303/36

konfisk/i (tr) **1** ⚖ Forpreni k alproprigi al la ŝtato per justica aŭ administra proceduro por puni iun. **2** Forpreni de iu laŭ rajtigita aŭtoritato ion malpermesitan aŭ senrajte posedatan.

konk/o ♂ Kalka tegaĵo de multaj moluskoj. ☞ karapaco, pekteno, ŝelo. ~ulo Konkoporta molusko. ~EB 340/25; ~BeE 176/30

konkub/o Viro edzece vivanta kun virino, kun kiu li ne estas edzigit. ~ino Virino edzinece vivanta kun viro, kun kiu ŝi ne estas edzinigita. ☞ kromvir(in)o, kromedz(in)o.

konsult/i (tr) **1** Demandi specialiston por ekscii ties opinion pri iu punkto. **2** Serĉi informojn en tiucela faka libro.

kontuz/i (tr) Pli-malpli profunde lezi la korpon per neakra objekto, tiel ke estiĝas hemoragio, kiu infiltriĝas en la histojn.

konvulsi/i § Senvolaj kaj momentaj kontraĥiĝoj de diversaj muskoloj.

korod/i (tr) **1** ☞ Kemie difekti la surfacon de io: akvo korodas metalojn; fero korodita de rusto; koroda acido, sublimaĵo. ☞ alteracii, mordi. **2** Iom post iom detruui, elmordi.

korset/o **1** Laĉebla subvesto, garnita per bartoj, kiun la virinoj portis por subteni la bruston kaj lumbon. ~EB 33/23; ~BeE 37/23 **2** Samforma ŝirmvesto el metalaj strioj portata de antivaj soldatoj por gardi la torson.

kotorn/o Ŝuo de antikvaj tragediaj aktoroj, kun tre alta plandumo.

kramf/o Muskola spasma, dolora kaj portempa.

kredit/i (tr) Enskribi en la konton de iu ĉion, kion oni ŝuldas al li. ☞ debeti.

kribr/i (tr) Apartigi per multatrua instrumento la dikajn erojn de solidaj materioj disde la pli maldikaj aŭ subtilaj eroj. ☞ filtri. ~i Multetrua instrumento por kribri.

krokiz/i (tr) Rapide skizi per kraĵono, plumo aŭ peniko, prezentante nur la karakterizajn trajtojn de la modelo, ordinare sen intenco tion poste kompletigi.

kupol/o Tegmento de konstruaĵo en formo de renversita kaliko. ~EB 318/43; ~BeE 153/72

Kunaĵo el mallongaj fadenoj lanaj aŭ silkaj, en formo de tufo aŭ peniko, kiu servas kiel ornamo por vestoj aŭ meblaro. ~EB 36/3

laks/o § Ellaso de ege molaj aŭ pli-malpli fluidaj fekoj. → disenterio, koliko. ~etiga ☞ Uzata por kontraŭi konstipon.

langvor/o Malvigleco, malstreĉiĝo de la korpaj aŭ animaj fortoj, sen difinita kaŭzo. ~a Malrapide moviĝanta, malema al ekzerciĝo, ne interesiĝanta al la ekstera mondo.

lard/o Grasa substanco, entenata en la subhaŭta histo de la dorso aŭ flanko de porko, uzata en kuirado kaj farmacio. ☞ graso, sebo, ŝinko.

larik/o Genro (Larix el pinacoj) de falfoliaj, monoikaj pingloarboj kun maldikaj, molaj pingloj, unuj en fasketoj sur mallongaj, verukformaj ŝosetoj, aliaj unuopaj sur longformaj ŝosoj, kaj kun staraj, malgrandaj, ovoidaj konusoj, kiuj ofte restas sur la arbo dum pluraj jaroj.

laŭr/o Ornama arbo kun ledecaj, larĝe lancetformaj folioj, spice odoraj, sur mallongaj, ruĝecaj petioloj, kaj kun flavblankaj floroj monoikaj. ~EB 312/60

lavend/o Genro de daŭrafoliaj arbustetoj kaj kelkaj tufarbustoj kun folioj mallarĝaj, grizaj, haraj, integraj, dentaj aŭ plume diverse entranĉaj, k kun floroj intense bonodoraj, viole bluaj aŭ viole purpuraj. ~EB 364/7; ~BeE 198/7 ~blua Viole blua, kiel la floroj de la vera lavendo.

lent/o **1** Genro (Lens el fabacoj) de herboj kun alternaj, pare plume kunmetaj folioj finiĝantaj per ĉiroj aŭ pintoj po unu, kun malgrandaj, blankaj aŭ bluetaj floroj kaj kun mallongaj, plataj guŝoj 1—2-semaj, unujara, volvegrimpa herbo kun blankaj, verdaj aŭ ruĝbrunaj semoj tre nutraj; malnova kulturplanto en Azio kaj Eŭropo. **2** Semoj de tiu ĉi specio.

leŭg/o Malnova mezurunuo de longo, la distanco kion homo povas marŝi dum horo.

librum/o **1** Libro el apartaj folioj ne kudre aŭ glue binditaj, sed nur premitaj inter ledaj aŭ lignaj kovriloj. **2** Libro el apartaj folioj nur preme binditaj ĉe unu rando inter klapaj kovriloj. **3** Ajna libro el kiu individuaj paĝoj povas preniĝi sen detruigo kaj esti remetitaj kiel antaŭe.

liken/o Simbiozita kombino el fungo kaj algo, plejofte verde blua, kiu povas vivteni sur nuda roko en preskaŭ ajna klimato.

likvor/o Trinkaĵo, farita el brando, aromaj plantoj kaj sukero: la kartuziana, benediktana likvoroj; ovolikvoro, herbolikvoro; gencianlikvoro (aromigita per ekstrakto el radikoj de la flava genciano).

limul/o Mara artropodo (unuspecia genro *Limulus polyphemus*) el la subklaso de ksifozuroj, parenca al la trilobuloj, vivanta ĉe la E marbordo de N Ameriko; ĝia korpo konsistas el granda, duoncirkla cefalotorako («kapo»), malpli granda abdomeno, kaj longa, ponardoforma vosto. ⇨ trilobuloj.

liut/o 🎵 Malnova kordinstrumento, iom simila al mandolino. ~EB 303/1; ~BeE 142/1

livre/o Distinga vesto, ordinare kolora kaj galonita, kiun portas la servistoj de unu sama domo aŭ mastro. ⇨ uniformo.

lob/o Rondforma elstara parto de organo: *loboj de la cerebro*.

lozenĝ/o Romboforma objekto, plej ofte medikamenta pilolo.

lukr/i (tr) Perlabori kontraŭ pagado. ~o Enspezo ricevata de iu por lia laboro.

lun-bovido Idomo reference al superstiĉo, en kio oni kredas ke la luno povas difekti nakonton dum ankoraŭ en la utero. Sekve, ajna misa tumero en la utero. Naskiĝinto distinge malperfekta. Pri homo, unsulto indike pri difekta intelekto, troa naiveco. Alivorte, ‘stultulo’.

lustr/o Plurbranĉa pendlumilo. ⇨ kandelabro, lucerno. ~EB 45/30, 259/21; ~BeE 78/21

malversaci/o ⚖️ Fraŭda alproprigo de mono, en la plenumado de privata aŭ publika ofico.

marasm Malsaneca ekstrema malgraseco kaj senvigleco. ⇨ apatio, inerteco, kadukeco, paralizo.

marmor/o Tipo de ŝtono. Polurebla kalkpetro, tute grandkristala, ofte enhavanta kolorajn vejnojn pro malpuraĵoj, uzata en konstruado kaj skulpturo.

mejl/o Mezurunuo de longo. Miloble tiu distanco inter unu dekstra paŝo kaj sekva dekstra paŝo. Alivorte, du mil paŝojn.

melankoli/o Stato de konstanta sopira malgajeco kaj malvigleco.

menaĝeri/o **1** Loko, kie oni kolektas kuriozajn bestojn por esploraj celoj aŭ por elmontrado al la publiko. Sinonimo bestejo. **2** Tia kolekto da bestoj.

mikrot/o ♂ Genro (*Microtus*) de mamuloj el la ordo de ronĝuloj, familio de musedoj kun malhelkolora dorso kaj preskaŭ nevideblaj oreloj; la specioj de tiu genro similas cetere al musoj kaj ratoj, sed ne vivas ĉe homaj loĝejoj.

mim/o Aktoro, ludanta senparolan rolon kaj esprimanta sin nur per mienoj kaj gestoj.

mirh/o La sekiĝinta bonodora gumrezino el la trunkŝelo de du specioj de komiforo, uzata en parfumindustrio kaj farmacio. ⇨ incenso, olibano, balzamo.

mirtel/o **1** Specio de vakcinio (*Vaccinium myrtillus*), falfolia arbusteto kun angulaj, verdaj branĉoj, kun ovalaj, pintfinaj, dentrandaj folioj, kun unu- aŭ du-opaj floroj, havantaj preskaŭ globan,

verdete aŭ roze blankan korolon, kaj kun nigraj beroj (interne ruĝaj) kovritaj de blua prujnumo; en arbaroj kaj erikejoj de Eŭropo kaj N Azio, kultivata por manĝeblaj fruktoj vitaminriĉaj, kaj medicine uzata. **2** La bero de mirtelo. **mirtelbero** bero de mirtelo. ~EB 361/23; ~BeE 195/23

morion/o Hispan-stila kasko havanta feran kreston. ~EB 310/60

mucid/a Havanta ŝiman odoron aŭ guston.

mul/o Hibrido de azeno kaj ĉevalino. ~EB 74/8; ~BeE 224/8

naiv/a **1** Sensperte malkaŝema kaj kredema, kiel infano. **2** (io) Senartifika, ne montranta pripensadon aŭ spertiĝon.

nevus/o § Loka tubereto aŭ makulo de la haŭto, de pigmenta aŭ vaskula deveno.

niĉ/o Regulforma kavaĵo en muro aŭ konstruo, destinita por loki statuon, fornon aŭ alian objekton. ☞ alkovo.

nimf/o **1** Unu el la helenaj duondiinoj, loĝantaj en la maroj, riveroj, fontoj, arbaroj, aŭ servantaj al pli altaj diaĵoj. → driado, najado.

nomenklatur/o Terminaro de iu scienco aŭ arto. ~**iko** Scienco pri la nomado de la taksonoj. ☞ taksonomio.

nudibrah-ul/o Genro de molkorpaj gastropodaj moluskoj, ofte brile koloraj, kiuj folasas sian karapacon tuj post sia larva juneco.

oestr/o Fiziologia stato de ina mamulo dum la maturiĝo de la ovaria(j) foliklo(j) kaj ovulado. → seksardo.

omar/o ☞ Genro (Homarus) de dekpiedaj krustacoj, kies unua piedparo portas grandajn, fortajn pinĉilojn, kaj kiuj vivas en maro; ilia karno estas bongusta: ruĝa kiel kuirita omaro. ☞ karcino, krabo.

oniks/o Formo de agato kun regule alternaj hel- kaj malhel-koloraj zonoj, uzata en juvelarto. ☞ gemo, kalcedono.

ontologi/o Parto de la metafiziko, studanta la problemojn pri la esto ĝenerale, sendepende de ĝiaj ŝanĝaspektoj, k pri ĝia unua kaŭzo.

opi/o § Narkota substanco, kvietiga laŭ malgrandaj dozoj, venena laŭ grandaj dozoj, kiun oni ekstraktas el la sekigita laktosuko de opiopapavo.

organik/a Kemia termino rilata al la karbonkombinaĵoj, tiuj sur kio baziĝas vivantuloj.

orgojl/o Tro granda memŝato, ne sufiĉe pravigebla kaj akompanata de malŝato por ĉiu alia.

oriel/o Speco de elstara fenestro, precipe ĉe supra etaĝo. Sin. korbelfenestr.

ort/o Δ Angulo de 90°; kvarono de tuta revoluo. → ortangulo.

oscil/i (ntr) □ Balanciĝi alterne en kontraŭaj direktoj ĉirkaŭ ekvilibra punkto. ☞ balanci, luli, swingi, ŝanceli. ~o Ĉiu el tiuj alternaj balanciĝoj. ~ado Agado de korpo aŭ medio, kiu oscilas.

pantofl/o Hejma piedvesto, malpeza kaj oportuna, mola kaj komforta.

paradoks/o **1** Opinio, kontraŭa al la komune akceptita, kaj tial ŝajnanta ofte absurda, kvankam ĝi povas finfine montriĝi ĝusta. ☞ ortodoksa. **2** Φ Kontraŭdiro, al kiu kondukas en iaj okazoj abstrakta rezono.

parapet/o Mureto aŭ balustrado ĉe rando de profundaĵo, por evitigi la enfalon; randmureto. ~EB 310/21; ~BeE 147/21

pasteĉ/o Hakita spicita viando, fiŝo aŭ legomo, bakita en tegaĵo el (ofte foliigita) pasto aŭ en terpoto.

pavilon/o Izola konstruaĵo sur tereno, ĝardeno aŭ korto, dependanta de pli granda kaj ĉefa. ~BeE 154/43, 204/15; ~EB 54/2, 55/14

pean/o **1** Helena kanto por honoro de Apolono. **2** (f) Milita kanto de venko kaj ĝojo.

pedik/o ∅ Genro (Pediculus) de parazitaj insektoj el la ordo de anopluroj, senflugilaj, vivantaj sur kapo kaj korpo de homoj kaj aliaj vertebruloj. ~EB 341/31; ~BeE 233/41

pekl/i (tr) Meti viandon, fiŝon aŭ legomojn en salon, salpetron aŭ salakvon, por konservi ilin manĝeblaj.

pekten/o ∅ Genro (Pecten) de maraj moluskoj el la klaso de duvalvuloj, kun granda, ventumilforma konko, el kiuj la Jakoba pekteno (P. jacobaeus) estas bongusta manĝaĵo. ☞ mitulo, ostro.

pergamen/o Ŝaffelo, senharigita per kalko, ne tanita k tiel preparita por skribado. ☞ papiruso.

pergol/o Ĝardena konstruaĵo el kolonetoj subtenantaj maldense surmetitajn trabojn. ~EB 39/80, 54/5, 257/17; ~BeE 203/2, 45/23, 84/17

periferi/o Δ La rando de dudimensia geometria figuro. ☞ perimetro.

perlamot/o La interna, ĉielarĥe rebrilanta tavolo de la konko de certaj moluskoj. ~EB 340/32

pervers/a Inklina al malbonfarado. ☞ malica.

petol/i **1** Uzi sian troon da energio en sencelaj, viglaj sendisciplinaj movoj. **2** Agadi ŝerce, sendiscipline, senkonsidere, kontraŭ la reguloj de bonkonduco.

pig/o ∅ Specio de birdo (Pica pica) el la ordo de paseroformaj, familio de korvedoj, kun blanka kaj nigra plumaro kaj tre longaj vostoplumoj. ☞ korako. ~a Prezenta nigrajn kaj blankajn neregulajn makulojn. ~EB 346/3; ~BeE 179/16

pioĉ/o Hakfosilo, konsistanta el ligna tenilo perpendikla al fera stango, de kiu unu ekstremo estas pinta kaj la alia plata, uzata por fosi tranĉeojn kaj simile. ~EB 150/31; ~BeE 312/28

pist/i (tr) Pecetigi aŭ pulvorigi per ripetataj batetoj: pisti pipron, salon; pisti grenon al grio; pisti la

pecojn fajnaj. ☞ frakasi, maĉi, mueli, disbati → pistomiksi. ~EB 27/52; ~BeE 172/8

pled/i (ntr) Paroli antaŭ juĝisto, por defendi sian propran aferon aŭ tiun de sia kliento.

plur-edr/o Solido, limita de finia nombro da ebenaj pluranguloj. ~EB 330/6-11; ~BeE 174/6-11

poci/o **1** § Likva medikamento, pokulere trinkota. **2** Simila afero, ofte drogo, miksitaj fare de sorĉisto por efektiviĝi diversajn rezultojn.

poliandri/o Stato de virino havanta plurajn edzojn samtempe. ☞ poligamio, poliginio.

popl/o Genro de dioikaj, falfoliaj, ofte grandaj arboj kun longpetiolaj, larĝaj folioj, kun floroj en longaj, pendaj amentoj aperantaj antaŭ la folioj, kaj kun fruktoj enhavantaj lanugajn semojn po multaj ~EB 355/15,23; ~BeE 189/15

pore/o Kultivoformo de aliumo (*Allium ampeloprasum* gr. *Porrum*, sin. *A. porrum*), unu- aŭ dujara herbo kun malgranda, ne tre videbla bulbo kaj kun longaj, plataj folioj, ĉebaze formantaj specon de trunketo, kaj kun ĉirkaŭ 1m alta pedunklo, apekse portanta infloreskon el rozaj floroj; multe kultivata kiel unujara por la folioj manĝataj kuiritaj inter aliaj en supoj kaj salato: poreoj kun blanka saŭco. ☞ ampeloprazo, ajlo, bulbo. ~EB 59/21; ~BeE 209/21

poriĝ/o Manĝaĵo, farita per miksado de avena aŭ alispeca grio en lakto aŭ akvo, sukerita aŭ salita. Sin. avenkaĉo.

portik/o Galerio, kiu malfermiĝas, almenaŭ unuflanke, per kolonaro. ~EB 316/50,56; ~BeE 153/64

potiron/o Speco de kukurbo (*Cucurbita maxima*), kultivata por grandaj, pli-malpli globaj fruktoj, manĝataj kuiritaj. La oranĝa ŝelo tranĉeblas por fariĝi ornamaĵo, kun kandelo en la elfosita centro. ~EB 59/23; ~BeE 209/23

procesi/o Ceremonia marŝo de personoj, boatoj kaj similaj, irantaj en orda sinsekvo.

promontor/o Alta pinto de terlando, kiu elstaras en la maro. Kabego.

propet/i Interhelpi por havigi al iu pardonon.

prudent/a Kapabla juĝi la cirkonstancojn k laŭ tio ĝuste kondukti. ~o La kapablo esti prudenta.

puc/a Tro ŝarĝita de ornamoj malbongustaj.

puli/o ① Rado, kies rando estas destinita ricevi ŝnuron, rimenon, ĉenon kaj similaj. ☞ bloko, takelo, transmisiilo. ~EB 216/48; ~BeE 368/55

punĉ/o Varma aŭ malvarma trinkaĵo el alkoholaĵo (ekz. vino, rumo), sukero aŭ siropo, akvo (aŭ teo, fruktosuko) kaj aromaĵoj. ☞ sangrio.

punkci (tr) Trabori per nadlo la parieton de nenormala aŭ natura kavaĵo de la korpo, por elĉerpi la entenatan likvon.

Maldensa delikata plektaĵo el kotonaj, linaj aŭ silkaj fadenoj, kies maŝoj aranĝitaj laŭ metoda trikado, prezentas artajn desegnaĵojn. ~EB 101/18,30; ~BeE 254/18,30

pupitr/o Mebleto, prezentanta deklivon, sur kiun oni metas libron, kajeron, partituron, por pli oportune legi aŭ skribi. ~EB 250/4; ~BeE 148/2,37

puzl/o 1 ♠ Ludo, konsistanta el displitigitaj eroj, kiujn oni reordigu por rekonstrui bildon aŭ formon. 2 (f) Tre komplika problemo, kies donitaĵoj estas konfuze senordo.

ragu/o Vianda, legoma aŭ fiŝa manĝaĵo, longe kuirita en spica saŭco kun faruno.

rankor/o Obstina malpardonemo, daŭra venĝema sento.

rapunkol/o Specio de kampanulo (Campanula rapunculus) el Eŭropo, U Azio kaj N Afriko, dujara herbo, kun violete bluaj floroj en longa grapolo kaj kun karna, manĝebla pivotradiko, por kiu ĝi antaŭe estis kultivata.

rasl/o § Nenormala bruo, aŭdebla ĉe brustaŭskulto, kaj produktata de la aerpaso en la aervojoj, jen pro amasitaj likvoj, jen pro mallarĝiĝo. ☞ stertoro.

refektori/o Granda ĉambro por komuna manĝado, en monaĥejoj kaj simile.

reptili/oj ☹ Klaso (Reptilia) de vertebruloj kun ŝanĝiĝanta korpotemperaturo, spirantaj ĉiam per pulmoj, kaj kun korpo kovrita de kornecaj platoj kaj/aŭ skvamoj, kelkafoje kovrantaj ostajn platojn. ☞ amfibioj. ~EB 350/27-41; ~BeE 182/33-41

retret/o 1 Ceda returniro de armeo, kiu forlasis pozicion sub la premo de la malamiko. 2 Ajna retroa irado for de io malfrontinda aŭ de io jam venkinta.

rezidu/o 1 ⊕ Restaĵo el petroj, pasintece elmetataj al la agado de eksteraj fenomenoj, nek transportita nek sedimentita: rezidua arkozo, rezidua argilo (el argila reziduo de dissolvitaj kalkpetroj). 2 ⊕ Restaĵo. 3 ♁ Tio, kio restas el heredaĵo, post pagado de la ŝuldoj, impostoj kaj legacoj.

refut/i (tr) Venke rebati per trafaj argumentoj. ☞ kontesti, repuŝi.

rigor/a Senindulge severa

risort/o Elasta lameno aŭ fadeno el metalo aŭ alia materialo, kapabla repreni la antaŭan formon, post kiam ĝi estis fleksita, premita aŭ streĉita. ~i Ekmovi rapide kiel risorto liberigita. ~EB 166/38, ~BeE 345/67

ronĝ (tr) Mordi, uzante la dentojn kiel ĉizilon k forigante maldikajn pecojn: la ratoj ronĝas meblojn; (f) la venĝemo ronĝis lian koron. Sin. mordeti. ~uloj ☹ Ordo (Rodentia) de mamuloj plejparte grajnovoraj, kies makzeloj havas kurbe ĉizilformajn incizivojn nur po du. ☞ leporuloj ~EB 351/12-18; ~BeE 184/14

roj/o Mallarĝa kaj malprofunda rivereto. ☞ lirli. ~EB 13/8; ~BeE 14/9

rotond/o Ronda konstruaĵo kun kupolforma tegmento. ~EB 316/55

rustik/a Prezentanta simplan, eĉ krudan prilaboradon, kiu restigis multajn neregulaĵojn, malglataĵojn ktp.

sakrilegi/o ☉ Malrespekta ago kontraŭ sanktigita persono, objekto aŭ loko.

salik/o Genro (Salix el salikacoj) de dioikaj arboj kaj arbustoj kun folioj integraj aŭ dentetaj, ĝenerale mallarĝaj kaj defalemaj, kaj kun vir- kaj in-seksaj floroj senperiantaj, ariĝintaj en amentojn aperantajn antaŭ la folioj aŭ samtempe kiel tiuj ĉi. ~EB 355/15,24; ~BeE 189/24

sandal/o Piedvesto, konsistanta nur el plandumo ligita per ŝnuroj aŭ rimenetoj al la piedo. ~EB 100/6,29 & 266/13; ~BeE 58/51

salubr/a Favora por la sano.

salv/o Samtempa pafado de aro da pafarkoj, fusiloj, kanonoj, ktp.

sateno ▣ Teksaĵo silka, nilona, lana, kotona, de kiu unu flanko estas glata k brila, ricevita per neegala nodado de la vefto aŭ de la varpo.

scintil/i (ntr) Brili, lumetante de tempeto al tempeto kiel stelo tra la atmosfero.

sensori/o La centro de la sensaĵoj, pli speciale la cerbo.

sentimental/a Havanta aŭ afektanta romanecan sentemon.

ŝed/o Kruda ŝirmejo por brutoj, kamparaj uzaĵoj kaj similaj, konsistanta el tegmento subtenata de fostoj, ordinare sen flankmuroj. Se havanta murojn, tiuj estas sen insulaĵo kaj foje el plankoj inter kiuj estas spacetoj. ~EB 78/51, 56; ~BeE 215/32

sieĝ/i (tr) **1** Kolekti kaj restadigi militistajn trupojn ĉirkaŭ fortikaĵo, por preni ĝin. **2** (f) Ĉirkaŭi, minacante aŭ tedante.

simfit/o Genro de plurjaraj herboj kun skorpioida cumo el ofte pendaj floroj havantaj tubforman korolon. ~EB 339/45; ~BeE 193/45

sinkretism/o Φ ☉ Kunigo de diversoriginaj ideoj, tezoj aŭ kredoj en novan doktrinon.

sinekur/o Ofico, el kiu oni tiras profiton k honoron, kaj kiu postulas nenian aŭ tre malgravan laboron aŭ zorgon.

sinu/o Ĉiu el la kurbaĵoj, fleksoj de vojo, rivero kaj simile.

skabel/o **1** Benketo, uzata de sidanta persono, por apogi siajn piedojn. **2** Malalta seĝeto, sen dorsapogilo. ~EB 99/14

skarlat/o Brilega sangoruĝa koloro.

skorpi/o ♂ (kn) Artropodo el la klaso de araneoidoj, kun cefalotorako portanta paron da fortaj pinĉiloj kun 4 parojn da movaj membroj, kaj kun duparta abdomeno, antaŭ- kaj post-abdomeno, ĉi-lasta sessegmenta kaj finiĝanta per venena pikilo. ~EB 342/40; ~BeE 175/44


skvam/o Lameto leganta parton de la surfaco de diversaj bestoj. ~EB 350/11

sobr/a **1** Modere trinkanta kaj manĝanta. **2** ☆ ☼ Evitanta ĉiajn superfluaĵojn. **3** (f) Senpasia,

senpartia, singarda pri siaj emocioj.


somno/o Stato transiĝa inter dormo kaj maldormo.

sond/i (tr) Mezuri per tiucela aparato la profundecon de io.

sorb/i (tr) **1** (iu) Enspirante, entiri likvon aŭ fluidon en la buŝon aŭ nazon.  engluti. **2** (io) Entiri k reteni en sin.

spiral/o Δ Ebena kurbo, kiu pli kaj pli malproksimiĝas de sia deira centra punkto, rondirante ĉirkaŭ ĝi. ~EB 284/8; ~BeE 287/49

stabl/o **1** Tablo por metia laboro. **2** Subportilo por tabuloj, ĉarpentaĵo ks, konsistanta el trabeto portata de kvar piedoj aŭ de du artikigitaj kadroj, fikseblaj je difinita angulo. ~EB 121/40-44; ~BeE 281/31

stalaktit/o ⊕ Konkrecio ĝenerale el kalcito, produktata same kiel stalagmito, sed kreskanta vertikale malsupren de sur la plafono de kaverno.  stalagmito, gutoŝtono. ~EB 13/80; ~BeE 14/65

step/o **1** ☼ Herba, senarba vegetaĵaro (vs ekosistemo) de la mezvarmaj aŭ malvarmaj, sekaj regionoj, karakterizata de la plejkovreco de gramineoj. **2** Loko, ofte vasta ebenaĵo, kie kreskas stepo.

strab/i (ntr) **1** Ne povi direkti ambaŭ okulojn al unu sama punkto. **2** Rigardi de flanke, kun malica aŭ envia intenco. **3** Rigardi kun la palpebroj mallarĝigitaj (dum cerbumi) al imagbildo anstataŭ al la vera mondo.

stuc/i (tr) Forigi la ekstremajn partojn, la pintojn de branĉoj, folioj aŭ radikoj.

stuk/o Tavolo da mortero, almetata ekstere sur brikmuro aŭ interne sur plafonoj, muroj kaj vandoj por ŝirmo kaj izolo de la surfaco. ~EB 117/38; ~BeE 45/3

stump/o Nedifektita restaĵo el fortranĉita membro.

sufuz/i (ntr) § (pp organisma likvo, precipe sango) Elverŝiĝi el vaskulo (sango), el peritoneo (ascito), kaj disvastiĝi en la histojn.

sukcen/o Malmola flava diafana fosilia rezino, el kiu oni faras diversajn objektojn: ornamaj bidoj, buŝaĵojn de pipoj, juvelaĵoj enhavantaj kaptitan insekton. ~a Montranta la koloron de sukceso.

supl/a Malrigida, facile deformebla.

surf/o Ŝaŭmo kaj tumulto de maraj ondoj, kiuj rompiĝas sur borda sablaĵo aŭ rifo kaj fortege retroiras.

ŝalm/o **1** Kano, kavigita kaj borita per kelkaj truoj, per kiu muzikis antikvaj paŝtistoj. **2** Primitiva formo de fluto aŭ klarneto, kun anĉo kaj truoj. ~EB 301/13; ~BeE 140/4 & 14

ŝankr/o Ulcero de la haŭto aŭ de mukozo, kiu iĝas la enirpordo de iuj infektoj.

ŝelk/o Duobla rimeno, ordinare elasta, uzata por teni pantalonon aŭ iun subveston ~EB 31/52, 33/47;

ŝim/o Mikroskopa fungo aŭ oomikoto, havanta bone rimarkeblan micelion aŭ sporaron.

ŝveb/i **1** ♂ Resti kvazaŭ pendanta en la aero, kun etenditaj, ne moviĝantaj flugiloj. **2** ➔ Flugi ĉirkaŭe malrapide, ĉe proks. la sama nivelo, super la sama loko: la aviadilo ŝvebis super la aerodromo, atendente la alteriĝan permeson. ☞ glisi. **3** (io konkreta) Resti pendanta en aero, preskaŭ ne ŝanĝante la lokon.

taktik/o **1** ✂ Arto aranĝi kaj utiligi la armeojn sur la batalkampo. ☞ strategio. **2** Maniero, metodo, uzata por atingi celon.

talisman/o Luksaĵeto, plejofte gemo gravurita per astrologiaj aŭ kabalaj signoj, kiu laŭ iuj kredoj gardas la portanton kontraŭ malbono.

tamarik/o Genro (Tamarix el tamarikacoj) de falfoliaj trunkarbustoj kun malgrandaj, skvamecaj folioj kaj kun malgrandaj, rozaj floroj en spikformaj grapoloj; ĉ. 55 specioj el Eŭropo, Azio kaj Afriko, salejaj, kelkaj pororname plantataj.

tapet/o Ĉia materialo, led, tolo, papero, plasto kaj simile, per kiu oni maldikege tegas alian aferon, plejofte la murojn de ĉambro. ~i (tr) Kovri per tapeto.

tempo/o ♥ Ĉiu el la du flankaj partoj de la kapo, inter la frunto, okuloj, oreloj kaj vangoj. ~EB 18/6; ~BeE 19/12

teras/o Alta ebena teramaso, subtenata per masonaĵo kaj aranĝita en ĝardeno por ĝuigi belvidon aŭ faciligi promenadon.

terat/o § Grava fizika aŭ fiziologia anomalia; monstraĵo.

torf/o Materialo (petro) bruligebla, malpeza, spongeca, bruna, kiu estiĝas en marĉoj per malkombiniĝo de vegetaĵoj, precipe de sfagnoj. ~ejo Tereno en kies grundo sedimentiĝis torfo. Torfejoj evoluas el marĉoj. ~EB 13/18

torpor/o Stato de korpa k mensa malvigleco.

trezor/o **1** Amaso da oro, arĝento aŭ aliaj multekostaĵoj, rezerve tenataj. **2** ☆ Kolekto el relikvoj kaj valorplenaj piaĵoj, konservitaj en iu preĝejo. **3** (f) Io tre ŝatinda.

trident/o Forko, kun tri dentoj, iam antaŭe la emblemo de Neptuno, helena dio. ~EB 308/30

tril/o 🎵 Rapida, alterna ripetado de du sonoj, kiujn disigas nur tono aŭ duontono. Ruligita sono kia la konsonanto R en la itala kaj E-o. Simila sonfiko dum fajfi, kanti, ktp. ~i (ntr) Fari trilon.

tundr/o Malvarmklimata, precipe boreala malalta vegetaĵaro, karakterizata de arbustetoj, herboj, likenoj.

turmalin/o Mineralo en formo de romboedraj, triangulsekcaĵaj kristaloj, nigra, ruĝa aŭ blua, pli dura ol kvarco, malpli ol topazo; ĝi elektriĝas pro varmigo aŭ kunpremo.

uleks/o Genro de dornaj tufarbustoj kun folioj parte ŝanĝiĝintaj al apekse dornaj filodioj, kaj kun

flavaj, unuope akselaj floro.

ungvent/o Medikamenta kun firmeco de pasto, kion oni aplikas aŭ ŝmiras sur la haŭton.

velur/o Silka, kotona aŭ lana ŝtofo, prezentanta unuflanke densan teksaĵon, kaj aliflanke molan supraĵon konsistantan el multaj mallongaj, rekte starantaj brilaj haroj.

vertiĝ/o Tia sensaĵo de perdo je la ekvilibro k de turniĝa aŭ oscila movo, kiun povas kaŭzi troa fortostreĉo, vido de proksima profundegaĵo k diversaj afekcioj.

viscer/o ♥ Ĉiu organo lokita en la kranio, brusto aŭ ventro; internaĵo. ~EB 22/1-57; ~BeE 23/1-41

vitriol/o 1 ☉ (ark.) Kunmeto de pluraj sulfatoj: blua vitriolo, CuSO_4 ; verda vitriolo, $\text{Fe}_2(\text{SO}_4)_3$; blanka vitriolo, ZnSO_4 . 2 (ark.) Koncentrita sulfata acido, H_2SO_4 . ~oleo ☉ (ark.) Vitriolo 2.

vizi/o 1 § Vidosensa halucino. 2 ⊖ Objekto aŭ sceno, kiun dia revelacio vidigas al profeto. 3 Imaga sceno de la futuro fare de iu kiu pripensas novegan ideon.

volut/o Spiralforma ornamaĵo en konstruaĵoj aŭ sur kapoj de arĉinstrumentoj. ~EB 302/17, 315/26, 316/23; ~BeE 152/26, 153/29,40

vortic/o La geometria figuro de kirla rotaciado, longiĝanta kaj maldkiĝanta en sia etendiĝo el loko de pleno al apuda loko de manko. ~BeE 8/33

zekin/o Moneroforma ornamaĵo, el arĝento aŭ straso, alkudrita al virina vesto.

zelot/o 1 Ano de iama hebrea subgrupo milite aktiva pri religia politiko. 2 Fervora kaj obstina adepto de ia ajn doktrino. ☞ fanatika.

zenit/o 1 La punkto sur la ĉiela sfero, situanta vertikale super la kapo de observanto. ☞ nadiro. 2 (f) Plej alta grado: lia famo estas ĉe la zenito. ☞ apogeo, kulmino, paroksismo, egeco.

Du Plusaj Rakontoj

Jen plusa, duparta rakontaro tradukita el la dua libro ankoraŭ nur parte tradukita. Tiun ĉi rakonton vi povas bone legi memstare. Ĝuu.

Tradukitaj el la angla: Vance Integral Edition, ISBN 0-9712375-1-4, Volumeno 35 el 44, Ĉapitro 5, partoj 1 kaj 2.



Rakontaro 5

De Káspara Vajtáco al Kvirnifo

Parto 1 La Dek Sep Virgulinoj

La ĉaso etendiĝis longe je distanco kaj tempo, kaj kondukis en tiun **mornan** lokon el ostokoloraj montetoj nomataj la Palaj Sulkegoj. Kugel fine uzis ruzan trompon por konfuzi ĉasadon, glitante de sur sia rajdobesto kaj kaŝanta sin inter la rokoj dum liaj malamikoj preter-kuregis ĉasante la rajdantomankan beston.

Kugel kuŝis sinkaŝe ĝis post la kolera bando reiris al Káspara Vajtáco, disputantaj inter si. Li eliris de sia kaŝloko; kaj tiam, post skui la pugnon kaj krei malbenojn al la nun malproksimaj figuroj, li turniĝis kaj daŭrigis sian vojon suden tra la Palaj Sulkegoj.

La regiono estis tiom akre malplena kaj tiom malĝojiga kiom la surfaco de mortinta suno, kaj pro tio evitita de tiaj estuloj kiaj sindikoj, ŝámboj, érboj kaj víspoj, kio estis por Kugel ununura kaj melankolia fonto de plaĉeco.

Paŝon post paŝo marŝadis Kugel, unu gambo metita antaŭ la alia: supren laŭ deklivo por superrigardi senfinan sinsekvon da senvivaj ondaj montetoj, malsupren refoje en la malplenejon kie maloftega akvo tralikis por nutreti malfortan vegetaĵaron. Ĉi tie Kugel trovis **aliumon**, **lapon**, skŭálíkson kaj fojfojan **trituron**, kio sufiĉis kontraŭ malsatego.

Tago sekvis tagon. La suno leviĝanta malvarmete kaj malbrile naĝis supren en la malhele bluan ĉielon, de tempo al tempo ŝajnanta flagri kun tavolo el blu-nigra rebrilo, finfine sinkante kiel enorma purpura perlo je la okcidento. Kiam mallumo faris, ke plua irado ne eblis, Kugel volvis sin en sia mantelo kaj dormis tiom bone kiom cirkonstancoj permesis.

Posttagmeze je la sepa tago Kugel lame malsupreniris deklivon en malnovegan fruktarbokampon. Kugel trovis kaj manĝegis kelkajn duone elsekiĝintajn sulko-pomojn, poste ekiris laŭ la postsigno de antikva vojo.

La vojaĵo etendiĝis je mejlo, por konduki al klifeton super larĝa ebenejon. Tuj sube, rivero preterfluis malgrandan urbeton, kurbiĝis for al la sudokcidento kaj fine malaperis en **brumo**.

Kugel spektis la pejzaĝon kun akra atento. Malproksime sur la ebenejoj li vidis zorge bontenatajn ĝardenojn, ĉiu precize kvadrata kaj el ekzakte sama grandeco; laŭlonge je la rivero drivis boateto de fiŝkaptisto. Trankvila sceno, pensis Kugel. Aliflanke, la urbeto estis konstruita laŭ stranga kaj antikva arĥitekturo, kaj la zorgega precizeco laŭ kio la domoj ĉirkaŭis la placon sugestis similan nefleksiblecon pri la ĉeloĝantoj. La domoj mem estis ne malpli unuformaj, ĉiu estante konstruaĵo el du, aŭ tri, aŭ eĉ kvar dikaj globaĵoj el malpligrandigantaj dimensioj, unu sur la alian, la plej suba ĉiam farbita blue, la dua malhele ruĝe, la tria kaj kvara respektive malhele mustard-**okre** kaj nigra; kaj ĉiu domo finiĝis per spiro el ornamege torditaj feroj stangoj, el diversaj altecoj. Hotelo sur la riveroflanko montris dezajnon iom mapli striktan kaj facilan, kun plaĉa ĝardeno ĉirkaŭa. Laŭlonge je la rivero oriente Kugel nun atentiĝis pri la alveno de **karavano** el ses alt-radaĵoj, kaj lia malerteco disfandiĝis; la urbeto estis evidente tolera pri fremduloj, kaj Kugel memfide ekmalsupreniris la monteton.

Ĉe la vilaĝa malcentro li haltis kaj elprenis sian malnovan monujon, kiun li estis konservinta malgraŭ tio, ke ĝi pendis malstrikte kaj malplene. Kugel ekzamenis la enhavon: kvin tercoj, kvanto apenaŭ sufiĉa por liaj bezonoj. Kugel pripensis momenton, poste kolektis manplenon da ŝtonetoj, kiujn li faligis en la monujon, por krei konvinkan rondecon. Li senpolvigis sian pantalonon, ĝustigis sian verdan ĉasistan ĉapelon, kaj antaŭeniris.

Li eniris la urbeton sen kontesto aŭ eĉ atento. Transirante la placon, li haltis por inspekti kunmetaĵon eĉ pli kuriozan ol estis la malordinara arĥitekturo: ŝtona farjo-fosaĵo, en kio kelkaj fostegoj brulis alte, ĉirkaŭita de kvin lampoj sur feraj stangoj, ĉiu kun kvin meĉoj, kaj super komplika interligaĵo el speguloj kaj lensoj, pri kio la kialo preteris la komprenon de Kugel. Du junaj viroj prizorgis la aferojn kun diligenteco, tondetantaj la dudek kvin meĉojn, instigantaj la fajron, ĝustigantaj ŝraŭbojn kaj regstangojn, kiuj siavice regis la spegulojn kaj lensojn. Ili portis ion, kio ŝajnis esti la ĉiloka vestaro: volumaj bluaj ĝis-genuaj pantalonoj, ruĝaj ĉemizoj, latun-butonaj nigraj veŝtoj kaj larĝ-randaj ĉapeloj; post seninteresitaj rigardoj ili neniom atentis al Kugel, kaj li daŭrige almarŝis la hotelon.

En la flanka ĝardeno dek du el la urbetanoj sidis ĉe tabloj, manĝantaj kaj trinkantaj entuziasmege. Kugel rigardis ilin dum unu aŭ du momentoj; ilia ceremoniemo kaj elegantaj gestoj sugestis pri manieroj el epoko longe pasinta. Kiel iliaj domoj, ili estis el tipo unika al la sperto de Kugel, palaj kaj maldikaj, kun ovo-formaj kapoj, longaj nazoj, malhelaj esprimegaj okuloj kaj oreloj tonditaj laŭ diversaj modoj. La viroj estis senescepte kalvaj kaj iliaj kapsuproj brilis en la ruĝa sunlumo. La virinoj dividis siajn nigrajn hararojn je la kapmezo, kaj tondis ilin abrupte mallongaj je nivelo unu colon super la oreloj: stilo kiun Kugel takis malbela. Rigardante la popolon manĝi kaj trinki, Kugel estis malfavore rememorita pri la nutraĵo kio subtenadis lin trans la Palaj Sulkegoj, kaj li ekĉesis zorgi pri siaj tercoj. Li ekmarŝis en la ĝardenon kaj sidigis sin ĉe tablo. Dika viro en blua ŝirmtuko alproksimiĝis, malridetanta iom pri la malorda aspekto de Kugel. Kugel tuj elprenis du tercojn, kiujn li eltenis al la viro. “Jen por vi mem, mia bona kunulo, por certigi senprokrastan servadon. Mi ĵus plenumis malfacilan veturon; mi ege malsatas. Portu al mi, mi petas, teleron kio samas je tio, kion la ĝentilulo tie ĝuas, kune kun diverseco da flank-teleretoj kaj botelon da vino. Poste, bonvolu esti tiom favora, ke vi petu la hotelestron, ke li ordigu por mi komfortan ĉambron.” Kugel senzorgmaniere elprenis sian monujon kaj lasis ĝin surfali la tablon, kie ĝia pezeco sonigis imponan sugeston. “Mi ankaŭ bezonos banujon, freŝajn litotukojn kaj raziston.”

“Mi mem estas Majer, la hotela **proprietulo**,” diris la dika viro en gastiga voĉo. “Mi atentis pri viaj deziroj tuj.”

“Bonege,” diris Kugel. “Via establaĵo impresas min bone, kaj eble mi restos kelkajn tagojn.”

La hotelestro riverencis en plaĉiĝo kaj rapidis for por estri la preparon de la verspermanĝo de Kugel.



Kugel ĝuis bonegan manĝon, kvankam la dua manĝmeto, telero da **astako farĉita** de fruktaĵo kaj fendaĵoj el **skarлата** mágon-argilo, li taksis iomete tro grasa. La rostita birdviando, tamen, ne povis priplendiĝi kaj la vino plaĉis al Kugel tiom multe, ke li mendis duan flakonon. Majer la hotelestro portis la botelon mem kaj akceptis la komplimentojn de Kugel kun iom da memkontenteco. “Nenie en Gundro ekzistas pli bona vino! Ĝi estas, mi konfesas, altpreza, sed vi estas persono, kiu lerte taksas la plejajn luksaĵojn.”

“Precize prave,” diris Kugel. “Sidiĝu kaj prenu glason kun mi. Mi konfesas pri scivolemo rilate al tiu ĉi rimarkinda urbeto.”

La hotelestro memvole sekvis la sugeston de Kugel. “Mi ne komprenas tion, ke vi trovas Gundron rimarkinda. Mi loĝadis ĉi tie dum la tuto de mia vivo, kaj ĝi ŝajnas al mi sufiĉe ordinara.”

“Mi nomos tri circkonstancojn, kiuj laŭ mia konsidero meritas mencion,” diris Kugel, nun iom pliparolema pro sia vinodrinkado. “Unue: la rondegaj desegnoj de viaj konstruaĵoj. Due: la kunmetaĵoj el lensoj super la fajro, kio je minimuma konsidero devas logi la atenton de fremduloj. Trie: la fakto, ke la viroj de Gundro ĉiuj estas tute kalvaj.”

La hotelestro kapjesis penseme. “La arĥitekturo, almenaŭ, estas rapide eksplikebla. La antikvaj Gundroj loĝis en grandegaj kukurboj. Kiam parto de la muro fariĝis malforta ĝi anstataŭiĝis per trabo, ĝis post sufiĉa tempo la popolo trovis sin loĝantaj en domoj tute rekonstruitaj el ligno, kaj la modo persistadis. Rilate al la fajro kaj projekciiloj, ĉu vi ne scias pri la tutmonda Ordo de Sunaj Emosinuloj? Ni stimulas la vivoforton de la suno; tiom longe kiom nia rado da simpatia vibrado regulas sunan bruladon, ĝi neniom estingiĝos. Similaj stacioj ekzistas ĉe aliaj lokoj: ĉe Blua Azor; sur la Insulo de Brazlo; ĉe la ĉirkaŭmurita urbo Maŭnt; kaj jen la observejo de la Granda Stelzorgisto ĉe Vro Vasiles.”

Kugel kapneis domaĝosigne. “Mi aŭdis, ke circkonstancoj ŝanĝiĝis. Brazlo jam delonge sinkis sub la marondoj. Maŭnt detruigiĝis mil jarojn antaŭe fare de la Distropoj. Neniam mi aŭdis pri aŭ Blua Azor aŭ Vro Vasiles, kvankam tio, ke mi vaste vagadis. Eble, ĉi tie ĉe Gundro, vi estas la solaj Sunaj Emosinuloj ankoraŭ ekzistantaj.”

“Tio ĉi estas morna novaĵo,” deklaris Majer. “La rimarkinda malfortiĝo de la suno tiel eksplikiĝis. Eble decas, ke ni duobligu la fajron sub nia regilo.”

Kugel verŝis pli da vino. “Demando ensaltas la pensojn. Se, kiel mi suspektas, ĉi tiu estas la sola Suna Emosinula stacio ankoraŭ funkcia, kiu aŭ kio tiam regas la sunon kiam ĝi estas pasinta sube de la horizonto?”

La hotelestro gestis kapnee. “Mi povas oferti nenian eksplikon. Eble estas, ke dum la horoj de la nokto la suno mem malstreĉiĝas kaj, iel, dormas, kvankam tiu ĉi estas kompreneble la plej maldika hipotezo.”

“Lasu, ke mi ofertu pluan hipotezon,” diris Kugel. “Penseblas, ke la malfortiĝo de la suno jam progresis preter ajna ebleco de regado, tiel ke viaj streboj, kvankam antaŭe utilaj, nun estas sen efiko.”

Majer suprenĵetis la manojn por gesti konfuziĝon. “Ĉi tiuj komplikaĵoj preteras mian spertokampon, sed jen staras la Nólido Hurusko.” Li direktis la atenton de Kugel al granda viro kun bareloforma ventro kaj brosa nigra barbo, kiu staris ĉe la enirejo. “Pardonu min dum momento.” Li levis sin por stariĝi kaj alproksimiĝanta la Nólidon parolis kelkajn minutojn, indikante al Kugel fojfoje. La Nólido fine faris abruptan geston kaj marŝegis trans la ĝardeno por kontraŭi Kugel-on. Li parolis en peza voĉo: “Mi komprenas, ke vi asertas, ke neniuj Emosinuloj ekzistas krom ni mem?”

“Mi statis nenion tiom definitive,” diris Kugel, iom puŝinta al neceso defendi. “Mi rimarkis, ke mi vaste veturadis, kaj ke neniuj aliaj tia ‘Emosinula’ agentejoj jam prezentiĝis al mia atento; kaj mi

senkulpe [spekulativis](#), ke eble neniu nuntempe funkcias.”

“Ĉe Gundro ni konceptas ‘senkulpecon’ kiel pozitiva kvalito, ne nur banala malesto de kulpo,” statis la Nólido. “Ni ne tiel malsaĝas, kiel certaj malnetaj disputemuloj emas supozi.”

Kugel entenis la varman rimarkon kiu leviĝis al lipoj, kaj kontentigis sin respondi ŝultroleve. Majer marŝis for kun la Nólido kaj dum kelkaj minutoj la du viroj interparolis, kun oftaj ekrigardoj en la direkto de Kugel. Poste la Nólido foriris kaj la hotelestro revenis al la tablo de Kugel. “Iom abrupta viro, la Nólido de Gundro,” li diris al Kugel, “sed tre kompetenta, preter ĉio.”

“Estus impertinente, se mi komentus,” diris Kugel. “Kio, precize, estas lia funkcio?”

“Ĉe Gundro ni tre alte taksas precizecon kaj metodismon,” eksplikis Majer. “Ni sentas, ke la malesto de ordo instigas malordon; kaj la oficisto respondeca pri la inhibiciado de kaprico kaj malnormalo estas la Nólido... Kio estis nia antaŭa konversacio? Ah jes, vi menciis nian fifaman kalvecon. Mi povas oferti nenian precizan eksplikon. Laŭ la diro de niaj saĝuloj, la cirkonstanco signifas la finan perfektigon de la homa raso. Aliaj homoj kredetas antikvan legendon. Paro da magiistoj, Asterlen kaj Maŭdred, kontestis gajni la favoron de la Gundroj. Asterlen promesis la bondonacon de ekstrema hareco, por ke la popolo de Gundro ne devu porti vestojn. Maŭdred, je la kontraŭo, ofertis al la Gundroj kalvecon, kun ĉiuj sekvantaj avantaĝoj, kaj facile venkis je la kontesto; kaj fakte Maŭdred fariĝis la unua Nólido de Gundro, la sama posteno nun plenumita, kiel vi scias, de Hurusko.” Majer la hotelestro kunpremis la lipojn kaj rigardis trans la ĝardeno. “Hurusko, malfidema ulo, rememorigis min pri mia fiksita regulo pri postulado al ĉiuj vojaĝantaj gastoj, ke ili pagu siajn kontojn tage. Mi nature strebis konvinki lin pri via plena fidemo, sed simple por pacigi al Hurusko, mi prezentos la kontosumon je la mateno.”

“Tio ĉi egalvaloras al insulto,” deklaris Kugel arogante. “Ĉu ni [lakeu](#) sub la kapricoj de Hurusko? Ne mi, vi estu certigita! Mi finpagos mian konton laŭ la kutima maniero.”

La hotelestro palpebrumis. “Ĉu mi rajtas demandi pri tio, kiom longe vi planas resti ĉe Gundro?”

“Mia vojaĝo portas min suden, per kiel ajn transporta rimedo kiu plej rapidas. Tio, mi devas supozi, probable estos riverŝipo.”

“La urbeto Lumarto situas dek tagojn malproksime sur karavano trans la Lir Ajng. La Rivero Isk ankaŭ preterfluas Lumarton, sed taksigaŝ malkonvena pro malbonsorto de tri interkuŝantaj lokoj. La Marĉo Lalo infestiĝas de pikaj insektoj; la arbo-[nanoj](#) de la Arbaro Sántalba ĵetfrapas preterpasantajn boatojn per forĵetaĵo; kaj la Senesperiga Rapidejo frakasas kaj ostojn kaj boatojn.”

“En tiu ĉi kazo mi veturos per karavano,” diris Kugel. “Intertempe mi restados ĉi tie, kondiĉe, ke la persekutadoj de Hurusko ne fariĝos netolereblaj.”

Majer lekis la lipojn kaj rigardis transŝultre. “Mi certigis al Hurusko, ke mi obeos strikte mian regulon. Li certe faros grandan disputon pri la afero krom se —”

Kugel faris komplezan geston. “Portu al mi [sigelojn](#). Mi fermegos mian monujon, kio enhavas riĉegecon el opaloj kaj alúmoj. Ni sekurigis la monujon en la fortik-skatolo kaj vi rajtos tenadi ĝin kiel [kaŭcion](#). Ne eĉ Hurusko rajtas nun protesti!”

Majer suprentenis la manojn signe je miro. “Mi ne povas alpreni respondecon tiom grandan!”

“Maltenu ĉian ajn timon,” diris Kugel. “Mi jam ŝirmis la monujon per sorĉo; kiam krimulo rompus la fermilon tiumomente la juveloj ekŝanĝiĝus por fariĝi senvaloraj ŝtonetoj.”

Majer dubeme akceptis la monujon de Kugel pro tiuj kondiĉoj. Ili kune observis la aplikadon de sigeloj kaj deponis la monujon en la fortikskatolon de Majer.

Kugel nun foriris al sia ĉambro, kie li banis sin, komandis la servicojn de **barbiero** kaj ekportis freŝajn vestojn. Ĝustigante la ĉapelon je deca inklinio, li marŝadis elen sur la placon.

Liaj paŝoj kondukis lin al la Sun-Emosinula stacio. Kiel antaŭe, du junaj viroj laboris diligente, unu zorganta la fajron kaj ĝustiganta la kvin lampojn, dum la alia tenis la regulan lumstrion cele al la malalta suno.

Kugel inspektis la kunmetaĵojn de ĉiuj anguloj, kaj baldaŭe la persono kiu bontenis la fajron elvokis: “Ĉu vi ne estas tiu atentinda veturisto kiu hodiaŭ esprimis dubojn pri la efikeco de la Emosinula Sistemo?”

Kugel parolis zorge: “Mi diris al Majer kaj Hurusko jene: ke Brazlo jam sinkis sube de la Golfo Melantuno kaj preskaŭ forgesiĝis el memoro; ke la ĉirkaŭmurita urbo Maŭnt jam delonge detruigis; ke nenion mi scias pri nek Blua Azor, nek Vro Vasiles. Ĉi tiuj estis la solaj pozitivaj deklaroj miaj.”

La juna fajro-bontenanto ĵetis brakplenon da lignostangoj en la fajro-fosaĵon kun infaneca malbonhumoro. “Tamen oni nin informas, ke vi konsideras niajn strebojn senefikaj.”

“Mi dirus nenion tiom emfaza,” diris Kugel ĝentile. “Eĉ se la aliaj agentoj Emosinulaj forlasiĝis, estas eble, ke la Gundra reglilo sufiĉas; kiu povas scii?”

“Mi diros al vi la jenan,” deklaris la fajristo. “Ni laboras sen rekompenco, kaj en la propra tempo ni devas tranĉi kaj transporti fuelon. La afero estas teda.”

La funkciisto de la celiga aparato amplifikis la plendon de sia amiko. “Herusko kaj la maljuna estraro faras neniom el la laboro; ili simple ordonas, ke ni strebado, kio estas, kompreneble, la plej facila parto de la projekto. Janred kaj mi estas el pli malnaiva generacio; laŭ principo, ni malakceptas ĉiujn dogmajn doktrinojn. Mi mem konsideras la Sunan Emosinulan sistemon malŝparo de tempo kaj strebado.”

“Se la aliaj agentoj jam forlasiĝis,” disputis Janred la fajristo, “kiu aŭ kio regas la sunon tiam, kiam ĝi estas pasinta preter la horizonto? La sistemo estas pura stult-falsaĵo.”

La funkciisto de la lensoj deklaris: “Mi nun elmontros pri tio, kaj liberigos nin ĉiujn el de tiu ĉi sendanka laborego!” Li movis regostangon. “Atentu, mi celigas la regan lumstrion for de la suno. Rigardu! Ĝi brilas kiel antaŭe, sen eĉ la malpleja prizorgo fare de ni!”

Kugel inspektis la sunon, kaj fakte ĝi ŝajnis tiel briladi kiel antaŭe, flagretante de tempo al tempo, kaj skuiĝetante kiel maljunulo kun febro. La du junuloj rigardadis kun simila atento, kaj dum pasis minutoj, ili komencis murmuri en plaĉeco. “Nia praveco montriĝis! La suno ne estingiĝis!”

Eĉ dum ili rigardadis, la suno, eble hazarde, eksuferis spasmon de malforteco, kaj ekstumbletis

horizonten. Malantaŭ ili soniĝis bruego de ofendiĝo kaj la Nólido Hurusko kuris antaŭen. “Kiel okazis tiu ĉi malrespondeco? Celigu la regilon ĝuste kaj tuje! Ĉu ni instigos, ke ni devu palpe serĉanta la vojon dum la resto da niaj vivoj en la mallumego?”

La fajristo indigne indikis al Kugel per gesto dikfingra. “Li konvinkis nin, ke la sistemo estas nenecesa, kaj ke nia laboro estis senutila.”

“Kio!” Hurusko turnegis sian fortikan korpon por kontraŭstari al Kugel. “Nur horojn antaŭe vi ekpaŝis piede en Gundron, kaj jam vi disordigas la fabrikon de nia ekzistado! Mi avertas vin, nia pacienco ne estas senlima! Vi ekestu for kaj ne alproksimiĝu la agentejon Emosinulan fojon duan!”

Plenega de kolerego, Kugel turniĝis sur piedo kaj ekmarŝis trans la placo.

Ĉe la karavanejo li enketis pri transportado al la sudo, sed la karavano kiu ĵus alvenis je tagmezo ekforiros je la tagmeza horo morgaŭe por reiri al la oriento laŭ la sama vojo de kie ĝi estis veninta.

Kugel reiris al la hotelo kaj enpaŝis la **tavernon**. Li atentis tri virojn ludantaj per kartetoj kaj ĉestaris sin por observi. La ludo evidentis esti simpla versio de Zámpolio, kaj baldaŭ Kugle petis, ke li inkludiĝi je la ludado. “Sed nur kondiĉe, ke la monorisko ne tro altas,” li protestis. “Mi ne aparte lertas kaj mi malŝatas perdi pli multe ol unu/du tercojn.”

“Bh,” eksklamis unu el la ludantoj. “Kio estas mono? Kiu tiam spezos ĝin, post kiam ni mortos?”

“Se ni prenos ĉiom el via oro, vi tial ne devos porti ĝin plu,” alia rimarkis ŝerce.

“Ni ĉiuj devas lerni,” la tria ludanto diris plaĉige al Kugel. “Vi estas bonŝanca pro havi la tri supremajn spertulojn por instruistoj.”

Kugel paŝis retroen je alarmiĝo. “Mi rifuzas perdi pli multe ol unu solan tercon!”

“Nu do! Ne estu virtulaĉo!”

“Nu bone,” diris Kugel. “Mi riskos je la afero. Sed tiuj ĉi kartetoj estas eluzitaj kaj malpuraj. Hazarde mi havas freŝan kartetaron en mia poŝo.”

“Bonege! La ludado daŭriĝas!”



Du horojn poste la tri Gundoj subenĵetis siajn kartetojn, celis al Kugel longajn malamikajn rigardojn, poste kiel per unusama penso stariĝis kaj elpaŝis la tavernon. Inspektante siajn gajnaĵojn, Kugel kalkulis tridek du tercojn kaj kelkajn kupraĵojn. En bonamika mensostato li foriris al sia ĉambro por la nokto.

Je la mateno, dum li manĝis la matenmanĝon, li atentis pri la alveno de la Nólido Hurusko, kiu tuje alproksimiĝis la tablon de Kugel kaj subenrigardis al Kugel kun iom malamika rideto, dum Majer staris nervoze kelkaj paŝoj malantaŭe.

Kugel parolis en voĉo de streĉita ĝentileco: “Nu, kio ĉi foje? La suno leviĝis; mia senkulpeco en la afero de la regila lumstrio estas per tio provita.”

“Mi nun koncerniĝas pri alia afero. Ĉu vi priscias la punojn pri **fraŭdo**?”

Kugel ŝultrolevis. “La afero neniom interesas min.”

“Ili severas kaj mi remencios ilin post momento. Unue, lasu min enketi: ĉu vi fide transdonis al Majer monujon laŭdire enhavantan valorajn juvelojn?”

“Mi ja faris. La posedaĵo ŝirmiĝis fare de sorĉo, mi volas aldoni; se la sigelo rompiĝus la juveloj fariĝus ordinaraj ŝtonetoj.”

Hurusko eltenis la monujon. “Atentu, la segilo ne rompiĝis. Mi tranĉis longtruon en la ledoj kaj rigardis internen. La enhavoj estis tiam kaj estas nun —” kun montrega gesto Hurusko elverŝis la monujon sur la tablon “—ŝtonetoj identaj kun tiuj en la vojo apuda.”

Kugel eksklamis en kolerego: “La juveloj nun estas senvalora rubaĵo! Mi kulpigas vin pri respondeco kaj vi devas pagi rekompenco!”

Hurusko sonigis ofendan ridon. “Se vi povas ŝanĝi juvelojn en ŝtonetojn, vi povas ŝanĝi ŝtonetojn en juvelojn. Majer nun metos al vi la konton. Se vi refuzos pagi, mi intencas instigi, ke vi najliĝu en la karcera ujo sub la pendumigejo ĝis tiu tempo, kiam vi ŝanĝos la decidon.”

“Viaj implikoj estas kaj naŭzaj kaj absurdaj,” deklaris Kugel. “Hotelestro, prezentu vian kalkulon! Lasu nin ĉesigi tiun ĉi miskomprenaĉon nun kaj por ĉiam.”

Majer venis antaŭen kun peceto de papero. “Mi kalkulas la tuton por esti dek unu tercoj, plus tioma kromdonaco kiom ajn ŝajnas dece.”

“Estos nenioma kromdonaco,” diris Kugel. “Ĉu vi ĝenadas ĉiujn viajn gastojn ĉimaniere?” Li svingĵetis dek kvin tercojn malsupren sur la tablon. “Prenu vian monon kaj lasu min en paco.”

Majer kun ŝafa mieno prenis supren la monerojn; Hurusko eligis senkompreneblan sonon kaj turniĝis for. Kugel, post elmanĝi la matenmanĝon, eliris refoje por marŝadi trans la placo. Ĉi tie li renkontis individuon kiun li rekonis kiel la pot-knabo de la taverno, kaj Kugel signis, ke li haltu. “Vi ŝajnas esti atenta kaj multescia ulo,” diris Kugel. “Ĉu mi rajtas demandi vian nomon?”

“Mi ordinare koniĝas per ‘Zelur’.”

“Mi konjektas, ke vi bone informiĝis pri la popolo de Gundro.”

“Mi konsideras min bone informita. Kial vi demandas?”

“Unue,” diris Kugel, “lasu min demandi, ĉu vi volas uzi viajn sciojn profite?”

“Certe, kondiĉe ke mi evitas la atenton de la Nólido.”

“Tre bone. Mi atentis pri neuzita budo nemalproksima, kio probabe servus nian celon. Post unu horo ni ekkomencos nian entreprenon.”

Kugel reiris al la hotelo kie, je lia peto, Majer aĉetis ŝildotabulon, farbilon kaj farbon. Kugel dezajnis ŝildon:

DEMANDU! VI RESPONDIĜOS!

KONSULOJ: *Tri Tercoj.*

Kugel pendigis la ŝildon super la budo, aranĝis kurtenojn kaj atendis klientojn. La pot-knabo, dumtempe, kaŝis sin sekrete en la malantaŭo.

Preskaŭ tuje popoloj transirante la placon haltis por legi la ŝildon. Virino mezaĝa baŭdaŭ alvenis.

“Tri tercoj estas granda sumo. Kiajn rezultojn povas vi garantii?”

“Neniujn ajn, laŭ la strikta naturo de aferoj. Mi estas lerta klarvidanto, mi havas spertojn pri la artoj de magio, sed scioj alvenas min de nekonataj kaj neregeblaj fontoj.”

La virino transpagis sian monon. “Tri tercoj estas bonprezo se vi povas solvi miajn zorgojn. Mia filino dum tute la vivo ĝuis la plejbonan sanon sed nun ŝi malsanas, kaj suferas morozan staton. Ĉiuj miaj medikamentoj estas senefikaj. Kion mi faru?”

“Momenton, sinjorino, dum mi meditas.” Kugel fermis la kurtenon kaj kliniĝis malantaŭen al loko, de kie li povis aŭdi la frustratajn rimarkojn de la pot-knabo, kaj poste retiris flanken malferme la kurtenojn.

“Mi ĵus unuiĝis kun la kosmo. Scio eniris al mi la menson! Via filino Diljana estas graveda. Kontraŭ plusa trio da tercoj mi aldonos la nomon de la patro.”

“Tiu estas sumo kiun mi pagas kun plezuro,” deklaris la virino kruelete. Ŝi pagis, ricevis la informon kaj marŝis celege for.

Alia virino alproksimiĝis, pagis tri tercojn, kaj Kugel aplikis sin al ŝia problemo: "Mia edzo promesadis al mi, ke li konservis ujon da oraj monuoj kontraŭ la futuro, sed je lia morto mi povis trovi ne eĉ unu kupron. Kie li kaŝis la oron?"

Kugel fermis la kurtenojn, interparolis kun la pot-knabo, kaj refoje aperis al la virino. “Mi havas malkuraĝigan novaĵon por vi. Via edzo Finstro elspezis multon da lia kaŝita oro ĉe la taverno. Per la restaĵo li aĉetis [ametistan broĉon](#) por virino nomata Varleta.”

La novaĵo pri la rimarkindaj talentoj de Kugel disvastiĝis rapide kaj komerco estis multa. Iomete antaŭ tagmezo, granda virino, buŝo kaj vizaĝo vualigitaj, alproksimiĝis la budon, pagis tri tercojn, kaj demandis en alt-piĉa, sed raŭketa, voĉo: “Legu al mi mian sorton!”

Kugel fermis la kurtenojn kaj konsultis la pot-knabon, kiu ne povis konjeti. “Tiu estas neniu konata de me. Mi povas diri al vi nenion.”

“Ne grave,” diris Kugel. “Miaj suspektoj jam pruviĝis.” Li malfermis la kurtenon. “La aŭguraĵoj estas malklaraj kaj mi rifuzas preni vian monon.” Kugel redonis la prezon. “Mi povas diri al vi jen tiom multe: vi estas individuo de [dominema](#) sinteno kaj el ne multa inteligenteco. Antaŭ vi situas kio? Honoroj? Longa vojaĵo sur akvo? Venĝo kontraŭ viaj malamikoj? Riĉeco? La bildo estas malklara; Mi eble legas la sorton propran.”

La virino detiris siajn vualojn kaj restis malkaŝita por esti la Nólido Hurusko. “Sinjoro Kugel, vi bonsortas, ke vi redonis mian monon, alikaze mi estus enkarceriganta vin pro malfidaj komercoj. Ajnakaze, mi taksas viajn agadojn malbonintencajn, kaj kontraŭaj al la publika bondeziro. Gundro estas maltrakviligita pro viaj malkaŝadoj; estos neniom pli da ili. Deprenu vian ŝildon, kaj estu feliĉe dankema pro tio, ke vi eskapis tiom facile.”

“Mi estos ĝoja fini mian komercon,” diris Kugel kun digneco. “La laboro estas laciga.”

Hurusko forte marŝis for en malbonhumoro. Kugel dividis siajn enspezojn kun la pot-knabo, kaj en spirito de kunula interplaĉo ili foriris de la budo.

Kugel manĝis sur la plej bonaj aferoj kiujn la hotelo ofertis, sed poste, kiam li eniris la taverson li renkontis rimarkindan mankon de amikemo inter la klientoj kaj baldaŭ foriris al sia ĉambro.

La postan matenon, dum li matenmanĝis karavano el dek vagonoj alvenis la urbeton. La principa ŝarĝaĵo ŝajnis esti aro da dek sep belaj junulinoj, kiuj rajdis sur du el la vagonoj. Tri aliaj vagonoj servis kiel dormejoj, dum la kromaj kvin ŝarĝiĝis de necesajoj, **kofroj**, **faskoj** kaj ŝrankoj. La karavanestro, dika mild-ŝajna viro kun ondaj brunaj haroj kaj silka barbo, helpis siajn plezurige belajn pasaĝerojn al la grundo kaj kondukis ilin ĉiujn al la hotelo, kie Majer alportis plenan matenmanĝaĵaron el spica kaĉo, prezervita **cidonio**, kaj teo.

Kugel rigardadis la grupon dum ili manĝadis kaj pripensis, ke vojaĵo al preskaŭ ajna loko kune kun tiaj kunvojaĝantoj estus ja plaĉa vojaĝo.

La Nólido Hurusko aperis, kaj iris renkonti la karavanestron. La du konversaciis amike dum ioma tempo, dum Kugel atendis malpacience.

Hurusko post longe foriris. La junulinoj, jam finintaj siajn manĝojn, eliris por promenadi la placon. Kuel transiris al la tablo, kie la karavanestro sidadis. “Sinjoro, mia nomo estas Kugel, kaj mi petas iome interparoli kun vi.”

“Ja certe! Bonvolu sidiĝi. Ĉu vi prenis glason de tiu ĉi bonega teo?”

“Dankon. Unue, ĉu mi rajtas pridemandi la ircelon de via karavano?”

La karavanestro esprimis surprizon pri la nescio de Kugel. “Ni celas al Lumarto; tiuj ĉi estas la ‘Dek Sep Virgulino de Simatiso’, kiuj tradicie ornamas la Grandan Spektakon.”

“Mi estas fremdulo ĉe tiu ĉi regiono,” Kugel eksplikis. “Sekve, mi scias nenion pri la ĉilokaj kutimoj. Ajnakaze, mi mem celas al Lumarto kaj estus plaĉita por kunvojaĝi en via karavano.”

La karavanestro gestis amikan kunsenton. “Plaĉos al mi, ke vi kunvojaĝu.”

“Bonege!” diris Kugel. “Do, ĉio aranĝiĝis.”

La karvanestro frotis al si la silkan brunan barbon. “Mi devas averti vin, ke miaj prezoj estas iom pli altaj ol kutime, kaze de la altkostaj agrablaĵoj, kiujn mi estas devigata provizi al tiuj ĉi dek sep neplaĉiĝemaj junulinoj.”

“Ĉu vere,” diris Kugel. “Kiom multe vi postulas?”

“La vojaĝo okupas la plimulton de dek tagoj, kaj mia minimuma prezo estas je tago po dudek tercoj, entute du cent tercoj, plus suplemento de dudek tercoj por vino.”

“Tiu ĉi estas multe superas mian kapablon elporti,” diris Kugel en moroza voĉo. “Ĉimomente mi kunportas nur trionon de tiu ĉi kvanto. Ĉu ekzistas ajna laboro per kiu mi povas meriti mian portadon?”

“Malbonsorte ne,” diris la karavanestro. “Ĵus ĉimatene la deĵora posteno de armita gardisto estis malplena, kio eĉ pagas malgrandan **subvencion**, sed Hurusko la Nólido, kiu volas viziti Lumarto, jam akceptis servi en tiu maniero kaj la posteno nun okupiĝas.”

Kugel eligis sonon de malesperiĝo kaj suprenturnis la okulojn ĉielen. Kiam post longe li povis devigi sin paroli, li demandis: “Je kiu tempo vi planas foriri?”

“Morgaŭ je sunleviĝo, kun absoluta akurateco. Mi bedaŭras, ke ni ne havos la plezuron de via akompanado.”

“Mi kune bedaŭras,” diris Kugel. Li reiris al sia propra tablo kaj sidadis primeditante. Baldaŭ li eniris la tavernon, kie diversaj kartetaj ludoj okazadis. Kugel provis aniĝi kun la ludantoj, sed ĉiufoje lia peto rifuziĝis. En malagraba humoro li aliris la kontoron kie Majer la hotelestro malpakis skatolon da argilaj pokaloj. Kugel provis estigi konversacion sed ĉifoje Majer malpovis preni tempon for de siaj laboroj. “La Nólido Hurusko iros vojaĝi kaj ĉinokte liaj amikoj celebros la okazaĵon per adiaŭa festo, por kio mi devas fari zorgajn preparojn.”

Kugel prenis tasegon da biero al flanka tablo kaj dediĉis sin al pripensado. Post kelkaj minutoj li eliris malantaŭan pordon kaj stude rigardis la pejzaĝon, kiu ĉi tie superrigardis la Riveron Isk’. Kugel promenis malsupren al la bordo de la akvo kaj malkovris kajon, kiel fiŝkaptistoj alligas siajn boatetojn kaj sekigas siajn retojn. Kugel rigardis supren kaj malsupren al la rivero, poste paŝadis reire al la hotelo, por pasigi la reston de la tago rigardante la dek sep junulinojn dum ili promenadis sur la placo, aŭ trinketis dolĉan **limedan** teon en la ĝardeno de la hotelo.

La suno subiris; krepusko el la koloro de malnova vino malheliĝis ĝis nokto. Kugel komencis siajn preparojn, kiuj rapide kompletiĝis, almenaŭ tiom multe, ke la esenco de lia plano estis en ĝia simpleco.

La karavanestro, kies nomo, Kugel jam lernis, estis Ŝimilko, kolektis sian **ekskvizitan** akompanantinaron por ilia vespera manĝo, poste kondukis ilin zorge al la dormejaj vagonoj, spite al la **paŭtoj** kaj protestoj de tiuj, kiuj volis resti ĉe la hotelo kaj ĝui la festaĵojn de la vespero.

En la taverno la bonvojaĝa festo honora je Hurusko jam komenciĝis. Kugel sidigis sin en malhela angulo kaj post iome logis la atenton de perspiranta Majer. Kugel eltenis dek tercojn. “Mi konfesas, ke mi tenadis maldankemajn pensojn pri Hurusko,” li diris. “Nun mi volas esprimi miajn bondezirojn — en absoluta anonimo, tamen! Kiam ajn Hurusko komencas novan tasegon da **elo**, mi volas, ke vi almetu plenan tasegon antaŭ li, por ke lia vespero estu senĉese ĝoja. Se li demandas pri kiu aĉetis la drinkon, vi respondu nur: ‘Unu el viaj amikoj volas komplimenti vin.’ Ĉu tiu ĉi klaras?”

“Absolute, kaj mi faros laŭ via direkto. Tio estas grand-kora gestaĵo, kion Hurusko alte taksos.”

La vespero progresis. La amikoj de Hurusko kantis ĝojajn kantojn kaj proponis dek duon da tostoj, je kiuj Hurusko partoprenis ĉiujn. Kiel Kugel ordonis, kiam ajn Hurusko eĉ ekkomencis drinki

de tasego, plua almetiĝis ĉe lia kubuto, kaj Kugel miris pri la amplekso de la interna **kapacito** de Hurusko.

Post longe Hurusko sentis neceson pardoni sin por foriri el la kunularo. Li ŝancelis tra la malantaŭa elirejo kaj iradis cele al tiu ŝtona muro havanta trogon sube, kio estis konstruita por la bonoportuno de la tavernaj klientoj.

Dum Hurusko alfrontis la muron, Kugel alpaŝis de malantaŭe kaj ĵetis reton de fiŝkaptisto super la kapo de Hurusko, poste lerte faligis ŝnuron ĉirkaŭ la dikaj ŝultroj de Hurusko, sekvate de pluaj turnoj kaj ligoj. La kriegoj de Hurusko dronis sub tiu kanto kiu tiumomente estis kantata je lia honoro.

Kugel trenis la blasfemantan korpegon malsupren laŭ la irejo al la kajo, kaj rulis lin turne kaj en boateton. Malligante la sekuran ŝnuron, Kugel puŝis la boateton for en la kurenton de la rivero. “Je la pleja minimumo,” Kugel diris al si, “du partoj de mia aŭguro estas pravaj; Hurusko jam honoriĝis en la taverno kaj nun komencas ĝui vojaĝon surakvan.”

Li reiris al la taverno kie la foresto de Hurusko post longe ĵus priatentiĝis. Majer esprimis opinion, ke havonte fruan foriron antaŭ si, Hurusko prudente enlitiĝis por dormi, kaj ĉiuj agnoskis, ke sendube tio eksplikis.

La postan matenon Kugel ellitiĝis horon antaŭ sunleviĝo. Li prenis rapidan matenmanĝon, pagis al Majer sian konton, poste iris tien kie Ŝimilko ordigis sian karavanon.

“Mi portas novaĵon de Hurusko,” diris Kugel. “Pro okazo de malbonŝanca aro da cirkonstancoj, li trovas sin malkapabla je la vojaĝo, kaj rekomendis min al tiu posteno por kio vi kontraktis lin.”

Ŝimilko kapneis mirante. “Domaĝo! Hieraŭ li ŝajnis tiom entuziasma! Nu, ni ĉiuj devas esti flekseblaj, kaj pro tio, ke Hurusko no povas kuniĝi al ni, mi plaĉiĝas akcepti vin anstataŭe. Tuj post ni komencos, mi instruos vin pri viaj devoj, kiuj estas rekte simplaj. Vi devas gardadi je noktoj kaj preni vian ripozon dum tagoj, kvankam okaze de danĝero, mi nature atendas, ke vi partoprenu la defendadon de la karavano.”

“Ĉi tiuj devoj estas ja inter miaj kompetentecoj,” diris Kugel. “Mi pretas ekiri je via bonoportuno.”

“Jen leviĝas la suno,” Deklaris Ŝimilko. “Ni ekiru kaj iradu for al Lumarto.”



Dek tagojn poste la karavano de Ŝimilko trapasis la Méthunan Intermonton, kaj la grandega Valo de Koraŭm mapleniĝis antaŭ ili. La plenplena Isk' vagadis ien kaj reen, reflektanta varmetan rebrilon; en la malproksimo morne staradis la longa malhela amaso de la Arbarego Dravno. Pli proksime, kvin kupoloj el rebriletante perlamota glaceo indikis la lokon de Lumarto.

Ŝimilko atentovoke alparolis la kunularon. “Sube situas tio kio restas de la malnova urbego Lumarto. Ne estu miskonvinkita pro la kupoloj; ili estas temploj iam sanktaj je la kvin demonoj Ĵaŭnt, Ĝastenejv, Pfampoŭn, Aldemro kaj Suul, kaj pro tio konserviĝis dum la Militoj Sámphaŝisikaj.

“La popolode Lumarto malsamas al iu ajn de via sperto. Multaj estas malgrandaj sorĉistoj,

kvankam Ĉaladet la Ĉefa Religiestro jam malpermesegis magion inter la urbaj bordoj. Vi eble pripensus, ke tiuj ĉi homoj estas **langvoraj** kaj malspritaj, kaj stuporigitaj de troa sensado, kaj vi estus prava pri tio. Ĉiuj estas obsede rigidaj pri ritismo, kaj ĉiuj alkredas pri iu Doktrino de Absoluta Altruismo, kio devigas ilin al virto kaj bonfarado. Pro tiu ĉi kialo ili nomiĝas la ‘Kompata Popolo’. Fina vorto rilate al nia vojaĝo, kio bonsorte progresis sen malorda okazo. La vagonistoj ŝoforis kun lerto; Kugel atentege gardis nin je noktoj, kaj mi bone plaĉiĝis. Do nun: antaŭen al Lumarto, kaj lasu, ke detalega priatentado estu nia frapfrazo!”

La karavano transiris la mallarĝan vojeton malsupren en la valon, poste procedis laŭ avenuo el rade sulkigita ŝtono sub arko el grandegaj mimoso-arboj.

Ĉe putriĝanta portalo malfermiĝanta al la placo la karavano renkontiĝis de kvin altaj viroj en jupoj el broditaj silkoj, la luksegaj duoble-kronaj kapvestaĵoj de la Koraŭmanaj Ĥuristoj donante al ili imponan dignecon. La kvin multe similis inter si, kun palaj travidebletaj haŭtoj, maldikaj altkrestaj nazoj, maldikaj membroj kaj pensegemaj grizaj okuloj. Unu kiu portis belegan jupon el mustarda flavo, brila ruĝo kaj nigro levis du fingrojn kiel kalma saluto. “Mia amiko Ŝimilko, vi alvenis sekure kun ĉiom via santa ŝarĝaĵo. Ni estas bone servitaj kaj tre plaĉigitaj.”

“La Lirĥ-Aing estis tiom paca, ke ĝi tedis,” diris Ŝimilko. “Certe, mi estis tre bonŝanca pro akiri la servicojn de Kugel, kiu gardis nin tiom bone je noktoj, ke neniam interrompiĝis nia dormado.”

“Bone farita, Kugel!” diris la ĉefa Ĥuristo. “Ni ĉimomente prenos la prizorgan respondecon super la valoregaj junulinoj. Morgaŭ vi rajtos meti vian konton al la kasisto. La Gastejo Vojaĝista situas jen tie, kaj mi konsilas vin pri ĝiaj komfortoj.”

“Juste tiel! Ni ĉiuj estos pli bonfartemaj post kelkajn tagojn da senlaboro!”

Tamen, Kugel elektis ne tiel dorloti sin. Ĉe la pordo al la gastejo li diris al Ŝimilko: “Ĉi tie ni apartiĝos, ĉar mi devas daŭrigi survoje. Aferoj premas sur mi kaj Almerio situas malproksime okcidenten.”

“Sed via salajro, Kugel! Vi devas atendi ĝis almenaŭ morgaŭ, kiam mi povos ekhavi certajn enspezojn de la kasisto. Ĝis tiam, mi estas sen mono.”

Kugel hezitis, sed post ioma tempo persvadiĝis restadi.

Horon poste mesaĝisto paradis en la gastejon. “Sinjoro Ŝimilko, vi kaj via akompanantaro estas devigataj memprezenti tuj antaŭ la Ĉefa Religiestro rilate pri afero de la plej ega graveco.”

Ŝimilko suprenrigardis alarmite. “Kio ajn misas?”

“Oni devigis min, ke mi diru nenion plu.”

Kun malĝoja vizaĝo Ŝimilko gvidis sian akompanantaron trans la placo al la **loĝio** antaŭ la malnova palaco, kie Ĉaladet sidis sur masiva seĝo. Ambaŭflanke staris la Kolegio de Ĥuristoj kaj ĉiuj alrigardis Ŝimilkon kun sombraj esprimoj.

“Pro kio vi devigis nin veni?” demandis Ŝimilko. “Kial vi rigardas min kun tioma graveco?”

La Ĉefa Religiestro parolis en profunda voĉo: “Ŝimilko, la dek sep junulinoj alportataj de vi de

Simnafajs al Lumarto ekzameniĝis, kaj mi bedaŭras raporti, ke el la dek sep, nur du povas esti klasifikataj kiel virgulinaj. La kromaj dek kvin jam estis sekse defloritaj.”

Ŝimilko apenaŭ povis paroli pro konsterniĝo. “Ne eble!” li sputete balbutis. “Ĉe Simnafajs mi plenumis la plej detalajn antaŭgardojn. Mi povas montri tri apartajn dokumentojn por certigi la purecon de ĉiu. Povas esti nenia dubo! Vi eraras!”

“Ni ne eraras, Sinjoro Ŝimilko. Aferoj estas tiel kiel ni pridiras, kaj povas facile pruviĝi.”

“‘Maleble’ kaj ‘nekredble’ estas la nuraj du vortoj kiuj venas en la menso,” kriis Ŝimilko. “Ĉu vi demandadis la knabinojn mem?”

“Kompreneble. Ili nur turnas supren la okulojn kaj fajfas tra inter la dentoj. Ŝimilko, kiel vi eksplikas tiun ĉi hororan fifaregon?”

“La afero **perpleksigas** min ĝis konfuziĝo! La knabinoj komencis la vojaĝon tiom puraj kiom je la tago de ilia naskiĝo. Tio ĉi estas fakte! Dum ĉiu konscia momento ili neniam foriris la kampon de mia percepto. Tio ĉi ankaŭ estas fakte.”

“Kaj ĉu dum vi dormadis?”

“La malprobableco estas neniom malpli ekstrema. La vagonistoj ripozis kune en grupo. Mi gastigis la ĉefvagoniston en la vagono propra kaj ni ambaŭ ĵuras unu por la alia. Kugel dumtempe gardadis la tutan kampon.”

“Sole?”

“Unu sola gardisto sufiĉas, eĉ kvankam la noktaj horoj estas malrapidaj kaj tedegaj. Kugel, tamen, neniam plendis.”

“Kugel estas evidente la kulpulo!”

Ŝimilko ridete kapneis. “La devoj de Kugel lasis al li nenian tempon por kontraŭleĝa konduto.”

“Kio, do, se Kugel malatentis siajn devojn?”

Ŝimilko respondis pacience: “Rememoru, ĉiu knabino ripozis sekure en ŝia privata ĉambreto kun pordo inter ŝi kaj Kugel.”

“Nu do — kio se Kugel malfermis tiun ĉi pordon kaj kviete eniris la ĉambreton?”

Ŝimilko konsideris dum dubema momento, kaj tiris al si la silkan barbon. “Je tia kazo, mi supozas, ke la afero povas ebli.”

La Ĉefa Religiestro turnis sian rigardon al Kugel. “Mi insistas, ke vi eldiru eksplikon pri tiu ĉi malhonora afero.”

Kugel elkriis indigne: “La enketo estas misfarego! Mia honoro estas atakita!”

Ĉaladet fikse alrigardis Kugelon kun kalma, se iom frida rigardego. “Vi estos permesata reaĉeto de via honoro. Ĥuristos, mi transdonas tiun ĉi personon al via gardado. Certigu, ke li havos ĉiun

oportunon por regajni sian dignon kaj memestimon!”

Kugel elmuĝis proteston kion la Ĉefa Religiestro ignoris. De lia granda podio li elrigardis pensoplene trans la placo. “Ĉu tiu ĉi estas la tria aŭ la kvara monato?”

“La kronoloĝo ĵus eliris la monaton de Jaŭnt, por eniri la tempon de Pfampoŭn.”

“Do estu tiel. Per diligenteco, tiu ĉi *lasciva* fripono eble ankoraŭ meritis nian amon kaj respekton.”

Paro da Ĥuristoj ektenis al Kugel la brakojn kaj lin kondukis trans la placo. Kugel ektiradis ien kaj tien sen ajna efiko. “Kien vi portas min? Kio estas ĉi tiu sensensa afero?”

Unu el la Ĥuristoj respondis en kompata voĉo: “Ni portas vin al la templo de Pfampoŭn, kaj la afero estas io tute alia ol sensensa.”

“Al mi plaĉas nenio ĉi tia,” diris Kugel. “Forprenu viajn manojn de mi; mi intencas foriri Lumarton ĉimomente.”

“Vi estos tiele helpata.”

La grupeto marŝadis supren sur erodita ŝtuparo el marmoro, internen tra grandega arka portalo, enire al eĥa halo, distingita nur per alta kupolo kaj centra sanktejo aŭ altaro ĉe la fora flanko. Kugel kondukiĝis en flank-ĉambron, lumigitan de altaj cirklaĵoj fenestroj kaj paneligitan de blua ligno. Maljuna viro en blanka robo eniris la ĉambron kaj demandis: “Kia ĉi tiu afero? Persono suferanta afliktiĝon?”

“Jes; Kugel estas farinta serion da abomenindaj krimoj, pri kiuj li volas elpurigi sin.”

“Tuta misdiro!” kriis Kugel. “Nenia pruvo ĉi tiu ĉi okazis kaj je ajna okazo mi estis *kajolita* kontraŭ mia kutima bonintenco.”

La Ĥuristoj, preteratentate, foriris, kaj Kugel lasiĝis kun la maljuna viro, kiu lamiris al benko kaj sidigis sin. Kugel komencis paroli sed la maljunulo gestis manleve. “Sinkalmigu vin! Vi devas rememori, ke ni estas kompata popolo, al kiu mankas ajna venĝemo aŭ malico. Ni ekzistas nur por helpadi aliajn sentantajn estulojn! Se persono agas krime, ni turmentiĝas de bedaŭro por la krimulo, pri kiu ni kredas, ke tiu mem estas la vera viktimo, kaj ni laboradas sen kompromiso por ke li renovigu sin.”

“Kleregaj vidpunktoj!” deklaris Kugel. “Jam nun mi sensas renoviĝadon!”

“Bonege! Viaj rimarkoj validigas nian filozofion; certe vi jam trapasis tion, kion mi nomas Fazo Unu de la programo.”

Kugel malridetis. “Ĉu ekzistas pluaj fazoj? Ĉu ili necesas?”

“Absolute; ankoraŭ restas Fazoj Du kaj Tri. Decas, ke mi ekspliku, ke Lumarto ne ĉiam sekvis tian politikon. Dum la altaj jaroj de la Grandaj Magioj la urbo falis sub la influon de Jazbejn la Malnecesigisto, kiu rompis enirejojn al la kvin demono-landoj kaj konstruis la kvin templojn de Lumarto. Vi nun staras en la Templo de Pfampoŭn.”

“Strange,” diris Kugel, “ke popolo tiom kompatema estas tiel fervoraj demonistoj.”

“Nenio povus esti pli for de la vero. La Kompata Popolo de Lumarto elpelis Jazbejn, por establi la Epokon de Amo, kio nun devas persisti ĝis la fina fadiĝo de la suno. Nia amo etendiĝas al ĉiuj, eĉ al la kvin demonoj de Jazbejn, kiujn ni esperas savi disde ilia malicema malbonegismo. Vi estos la plej nuntempa el longa serio da noblaj individuoj kiuj laboradis por tiu ĉi celo, kaj el tio konsistas Fazo Du de la programo.”

Kugel staris velke pro konsterniĝo. “Tia laboro multe superas mian kompetentecon!”

“Ĉiu sentas la saman mankon,” diris la maljunulo. “Tamen necesas, ke Pfampoŭn instruiĝi pri kompato, konsideremo kaj moralo; pro strebadi tiel, vi spertos ondon de feliĉa kulpo-repago.”

“Kaj Fazo Tri?” ronkis Kugel. “Kio je tio?”

“Kiam vi sukcesos je via misio, tiam vi estos glorie akceptata en nian frataron!” La maljuna viro ignoris la malesperan ĝemon sonigitan de Kugel. “Nu, mi kalkulu: la monato de Jaŭnt ĝuste nun finiĝas, kaj ni eniras la monaton de Pfampoŭn, kiu estas eble la plej malagraba de la kvin pro kialo de liaj sensivaj okuloj. Li fariĝas kolerega pro eĉ tiom malmulto, kiom unu briletero, kaj vi devas provi viajn persvadojn en absoluta mallumo. Ĉu vi havas iujn ajn pluajn demandojn?”

“Jes ja! Kion fari, se Pfampoŭn rifuzas ripari la konduton?”

“Tio ĉi estas ‘negativisma pensado’ kion ni kompataj popoloj rifuzas rekoni. Ignoru ĉion, kion vi aŭdis rilate al la makabraj kutimoj de Pfampoŭn. Iru antaŭen en plena memfido!”

Kugel elkriis en kordoloro: “Kiel mi revenos por ĝui miajn honorojn kaj premiojn?”

“Sendube Pfampoŭn, kiam **kontricia**, sendos vin supren per rimedo sia propra,” diris la maljunulo. “Nun mi bone adiaŭas vin.”

“Unu momenton! Kie miaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj? Kiel mi vivtenadu?”

“Ankaŭ tiujn ĉi aferojn ni lasas al la elekto de Pfampoŭn.” La maljunulo tuŝis butonon; la planko malfermiĝis sube de la piedoj de Kugel; li glitis laŭ spirala fostubo je kapturna rapido. La aero grade fariĝis siropeca; Kugel alfrapis tavoloeton de nevidebla kunstriktiĝo kiu krevis kun sono tia, kia ŝtopilo tiritita el botelo, kaj Kugel eliris en ĉambron meze grandan, lumigitan per lumeto de sola lampo.

Kugel staris senmove rigida, apenaŭ riskante spiri. Sur podio transĉambra Pfampoŭn sidis dormanta en masiva seĝo, du nigraj duonsferoj **ŝutrantaj** la malnormale grandegajn okulojn kontraŭ la lumo. La griza trunko malorde plenigis preskaŭ la tutan longon de la podio; la masivaj disaj gamboj kuŝis plate kontraŭ la planko. Brakoj, tiom grandaj ronde kiom Kugel mem, finiĝis en fingroj tri futojn longaj, ĉiu ornamita per cento da juvelaj ringoj. La kapo de Pfampoŭn grandis tiom, kiom **ĉarumo**, kun grandega nazo kaj ege granda vangopenda buŝo. La du okuloj, ĉiu tiom granda kiom kuireja lavbaseno, malvideblis pro la ŝirmaj duonsferoj.

Kugel, entenante la spiron pro timo kaj ankaŭ kontraŭ la fiodorego kiu pendis en la aero, rigardis singarde ĉirkaŭ la ĉambro. Ŝnureto kondukiĝis de la lampo, trans la plafono, por pendi apud la fingroj de Pfampoŭn; preskaŭ kiel refleksa kutimo Kugel malligis la ŝnuron disde la lampo. Li

vidis ununuran elirejon de la ĉambro: malalta fera pordo tuj malantaŭ la seĝo de Pfampoŭn. La ŝuta tubo laŭ kiu li estis enirinta nun ne troviĝis.

La vangopendaĵoj apud la buŝo de Pfampoŭn nun ekmovetis kaj leviĝis; **homonkulo** vivanta kiel kreskaĵo sur la pinto de la lango de Pfampoŭn rigardis serĉe elen. Ĝi rigardegis al Kugel per bidaj nigraj okuloj. “Ha, ĉu tempo pasis tiom rapide?” La kreitulo, kliniĝante antaŭen, konsultis signon sur la muro. “Ja vere okazis; mi trodomis kaj Pfampoŭn estos kolereta. Kiuj estas viaj krimoj? Ĉi tiuj detaloj estas interesaj al Pfampoŭn — kio samas diri mi mem, tamen pro kaprico mi kutime nomas min Pulsifer, kvazaŭ mi estus aparta estulo.”

Kugel parolis en voĉo de brava memfido: “Mi estas Kugel, inspektoro por la nova reĝimo, kiu nun tenas povon en Lumarto. Mi venis suben por certigi pri la komforto de Pfampoŭn, kaj ĉar ĉio bonas, mi nun reiros supren. Kie la elirejo?”

Pulsifer demandis plendeme: “Havas vi neniujn krimojn por pridiri? Jen malplaĉa novaĵo. Ambaŭ Pfampoŭn kaj mi ĝuas grandajn pekegojn. Antaŭ ne tre longe iu mar-komercisto, kies nomo evitas memoron, kaptis kvazaŭ sorĉe nian atenton dum pli ol horo.”

“Kaj kio okazis poste?”

“Pli bone, ke oni ne demandu.” Pulsifer okupis sin polurante unu el la dentegojn de Pfampoŭn per broseto. Li puŝis sian kapon antaŭen kaj inspektis la makulan vizaĝon super si. “Pfampoŭn ankoraŭ dormas profunde; li engestis eksternorme grandan manĝon tuj antaŭ ol endormiĝi. Pardonu min dum mi esploras la progresostaton de la digestado de Pfampoŭn.” Pulsifer ekeniris malataŭ la vangopendaĵojn de Pfampoŭn kaj montris sin nur kiel vibrado en la muskoloŝnura griza kolo. Baldaŭ li renvenis al vido. “Li tre malasatas, aŭ tiel evidentas. Decas, ke mi veku lin; li volas alparoli vin antaŭ ol ...”

“Antaŭ ol kio?”

“Ne grave.”

“Momenton,” diris Kugel. “Al mi interesas konversaciado kun vi antaŭ Pfampoŭn.”

“Ĉu vere?” demandis Pulsifer, kaj poluris la dentegon de Pfampoŭn’s kun granda spriteco. “Tio ĉi estas plaĉa por aŭdi; mi ricevas malmultajn komplimentojn.”

“Strange! Mi vidas multon en vi merita je rekomendo. Necese, via kariero etendiĝas man-en-mane kun tiu de Pfampoŭn, sed povas esti, ke vi havas celojn kaj ambiciojn viajn proprajn?”

Pulsifer apogigis la lipon de Pfampoŭn supren sur la puriga broso kaj malstreĉiĝis sur la breto tiel kreita. “Foje mi sentas, ke mi ĝuos vidi iomete de la ekstera mondo. Ni supreniris kelkajn fojojn al la surfaco, sed ĉiam dum nokto kiam pezaj nuboj obstaklas la stelojn, kaj eĉ tiam Pfampoŭn plendas pri la troa brileco, kaj li rapide revenas ĉi suben.”

“Domaĝe,” diris Kugel. “Je tagoj ekzistas multo por vidi. La pejzaĝo ĉirkaŭ Lumarto plaĉas. La Kompata Popolo ĝuste nun preparas sian Grandan Spektakon de Plejaj Kontrastoj, pri kio oni diras, ke belegas.”

Pulsifer gestis sopiran kapneon. “Mi dubas, ke iam ajn mi vidos tiajn spektaklojn. Ĉu vi spektis

multajn hororajn krimojn?”

“Ja mi faris. Ekzemple, mi rememoras pri nano el la Arbaro Batavro, kiu rajdis pelgrejnon —”

Pulsifer interrompis lin kun gesto. “Momenton. Pfampoŭn estos volanta aŭdi tion ĉi.” Li kliniĝis malstabile el la kaverna buŝo por rigardegi supren al la kovritaj okulgloboj. “Ĉu li, aŭ pli precize, ĉu mi vekiĝis? Mi kredis, ke mi atentis pri ekmoviĝo. Ajnakaze, malgraŭ tio, ke mi ĝuis nian konversacion, ni devas antaŭenigi niajn devojn. Hm, la lumoŝnuro estas en malordo. Eble vi agos tiom bonhelpe, ke vi estingos la lumon?.”

“Ne ekzistas kaŭzo por hasti,” diris Kugel. “Pfampoŭn dormas pace; lasu, ke li ĝuu la ripozon. Mi havas ion por montri al vi, ludon de ŝanco. Ĉu vi konas pri ‘Zámpolio’?”

Pulsifer indikis negative, kaj Kugel elprenis siajn kartetojn. “Atentu detale! Mi distribuas al vi kvar kartetojn kaj mi prenas kvar kartetojn, kiujn ni kaŝas unu de la alia.” Kugel eksplikis la regulojn de la ludo. “Necese ni ludas por moneroj el oro aŭ iu simila valoraĵo, por fari, ke la ludo estu interesa. Mi tial vetas kvin tercojn, valoro kion vi devas kontraŭi egale.”

“Tie for en du sako estas la oro de Pfampoŭn, aŭ kun egala propreco, mia oro, ĉare mi estas integra aksesoro de tiu ĉi vasta masivulo. Elprenu sufiĉe da oro por valori egale je viaj tercoj.”

La ludo procedis. Pulsifer venkis la unuan interludon, je sia feliĉego, poste venkiĝis je la sekva, kio instigis, ke li plenigu la aeron kun mornaj plendoj; poste li venkis refoje kaj refoje ĝis Kugel deklaris mankon de plua mono. “Vi estas ruza kaj lerta ludanto; estas ĝojige, batali vin per la inteligento! Tamen, mi kredas, ke mi povus venki vin se mi estus havonta la tercojn kiujn mi lasis en la templo supera.”

Pulsifer, iom ŝveligita kaj memglora, moketis la fanfaronon de Kugel. “Mi timas, ke mi estas tro ruza por vi! Jen, reprenu viajn tercojn kaj ni ludos fojon plu.”

“Ne; tiel ĉi ne estas la kutima agmaniero de sportistoj; mi tro fieras por akcepti vian monon. Lasu min sugesti solvon por la problemo. En la templo supera estas mia sako da tercoj kaj sako da dolĉaĵoj kiujn vi eble ŝatos manĝeti dum ni daŭrigos la ludon. Lasu, ke ni iru akiri tiujn ĉi objektojn, post ol tio mi defios vin, ke vi venkadu plu tiel, kiel antaŭe!”

Pulsifer kliniĝis for elen por inspekti la vizaĝon de Pfampoŭn. “Li ŝajnas tre komforta, kvankam liaj orgenoj boladas je malsato.”

“Li dormas tiom profunde kiom antaŭe,” deklaris Kugel. “Ni do hastu. Se li vekiĝas nia ludo estos difekte interrompata.”

Pulsifer hezitis. “Kio pri la oro de Pfampoŭn? Ni malrajtas riski lasi ĝin ne prigardita!”

“Ni prenos ĝin kun ni, kaj ĝi neniam estos ekster nia gardado.”

“Sufiĉe bone; metu ĝin ĉi tie sur la podion.”

“Jen, kaj nun mi pretas. Kiel ni supreniru?”

“Simple premu la plumban ampolon apud la brako de la seĝo, sed mi petas, faru ĉion kviete.

Pfampoŭn eble fariĝus maltrankvila se li vekigis en ĉirkaŭejo nekonata.”

“Li neniam antaŭe ripozis pli komforte! Ni iras supren!” Li premis la butonon; la podio tremetis kaj knaris kaj flosis supren laŭ malhela ŝakto, kio malfermiĝis super ili. Baldaŭ ili ektrapenetris la valvon de la kunprema energikampo kiun Kugel trapasis falante malsupren tra la ŝuto. Tuj okazis, ke fora brileto de skarлата lumo enfluetis la ŝakton kaj momenton poste la podio glitis halte je sama nivelo de la altaro en la Templo de Pfampoŭn.

“Nu do, mia sako da tercoj,” diris Kugel. “Kie, precize, lasis mi tion? Iomete for tie, mi kredas. Atentu! Tra la grandaj arkoj vi povas supervidi la ĉefan placon de Lumarto, kaj jen estas la Kompata Popolo prizorgantaj siajn ordinarajn aferojn. Kio estas via opinio pri ĉio ĉi?”

“Tre interesaj, kvankam tiom vasta pejzaĝo malfamiliaras al mi. Fakte, mi preskaŭ sentas kapturiniĝon. Kio estas la fonto de la sovaĝa ruĝa brilego?”

“Tio estas la lumo de nia antikva suno, nun iranta okcidenten al subiro.”

“Ĝi ne plaĉas al mi. Estu rapida, mi petas, zorgante vian aferon; subite mi ege netraktivilas.”

“Mi agos haste,” diris Kugel.

La suno, falanta profunde suben, sendis strion da lumo tra la portalo, por frapi sur la tutan altaron. Kugel, paŝante malantaŭ la masiva seĝo, ektiris for la du klapojn gardantajn la okulojn de Pfampoŭn, kaj la laktokoloraj globoj rebiletis malseke en la sunlumo.

Dum tuja momenteto Pfampoŭn restis kvietaj. Liaj muskoloj eke kunfleksegis, liaj gamboj ekmoviĝis, lia buŝo ekmalfermiĝis grande, kaj li eligis eksplodaĵon da sono: grinca kriego kio puŝblovis Pulsiferon elen por tiel vibradi, kie flago en vento. Pfampoŭn saltegis de la altaro por fali disetendiĝe kaj rulante trans la planko de la templo, tutatempe soniganta siajn kataklismajn kriegojn. Li grimpe trenis sin por stariĝi, kaj frapeganta la kahelan plankon per liaj grandegaj piedoj, kaj li risortis ien kaj tien kaj fine trarompis kreve la ŝtonajn murojn, kvazaŭ ili estus paperaj, dum en la placo la Kompata Popolo staradis ŝtone senmovaj pro teruro.

Kugel, prenanta la du sakojn da oro, eliris la templon per flankaj enirejoj. Dum momento li rigardis al Pfampoŭn kureganta la placon laŭ disaj direktoj, krieganta kaj vipe brakumanta kontraŭ la suno. Pulsifer, teneganta senespere la detentegojn, provis gvidi la kolere frenezan demonon, kiu preteratenta je ajna deteno, plonĝis orienten tra la urbo, piede subenbatanta arbojn, eksplode trakuranta domojn kvazaŭ ili ne ĉeestis.

Kugel marŝadis haste suben al la rivero Isk' kaj procedis elen sur kajo. Li elektis platsuban boaton bone grandan, ekipohavan je velstango, velo kaj remiloj, kaj pretigis sin por surpaŝi. Boateto alproksimiĝis al la kajo de la venflua direkto, puŝstange pelata de strebe laboranta granda viro en ĉifonaj vestoj. Kugel turniĝis for, ŝajnigante intereson en la pejzaĝo el ne pli ol ordinara intenseco, atendante ke li povu suriri la boaton sen logi priatenton.

La boateto tuŝis la kajon; la boatetisto suprengrimpis eskalon.

Kugel daŭrigis sian rigardon transakvan, afektante neintereson pri ĉio krom la rivera pejzaĝo.

La viro, anhelante kaj ĝemante, subite ekhaltis. Kugel sentis ties intensan inspektadon, kaj post

longe turniĝanta, enrigardis la troplenan vizaĝon de Hurusko, la Nólido de Gundro, kvankam ties vizaĝo estis apenaŭ rekonebla pro la mordoj kiujn Hurusko estis suferinta de la insektoj de la Marĉo Lalo.

Hurusko rigardegis longe kaj malmole al Kugel. “Tio ĉi estas ege plaĉa okazo!” li diris raŭkvoĉe. “Mi timas, ke ni neniam refoje renkontiĝos. Kaj kion vi portas en tiuj ledaj sakoj?” Li barakte fortiris sakon de Kugel. “Oron, laŭ ĝia pezeco. Via aŭguro ja estas tute pravigata! Unue honoroj kaj vojaĝo sur akvo, nun riĉaĵoj kaj venĝo! Pretigu vin por morti!”


“Momenton!” kriis Kugel. “Vi neglektis ĝuste fiksi la boateton al la kajo! Jen kontraŭregula konduto!”

Hurusko turniĝis por rigardi, kaj Kugel puŝis lin de sur la kajo en la akvon.

Blasfemanta kaj freneze krieganta, Hurusko baraktis por atingi la strandon dum Kugel hastofuŝe strebis disigi la ligaĵojn de la ŝnuro tenanta boaton al kajo. Post longe la ŝnuro malligiĝis; Kugel tiris proksimen la boaton dum Hurusko alvenis strebe kuranta laŭ la kajo kiel virbovo. Al Kugel restis neniu alia elekto krom forlasi sian oron, ensalti la boaton, puŝi for kaj ekuzi la remilojn dum Hurusko staradis svinganta siajn brakojn en kolerego.

Kugel pensoplene levis la velon; la vento portis lin malsupren laŭ la rivero kaj ĉirkaŭ turnejo. Al Kugel la fina vidaĵo pri Lumarto, en la mortanta lumo de posttagmezo, inkludis la malaltajn kupolojn de la demonaj temploj kaj la malhelan silueton de Hurusko surstaranta la kajon. De malproksime la krioj de Pfampoŭn ankoraŭ aŭdeblis kaj fojfoje la kraŝa frapsono de falantaĵ [masonaĵoj](#).





Parto 2 La Sakpleno da Songoj

La Rivero Isk', forirante Lumarton, vagadis laŭ larĝaj kurboj trans la Ebenejo de Ruĝaj Floroj, celante ĝenerale la sudon. Dum ses **idilie** pacaj tagoj Kugel veturis boate laŭ la akvoplana rivero, haltanta je noktoj ĉe unu aŭ alia el la riverbordaj gastejoj.

La sepan tagon la rivero turniĝis okcidenten, per malregule subitaj migroj kaj etendiĝoj trapasis tiun landon el rokaj stangoj kaj arbaraj montetoj konata laŭ nomo Ĉajm' Purpura. Vento bloviĝis, se iam ajn, per neatendebaj ekblovoj, kaj Kugel, faligante la velon, estis kontenta drivi laŭ la flu-direkto, stirante sian boateton per nur foj-fojaj puŝetoj remilaj.

La vilaĝoj de la ebenejo forlasiĝis; la regiono estis neloĝata. Pro vido de la disfalintajn tombojn ĉe riverbordo, la kreskaĵarojn el **kupresoj** kaj **taksusoj**, pro nokta aŭdo de kvietaj konversacioj, Kugel feliĉis iri rivere anstataŭ piede, kaj estis kun granda trankviliĝo, ke li drivis for el la Ĉajm' Purpura.

Ĉe la vilaĝo Trun', la rivero elverŝis sin en la Marĉon Cómolon, kaj Kugel vendis la boaton por dek **térsoj**. Por ripari al si la enspezojn li akceptis dungaĝon sube de la vilaĝa buĉisto, plenumanta la pli malŝatatajn taskojn kiuj necesas al tiu komerco. Tamen, la enspezo sufiĉis kaj Kugel firmigis sin al siaj maldignaj devoj. Li laboris tiel bonfike ke li vokiĝis por helpi prepari festomanĝaĵon prezentiĝotan ĉe grava religia festo.

Per simpla miso, aŭ pro la premo de cirkonstancoj, Kugel uzis du sanktajn bestojn en la preparo de sia speciala **raguo**. Meze dum la bankedo la misfaro malkovriĝis kaj fojon plu Kugel eliris urbon sub ombro de metafora nuboj.

Post sinkaŝi la tutan nokton malantaŭ la komunuma buĉejo por eviti la freneze agacitajn homamasojn, Kugel eliris kun rapido trans la Marĉo Cómol'.

La vojo kondukis nerekte, kurbiĝante ĉirkaŭ **torfaj** marĉetoj kaj putrecaj laĝetoj, turniĝis por sekvi la vojon de malnovega ŝoseo, tiele duobliganta la longecon de la vojaĝo. Vento el la nordo blovis la ĉielon tute sennuba, tiel por montri la pejzaĝon en rimarkinda klareco. Kugel trovis nenian plezuron en la vidaĵo, aparte ne, kiam rigardanta antaŭen, li ekvidis malproksiman **pélgrejnon** ĉasflugantan laŭ la venta direkto.

Dum pasis la posttagmezo la vento mildiĝis, lasanta la tutan marĉon preternature senmova. De malantaŭ tufoj akvo-**vélfkenoj** vokis al Kugel, uzanta la dolĉajn voĉojn de malĝojaj junulinoj: "Kugel, ho Kugel! Kial vi veturas haste? Alvenu mian arbejon kaj kombu mian belan hararon!"

Kaj: "Kugel, ho Kugel! Kien vi iras? Kunportu min, por ke ni kunspertu viajn ĝojajn aventurojn!"

Kaj: "Kugel, amata Kugel! La tago mortas; la jaro finiĝas! Venu viziti min malantaŭ la tufo, kaj ni konsolos unu la alian sen ajna deteno!"

Kugel nur marŝis des pli rapide, anxie deziranta trovi ŝirmejon por la nokto.

Dum la suno tremis ĉe la rando de Cómola Marĉo Kugel venis al eta gastejo, izolita sub kvin masivaj kverkoj. Li dankeme akceptis ĉambron por la nokto, kaj la gastejestro prezentis mezbonan

vespermanĝon el boletigitaj herboj, foste rostitaj **fragmito**-birdoj, semo-kuko kaj densa biero el **ksantioj**.

Dum Kugel manĝis, la gastejestro staris apude kun manoj ĉe koksoj. “Mi vidas pro via konduto ke vi estas lordo de alta rango; malgraŭ tio vi saltetas trans Cómbolo Marĉo surpiede kiel kamparanaĉo. Tiu ĉi mala inter-komparo min konfuzas.”

“Ĝi facile eksplikiĝas,” diris Kugel. “Mi konsideras min la ununura honesta viro en mondo el friponoj kaj kanajloj, ĉi estuloj esceptitaj. En tiaj ĉi cirkonstancoj estas malfacile amasigi riĉaĵojn.”

La gastejestro tiris al si la mentonon, turniĝis for. Kiam li venis por prezenti al Kugel deserton el **ribo**-kuko, li hezitis sufiĉe longe por diri: “Viaj malfacilaĵoj elvokis mian simpation. Ĉinokte mi meditos pri la afero.”

La gastisto ja kondukis laŭ sia diro. Je la mateno, post Kugel finis matenmanĝi, la gastejestro kondukis lin en la besto-korton kaj prezentis grandan brun-grizan beston kun fortikaj malantaŭaj gamboj kaj tufa vosto, jam provizita per brid-rimeno kaj selo, preta por esti rajdata.

“Jen la plej malmulto kion mi povas fari por vi,” diris la gastejestro. “Mi vendos ĉi tiun beston kontraŭ meza prezo. Agnoskite, eleganteco mankas al ĝi, kaj fakte ĝi estas hibrido el dáŭngo kaj félukharo. Tamen, ĝi iras kun facila marŝ-maniero; ĝi nutriĝas per malaltprezaj forĵetaĵoj, kaj famas pro obstina lojaleco.”

Kugel moviĝis ĝentile for. “Mi dankas pro via donemo, sed por tia bestaĉo iu ajn prezo estus troa. Atentu la **ulcerojn** ĉe la bazo de ĝia vosto, la **ekzemon** laŭ ĝia dorso, kaj, se mi ne eraras, mankas al ĝi unu okulo. Krome, ĝiaodoro ne tute plaĉas.”

“Neniaĵoj!” deklaris la gastejestro. “Ĉu vi deziras fidindan rajdobeston por porti vin trans la Ebenejo de Starantaj Ŝtonoj, aŭ pliigilon por via memŝato? La besto fariĝos via propra kontraŭ nur tridek tέρsoj.”

Kugel saltis malantaŭen pro ŝoko. “Kiam bonega Cábalesa hŭérioto vendiĝas kontraŭ dudek? Kara kunulo mia, via donemo superas mian pago-kapablon!”

La esprimo de la gastejestro montris nur paciencon. “Jen, en la mezo de la Cóbola Marĉo, vi ne aĉetos eĉ la odoron de mortinta hŭérioto.”

“Ni forĵetu **eŭfemismojn**,” diris Kugel. “Via prezo fie aŭdacas.”

Dum momento la vizaĝo de la gastejestro perdis sian afablan esprimon kaj li parolis en voĉo plenda: “Ĉiu persono al kiu mi vendas tiun ĉi rajdobeston provas same preni de mi maljustan avantaĝon pro mia komplezemo.”

Kugel konfuziĝis pri la diraĵo. Malgraŭ ĉio, detektanta malrezolutiĝon, li puŝis al tiu avantaĝo. “Spite kontraŭ dek du da priduboj, mi doneme ofertas dek du tέρsojn!”

“Akceptite!” kriis la gastejestro preskaŭ antaŭ ol Kugel finis paroli. “Mi rediras, ke vi trovos tiun ĉi beston tute lojala, eĉ preter tio kion vi atendas.”

Kugel transpagis la dek du tέρsojn kaj zorge enseliĝis sur la besto. La gastejestro adiaŭis lin

milde. “Estu ke vi ĝuos sekuran kaj komfortan vojaĝon!”

Kugel respondis sammaniere. “Estu ke viaj entreprenoj sukcesos!”

Por ke li faru brav-ŝajnan foriron, Kugel provis rimene turni la beston **karakole**, sed ĝi nur kaŭriĝis proksime al la grundo, poste mildpaŝis surire la vojjon.

Kugel rajdis unu **mejlon** komferte, kaj pluan, kaj konsiderante ĉion, rigardis sian akiraĵon kun favoro. “Ne disputeblas, ke la besto marŝas molpiede; nun mi eklernu ĉu ĝi povas galopeti kun rapido.”

Li skuis la rimenojn; la besto ekis laŭ la vojo, ĝia irmaniero estanta unike petola pomp-marŝo, kun vosto arĥita kaj kapo alte tenata.

Kugel kalkane piedfrapis la beston je ĝiaj anhele spirantaj flankoj. “Rapidu pli! Ni testu vian kapablon!”

La besto risortis antaŭen kun granda energio, kaj la venteto blovis al Kugel la mantelon tiel ke ĝi flagradis malantaŭ liaj ŝultroj.

Impone masiva kverko staris apud kurbiĝo de la vojo; objekto kiun la besto ŝajne rekonis por esti signifa. Ĝi pliigis sian rapidon, tio nur por ekhalti kaj levi sian malantaŭon, tiel ĵetante Kugelon en la apudvojan fosaĵon. Kiam falmarŝe li sukcesis supreniri por stari survoje, li observis, ke la besto estis foriranta trans la marĉo, laŭ direkto ĝenerale kondukanta al la gastejo.

“Besto ja lojala!” grumblis Kugel. “Ĝi sendeflankigeble fidelas al la komforto de ĝia bona bestodomo.” Li trovis sian verdan **veluran** ĉapelon, ĝin remetis sur la kapon kaj komencis refoje piediri suden laŭ la vojo.

Malfrue posttagmeze Kugel ekvidis vilaĝon konsistantan el dek du kotaj dometoj kie loĝis dike malaltaj longabrakaj homoj, distingeblaj pro iliaj grandaj hararoj blankigitaj.

Kugel konjektis la sunan altecon, poste ekzamenis la terenon antaŭan, kiu etendiĝis kiel morna sinsekvaĵaro el montetoj kaj lagetoj ĝis la vidlimo. Subpremante ĉiujn siajn antaŭtimetojn li alproksimiĝis la plej grandan kaj pretendeman el la dometoj.

La mastro de la domo sidadis sur benko je flanko, blankiganta la hararon de unu el siaj infanoj, ke ĝi tiel radiadu kiel petaloj de blanka **krizantemo**, dum aliaj malpuraj infanoj ludis apude en la koto.

“Bonan matenon,” diris Kugel. “Ĉu vi povas provizi al mi manĝon kaj loĝon por la nokto? Mi nature intencas adekvatan repagon.”

“Mi sentos min privilegita tiel farante,” respondis la domestro. “Tiu ĉi estas la plej komforta dometo de Sámsetisko, kaj mi koniĝas pro mia bonstoko de anekdotoj. Ĉu vi volas inspekti la internon?”

“Estus al mi plezuro resti horon en mia ĉambro antaŭ ol indulgi min en varma bano.”

Lia gastiganto blovis pufe la vangojn, kaj forviŝante la bankigaĵon de sur la manoj venigis

Kugelon eniri la dometon. Li montris mason da fragmitoj ĉe flanko de la ĉambro. “Jen via lito; ripozu tiom longe kiom vi volas. Rilate al bano, la laĝetoj de la marĉo infestiĝas je trélkojdoj kaj drato-vermoj, kaj ne povas esti rekomendataj.”

“Tiukaze, mi devas rezigni pri tio,” diris Kugel. “Tamen, mi ne manĝis de post la mateno, kaj pretas preni la vespermanĝon kiel eble plej frue.”

“La edzino foriris por kaptilumi en la marĉo,” diris lia gastiganto. “Estus trofrue por ke ni diskutu la vespermanĝon antaŭ ol lerni kion ŝi sukcesas elpreni per sia penado.”

Post ioma tempo la virino revenis portanta sakon kaj **vimenan** korbon. Ŝi konstruis fajron kaj preparis la vespermanĝon, dum Erüig la dommastro elprenis du-kordan gitaron kaj malenuigis Kugelon per baladoj de la regiono.

Postatempe la virino vokis al Kugel kaj Erüig, ke ili envenu la dometon, kie ŝi prezentis bovlojn da kaĉo, telerojn da frititaj musko kaj gánjonoj, kun tranĉaĵoj de grize nigra pano.

Post vespermanĝi Erüig pelis siajn edzinon kaj infanojn el la domo en la nokton, eksplikante: “Tio kion ni devas diskuti maldecas por needukitaj oreloj. Kugel estas grava vojaĝanto kaj ne volas mezuri ĉiujn siajn vortojn.”

Elprenante terakotan botelegon, Erüig verŝis du kvantetojn da **arako**, unu el kiuj li metis antaŭ Kugel, poste komfortigis sin por konversacii. “De kie vi venis kaj kien vi celas?”

Kugel gustumis la arakon, kiu ekbruligis tute laŭlonge la internon de lia laringo. “Mi indiĝenas je Almerio, kien mi nun returnas.”

Erüig gratis al si la kapon senkomprene. “Mi ne povas diveni vian kialon, pro kio vi iras tiom malproksimen, nur por retrofari vian paŝadon.”

“Certaj malamikoj verkis malbonfarojn kontraŭ mi,” diris Kugel. “Je mia reveno, mi intencas adekvatan venĝon.”

“Tiaj repagoj mildigas la spiriton kiel neniam aliaj,” kunsentis Erüig. “Tuja obstaklo estas la Ebenejo de Starantaj Ŝtonoj, pro tio ke ásnoj **hantas** la lokon. Mi povas aldoni ke ankaŭ pélgrejnoj oftas.”

Kugel skuetis nervoze sian glavon. “Kiom malproksimas la Ebenejo de Starantaj Ŝtonoj?”

“Kvar mejlojn sude la grundo leviĝas kaj la Ebenejo de Starantaj Ŝtonoj komencas. La vojo kondukas de kolonaĵo al kolonaĵo ĝis distanco de dek kvin mejloj. Veturanto kor-fortika povas transiri la ebenejon en kvar aŭ kvin horoj, kondiĉe ke li ne estu atendigita aŭ **vorigita**. La urbeto Kvirnifo situas pli malproksima je du horoj plu.”

“Unu **colo** de antaŭscio same valoras kiel dek mejloj de postapensado—”

“Bone dirita!” kriis Erüig, glutante buŝplenon da arako. “Mia sama opinio, ekzakte precize! Kugel, vi estas sagaca!”

“—kaj parolante pri tiu ĉi temo, ĉu mi rajtas demandi vian opinion pri Kvirnifo?”

“Tiu popolo strangas je multaj flankoj,” diris Erüig. “Fanfarone ili memgratulas pro la ĝentileco de siaj kutimoj, tamen ili rifuzas blankigi la harojn, kaj ili malstrikatas je siaj religiaj observindaĵoj. Ekzemple, la laikanoj faras riverencojn al Sankta Ŭiulio per la dekstra mano, ne sur la gluteo, sed sur abdomeno, io kion ni ĉi tie konsideras pigre malpreciza praktiko. Kiaj estas viaj opinioj?”

“Decas ke la rito estu observata laŭ via priskribo,” diris Kugel. “Neniu alia metodo portas gravecon.”

Erüig re-plenigis la glason de Kugel. “Mi taksas tion kiel grava aprobo pri niaj vidpunktoj!”

La pordo malfermiĝis kaj la edzino de Erüig enrigardis la dometon. “La nokto mallumas. Akra vento blovas el la nordo, kaj nigra besto rampas ĉe la rando de la marĉo.”

“Staru inter la ombroj; Sankta Ŭiulio gardas siajn proprajn. Ne penseblas, ke vi kaj viaj infanaĉoj agacu nian gaston.”

La virino malbonvole fermis la pordon kaj reiris en la nokton. Erüig tiris sin antaŭen sur la tabureto kaj glutis kvanton da arako. “La popolo de Kvirnifo, kiel mi diris, sufiĉe strangas, sed ilia registro, Duko Orbal, superas ilin je ĉiu kategorio. Li dediĉas sin al la studo de mirindaĵoj kaj unikaĵoj, kaj ĉiu fuŝa sorĉisto kun du ĉarmoj en la kapo estas bankedita kaj celebrita kaj invitita ĝui ĉiujn plejbonaĵojn de la urbo.”

“Plej strange!” deklaris Kugel.

Refoje la pordo malfermiĝis kaj la virino rigardis en la dometon. Erüig detenis la glason kaj malridetis malantaŭen trans la ŝultro. “Kio problemas ĉifoje?”

“La besto nun moviĝas inter la dometoj. Laŭ ĉio kion ni povas scii, eble ankaŭ ĝi adoras Ŭiulion.”

Erüig provis disputi, sed la vizaĝo de la virino fariĝis malcedema. “Same bonas, ke via gasto forlasu siajn ĝentilecojn nun ol poste, ĉar ni ĉiuj, ĉiuokaze, devas dormi sur la sama maso de fragmitoj.” Ŝi malfermis plene la pordon kaj ordonis siajn malnetajn infanojn eniri la dometon. Erüig, certigita ke nenia plua konversacio eblis, malsuprenĵetis sin sur la fragmitojn, kaj Kugel sekvis post nelonge.

Postamatene Kugel matenmanĝis cindro-kukon kaj herban teon, kaj preparis foriri. Erüig akompanis lin ĝis la vojo. “Vi estas farinta al mi bonan impreson, kaj mi helpas al vi la transiron de la Ebenejo de Starantaj Ŝonoj. Unuaportune prenu ŝtoneton pugne grandan kaj faru sur ĝi la signon trigraman. Se vi atakiĝos, tenu alte la ŝtoneton kaj elkriu: ‘Permesu min pasi! Mi portas sanktan objekton!’ Ĉe la unua kolonaĵo staranta, deponu la ŝtoneton kaj elektu alian de sur la stako, refoje faru la signon kaj portu ĝin al la dua kolonaĵo, kaj tiele trans la ebenejo.”

“Tute klare,” diris Kugel. “Sed eble decas ke vi montru al mi la plej potencon version de la signo, kaj tiel freŝigu mian memoron.”

Erüig gratis markon en la tero. “Simple, precize, ĝuste! La popolo de Kvirnifo neglektas tiun ĉi cirklaĵon kaj skribaĉas ajnadirekte.”

“Malstrikteco, refoje ekzemplata!” diris Kugel.

“Nu do, Kugel: adiaŭ! Venontafoje kiam vi pasos nepre haltu ĉe mia dometo. Mia botelego da arako havas malstriktaĵon ŝtopilon!”

“Mi ne abstinus de tiu plezuro kontraŭ mil tĉrsoj. Kaj nun, rilate al mia ŝuldeco—”

Erŭig levis geste la manon. “Mi akceptas neniujn tĉrsojn de miaj gastoj!” Li ekis kaj liaj okuloj larĝis kiam lia edzino alvenis kaj pik-batis al li la ripojn. “Nu, do,” diris Erŭig. “Donu al la virino unu/du tĉrsojn; tio bonhumorigos ŝin dum ŝi prilaboras sian taskojn.”

Kugel transpagis kvin tĉrsojn, kio enorme satigis la virinon, kaj tiel eliris la vilaĝon.

Post kvar mejloj la vojo kliniĝis supren al griza ebenejo dissternite per kolonoj el griza ŝtono. Kugel trovis grandan ŝtoneton, kaj metante sian dekstran manon sur la gluteo gestis profundan saluton al la objekto. Li gratis sur ĝi signon iom similan al tiu desegnita por li fare de Erŭig kaj eldiris: “Mi konfidas tiun ĉi ŝtoneton al la atento de Ŭiulio! Mi petas ke ĝi ŝirmu min transirante la sombran ebenejon!”

Li ekzamenis la pejzaĝon, sed krom la kolonaĵoj kaj la longajn nigrajn ombrojn kuŝigitajn de la ruĝa matena suno, li malkovris nenion meritindan atenton, kaj dankeme ekiris laŭ la piedvojo.

Li estis piedirinta ne pli ol cent jardojn kiam li sentis ĉeeston kaj ektorniĝante ekvidis ásmon okdentegan preskaŭ tuŝe proksiman. Kugel levis alte la ŝtoneton kaj kriis: “Foriru vi! Mi portas sanktan objekton kaj mi ne volas esti altrudita!”

La ásmo parolis per mola malklara voĉo: “Malprave! Vi portas ordinaran ŝtoneton. Mi rigardis kaj vi pigre fuŝis la riton. Ekfuĝu se vi volas. Mi bezonas la ekzercon.”

La ásmo venis antaŭen. Kugel ĵetis la ŝtoneton kun la tuto de sia forto. Ĝi alfrapis la nigran frunton inter la hirtaj antenoj, kaj la ásmo falis grunden; antaŭ ol ĝi povis leviĝi Kugel jam detranĉis ĝian kapon.

Li komencis reiri, poste returnis por preni la ŝtoneton. “Kiel mi sciu tion, kiu estis celiginta la ĵeton tiom precize? Ŭiulio almenaŭ meritas, ke mi tion pridubu.”

Ĉe la unua kolonaĵo li tiel interŝanĝis ŝtonetojn kiel Erŭig estis rekomendinta, kaj ĉifoje li faris la signon trigraman kun zorgo kaj precizo.

Sen trudiĝo li transiris al la sekvanta kolonaĵo kaj tiele pluiris trans la ebenejo.

La suno sekvis sian vojon ĝis la zenito, paŭzis ioman tempon, poste malsupreniris en la okcidento. Kugel marŝadis netrudita de kolonaĵo al kolonaĵo. Kelkafoje li vidis pélgrejnon glitantan trans la ĉielo, kaj ĉiun fojon li ĵetis sin plate gruden por eviti atenton.

La Ebenejo de Starantaj Ŝtonoj finiĝis ĉe rando de klifo superrigardanta larĝan valon. Pro tio, ke sekureco tiom proksimis, Kugel malstriktiĝis en sia gardemo, kaj tuj poste ektimiĝis pro krio triumfa el la ĉielo. Li ekturis hororigitan rigardon trans la ŝultro, poste plonĝ-saltis de la klifa rando en krutan valetan, kie li zigzagis inter rokoj kaj premis sin en ombron. Malsupren glitfalis la pélgrejno, preterpasante la kaŝejon de Kugel. Trilante pro ĝojo, ĝi surgrundiĝis ĉe la bazo de la klifo, kaŭzante subitajn ekkriojn el gorgo de alia homo.

Gardante ke li restu kaŝata, Kugel malsupreniris la deklivon, kaj trovis, ke pélgrejno postsekvis grasan nigra-haran viron kiu vestiĝis per katuna kompleto presornamita en nigra-blankaj romboj. Ĉi tiu persono vigle prenis fuĝejon malantaŭ dik-trunka olólfar-arbo, kaj la pélgrejno ĉasis lin unue laŭ unu direkto, poste laŭ alia, klakante siajn dentegojn kaj provante kroĉi per siaj unegaj manoj.

Malgraŭ sia ronda pezeco, la viro montris rimarkindan viglecon piedan kaj la pélgrejno komencis kribi pro frustrado. Ĝi haltis por rigardi minace tra akselo de la arbo kaj morde ataki per sia longa buŝo.

Kapricavole Kugel kaŝiris antaŭen sur roka breto; tie, elektanta oportunan momenton, li saltis por fali sur la kapo de la bestaĵo, premante ĝian kolon malsupren en branĉa akselo de la olófan-arbo. Li alvokis la timigitan viron: “Rapidu! Alportu fortan ŝnuron! Ni ligos fikse kaptita tiun ĉi flugilhavan hororaĵon!”

La viro en la nigra-blanka rombara vestaĵoj krivokis: “Kial estu kompata? Ĝi devas esti mortigita kaj ĉimomente! Forprenu vian piedon, por ke mi detranĉu ĝian kapon.”

“Hezitu,” diris Kugel. “Malgraŭ ĉiuj ĝiaj malbonecoj, ĝi estas valora specimeno per kiu mi esperas profiti.”

“Profiti?” La ideo ne antaŭe memprezentis al la graso ĝentilulo. “Mi devas deklari proprigo-raĵton antaŭan! Mi ĵus pretis senkonsciigi la beston tiam, kiam vi entrudis.”

Kugel diris: “Tiukaze mi simple prenu mian pezon de sur la kolo de la bestaĵo kaj foriru survoje.”

La viro en la nigra-blanka vestaĵaro gestis agacite. “Certaj personoj kondukis ĝis ajna ekstremo nur por retorika venko. Tenu firme, do. Mi havas adekvatan ŝnuron tiuloke.”

La du viroj fikis branĉon super la pélgrejna kolo kaj ligis ĝin sekure tiuloke. La graso ĝentilulo, kiu sinprezentis per la nomo Iolo la Ŝonĝo-prenisto, demandis: “Je kia preciza valoro vi taksas tiun ĉi hororaĵon, kaj kial?”

Kugel diris: “Al mia atento venis informo ke Orbal, la Duko de Ombalikŭo, estas amato de strangaĵoj. Certe li pagos bone por tia ĉi monstraĵo, eble ĝis valoro de cent térsoj.”

“Viaj teorioj validas,” Iolo agnoskis. “Ĉu vi certas ke la ŝnurligo sekuras?”

Dum Kugel testis la ŝnuron li ekvidis ornamaĵon konsistantan el blua vitra ovo kun ora ĉeno ĉe la bestaĵa kresto. Dum li deprenis la objekton, la mano de Iolo ekis antaŭen, sed Kugel ŝultrumis lin for. Li demetis la amuleton, sed Iolo ektenis la ĉenon kaj la paro inter-rigardis sin minace okul-al-okule.

“Maltenu vian kaptadon de mia propraĵo,” diris Kugel per voĉtono glacia.

Iolo protestis vigle. “La objekto apartenas al mi ĉar mi ĝin vidis unue.”

“Sensece! Mi prenis ĝin de la kresto kaj vi provis barakti ĝin el mia mano.”

Iolo piede batis la grundon. “Mi ne toleros ordonemon!” Li barakte provis elpreni la bluan ovon

elde la tenado Kugela. Kugel perdis sian tenadon kaj la objekto ĵetiĝis kontraŭ montetan flankon kie ĝi rompiĝis en brile blua eksplodo lasanta truon en la montetflanko. Tuje elvenis or-grize kolora tentaklo kiu ektenis Kugelon ĉe la gambo.

Iolo risortis malantaŭen kaj de sekura distanco rigardadis al Kugel dum li baraktis kontraŭ tiriĝon entruan. Kugel savis sin lastamomente per ekteni al arbostumpo. Li alvokis: “Iolo, hastu! Portu ŝnuron kaj ligu la tentaklon al tiu ĉi stumpo; alikaze ĝi min tirus en la monteton!”

Iolo krucis antaŭbruste sian brakojn kaj parolis en tonoj mezuritaj: “Avareco portis al vi tiun ĉi malbonon. La okazo eblas esti dia juĝo kaj mi hezitas entrudi.”

“Kio? Post ol vi mem baraktis kaj dente kaj unge por eltiri la objekton el mia mano?”

Iolo malridetis kaj kunpremis la lipojn. “Ajnakaze mi posedas nur unu ŝnuron: tiun kiu ligas mian pélgrejnon.”

“Mortigu la pélgrejnon!” anhelis Kugel. “Kontribuu la ŝnuron je ĝia plej urĝa uzo!”

“Vi mem taksis tiun ĉi pélgrejnon kontraŭ cent térsjoj. La ŝnuro valoras je dek térsjoj.”

“Nu bone,” diris Kugel tra dentoj kunpremitaj. “Dek térsjoj por la ŝnuro, sed mi ne povas pagi cent térsjojn kontraŭ mortinta pélgrejno, ĉar mi portas nur kvardek kvin.”

“Do tiel estu. Transdonu la kvardek kvin térsjojn. Kian garantion povas vi diri kontraŭ la restanta sumo?”

Kun ioma malfacilo Kugel sukcesis ĵeti sian monsakon da térsjoj. Li montris sian [opalan](#) orel-pendaĵon, kiun Iolo tuj postulis, sed kiun Kugel rifuzis transdoni antaŭ ol la tentaklo estu jam ligita al la stumpo.

Kun malmulta gracio Iolo detranĉis la kapon de la pélgrejno, poste transiris portante la ŝnuron kaj sekurigis la tentaklon al la stumpo, tiel mildigante la tirforton al la gambo de Kugel.

“La orel-pendaĵon, se vi bonvolas!” diris Iolo, kaj li poziciis sian tranĉilon signifoplene apud la ŝnuro.

Kugel transĵetis la juvelon. “Jen vi havas ĉion: la tuton de miaj riĉaĵoj. Nun, bonvolu liberigi min de tiu ĉi tentaklo.”

“Mi estas singarda viro,” diris Iolo. “Mi devas konsideri la aferon laŭ kelkaj perspektivoj.” Li ekokupiĝis [bivaki](#) por la nokto.

Kugel vokis peton kompatigan: “Ĉu vi rememoras pri kiel mi savis vin de la pélgrejno?”

“Mi ja faras! Kaj grava filozofia demando pro tio leviĝis. Vi tiel rompis la inter-staton kaj nun tentaklo altenas vian gambon, kio estas, laŭkonsidere, la nova inter-stato. Mi zorge pripensados la rilatecon.”

Kugel argumentis neniom sukcese. Iolo konstruis bivakan fajron super kiu li kuiris raguon el herbaĵoj kaj gresoj, kion li manĝis kun duono de nevarma birdoviando kaj glutoj de vino el leda

botelo.

Kliniĝante ripoze kontraŭ arbo li donis sian atenton al Kugel. “Sendube vi estas survoje al la Granda Ekspozicio de Mirindaĵoj de Duko Orbal, ĉu?”

“Mi estas vojaĝanto, nenio plu,” diris Kugel. “Kio estas tiu ĉi ‘Granda Ekspozicio’?”

Iolo esprimis al Kugel bedaŭran rigadon pri lia stulteco. “Ĉiun jaron Duko Orbal prezidas super kontesto inter mirindaĵistoj. Ĉijare la premio estas mil téroj, kion mi intencas gajni per mia ‘Sakpleno da Songĵoj’.”

“Via ‘Sakpleno da Songĵoj’ mi supozas esti ŝercaĵo, aŭ io simila al romantika metaforo, ĉu?”

“Nenio el tia klaso!” deklaris Iolo kun malestimo.

“Ia **kalejdoskop**a projekciaĵo? Programo el unu-personaj teatraĵoj. **Haluciniga** gaso?”

“Neniu el tiuj. Mi portas kun mi kelkaro da puraj **ne-adulteritaj** songĵoj, koncentritaj kaj kristaligitaj.”

El sia valizo Iolo prenis saketon el mola bruna ledto, el kiu li prenis objekton simil-aspektan al pala blua neĝo-kristalo unu colon granda laŭ diametro. Li tenis ĝin alte en la lumo de l’ fajro por ke Kugel povu admiri ĝiajn fuĝajn rebrilaĵojn. “Mi aplikos al Duko Orbal per miaj songĵoj, kaj kiel povus esti ke mi malsukcesu venki ĉiujn aliajn kontestantojn?”

“Viaj ŝancoj ŝajnas esti bonaj. Kiel vi kolektas songĵojn?”

“La procedo estas sekreta; tamen mi povas pridiri la ĝeneralan procezon. Mi loĝas apud la Lago Lelt en la Lando de Daj-Pasánt. Je kalmaj noktoj la surfaco de la akvo plidensiĝas en filmon kiu reflektas la stelojn tiel ke ili fariĝu globetoj el brileco. Per la uzado de taŭga sorĉeto, mi povas suprenpreni netuŝeblajn fadenojn el pura stellumo kaj akva faden-fasko. Mi **plektas** tiun fadenon por fari retojn kaj poste vojaĝas ĉasante songĵojn. Mi kaŝas min sube de fenestro-kurtenojn kaj inter la folioj de ĝardenaj arboj; mi kaŝas sur tegmentoj; mi vagas tra dormantaj domoj. Ĉiam mi pretas rekapiti la songĵojn dum ili preter-drivas. Ĉiun matenon mi portas tiujn ĉi mirindajn **flokojn** al mia laboratorio kaj tie mi ordigas ilin kaj verkas miajn procedojn. Post ioma tempo mi ellaborigas kristalon el cent songĵoj, kaj per tiuj ĉi dolĉaĵoj mi esperas amuzegi Dukon Orbal’n.”

“Mi ofertus gratulojn se ne estus pro tiu ĉi tentaklo tenanta mian gambon,” diris Kugel.

“Tio estas bonkora emocio,” diris Iolo. Li aldonis kelkajn ŝtipon al la fajro, ĉantis sorĉaĵon defendan kontraŭ bestoj de la nokto, kaj komfortigis sin por endormiĝi.

Horo pasis, Kugel provis laŭ variaj metodoj malstrikigi la tenadon de la tentaklo, sen sukceso, nek povis li elpreni sian glavon aŭ elporti ‘**Ŝpruclumon**’ el sia zonsako.

Finfine li sidadis ripoze kaj konsideris novajn alirojn por solvi sian problemon.

Per streĉado kaj strebado li sukcesis akiri branĉeton, per kiu li sukcesis treni al si pli longan branĉon, kiu ebligis ke li prenu alian el sama longeco. Kunligante la duopo per fadeno el sia poŝo, li artifikis stangaĵon precize tiom longa por ebligi ke li etendu ĝis la dormanta figuro Iolo.

Laborante kun zorgo, Kugel tiris la valizon de Iolo trans la grundo, fine ĝis etenda distanco de siaj fingroj. Unue li elprenis la monujon de Iolo, trovante du cent tĉrsojn, kiujn li transmetis en sian propran monsakon; poste la opalan orel-pendaĵon, kiun li lasis fali en poŝon de sia ĉemizo; poste la sakplenon da songĉoj.

La valizo enhavis nenion plu valoro-havan, krom tiu porcio de nevarma birdo-viando kiun Iolo estis rezervinta por sia matenmanĝo kaj la leda botelo de vino, ambaŭ el kiuj Kugel flankenmetis por sia propra uzado. Li remetis la valizon tiuloke kie li ĝin estis trovinta, poste malligis la branĉojn kaj ĵetis ilin for. Pro tio ke mankis pli bona kaŝloko por la sakpleno da songĉoj, Kugel ligis la fadenon al ĝi kaj mallevis ĝin en la misteran truon. Li manĝis la birdo-viandon kaj trinkis la vinon, poste komfortigis sin kiel plej eble.

La nokto progresis. Kugel aŭdis la plendan krion de nokto-ĝáro kaj ankaŭ la ĝemon de sesgamba ŝámbo je ioma distanco.

Post kutima tempopaso la ĉielo lumiĝis purpure kaj la suno aperis. Iolo aktivigis sin, oscedis, fingre kombis la malordajn harojn, blovis revivige la fajron kaj diris al Kugel ĝentilan alvokon. “Kaj kiel pasis la nokto?”

“Tiom bone kiom povis esti atendata. Estas senutile, preter ĉio, plendi kontraŭ senceda realeco.”

“Ĝuste tiel. Mi jam multe pripensis vian situacion, kaj mi atingis decidon kiu vin ĝojetigos. Jen mia plano. Mi pluirados al Kvirnifon kaj tie [marĉandos](#) strebe por vendi vian orel-juvelon. Post enspezi ĝis via ŝuldo, mi revenos kaj transpagos al vi tiom ajn sumon kiu estas troa.”

Kugel proponis alian planon. “Ni ambaŭ iru al Kvirnifo kune, tiel vi estus neŝargita je la malkonveno vojaĝi revene.”

Iolo kapgestis nee. “Mia plano devas venki.” Li iris al sia valizo por elpreni sian matenmanĝon kaj tiel malkovris la perdiĝon de siaj proprajĉoj. Li elvokis ploregan muĝon kaj ekrigardis fikse al Kugel. “Miaj tĉrsoj, miaj songĉoj! Ili forestas, ĉio mankas. Kiel vi ekspliku ĉi tion?”

“Tre simple. Ĉirkaŭ kvar minutojn post meznokto rabisto venis el la arbaro kaj foriris kun la enhavoj de via valizo.”

Iolo tiregis al sia barbo per la fingroj de ambaŭ manoj. “Miaj valoregaj songĉoj! Kial vi ne elkriis alarmon?”

Kugel gratis al si la kapon. “Plene verdire, mi ne kuraĝis rompi la inter-staton.”

Iolo salte stariĝis kaj enrigardadis la arbaron je ĉiuj direktoj. Li turnis al Kugel sian dorson. “Kia tipo de viro estis tiu rabisto?”

“En certaj aspektoj li ŝajnis esti bonkora viro; post preni al si viajn proprajĉojn, li prezentis al mi duonon da nevarma birdo-viando kaj botelon de vino, kiujn mi manĝis kun dankemo.”

“Vi manĝis mian matenmanĝon!”

Kugel gestis ŝultroleve. “Mi ne povis esti certa pri tio, kaj fakte mi ne pridemandis. Ni havis mallongan konversacion kaj mi lernis ke kiel ni mem li celas al Kvirnifo kaj la Ekspozicio de

Mirindaĵoj.”

“Aa, a ha! Ĉu vi rekonus tiun personon se vi lin refoje vidus?”

“Sen ajna dubo.”

Iolo tuj fariĝis energia. “Ni pritraktu tiun tentaklon. Eble ni povos ĝin malstrikigi per tirado.” Li ektenis la finon de la or-griza membro kaj post sin stabiligi strebis ĝin levi de sur la gambo de Kugel. Dum kelkaj minutoj li laboradis, piedbatanta kaj tireganta, neniom atentante la dolorkriojn de Kugel. Finfine la tentaklo malstriketiĝis kaj Kugel rampis al distanco sekura.

Kun multa zorgado Iolo alproksimiĝis la truon kaj enrigardis al ĝi la profundon. “Mi vidas nur briletadon de foraj lumoj. La truo misteras! Kio estas tiu fadeneto kondukanta en la truon?”

“Mi ligis ŝtonon al fadeno kaj provis mezuri la distancon ĝis la subo de la truo,” Kugel eksplikis. “Ĝi estas neniaĵo.”

Iolo tiris al la fadeno, kiu unue cedis, poste rezistis, fine rompiĝis, kaj Iolo restis tenante nur fibrigitan finaĵon. “Strange! La fadeno korodiĝis, kvazaŭ pere de kontakto kun iu acida substanco.”

“Tre strange!” diris Kugel.

Iolo ĵetis la fadenon en la truon. “Venu, ni povas malŝpari ne plu da tempo! Ni hastu al Kvirnifo kaj serĉu la friponon kiu ŝtelis miajn valoraĵojn.”

La vojo eliris la arbaron kaj pasis tra regiono de kamparoj kaj fruktarbejoj. Kamparanoj suprenrigardis kun miro kiam la du preterpasis; la dika Iolo vestita en nigra-blanke rombe presita kompleto kaj la maldika Kugel kun nigra mantelo pendanta de siaj malgrasaj ŝultroj kaj bona verda ĉapelo orname super lia sombra vizaĝo.

Survoje Iolo elvokis pli kaj pli da serĉaj demandoj rilate al la rabisto. Kugel jam perdis intereson pri la subjekto kaj ripete diris ambiguajn, eĉ kontraŭstarajn, respondojn, kaj la demandoj de Iolo fariĝis eĉ pli kaj pli serĉaj.

Je ilia eniro al Kvirnifo, Kugel ekvidis hotelon kiu ŝajnis oferti komfortan gastigadon. Li diris al Iolo: “Ĉi tie niaj vojoj disiĝas, ĉar mi planas halti ĉe tiu jena hotelo.”

“La ‘Kvin Strigoj’? Ĝi estas la plej kara hotelo de Kvirnifo! Kiel vi pagu vian konton?”

Kugel faris geston memfidan. “Ĉu mil tĉrsoj ne estas la granda premio ĉe la Ekspozicio?”

“Certe, sed kiun mirindaĵon planas vi montri? Mi avertas vin, la duko neniom paciencas je ĉarlatanoj.”

“Mi ne estas tia viro kiu diras ĉion kion li scias,” diris Kugel. “Mi malkovros neniujn el miaj planoj ĉi tiun momenton.”

“Sed kio pri la rabisto?” kriis Iolo. “Ĉu ni ne estis serĉonta tra tute Kvirnifon?”

“La ‘Kvin Strigoj’ estas tiom bona serĉoloko kiom ajna, ĉar rabisto certe vizitos la komunan ĉambron por fanfaroni pri siaj sukcesoj kaj malŝpare elspezi viajn tĉrsojn kontraŭ drinkoj.

Dumtempe, mi esperas al vi facilajn tegmentojn kaj nefuĝajn songojn.” Kugel riverencis ĝentile kaj adiaŭis al Iolo.

Ĉe la ‘Kvin Strigoj’ Kugel elektis taŭgan ĉambron, kie li freŝigis sin kaj ordigis siajn vestojn. Poste, enirante la komunan ĉambron, li ĝuis malrapidan manĝadon sur la plej bonaj provizaĵoj de la stablo.

La hotelestro paŭzis apude por certiĝi ke ĉio estis en ordo kaj Kugel komplimentis lin pri liaj prezentaĵoj. “Fakte, ĉio mezurita kontraŭ ĉio, Kvirnifo devas konsideriĝi loko favorita de la elementoj. La pejzaĝo bonaspektas, la aero bonsanigas, kaj Duko Orbal ŝajnas esti indulga registro.”

La hotelestro respondis per nefirma jeso. “Kiel vi indikis, Duko Orbal neniam estas kolerega, suspektama, aŭ malmilda krom se, laŭ lia saĝeco, li sentas sin tiele inklina, postsekve de tio ĉiom da mildeco flankenmetiĝas favore al justeco. Ekrigardu al la supro de la monteto; kion vi vidas?”

“Videblas kvar tuboj, aŭ star-tubo, ĉirkaŭ tridek jardojn altaj kaj ĉiu havanta unu jardon en diametro.”

“Viaj okuloj precizas. En tiujn ĉi tubojn estas faligataj malobeemaj membroj de la societo, sen konsidero pri kiu staras sube aŭ kiu sekvas poste. Pro tio, dum vi rajtas konversacii kun Duko Orbal aŭ eĉ riski modestan plaĉtemon, neniam ignoru liajn ordonojn. Krimuloj, kompreneble, spertas rapidan pritrakton.”

Kugel, pro sia kutimo, ekrigardis maltrankvile trans sia ŝultro. “Tiaj striktigoj apenaŭ aplikiĝas al mi, nekonata ĵus-alveninto en la urbo.”

La hotelestro elvokis priduban grunton. “Mi konjektas ke vi venis por spekti la Ekspozicion de Mirindaĵoj, ĉu?”

“Ĝuste tio! Mi eĉ eble kontestos por la granda premio. Tiurilate, ĉu vi povas rekomendi dependeblan liverejon?”

“Certe.” La hotelestro provizis specifajn direktojn.

“Mi ankaŭ volas dungi aron da fortaj kaj nepigraj laboristoj,” diris Kugel. “Kie iuj tiaj povas varbiĝi?”

La hotelestro montris fingre trans la placo al malpura taverno. “En la korto de la ‘Hojlanta Hundo’ ĉiuj el la urbaj fiuloj kunvenas por interdisputi. Jene trovos vi laboristojn sufiĉajn por viaj celoj.”

“Dum mi vizitos la liverejon, bonvolu sendi knabon transen por dungi dek duon da tiuj fortikaj estuloj.”

“Laŭ via deziro.”

Ĉe la liverejo Kugel luis grandan ses-radan vagonon kaj teamon el fortaj [fárlakoj](#). Kiam li revenis kun la vagono al la ‘Kvin Strigoj’, li trovis atendanta labor-teamon el dek du individuoj de variaj tipoj, inkluzive de viro ne nur senila sed ankaŭ al kiu gambo mankis. Alia, halucinanta pro tokso, baraktis kontraŭ imagataj insektoj. Kugel maldungis tiujn du je la momento. La grupo ankaŭ

inkludis Iolon la Songŝo-prenisto, kiu inspektis Kugelon kun la plej vigla suspekto.

Kugel demandis: “Kara kunulo mia, kion vi faras inter tiom **sordida** kunularo?”

“Mi akceptas dungiĝon por ke mi povu manĝi,” diris Iolo. “Ĉu mi rajtas demandi tion, kiel vi enspezis sufiĉe por dungi tiom multe da lertaj laborantoj? Ankaŭ, mi observas ke de via orelo pendas tiu juvelo kiu nur la antaŭan nokton estis propraĵo mia!”

“Ĝi estas la dua el paro,” diris Kugel. “Kiel vi scias, la rabisto prenis la unuan kune kun viaj aliaj valoraĵoj.”

Iolo esprimis per kurbita lipo. “Mi nun anxias eĉ pli ol antaŭe por renkonti tiun **donkiĥotan** rabiston kiu prenis mian juvelon sed lasis vin ankoraŭ posedi la vian.”

“Li ja estis rimarkinda persono. Mi kredas, ke mi ekvidis lin ne pli ol horon antaŭe, rajdanta rapide el la urbon.”

Iolo refoje kurbigis sian lipon. “Kion vi proponas fari per tiu ĉi vagono?”

“Se vi ŝatus enspezi per dunga laboro, baldaŭ vi lernos tion.”

Kugel ŝoforis la vagonon kun laboristaro el de Kvirnifo survoje al la mistera truo, kie li trovis ĉion en stato sama kiel antaŭe. Li ordonis ke longaj truoj estu fosataj en la montenton; skatol-paneloj instaligis, post kiam la ĉirkaŭa bloko da tero, inkluzive de la truo, stumpo kaj tentaklo, estis supren-trenitaj sur la plafonon de la vagono.

Dum la mezaj staĝoj de la projekto, la manieroj de Iolo grade ŝanĝiĝis. Li komencis voki ordonojn al la laboristoj kaj vokis al Kugel kun kora afableco. “Nobla ideo, Kugel! Ni profitos multe!”

Kugel levis la brovojn. “Mi ja esperas venki granda-premie. Via salajro, tamen estos relative modesta, eĉ tre malmulta, krom se vi laboru pli vigle.”

“Kio!” toniris Iolo. “Certe vi konsentas, ke tiu ĉi truo estas duone propraĵo mia!”

“Mi konsentas neniom tiele. Diru nenion plu pri la afero, aŭ vi maldungiĝos tiumomente.”

Grumblanta kaj kolera Iolo rekomencis labori. Post ioma tempo Kugel kunportis la blokon da tero, kun la truo, stumpo kaj tentaklo revene al Kvirnifon. Survoje li aĉetis malnovan ŝirmotukon per kiu li kovris la truon, tiel por amplifiki la eventualan efikon de ĝia montraĵo.

Ĉe la loko de la Granda Ekspozicio Kugel glitigis sian montraĵon de sur la vagono kaj en la ŝirmejon de **pavilono**, poste li finpagis sian laboristaron, je la malkontenteco de tiuj kiuj estis kultivintaj **ekstravagancajn** esperojn.

Kugel rifuzis aŭskulti ajnajn plendojn. “La salajro sufiĉas! Se ĝi estus dekoble pli, ĉiu lasta tĉrco ankoraŭ destiniĝus por la kesto de la ‘Hojlanta Hundo’.”

“Unu momenton!” kriis Iolo. “Vi kaj mi devas negoci konsenton!”

Kugel nur saltis sur la vagonon kaj ĝin ŝoforis returne al la liverejo. Kelkaj el la viroj postkuris

kelkajn paŝojn; aliaj ĵetis ŝtonojn, sen ajna efiko.

La sekvan tagon trumpetoj kaj gongoj anoncis la formalan malfermiĝon de la ekspozicio. Duko Orbal alvenis en la placo portanta belan robon el magenta molaĵo randigita de blankaj plumoj, kaj ĉapelon el pale blua veluro granda je tri **futoj** en diametro, kun arĝentaj **kvastoj** ĉirkaŭ la rando kaj **kokardo** el arĝenta tufo.

Surirante al **tribuno**, Duko Orbal alparolis la homamason. “Kiel ĉiuj scias, homoj konsideras min stranga, ĉar mi entuziasmas pri miraĵoj kaj elstaraĵoj, sed, preter ĉio, kiam oni analizas tiun okupiĝon, ĉu la afero vere absurdas? Pripensu la tempojn antikvajn ĝis tio de la Vapúrialoj, la Verda kaj Purpura Kolegio, la potencaj magiistoj inter kiuj troviĝas Amberlen, la dua Ĉidul de Porfirincoc, Morien, Kalanktuz la Kalma, kaj komprenble Fandea. Tiuj estis tagoj de povo, kaj ili probable ne reokazos krom pere de nostalgia rememoro. Do nun, tiu ĉi, mia Granda Ekspozicio de Mirindaĵoj, kaj kune kun tio ĉi, pala rememoro pri kiel aferoj iam estis.

“Tamen, ĉio konsiderata kun ĉio, mi legas en mia horplano ke ni havos stimulan programon, kaj preterdube mi trovos malfacilon aljuĝi la grandan premion.”

Duko Orbal ekrigardis paperon. “Ni inspektos la ‘Viglajn **Skadrojn**’ de Zaraflam, la ‘Malprobablajn Muzikistojn’ de Bazard, Ksalops-on kun sia ‘**Kompendio** de Universalaj Scioj’. Iolo ofertos sian ‘Sakplenon de Songoj’, kaj, fine, Kugel prezentos por nin amuzi ion al kiu li donis la incitan titolon: ‘Neniejo’. Ja tre provoka programo! Kaj nun sen plua atendigo ni komencos spekti Zaraflam-on kaj siajn ‘Viglajn Skadrojn’.”

La homamaso moviĝis ondege al la unua pavilono kaj Zaraflam elvokis siajn ‘Viglajn Skadrojn’: parado de blatoj soldate vestitaj en rugaj, blankaj kaj nigraj uniformoj. La serĝentoj geste svingis kurbajn glavojn; la soldatoj portis **muskedojn**; la skadroj regule marŝis kaj retromarŝis laŭ komplikaj evoluoj.

“Haltu!” laŭte ordonis Zaraflam.

La blatoj haltis abrupte.

“Prezentu armilojn!”

La blatoj obeis.

“Pafu saluton honore al Duko Orbal!”

La serĝentoj ĉiuj levis sian glavon; la marŝviroj levis ŝultre ĉiuj sian muskedon. Suben falis la glavoj; la muskedoj ekpafis, ellasantaj etajn nubetojn de blanka fumo.

“Bonege!” deklaris Duko Orbal. “Zaraflam, mi laŭdas vian zorgegan precizecon!”

“Mil dankojn, via Moŝto! Ĉu mi premiiĝis unuarange?”

“Ankoraŭ tro malfruas por tion diveni. Nun, al Bazard kaj liaj ‘Malprobablaj Muzikistoj’!”

La spektantaro moviĝis al la dua pavilono kie Bazard postnelonge aperis, lia vizaĝo dolore bedaŭra. “Via Moŝto kaj noblaj civitanoj de Kvirnifo! Miaj ‘Malprobablaj Muzikistoj’ estis fiŝoj el la

Maro Kantik' kaj mi sentis memfidon pri la granda premio kiam mi portis ilin al Kvirnifo. Tamen, dum la nokto iu liko malplenigis la basenon ĝis sekeco. La fiŝoj mortis kaj ilia muziko estas por ĉiam perdita! Mi ankoraŭ volas resti kontestanta por la granda premio; tial mi simulos la kantojn de la iama muzikistaro. Bonvolu juĝi la muzikon laŭ tiu ĉi bazo.”

Duko Orbal faris geston de mora rigido. “Neeble. La montraĵo de Bazard nun deklariĝas malvalida. Ni iru antaŭen al Ksalops kaj lia rimarkinda ‘Kompendio’.”

Ksalops antaŭenpaŝis de sia pavilono. “Via Moŝto, genobluloj de Kvirnifo! Mia konkursaĵo ĉe tiu ĉi ekspozicio estas vere rimarkinda; tamen, malsimile al Zaraflam kaj Bazard, mi ne rajtas anonci personan meriton pri ĝia ekzisteco. La profesio mia estas disserĉe rabi antikvajn tombojn, en kio la riskoj multas kaj rekompencoj maloftas. Je grandega bonŝanco mi hazardis al tiu kripto kie kelkajn epohojn antaŭajn entombiĝis la magiisto Zinkzen. El tiu ĉi **ublieto** mi savis la volumenon kiun mi nun montras al viaj mirigataj okuloj.”

Ksalops viŝe deprenis tukon por malkovri grandan libron binditan en nigra led. “Je ordono tiu ĉi volumeno devas malkovri informon el ĉia ajn tipo; ĝi scias ĉiun trivialan detalon, ekde tiu tempo kiam la steloj ekbrulis ĝis la nuna dato. Demandu; vi estos respondata!”

“Rimarkinde!” deklaris Duko Orbal. “Prezentu antaŭ ni la Perditan **Odon** de Psirmo!”

“Certe,” diris la libro en voĉo raspsona. Ĝi ekmalfermis siajn kovrilojn por montri paĝon kovritan de malregule formitaj kaj interŝlositaj literaĵoj.

Duko Orbal diris konfuzitan demandon: “Tiu ĉi estas preter mia kompreno; provizu al mi tradukon.”

“La peto estas rifuzata,” diris la libro. “Tia poezio kia tiu ĉi tro dolĉas por ordinaraĵ oreloj.”

Duko Orbal ekrigardis al Ksalops, kiu rapide alparolis la libron: “Montru al ni scenojn el epohoj pasintaj.”

“Laŭ via deziro. Reiranta al la Dek Naŭa Epoho de la Kvindek Dua Ciklo, mi montras elrigardon trans la Valo Linksfad’, frontante la Turon de Frida Sango apartenanta al Kolgut.”

“La detalaro atentindas kaj ekzaktas!” deklaris Duko Orbal. “Mi havas scivolon rigardi la aspekton de Kolgut mem.”

“Nenio pli simplas. Jen la teraso de la Templo ĉe Tanutro. Kolgut staras apud la floranta ploreg-arbusto. En la seĝo sidas la Imperiestrino Nokson, nun en sia cent kvardeka ĵaro. Ŝi estis gustanta neniom da akvo en ŝia tuta vivdaŭro, kaj manĝis nur amarajn florojn, kun foje mordeto de boligita angil-viando.”

“Ba!” diris Duko Orbal. “Plej abomenega maljuna virinaĉo! Kiuj estas tiuj nobluloj starantaj en vico malantaŭ ŝi?”

“Ili konstituas ŝian sekvantaron da amistoj. Ĉiun monaton unu el ilia aro ekzekutiĝis kaj nova fortulo prenis ties oficon. Konkurado viglis por premiigi per ama rekono fare de la Imperiestrino.”

“Ba!” grumble direktis Duko Orbal. “Montru al ni anstataŭe belan kortan noblulinon de la Flava

Epoĥo.”

La libro diris plendvoĉan silabon en lingvo nekontata. La paĝo turniĝis por malkovri **travertinan** promenejon apud malrapida rivero.

“Tiu ĉi bon-observige montras la tiutempan skulptarton hortikulturaran. Atentu tie ĉi, kaj tie ĉi!” Per luma sago la libro indikis vicon de masivaj arboj tonditaj en globaj formoj. “Tiuj estas iríks-oj, la sapo de kiu povus uziĝi kiel efika antivermaĵo. La specio formortis. Laŭlonge la vojo vi observos multecon da homoj. Tiuj kun nigraj strumpoj kaj longaj blankaj barboj estas la Alúliaj sklavoĵoj, kies prauloj alvenis de fora **Kanopo**. Ankaŭ ili formortis. En la meza distanco staras bela virino nomata Ĝiao Ĝaro. Ŝi indikiĝas pere de ruĝa punkto super ŝia kapo, kvankam ŝia vizaĝo frontas la riveron.”

“Tio ĉi apenaŭ kontentigas,” grumblis Duko Orbal. “Ksalops, ĉu vi ne povas regi la perversecon de via montraĵo?”

“Bedaŭrinde ne, via Moŝto.”

Duko Orbal faris enflaron de malplezuriĝo. “Finan demandon! El tiuj homoj nun loĝantaj en Kvirnifo, kiu plej minacas la bonstaton de mia regnejo?”

“Mi estas stokejo de informoj, ne divenisto,” informis la libro. “Tamen, mi rimarkos ke inter la ĉeestantuloj staras iu vulp-vizaĝa vagabondo kun ruza esprimo, kies kutimoj povus ruĝigi la vangojn de la Imperiestrino Nokso mem. Lia nomo—”

Kugel eksaltis antaŭen kaj fingre indikis transplacen. “Jen tie! La rabisto! Li forkure eskapas! Alvoku la ĝendarmojn! Sonorigu la gongon!”

Dum ĉiuj turniĝis por foren rigardi, Kugel fermis frape la libron kaj per falanga artiklo enpremis tord-stabe la kovrilon. La libro gruntis agacite.

Duko Orbal returniĝis kun malrideto de konfuziĝo. “Mi vidis neniun rabiston.”

“Tiukaze certas, ke mi eraris. Sed jene atendas Iolo kun lia fama ‘Sakpleno da Songĵoj!’”

La duko pluiris al la pavilono de Iolo, sekvata de la entuziasma spektantaro. Duko Orbal diris: “Iolo la Songĵo-prenisto, via fameco estas veninta antaŭ ol vi mem trans la tuta distanco de forega Daj-Pasánt! Mi tiel ĉi ofertas al vi bonvenon oficialan!”

Iolo respondis en mizera voĉo: “Via Moŝto, bedaŭrinda novaĵo direndas. Dum tuto da jaro mi faradis prepariojn por tiu ĉi tago, esperante meriti la grandan premion. La blovegado de noktomezaj ventoj, la kolerego de domloĝantoj, la timegigaj atentoj de fantomoj, ŝríoj, tegmento-kurantoj kaj férmenoj; ĉiuj ĉi estis kaŭzintaj al mi malkomfortojn! Mi estis vagantaj la mallumajn horojn ĉasante miajn songĵojn! Mi sinkaŝis apud dormĉambroj, rampis tra subtegmentoj, kline staradis super dormseĝoj; Mi suferis grat-vundojn kaj kontuzojn; sed neniam taksis kara la koston se, pere de mia entrepreno mi sukcesis kapti specimenon aparte raran.

“Ĉiun songĵon kiun mi kaptis en mia reto mi ekzamenis kun zorgo; por ĉiu songĵo kare konservita mi forlasis dek du, kaj fine el mia stoko de superlativaĵoj mi ellaborigis miajn mirindajn kristalojn, kaj tiujn mi surportis laŭ la longa vojoj de Daj-Pasánt. Kaj poste, nur lastan nokton, en cirkonstancoj plej misteraj, miaj valoregaĵoj ŝteliĝis fare de rabisto pri kiu nur Kugel asertas, ke li vidis.

“Mi nun asertas, ke la sonĝoj, sendepende de tio ĉu ili estu aŭ proksimaj aŭ malproksimaj, reprezentas mirindaĵojn de vere supra kvalito, kaj mi proponas, ke detala pridirado de la eroj—”

Duko Orbal levis sian manon. “Mi devas ripeti la ĵuĝon deciditan kontraŭ Bazard. Strikta regulo kondiĉigas ke nek imagitaj nek rakontitaj mirindaĵoj kvalifikiĝas por la kontesto. Eble ni havos oprotunon por juĝi viajn sonĝojn je venontjara kontesto. Nun ni devas pluri al la pavilono de Kugel kaj enketi lian provokaĵon ‘Neniejo’.”

Kugel surpaŝis la podion antaŭ sia montraĵo. “Via Moŝto, mi prezentas por via enketo veran mirindaĵon: ne disvagadon de insektoj, sed aŭtentikan miraklon.” Kugel viŝtiris makovre la tukon. “Jen!”

La duko faris sonon de konfuziĝo. “Ĉu maso de tero? Stumpo? Kio estas tiu strange aspekta membro elvenanta la truon?”

“Via Moŝto, ĉi tie mi havas enirejon kondukantan al spaco nekonata, kun la brako de unu el ĝiaj loĝantoj. Inspektu tiun tentaklon. Ĝi pulsas kun la vivo de alia kosmo! Atentu pri la ora rebrilo de la dorsa surfaco, la verdo kaj **lavend**-bluo de tiuj ĉi enkrustaĵoj. Sur la suba flanko vi malkovros tri kolorojn el tipoj neniam antaŭe viditaj!”

Kun esprimo senreaga Duko Orbal tiris al si la mentonon. “Ĉio ĉi sufiĉe bonas, sed kie estas la cetero de la estulo? Vi prezentas ne miraklon, sed frakcion de miraklo! Mi ne povas decidi la ĵuĝon baze de vosto, aŭ postaĵo, aŭ rostro, kio ajn la membro povas esti. Krome, vi asertas ke la truo kondukas al alia kosmo; tamen mi vidas nur truon, similante nenion pli eksterordinaran ol la fosloĝejon de ŭizen-diablo.”

Iolo sinpuŝis el la homamaso. “Ĉu mi rajtas oferti opinion? Dum mi pripensas eventojn, mi konvinkiĝas ke Kugel mem ŝtelis miajn sonĝojn!”

“Viaj rimarkoj interesas neniun,” diris Kugel. “Bonvolu tenadi kvieta la langon dum mi daŭrigas mian prezentadon.”

Iolo ne lasis sin esti tiom facile subpremata. Li turniĝis fronti al Dukon Orbal kaj kriis en kortuŝa plendo: “Aŭskultu min, se vi volas! Mi konvenkiĝas ke la ‘rabisto’ estas nenio pli ol kreaĵo de la imago de Kugel. Li prenis miajn sonĝojn kaj ilin kaŝis, kaj kie alie ol en la truo mem? Kiel pruvaĵo mi atentigas al tiu fadeno etendiĝanta en la truon.”

Duko Orbal rigardis enkete al Kugel kun malrideto. “Ĉu tiuj ĉi akuzoj veras? Respondu precize, ĉar ĉio povas ver-proviĝi.”

Kugel elektis siajn vortojn kun zorgo. “Mi povas ĵurdiri nur tion kion mi mem scias. Penseblas ke rabisto kaŝis la sonĝojn de Iolo en la truo dum mi mem estis aliel okupita. Por kio? Kiu povas diri?”

Duko Orbal demandis en voĉo ĝentila: “Ĉu oni pripensis serĉi la truon por tiu ĉi netrovebla ‘sako de sonĝoj’?”

Kugel gestis per nezorga ŝultrolevo. “Iolo rajtas eniri nun kaj serĉadi ĝis kontentiĝos la koro sia.”

“Vi mem asertas ĉiujn rajtojn proprietajn je tiu ĉi truo!” pafe respondis Iolo. “Pro tio la devogardi publikan sekurecon estas via!”

Dum kelkaj minutoj vigla disputo okazis, ĝis Duko Orbal mem interpozis. “Ambaŭ disputantoj levis persvadajn punktojn; Mi sentas, tamen, ke mi devas juĝi kontraŭ Kugel. Mi tial juĝdiras ke li serĉu sian propran estejon por la mankantaj songoj kaj ilin reprenu se tio eblas.”

Kugel disputis la decidon kun tia viglo ke Duko Orbal tuniĝis ekrigardi laŭlonge la horizonton, post kiam Kugel moderigis sian plendadon. “La juĝa decido de Via Moŝto kompreneble devas supriĝi, kaj se mi devas, mi esploretos por serĉi la perditajn songojn de Iolo, malgraŭ tio ke liaj teorioj memevidente absurdas.”

“Bonvolu fari, tuj.”

Kugel akiris longan foston, al kiu li fiksis graplon. Delikate puŝante sian kunmetaĵon en la truon, li viŝe trenis ĝin tien kaj reen, sed sukcesis neniel krom stimuli la tentaklon, kiu baraktis flank-al-flanke.

Iolo subite elkriis en ekscitiĝo. “Mi observas rimarkindan fakton! La bloko de tero mezuras maksimume ses futojn laŭ profundo, sed Kugel jam puŝis foston longan je dek du futoj en la truon! Kian trompon praktikas li nun?”

Kugel respondis en plataj tonoj: “Mi promesis al Duko Orbal miraklon kaj mirindaĵojn, kaj mi kredas ke tion mi estas farinta.”

Duko Orbal kapjesis grave. “Bone dirita, Kugel! Via montraĵo provokas! Tamen, vi ofertas al ni nur tiklan ekvidon: truo senfunda, longa mezuro da tentaklo, stranga koloro, malproksima lumo—impresante ke via montraĵo ŝajnu esti iom provizora kaj tre eke planita. Kontrastu, se vi volas, la precizeco de la blatoj de Zaraflam!” Li levis sian manon kiam Kugel komencis protesti. “Vi montras truon, kaj bonega truo ĝi estas. Sed kiel malsamas tiu ĉi truo kompare al ajna alia? Ĉu mi povas en justeco doni premion sur tia bazo?”

“La afero povas esti solvita laŭ maniero satiga al ni ĉiuj,” diris Kugel. “Permesu al Iolo ke li eniru la truon, por certigi al si mem ke liaj songoj estas ja alilokaj. Poste, je lia reveno, li raportos pri la vere mirinda naturo de mia montraĵo.”

Iolo faris tujan proteston. “Kugel pretendas la montraĵon; lasu ke li faru la esploron!”

Duko Orbal levis sian manon por havi silenton. “Mi dekretas ordonon tiele decida ke Kugel devas tuj eniru sian montraĵon por serĉi la propraĵojn de Iolo, kaj samtempe faru detalan observadon de la ĉirakaŭejo, por la bono de ni ĉiuj.”

“Via Moŝto!” protestis Kugel. “Tiu ĉi neniel estas simpla afero! La tentaklo preskaŭ plenigas la truon!”

“Mi vidas spacon sufiĉan por preteriro fare de movlerta viro.”

“Via Moŝto, por diri veron, mi ne ŝatas eniri la truon, pro plena timo mia.”

Duko Orbal refoje ekrigardis supren al la tuboj kiuj staris en vico ĉe la proksima horizonto. Li

parolis transŝulte al forta viro en brunruĝa uniformo. “Kiu el la tuboj pli decas esti uzata je tiu ĉi tempo?”

“La dua en vico de la dekstro, via Moŝto, estas nur kvarone okupita.”

Kugel deklaris en tremanta voĉo: “Mi timas, sed mi ĵus venkis mian timon. Mi serĉos la perditajn sonĝojn de Iolo!”

“Bonege,” diris Duko Orbal kun strikt-lipa rideto. “Bonvolu ne prokrasti; mia pacienco elĉerpiĝas.”

Kugel nememcerte puŝis gambon en la truon, sed moviĝo de la tentaklo instigis ke li ĝin reprenu. Duko Orbal murmuris kelkajn vortojn al la ĝendarmo, kiu alportis vinĉon. Oni tiris la tentaklon el la truo kvin jardojn plu.

Duko Orbal instruis al Kugel: “Sursidu interkrure la tentaklon, altenu ĝin per kaj manoj kaj gamboj, lasu ke ĝi entiru vin tra la truo.”

Senespere Kugel surgrimpis la tentaklon. Oni lasis la tension de la vinĉo malstreĉiĝi kaj Kugel tiriĝis en la truon.



La lumo de Tero kurbiĝis for de la malfermejo kaj ne eniris; Kugel plonĝis en cirkonstancon el preskaŭ-tuta mallumo, kie, tamen, pro iu paradoksa kondiĉo li kapablis senti detale la plenon de sia nova ĉirkaŭejo.

Li staris sur surfaco kiu estis kaj ebena kaj malglata, kio havis altejojn kaj malaltejojn kaj monetojn kiel surfaco de maro ventoblovita. La nigra sponga ŝtofo subpieda montris etajn kavaĵojn kaj tunelojn ene de kiuj Kugel sentis la moviĝon de sennombraj preskaŭ-nevideblaj lumpunktetoj. Kie la spongo leviĝis alte, la kresto iuloke kurbiĝis tiel kiel onda ŝaŭmo, alikoke staris supren malneta kaj krusta; ambaŭkaze, la franĝoj lumis ruĝaj, pale bluj kaj en kelkaj koloroj kiujn Kugel neniam antaŭe observis. Neniu horizonto detekteblis kaj la ĉilokaj konceptoj de distanco, proporcio, kaj grandeco ne racie pripenseblis al la komprenopovo de Kugel.

Superkape pendis senviva Neniaĵo. La sola rimarkindaĵo, granda disko el pluva koloro, floris ĉe la zenito, objekto tiom malluma ke ĝi preskaŭ nevideblis. Ĉe meza distanco—ĉu mejlo? dek mejloj? cent jardoj?—monteto iom masiva superaltis la tutan panoramon. Per pli detala inspekto Kugel vidis ke tiu ĉi monteto estis grandega maso de gelateneca haŭto, ene de kiu floris globa orgeno ŝajne analoga al okulo. El la bazo de tiu ĉi estulo cent tentakloj etendiĝis fore kaj dise trans la nigra spongo. Unu el tiuj ĉi tentakloj preteris la piedojn de Kugel, pasis tra interkosma rompiĝo, elire surkuŝis la teron de Tero.

Kugel malkovris la sakon de sonĝoj apartenantaj al Iolo, malpli ol tri futoj proksima. La nigra spongo, kontuzite de la alfrapo, estis jam ellasinta likvon por iomete dissolvi la ledon kaj lasi truon, tiel ke la steloformaj sonĝoj dise elverŝiĝis sur la spongo. Per grapli uzante la stangon, Kugel estis difektinta kreskaĵon de brunaj nodoj. La rezulta **eksudo** estis gutinta sur la sonĝojn kaj kiam Kugel prenis unu el la delikataj steletoj, li vidis ke ĝiaj randoj lumis per strangaj franĝoj el koloro. La kombinaĵo de elsorbaĵoj kiu estis penetrinta tra la objekto afektis liajn fingrojn juke kaj pik-vibre.

Dudeko da etaj lumaj nodoj svarmis ĉirkaŭ lia kapo, kaj mola voĉo alvokis lin nome. “Kugel, kia plezuro ke vi venis por viziti nin! Kion vi opinias pri nia plaĉa lando?”

Kugel rigardis ĉirkaŭen kun mireto; kiel povis loĝanto de tiu ĉi loko sciu la nomon lian? Trans distanco de dek jardoj li observis etan monteton el plasmone malsimila al la monstra grandulo kun la flosanta okulo.

Lumaj nodoj orbitis lian kapon kaj la voĉo aŭdiĝis en liaj oreloj: “Vi konfuziĝis, sed rememoru, ĉi tie ni efikadas malsame. Ni intersendas niajn pensojn en ujetoj; se vi rigardus detale vi vidus ilin rapidantajn tra la flúks-kampo: delikataj etaj anim-molekuloj avidaj por transsendi siajn ŝarĝojn de iluminaĵo. Jen! Atentu! Tuj antaŭ viaj okuloj svebas bonega ekzemplero. Ĝi estas penso via propra pri kiu vi dubas; sekve ĝi hezitas, kaj atendas vian decidiĝon.”

“Ĉu mi ne parolu?” demandis Kugel. “Ĉu tio ne faciligus aferojn?”

“Tute kontraŭe! Sonon oni konsideras ofenda kaj ĉiu malŝategas la plej etan murmuron.”

“Ĉio ĉi sufiĉe bonas,” grumblis Kugel, “sed—”

“Silenton, mi petas! Nur sendu anim-molekulojn!”

Kugel elsendis tutan aregon da lumaj pensaĵoj: “Mi provos laŭ la plejo de mia kapablo. Ĉu vi povus informi min pri tio, kiom fore etendiĝas tiu ĉi lando?”

“Ne certige. Fojatempe mi elsendas anim-molekulojn por esplori la forajn lokojn; ili raportas senliman pejzaĝon simila al tio kion vi vidas.”

“Duko Orbal de Ombalikŭo komandis min kolekti informojn kaj lin interesos viaj rimarkoj. Ĉu valoraj substancoj troveblas ĉi tie?”

“Ĝis certa kvanto. Ekzistas prócadelo kaj difáno kaj fojfoja briletaĵaro da zámandroj.”

“Mia unua zorgo, kompreneble, estas kolekti informon por Duko Orbal, kaj mi ankaŭ devas savi la sonĝojn de Iolo; tamen plaĉus al mi akiri unu/du valorajn bagatelojn, se nur por rememorigu min mem pri nia plaĉa asociiĝo.”

“Kompreneble! Mi simpatias al viaj celoj.”

“Tiukaze, kiel mi akiru kvanteton da tiuj substancoj?”

“Facile. Forsendu anim-molekulojn por rikolti laŭ viaj bezonoj.” La estulo eligis aregon da palaj plasmoj kiuj foriris ĉiudirekten kaj post nelonge revenis kun kelkaj dek-duoj da etaj sferoj briletadantaj per froste blua lumo. “Jen estas zamándroj el la pleja klareco,” diris la estulo. “Akceptu ilin kun miaj komplimentoj.”

Kugel metis la ĝemojn en sian saketon. “Tio ĉi estas tre konvena sistemo por akiri riĉaĵojn. Mi ankaŭ volas akiri kvanteton da difánoj.”

“Elsendu anim-molekulojn! Kial laborigu vin mem sennecese?”

“Ni pensas laŭ similaj vojoj.” Kugel dissendis kelkcentojn da anim-molekulojn kiuj post

nelonge revenis kun dudek etaj [ingotoj](#) de la valora metalo.

Kugel ekzamenis sian saketon. “Ankoraŭ restas spaco por ioma kvanto da prócadelo. Kun via permeso mi elsendos la necesajn anim-molekulojn.”

“Mi neniel eĉ songus pri vin kontraŭstari,” asertis la estulo.

La anim-molekuloj rapidis for, kaj baldaŭ revenis kun sufiĉa kvanto da prócadelo por plenigi la saketon de Kugel. La estulo diris pensoplene: “Tio ĉi estas almenaŭ duono de la trezoro de Utaŭ; tamen, li ŝajne ne atentis la mankon.”

“‘Utaŭ’?” demandis Kugel. “Ĉu vi pridiras tiun foran monstran korpegon?”

“Jes, tiu estas Utaŭ, kiu foje estas kaj malĝentila kaj kolereza.”

La okulo de Utaŭ turniĝis al Kugel kaj ŝvelis tra la eksterna membrano. Ondego da anim-molekuloj alvenis pulsantaj kun signifeco. “Mi observas ke Kugel ŝtelis el mia trezoro, ago kion mi denuncas kiel rompo de gasta kutimo. Por rekompenci, li devas elfosi dudek du zámandrojn el sub la Tremetantaj Ŝálikoj. Li devas kribri ok funtojn da prócadelo el al Polvo de Tempo. Laste li devas skrapri ok [akreojn](#) da difána floraĵo de sur la faco de la Alta Disko.”

Kugel alsendis anim-molekulojn. “Sinjoro Utaŭ, la puno pezas sed justas. Atendu momenton dum mi iros repreni la necesajn ilojn!” Li prenis al si la songojn kaj risortis al la aperturo. Ektenante la tentaklon li kriis supren tra la truo: “Tiru la tentaklon, turnadu la vinĉon! Mi estas savinta la songojn!”

La tentaklo konvulsiis kaj baraktis, efektive obstaklanta la elirejon. Kugel turnis kaj metante siajn fingrojn inter la lipoj eligis penetran fajfon. La okulo de Utaŭ ruliĝis supren kaj la tentaklo faliĝis malrigida.

La vinĉo trenegis al la tentaklo kaj Kugel tiriĝis elire tra la truo. Utaŭ, regajnante la sentokapablon, tiris al sia tentaklo tiom violente ke la ŝnuro ekrompiĝis; la vinĉo ĵetiĝis ekfluganta; kaj kelkaj personoj fale viŝiĝis de siaj starpozoj. Utaŭ retiris sian tentaklon kaj la truo tuj fermiĝis.

Kugel ĵetetis la sakon de neĝero-formaj songo-kristalaĵoj malestime ĉe la piedoj de Iolo. “Jen ili, sengratulo! Prenu viajn tedigajn halucinojn kaj foriru laŭ via vojo! Lasu ke ni aŭdu nenion plu pri vi!”

Kugel turniĝis al Duko Orbal. “Mi nun kapablas raporti pri la alia kosmo. La grundo konsistas el nigra spongo-simila substanco kiu briletadas kun [duiliono](#) da [infinitezimaj](#) lumetoj. Mia esploro malkovris neniamajn limojn en la ĉiudirekta etendo de tiu lando. Pala disko, apenaŭ videbla, plenigas kvaronon el la ĉielo. La loĝantoj konsistas el malbonhumora masivulo nomata Utaŭ, kaj aliaj pli-malpli similaj. Neniu sono permesiĝas kaj signifo transportiĝas pere de anim-molekuloj, kiuj ankaŭ alportas la necesajojn de vivtenado. Entute, jen miaj malkovroj, kaj nun, kun plena estimo, mi pretendas akiron de la granda premio el mil térsoj.”

De malantaŭ la dorso Kugel aŭdis la mokan ridadon de Iolo. La duko respondis: “Mia kara Kugel, tio kion vi sugestas tute maleblas. Pri kiu montraĵo diras vi? Ĉu tiu proksima skatolo da tero? Al ĝi tute mankas ajna pretendo al unikeco.”

“Sed vi vidis la truon! Per via vinĉo vi tiris la tentaklon. Laŭ obeo de viaj ordenoj, mi eniris la truon kaj esploris la regionon!”

“Sufiĉe prave, sed truo kaj tentaklo ambaŭ malaperis. Mi ne eĉ dum momento sugestas ke vi mensogis, sed via raporto ne facile pruveblas. Mi apenaŭ povas honorigi estaĵon tiom fuĝan kiom la memoro de ne-ekzistanta truo! Mi bedaŭras ke je tiu ĉi fojo mi devas vin preterpasi. La premio doniĝos al Zaraflam kaj liaj rimarkindaj blatoj.”

“Atendu momenton, via Moŝto!” Iolo elkriis. “Rememoru, mi jam listiĝis en la konkurso! Post fine mi kapablas montri miajn kreaĵojn! Jen iu aparte bona specimeno, distilita el cent sonĝoj kaptitaj fruamatenne el aro da belaj virgulinoj dormantaj en ĝardeno ŝirmejo inter bonodoraj grimplantoj.”

“Konsentite,” diris Duko Orbal. “Mi prokrastos la premion ĝis post testi la kvaliton de viaj spektindaĵoj. Kiel procedi? Ĉu mi devas pretiĝi por dormo?”

“Neniel! Sorbado de sonĝo dum nedormaj horoj produktas ne halucinon, sed animstaton: sensaĵo freŝa, nova kaj dolĉa; logaĵo de la perceptoj, neesprimebla vigliĝo. Malgraŭ tio, kial vi ne estu komforta gustumante miajn sonĝojn? Nu, viro! Alportu ripozo-seĝon! Kaj vi, kusenon por la kapo de Lia Moŝto. Vi! Bonvolu depreni la ĉapelon de Lia Moŝto.”

Kugel anticipis nenian profiton en sia mema plua atendo. Li transiris al la homamaso rando.

Iolo elprenis sian sonĝon kaj por momento ŝajnis konfuzita pri la ŝmiraĵoj kiuj ankoraŭ glue kovretis la objekton. Tuj poste li decidis ignori tion, kaj atentis la fakton ne plu krom per interfroti la fingrojn kvazaŭ post kontakto kun ia glueca substanco.

Farante serion de grandaj gestoj, Iolo alproksimiĝis la seĝon kie Duko Orbal sidis ripoze. “Mi aranĝos la sonĝon por ĝia plej konvena sorbado,” diris Iolo. “Mi metas kvanton en ambaŭ oreloj; mi metas kvanteton en ambaŭ naztruoj; mi metas la restaĵon sube de la honorinda lango de via Moŝto. Nun, se via Moŝto malstreĉiĝus, post duono de minuto la [kvintesenco](#) de cent perfekte belaj sonĝoj koniĝadus.”

Duko Orbal fariĝis rigida. Liaj fingroj grimpegis la brakojn de la seĝo. Lia dorso kurbiĝis kaj liaj okuloj elŝveliĝis de siaj ingoj. Li klinfalis malantaŭen, poste ruliĝis, ekstremis, saltis kaj kuris ĉirkaŭ la placon antaŭ la mirigitaj okuloj de siaj subjektuloj.

Iolo elkriis en latuneca voĉo: “Kie estas Kugel? Alportu tiun friponon Kugel!”

Sed Kugel jam estis foririnta de Kvirnifo kaj nenie troviĝis.



adulter/i (tr) Aldoni senefikan aŭ malbonkvalitan elementon al uzotaj substancoj

akre/o Unuo de termezurado, tiom kion bienisto kun paro de oksoj povas plugi en unu tago.

aksel/o Kavobando la artiko de la brako kun la trunko. ~*EB 354/25*

alium/o Genro de unu-, du- k plur-jaraj herboj kun tunika bulbo kaj kun umbelsimila infloresko; ĉ. 690 sp-oj, N-hemisferaj, plejparte kun fortaodoro specifa.

ametist/o ⊕ Violkolora var. de kvarco, uzata kiel ornamaĵo aŭ gemo.

arak/o Orienta brando, distilita el palmovino, el fermentinta rizo aŭ el sukerkano.

astak/o ♂ Genro (*Astacus*) de dekruraj krustacoj, vivantaj en sensalaj, puraj akvoj, kun longa pinto inter la okuloj; tre bongustaj. ☞ kankro, omaro.

barbir/o Tiu, kiu metie razas aŭ tondas barbon kaj kapharojn.

bivak/i (ntr) Sentende ripozi sur kamparo.

broĉ/o Ornamaĵo, pli-malpli multekosta, kun sendanĝera pinglo. ~*EB 38/17*; ~*BeE 34/16, 83/77*

brum/o Malklariĝo de la atmosfero kun vidodistanco de pli multe ol unu kilometro.

cidoni/o **1** Genro (*Cydonia* el rozacoj) de falfoliaj trunkarbustoj k arboj kun simplaj, ovale korformaj, lanugaj folioj, kun kvinombraj, unuopaj rozaj aŭ roze blankaj floroj k kun fruktoj (berecaj ŝajndrupoj) bonodoraj, lanugaj, adstringaj. **2** Frukto de cidonio, pli speciale de la ordinara cidonio. Sin. cidonibero. ~*EB 357/18*; ~*BeE 191/18*

col/o Malnova mezurunuo de longo (ĉirkaŭ 2.5 cm).

ĉarlatan/o Trompisto trouzanta la publikan kredemon, brue serĉanta la popularecon.

ĉarum/o Malgranda ĉareto, kiun oni puŝas aŭ tiras per du timonetoj, k kiu ruliĝas sur unu sola rado, posta aŭ meza. ~*EB 114/42*; ~*BeE 271/37*

domin/i Superregi, superpotenci.

donkiĥoto Komuna nomo por signi homon, kiun karakterizas nepraktika idealismo, kiel la faman Don-Kiĥoto, protagonisto de la senmorta romano de Cervanteso. ~**a** tia mianiero, tia agado.

duilion/o Grandega kvanto, 10^{12} .

ekskvizit/a Tre ege altkvalita laŭ artista desegno, materiala konstruo. Esprimanta la plej puran modon.

ekstravaganc/o Ago aŭ parolo kontraŭa al la komuna saĝo, senseca strangaĵo. ~**a** Kontraŭa al la komuna saĝo, sensece stranga.

eksud/i Eliĝi tra histo, simile al ŝvito.

ekzem/o Haŭta lezo, karakterizata de jukado, ruĝeco k formiĝo de tre fajnaj veziketoj, el kiuj povas eksudi seraĵo, k fine per disskvamiĝo de la epidermo.

el/o Malpeza kaj hela biero, fabrikata per malmulte rostita malto.

eŭfemism/o Parola stilo konsistanta en la uzo de nepreciza dirmaniero, por mildigi la krudecon de la ĝusta vorto.

farĉ/o Hakita kaj spicita viando, legomaĵo aŭ fruktaĵo, kiun oni enmetas en la internon de bakota besto (ekz. ansero), de kuirota legomo (ekz. kukumoj, kukurbetoj, tomatoj ks), de alia kuirotaĵo, bakaĵo aŭ de ĉokoladaĵo. **~i** Plenigi la internon de manĝaĵo per farĉo.

fask/o Aro de samspecaj longformaj objektoj, kune tenataj aŭ ligitaj. 🗑️ garbo. *~EB 76/9*

fárlako Fikcia trenbesto fortika kiel okso.

flok/o Peceto, tufeto el maldensa k malpeza materio, kiu ŝvebas en aero, malrapide falante.

fragmit/o Iu el tri specoj de kanoj, kreskantaj ĉe rando de marĉoj kaj lagetoj.

fraŭd/i (tr) 🎭 Trompe kaj malhoneste senigi je mono aŭ alia valoraĵo, pri kiu iu persono havas rajton.

fut/o Mezurunuoj de longo. Ĉirkaŭ triono de metro.

halucin/o Erara percepto de sensaĵo, dum ekzistas neniam ekstera objekto kapabla ĝin produkti

hant/i (tr) Vizitadi tiel ke iu loko fariĝi timiga. Precipe (sed ne necese) temas pri fantomo.

homonkul/o Hometo, kiun alkemiistoj kreis en retorto.

idili/o Poemeto pri laŭnatura, kampara vivo, k plejofte pri naivaj amoj de paŝtistoj. **~a** Prezentanta la ecojn de idilio: idilia romano, pejzaĝo, aventuro, vivo.

infinitozim/o Senlima malgrando.

ingot/o Briko el metalo, pricepe oro, argento aŭ ŝtalo.

jard/o Mezurunuoj de longeco, iomete mapli ol metro.

kahel/o Plato el bakita kaj glazurita argilo aŭ simila materialo, uzata por pavimi aŭ tegi. *~EB 41/51*

kajol/i (tr) Influi per karesaj aŭ flataj agoj aŭ vortoj, por ricevi dezirataĵon

kalejdoskop/o Optika aparato, cilindroforma, kiu helpe de du aŭ tri speguloj, interne kaj angule lokitaj, ebligas ricevi beletajn simetriajn bildojn, ŝanĝiĝantajn ĉe la plej malgranda movo de la aparato.

Kanop/o Stelo de minus-unua grandeco, kiu havas ŝajna magnitudo de -0.86. *~BeE 3/46; ~EB 5/46*

kapacit/o ☐ Gasa, likva aŭ solida materikvanto, kiun povas enteni ujo: kapacito de vazo.

karakol/i (ntr) (pp ĉevalo aŭ rajdanto) Fari, dum irado, fantaziajn turniĝojn k saltetojn.

karavan/o En Oriento aŭ Afriko, aro da pilgrimantoj aŭ komercistoj, kun iliaj ŝarĝobestoj, vojaĝantaj kune pro sendanĝereco aŭ oportuneco. ~EB 337/1

kaŭci/o Monsumo, kiun oni deponas, aŭ kiun oni promesas pagi, por garantii la plenumon de interkonsento aŭ kontrakto farita de la kaŭciano aŭ de alia.

kofr/o Granda ŝlosebla kesto el ligno, ledo, metalo kaj aliaj, destinita enteni vestojn kaj aliajn aĵojn, kiujn oni transportas vojaĝe. ☞ kesto, valizo. ~EB 200/6

kokard/o Insigno en formo de disketo aŭ banteto, kiun oni portas ĉe la ĉapelo. ~BeE 68/8; ~EB 274/4

kompendi/o Mallongigo de la tutaĵo de scienco aŭ doktrino.

kontrici/o † Pento pri kulpita peko, pro sincera amo al Dio. ☞ atricio.

krest/o Karneca, ĝenerale ruĝa, elkreskaĵo sur la kapo de kelkaj birdoj, ekz. koko, meleagro. ~EB 74/22

krizantem/o Unujara herbo, precipe ĝia floro. ~BeE 214/7, ~EB 63/7

ksanti/o Unujara herbo, kies duopaj fruktoj portas apeksajn pintojn po du kaj kroĉdornojn po multaj.

kupres/o Daŭrafoliaj, monoikaj arboj kun malhele aŭ blue verdaj, skvamformaj folioj k kun globformaj konusoj. Sinonimo = cipreso. ~EB 356/58

kvast/o Kunaĵo el mallongaj fadenoj lanaj aŭ silkaj, en formo de tufo aŭ peniko, kiu servas kiel ornamo por vestoj aŭ meblaro. ~EB 36/3

kvintesenc/o Tio, kio estas plej esenca, plej perfekta en io.

laik/o Homo religia sed kiu ne apartenas al pastraro aŭ monaĥaro.

lake/o **1** Servisto ĉe riĉuloj, ordinare portanta livreon. **2** (f) Homo, kiu pro malkuraĝo aŭ profitemo obeas servutece al iu potenca instanco. ~**i** **1** Labori kiel lakeo. **2** (f) Malnoble peni iun flati k servi.

langvor/o Malvigleco, malstreĉiĝo de la korpaj aŭ animaj fortoj, sen difinita kaŭzo. ~**a** Malrapide moviĝanta, malema al ekzerciĝo, ne interesiĝanta al la ekstera mondo.

lap/o Speco de arkteo (*Arctium lappa*) el Eŭropo, plurjara, ĝis 3m alta herbo, kies karna pivotradiko kaj foliripoj estas manĝataj kuiritaj en Japanio kaj medicine uzataj en Eŭropo.

lasciv/a Avida aŭ instiga al amorĝuoj.

lavend/o Purpur-blua, bonodora floro, el kio estas farata parfumo.

limed/o Specio de citruso (*Citrus limetta*), arbo kun fruktoj similaj al citronoj, sed pli globaj, unuope havantaj grandan mametaĵon, ĉirkaŭitan de okulfrapa malaltaĵo; pulpo dolĉa aŭ acida. ☞ limeo.

loĝi/o 1 𐌆 Malgranda fako kun flankaj seĝtoj kaj kelkaj seĝoj por spektantoj. 𐌆 balkono, galerio, parteroj. 2 𐌆 Galerio, larĝe malfermita sur la ekstero kaj flanke subportata de muroj, kolonoj aŭ konzolaj subportiloj, ordinare ĉe supra etaĝo de domo aŭ palaco. 𐌆 altano, balkono, portiko, teraso. ~EB 19/18, 53/17; ~BeE 125/15

marĉand/i (ntr) Diskuti pri la prezo de io, por aĉeti ĝin pli malkare.

mason/o (tr) Fortike konstrui ion el ŝtonoj aŭ brikoj, kunigante ilin per mortero aŭ cemento. ~aĵo Io masonita.

meĉ/o Speco de ŝnuro. 1 el bruligebla kaj sorba materialo, kiun oni metas en lampon aŭ en mezon de kandelo por konduki bruligotan substancon ĝis la flamo. 2 preparita por konduki fajron ĝis substanco, kiun oni volas eksplodigi de malproksime. Sin. brulŝnuro. ~EB 47/25; ~BeE 312/13

mejlo Mezurunuo de longo por teraj vojaĝoj: iom pli ol 1,600 metroj.

morn/a Preme malĝojiga, malhela.

musked/o Malnova peza pafilo, sen turniloj en la paftubo, ŝarĝita de pulvo per verŝi en la antaŭo.

nan/o Homo kaj pli ĝenerale vivulo, kies staturado estas nenormale malgranda

od/o Lirika poemo, dividita en strofoj, ordinare similaj inter si.

okr/o ⊕ Argila tero, kutime pulvorea, de flaveta ĝis ruĝeta pro enhavo de ferikaj oksidoj (hematito, goetito k limonito), uzata kiel pigmento por farboj.

opal/o Juvelŝtono. Mineralo, var. de silico sub formo de ŝajne nekristalaj amasetoj aŭ konkretioj.

paŭt/i (ntr) Montri malbonhumoron, malkontentiĝon kaj simile, antaŭenigante la lipojn en grimaceto.

pavilon/o Izola konstruaĵo sur tereno, ĝardeno aŭ korto, dependanta de pli granda kaj ĉefa. ~BeE 154/43, 204/15; ~EB 54/2, 55/14

perpleks/a Ŝanceliĝa pro senkonsileco; hezitantanta inter pluraj kontraŭaj decidoj. ~igi Fari perpleksa. → dubi, embarasi, konfuzi, konsterni.

pélgrejn/o Granda, altfluganta, homvora bestulo kun blankaj dentegoj, ungaj manoj kaj kapo el nigra ĥitino. Gargojle aspekta kies flugiloj sonas tiel kiel rustaj haspoj, kun korpo kia malmola ledo kaj birda beko hakilforma. Ĝiaj okuloj konstante serĉas ĉiuflanken el sulke maljunaspekta vizaĝo.

plekt/i (tr) Kunigi plurajn fadenformajn objektojn, multfoje k regule interkrucigante ilin

propriet/i Profitado el objektoj, laboriloj k homa laborkapablo, efektiviganta per laboro propra aŭ aliula. ~ulo Tiu, kiu havas proprion pri io.

ragu/o Vianda, legoma aŭ fiŝa manĝaĵo, longe kuirita en spica saŭco kun faruno.

rib/o Tufarbustoj kun plejofte mane lobaj, larĝaj folioj, kun floroj unuopaj aŭ en glomeruloj aŭ grapoloj, kaj kun manĝeblaj plursemaj beroj, ~EB 60/12

romb/o Kvarlatero, kies ĉiuj lateroj estas egale longaj. ~*BeE* 169/35, ~*EB* 328/35

sigel/o **1** Distinga signo, stampita sur moligita substanco, por garantii la aŭtentikecon de dokumento. **2** Distinga marko, kiu konfirmas apartenecon aŭ aŭtentikecon. **3** Distinga marko, kiu montras la finitecon, kompletecon. **4** Signo, stampita sur moligita substanco, k almetita al koverto, skatolo, pordo ks, por certigi la sekreton, malhelpi la malfermon sen la scio de la posedanto ktp. **5** Tio, kio kvazaŭ garantias la sekretecon.

skadr/o Parto de kavaleria regimento, komandata de majoro.

skarlat/o Brilega sangoruĝa koloro.

sombr/a Donanta la impreson de profunda melankolio

sordid/a Naŭze malpura.

spekulativ/i Bazita sur pure teoria rezonado, celante nur scion, sen ia ajn praktika utilo.

subvenci/o Monhelpo, donita de ŝtato, urbo, societo aŭ mecenato al persono, movado, lernejo kaj simile.

ŝakt/o **1** Vertikala truo, ĝenerale profunda, kiun oni boras en tero por ekspluati minaĵon, karbon, nafton, salon kaj simile. ~*EB* 137/14; ~*BeE* 297/25 &32 **2** Spaco, en formo de vertikala truo, aranĝita en konstruaĵo por ricevi ŝtuparon aŭ lifton.

Ŝpruclumo Aferl el pli frua rakonto, ankoraŭ atendanta tradukon. Pli precize nomata la *Brusta Ĉielrompa Ŝpruclumilo*, tiu ĉi estas la skvamo de supermonda estulo nomata Sadlark, jam delonge mortinta, sed kies restantaj skvamoj ankraŭ entenas magian potencon. Eĉ la plej malgrandaj, preskaŭ nesignifaj skvamoj estas danĝeraj al tuŝo. Tiu ĉi centra, ĉefa skvamo entenas grandan potencon kaj ege danĝeras. Kugel ĝin timas, sed foje tamen uzis ĝin kiel armilo.

ŝutr/o Kunaĵo el tabuloj aŭ platoj, adaptita al fenestro k povanta ĝin kovri, ekstere aŭ interne, per alkroĉigo, malfaldiĝo aŭ turniĝo sur ĉarniroj, por ĝin ŝirmi kontraŭ ŝtelistoj, taglumo kaj aliaj. 🗨️ ĵaluzio.

taksus/o Daŭrafoliaj, dioikaj pingloarboj kun molaj pingloj k kun semoj unuopaj, beraspektaj, ĉar unuope ĉirkaŭitaj de karna, sukplena arilo ĝenerale intense ruĝa. ~*BeE* 190/61, ~*EB* 356/61

tavern/o Drinkejo aŭ popola restoracio. 🗨️ bierejo, gastejo, kafejo.

térs/o Monero, la baza monunuo de la Mortanta Tero.

torf/o Materialo (petro) bruligebla, malpeza, spongeca, bruna, kiu estiĝas en marĉoj per malkombiniĝo de vegetaĵoj, precipe de sfagnoj. ~*EB* 13/18

travertin/o Grize bruna ŝtono. Sedimenta, kontinenta kalkpetro, kavoriĉa, ofte malpeza, estiĝanta ĉe fontoj aŭ en malprofundaj riveroj kontakte de vegetaĵoj (biokemia deveno), uzata por konstruaĵoj.

tribun/o Elstara podio, plejofte kun seĝo k pupitro, de kie parolas oratoro, precipe politika.

trituro/o ♂ Genro (Triturus) de amfibioj el la ordo de urodeloj, fam. de salamandroj, kun 5 fingroj

sur ĉiu piedo k kun flanke plata vosto, ofte vivantaj en akvo. ~EB 350/20; ~BeE 182/20

ubliet/o En mezepokaj kasteloj, subtera karceroj, en kiu oni ofte lasis morti la malliberulon.

ulcer/o Lezo de haŭto aŭ mukozo kun substancoperdo k malforta tendenco cikatriĝi

velur/o Silka, kotona aŭ lana ŝtofo, prezentanta unuflanke densan teksaĵon, k aliflanke molan supraĵon konsistantan el multaj mallongaj, rekte starantaj brilaj haroj.

vélfken/o Fea estulo loĝanta en sovaĝa loko.

vimen/o **1** Speco de saliko. **2** La flekseblaj vergoj de vimeno.

vor/i Krude manĝi, ŝirante per la dentoj (speciale pri bestoj).

Atribuoj

Jen tiuj, kiuj kontribuis al tiu ĉi eldono.

Verkis:

Jack Vance (1916-2013)

Originala Titolo: *'Cugel the Clever'*

Alinome: *'Eyes of the Overworld'*

Permesis:

Jack & Norma Vance (*inter 1997 & 2013*)

John Vance & [Spatterlight Press](#) (*post 2013*)

[Pelgrane Press](#) — Britio, la kovrila bildo

Tradukis:

Ĝan Ŭesli Starling — Usono

Orlando Hernández — Hispanio

Ilustris:

Paul Rhoads — Francio, la internajn bildojn.

Jerome Huguenin — Francio, la kovrilon

Kontrolis:

Pluaj kontrolistoj invitiĝas — Ĉu eble vi?

Se vi volas kontribui per ilustraj aŭ per plue kontroli, kontaktu epoŝte: gan@starling.us

Helpis ankaŭ la sube listitaj referenciloj. Se vi ne povas kontribui al nia projekto per kontroli aŭ ilustraj, bonvolu pripensi monan donacon al unu el ili.

 **Vortaro** — reta vesio de PIV

 **Lingvohelpilo** — projekto de E@I kaj ESF

Senpage Haveblaj

<http://esperanto.us>



Fantasto — *La Mortanta Tero*

Mazirien la Magiisto

Ses interligitaj noveloj pri la fintempo de la Tero, kiam magio superas ol scienco post ol la luno delonge malaperis kaj eĉ la suno mem ŝvelas ruĝe montante makulajn signojn de baldaŭa mallumiĝo.

Kugel La Ruza

Sep sin-sekvaj noveloj formantaj la duan volumon el la serio 'La Mortanta Tero'. Rakontaro en kiu humore krulea magiisto devigas friponan anti-heroon al grandega aventuro ĉe la fora flanko de l' mondo por plenumi nefareblan mision La aventuroj de Kugel la Ruza iom ŝokas kaj tre amuzas, ambaŭ samtempe.

Kugel: la Ĉielorompa Ŝpruclumo

Plua aventuro de Kugel la Ruza. Refoje li devas transpaŝi la mondon devigita de magiisto al ankoraŭ plua nefarebla misio.

Scienca Fikcio — *Diversaj*

Trigamba Joĉjo

Sur planedeto senaera du junuloj alfrontas beston nevenkeblan.

La Luna Sfingo

En kulturo kie ĉiuj portas maskojn, ĵus alveninta diplomato ĉasas murdiston.

Domo de l' Se

Post respondi al reklmao pri aventuro, viro ekfrontas multon pli ol atendite.

Retretejo Ulvarda

Kiam surtere estas 50 miliardoj da homoj, ĉu izoleco dezirindas pli ol ĉio?



Tiuj ĉi Esperantaj tradukoj pri *Kugel la Ruza* verkitaj de Jack Vance estas disponebla laŭ la permesilo
Krea Komunaĵo Atribuite-Nekomerce-Nemodifite 4.0 Tutmonda

La permesilo temas sole pri tiu ĉi Esperanta traduko. La permesilo temas neniel kaj neniom pri la
originalo kies ĉiuj rajtoj daŭre apartenas al John Vance kaj Spatterlight Press.

